



Szanownemu Panu prof. A. A. Kryńskiemu  
w dowód przyjaźnej pamięci  
ofiaruje Tumas.

Warszawa, d. 3. Maja 1918.

SINJORO TADEO

SINJORO TABBO

# SINJORO TADEO

AŬ

LASTA ARMITA POSEDOPRENO EN LITVO

(POLA EPOPEO «PAN TADEUSZ»)

DE

ADAM MICKIEWICZ.

ESPERANTA TRADUKO

DE

ANTONI GRABOWSKI.

WARSZAWA

ELDONO KUN HELPO DE ESPERANTISTA RONDETO

1918

PHILIPPO JABBO

LIBRERIA FORTINATO DI LINO

ROMA - VIA CONDOTTI 10

ADAM MICHEWICZ



II. 71.614

WARSAWA

---

Presejo L. Bogustawski, Warszawa (Varsovio).



## ANTAŬPAROLO.

Adam Mickiewicz, la plej granda poeto de Polujo, naskiĝis, la 24-an de Decembro 1798, en Litvo, en urbo Nowogródek (Mińska gubernio), kie lia patro, posedanto de ĉirkaŭaĵa bieneto Zaosie, estis juĝeja advokato.

La poeto pasigis sian infanecon inter la natur-belecoj de sia patro-urbo kaj kreskis sub la influo de sia amata religia patrino. En j. 1807 la okjara knabo estis donita en la urban klasikan lernejon, administritan de pastroj Dominikanoj, kie oni uzis multe da libera tempo por ludoj, fizikaj amuzoj, eĉ por soldataj ekzercoj.

En la j. 1812-a du okazajoj el hejma kaj nacia vivo potence skuus la animon de l' junulo: en monato Majo mortis lia patro kaj en Julio tramarŝis Napoleonaj kaj polaj armeoj tra Nowogródek, irante kontraŭ Moskvo. Pri la impreso de ĉi-tiu militiro, kiun esperplene benis la tuta Polujo, la poeto en posteaj jaroj skribis al sia amiko Januszkiewicz: „Mi memoras bone la j. 1812... Mi estis tiam en funebra vesto post la morto de mia patro. Mi staris sur la strato kaj rigardis la enirantan polan armeon kaj pro ĝojo mi ploris...“ Nome tiun „printempon de l' espero“ koncernas la grandioza komenco de l' XI-a Libro de „Sinjoro Tadeo“ finiĝanta per la vortoj:

Mi vin ankoraŭ vidas, song-vidajo bela!  
Mi, naskita sub jugo, vindita en fero,  
Havis nur unu tian printempon sur tero.

Post tiu ĝoja printempo venis longa, terura vintro, kun sangaj fantomoj de pereuloj el la granda armeo, treniĝantaj tra malvivaj, neĝekovritaj kampoj.

Fininte la gimnazon en j. 1815, M. iris por pluaj studoj en la ĉefurbon Wilno, kies pola universitato estis tiam flo-

ranta kaj posedis tutan serion da eminentaj fortoj sciencaj kaj pedagogiaj, kiuj donis al M. firmajn fundamentojn pri natursciencoj, lingvoj, literaturo, kaj vigligis lin al memstara laboro.

Inter la studentaro regis tiam plej noblaj tendencoj de virta vivo, diligenta laboro, amo al patrujo, kiuj koncentriĝis en la sekretaj unuiĝoj de t. n. Filomatoj kaj Filaretoj, en kies organizoj vive partoprenis la poeto. La idealaj amikaj interrilatoj estis tiel fortaj, ke ilian fadenon eĉ la posteaj registaraj persekutoj neniam kapablis disŝiri.

Post fino de la studoj en j. 1819 la juna M. fariĝis gimnazia instruisto en Kowno kaj tie li komencis verki siajn poeziaĵojn, kiuj, eldonite en du volumoj en Wilno (1822), enhavis „Balladojn kaj Romancojn“, belegan poezian rakonton „Grażyna“ pri litva dukedzino, kiu, defendante la patrujon, heroe pereis, kaj krom tio ili enhavis du partojn de dramaj bildoj s. t. „Dziady“ (Avoj), en kiuj la poeto pentris la antikvan litvan moron de festo de mortintoj kaj la historion de sia malfeliĉa amo al Maryla Wereszczaka. Ĝi estas prezentita tra ĉiuj plej subtilaj stadioj de melankolia medito, tra eksplodoj de korszento, maldolĉo, malbena, minaco kaj indiferenteco ĝis perdo de konscio kaj frenezo. Tiuj du volumoj estis akceptitaj kun admiro de tuta Polujo kaj ili estis la anoncantoj de la nova granda romantika epoko en la pola literaturo, brilanta per la nomoj de Mickiewicz, Slowacki kaj Krasiński.

En la j. 1823 la poeto, liberiginte de sia instruista okupo, reaperis en Wilno inter siaj amikoj kaj kolegoj. Sed la feliĉo ne daŭris longe. La rusa kuratoro de l' universitato, Novosilcov, malkovris la sekretajn unuiĝojn de l' junularo. Sekvis amasaj revizioj kaj arestoj. Ankaŭ M. estis arestita kaj komenciĝis lia sesmonata mallibereco, dum kiu okazis lia nova spirita aliformiĝo: mortis en li la malfeliĉa amanto Gustav kaj naskiĝis Konrad, spirita ĉefo de l' nacio, heroo de la postea III-a parto de „Avoj“. En Aprilo de l' j. 1824 M. estis liberigita, sed li restis ankoraŭ duonjaron en Wilno, atendante pluajn disponojn de l' registaro, kiu fine transloĝigis la liberigitajn en malproksimajn lokojn de Rusujo. Ankaŭ M. devis forlasi sian amatan hejman Litvon, por ĝin neniam plu revidi. Por la poeto komenciĝis longaj jaroj de devigita migrado, dum kiu fortiĝis lia spirito kaj leviĝis al ĉiam pli altaj flugoj.

Lia unua vojaĝa etapo estis Petersburgo, kie la poeto konatiĝis kun la pola pentristo kaj religia mistikulo Oleszkiewicz, kiu ne restis sen influo sur lian postean animan staton. En Januaro de l' jaro 1825 M. forlasis Petersburgon, vojaĝante en Odesson, kie li estis ricevonta okupon ĉe l' liceo Richelieu; sed la loka registaro tion ne permesis. Do la poeto partoprenis en la Odessa societa vivo, studis lingvon italan kaj verkis siajn erotikajn „Sonetojn“, kies arta valoro estas tre granda, dank' al la koncizeco de l' lingvo, delikate pentritaj anim-agordiĝoj kaj la majstreco de l' formo. — Frukt

de lia marvojaĝo al la Krimeo estis la „Krimeaj sonetoj“, en kiuj potence regas la grandioza, minaca kaj sovaĝa naturo. La bildoj estas penetritaj de admiro kaj de seriozaj, profundaj pensoj.

Baldaŭ post la Krimea ekskurso la poeto vojaĝis Moskvon, por alpreni malagrablan por si devon de oficisto. Tie li eniras en rilatojn kun rondo da poetoj kaj scienculoj, interkonigiĝas kun la granda rusa poeto Puŝkin, vizitas salonojn, ĉie agrable vidate kaj adorate pro sia simpla konduto, profunda menso kaj brila talento improviza.

En Moskvo (1827) la poeto finis kiel produkton de siaj zorgoj pri la nacia ekzisto, de personaj travivaĵoj, koraj doloroj, maltrankviloj kaj meditoj, la grandiozan poemon „Konrad Wallenrod“, pri la bataloj de la antikvaj litvanoj kun la ordeno de Kruckavaliroj. Duafoje la poeto, ne povanta paroli tute malkaŝe, reniris al la historio de Litvolando, por prezenti sur ĝia fono la potencon de l' amo al patrujo, koncentrifan en la animo de l' heroo, konanta neniajn leĝojn, krom sia volo de potenco kaj savo de l' patrujo. La poemo vekis grandan entuziasmon, ne sole pro la politika tendenco patriota, sed ankaŭ pro eminentaj artaj belecoj: riĉa fantazio, potenco de l' sento, plastikeco de ĉefaj figuroj kaj majstra formo de l' lingvo.

„Konrad Wallenrod“ ricevis la permeson de la iom pli liberala cenzuro en Petersburgo, kie la poemo aperis en j. 1828, sed baldaŭ turnis sur ĝin sian atenton la konulo de simboloj, persekutanto de la junularo en Wilno, Novosilcov. Li rimarkis la danĝerajn tendencojn kaj al la poeto minacis almenaŭ deviga ekzilo en pli malproksimajn guberniojn de Rusujo.—Dank' al helpo de influaj amikoj M. ricevis la permeson, forvojaĝi en eksterlandon aŭ pli ĝuste vagi for de la patrujo ĝis fino de l' vivo.

Forlasinte en Majo de l' j. 1829 Rusujon el Kronstadt, la poeto vojaĝas Berlinon kaj aŭskultas prelegojn de l' filozofa Hegel, ne alprenante tamen liajn abstraktajn. Poste M. vizitas Drezdenon; en Praha li konatiĝas kun la bohema poeto Hanka, kaj en akompano de sia amiko Odyniec li rapidas al Wejmar, por saluti respektplene la maljunan grandan kreinton de „Faust“. Poste M. veturas tra Svisujo kaj la ĉefurboj de Italujo en Romon, kies potenca impresado superis ĉiujn ĝisnunajn impresojn de vojaĝo.

La j. 1830 la poeto pasigas en Svisujo, revenas en Romon, kie lin atingas la sciigo pri la revolucio en Polujo. En j. 1831 li serĉas en Parizo vane la eblecon por veturi Varsovion, do li vojaĝas almenaŭ en la prusan Polujon, kaj ne povante transiri la limon, gastas tie kelkajn monatojn kaj vidas arojn da polaj elmigrantoj, kiuj post la malfeliĉa fino de l' pola milito, iris en Francujon.

En j. 1832 M. vojaĝas Drezdenon, kie li komponas sian plej alteflugan ĉefverkon, la III-an parton de „Dziady“,

estantan eksplodo de elementa inspiro, kiu atingas Prome-tean altecon en la ribelo kontraŭ Dio, kiu rigardas indife-rente la turmentojn de milionoj. La poeto Konrad sentas sian potencon super la naturo, koncentrigas en sia koro ĉiujn suferojn de l' nacio kaj fiere postulas la regadon de animoj, por savi sian popolon. Dio anoncas sub mistera signo al Polujo la savonton, sed ne al li, nur al sia humila servisto, la pastro Petro, kiu havas vizion de l' estonteco. — Baldaŭ poste sekvas „Libroj de l' nacio“ kaj „Libroj de pola pil-grimeco“, kiuj montras al la popolo la vojon de interna re-naskiĝo, kaj apogas sin sur la kredo pri reviviĝo de Polujo, post ĝia martireco, en la estonta homaro renaskita, fratigita kaj repacigita kun Dio.

En la sama j. 1832 la poeto loksidiĝas en Parizo. Post la travivitaj anim-skuoj, evitante la bruegon de l' urbo kaj la disputojn de emigraciaj partioj, M. serĉas trankvilon en la rememoroj de l' infaneco, tiu lando „sankta kaj pura, kiel unua ekamo“. Li turnas sin al ĝi per ama rigardo, por ĉerpi el tie balzamon por propraj kaj samlandanaj suferoj. Tia estas la psikologia genezo de lia eposo „Sinjoro Tadeo“, kiun li komencis verki en Decembro de l' j. 1832 kaj finis en Februaro 1834, kaj al kiu ni ankoraŭ revenos, por preparoli la ĉefverkon iom pli vaste.

Oni povas diri, ke kun „Sinjoro Tadeo“ finiĝas la poezia agado de M. La fundon de lia animo okupas nun la nesolvi-taj taskoj kaj demandoj naciaj kaj individuaj kaj la studado de mistikaj verkistoj. — En Julio 1834 la poeto edziĝas kun fraŭlino Celina Szymanowska. Kiam lia familio komencis pligrandiĝi sekvis materialaj zorgoj pri vivtenado. La poeto verkas do en lingvo franca du dramojn „Jakób Jasiński“ kaj „Baraj Konfederatoj“, kiuj tamen ne estis prezentitaj sur la pariza scenejo kaj fine preskaŭ tute perdiĝis ĉe la teatro-direktoroj, tiel ke restis nur kelkaj fragmentoj. — Ricevinte la katedron de latina literaturo en Lozano (Svisujo), M. prelegas tie dum la akademia j. 1839—40, kaj li estas alvokita tuj poste en Parizon kiel profesoro de slavaj literaturoj ĉe „Collège de France“, kie li ravas sian vastan aŭdantaron per sincera inspiro, kiu lin eĉ por momento ne forlasas.

En j. 1841 aperas en Parizo la mistikulo Towiański, kiu tute gajnas la poeton por siaj ideoj. La lecionoj de l' poeto fariĝas prelegoj pri mesianismo, pri nova historiozofio, nova filozofio, nova historio kaj antaŭ ĉio pri idealo de nova homo. Per titanaj anim-streĉoj M. formas sintezojn de l' pasinteco, nuneco kaj estonteco kaj starigas ilin antaŭ la popolo kaj homaro kiel voj-montrilon. En j. 1844 la franca registaro donas al li devigan forpermeson kaj por la granda homo komenciĝas malĝojaj tagoj; li batalas kun mizero, sed li restas fidela al sia misio.

Kiam en j. 1848 venis la falsa printempo de popoloj, M. rapidas Romon, por emigi la novan papon Pion IX, ke li

malkaŝe elpaŝu kiel defendanto de premataj popoloj. Ne trovinte aŭskulton li formas polan legionon, batalanton por libereco de Italujo kaj tramarŝas triumfe la tutan landon de Romo ĝis Mediolano. Reveninte Parizon li fondas la gazeton „La tribune de peuples“ kun tendenco demokrata.

En j. 1852 M. ricevas formalan eksigon kiel profesoro de Collège de France, por kio oni al li donas oficon de bibliotekisto en la Arsénale. La poeto tamen ne ĝisvivis trankvilan maljunecon. En j. 1855, post eksplodo de l' orienta milito, li aperas en Konstantinoplo, por formi legionon, kaj fariĝas viktimo de la reganta ĥolero. Li mortis la 26-an de Novembro 1855, kiel soldato sur posteno, restinte ĝis la lasta momento en servo de l' patrujo kaj de l' homaro. Lian korpon oni transveturigis en Parizon kaj enterigis sur tombejo Monmorency. En Julio 1890 li ekripozis en la reĝaj katakomboj sur Wawel en Kraków.

„Sinjoro Tadeo aŭ lasta „zajazd“<sup>1)</sup> en Litvo, nobela historio el j. 1811 k. 1812, en dekdu libroj verse de Adam Mickiewicz“, estas la modesta titolo, kiun la poeto donis al sia eposa ĉefverko. Li intencis komence komponi „idilian poemon en speco de Hermano kaj Doroteo“, sed dum la verkado la kadroj disvastiĝadis ĉiam pli, ĝis fine M. donis tutsolan en la moderna literaturo grandan poemon,<sup>2)</sup> kies temo, historia momento kaj vivoplenaj figuroj de tuta malaperinta socio — kunmetis tutajn, pentritan kun Homera plastikeco kaj kun Olimpa trankvilo kaj sereno. La poeto prezentas la pasintecon, en kiu al li ĉio estas konata kaj kara, mondon kiu enhavis ĉiujn kondiĉojn de poezieco kaj kiu, vidate tra l' prismo de hejmsopiro, vestiĝis per ĉarmo; tial ĉio estas en ĝi viva, klara kaj perfekta. Ĉar la poeto enfermis la tutajn sur malgranda spaco kaj en tre mallonga tempo (la tuta simpla agado de la unuaj dek libroj okazas en 5 tagoj, de vendredo ĝis mardo, kaj la du lastaj libroj okupas ne plenajn 24 horojn), do la poeto povis per siaj preskaŭ dekmil versoj priskribi ĉion tiel vaste, neniun kaj

<sup>1)</sup> En la esperanta titolo mi tradukis la vorton „zajazd“ per „armita posedopreno“, ĉar ĝi ne signifas simplan invadon (najazd), sed rajtigitan plenumon de juĝa verdikto per kolektivaj privataj fortoj armitaj.

<sup>2)</sup> La germana filozofo Nietzsche, kreinto de Zarathustra, skribas en sia antaŭnelonge eldonita korespondado al sia amiko Overbeck: „Ĉu vi konas Sinjoron Tadeon de Mickiewicz, en traduko de Lipiner? Mi konfesas, ke mi estas plena de miro, ke en niaj tempoj povis aperi tia poemo. Mi ne scipovus en la literaturo de nia centjaro trovi ion egalan al Sinjoro Tadeo, laŭ riĉeco, enhavopleno kaj simpleco de anim-agordiĝoj, ankaŭ rilate al stranga ĉarmo poezia“.

nenion preterlasante. Per belegaj koloroj kaj kun granda vereco estas pentritaj magnatoj kaj nobeloj, kampuloj kaj, judoj, ilia vivo en palacoj, biendomoj kaj kabanoj, ĉe laborodistriĝo kaj preĝo. La granda poeto prezentas la tutan kulturon, kutimojn, dezirojn kaj aspirojn de sia litvopola hejmlando. Same precize kaj belege li pentras la tutan naturon: la ĉielon kun astroj kaj nuboj, kaj la teron kun torentoj kaj lagetoj, kun bestoj sovaĝaj kaj hejmaj, kun arbaroj, grenkampoj kaj herbejoj, kun ĝardenoj, fruktarboj, legom-bedoj kaj floroj. Ĉio estas en la verko mirinde bele interligita kaj nenio estas en ĝi malnecesa.

La poemo ne estas heroo en la kutima senco de l' vorto. Sinjoro Tadeo, doninta kiel ĉefa amanto la nomon al la komence intencita idilia poemo, ne estas heroo, sed kiel la Goethea Hermano nur brava, bona junulo; ĉefa persono de la tuta agado estas la tragedia figuro de Jacek Soplica, kaŭzinto de l' konflikto inter du familioj kaj ĝia viktimo; efektiva ĉefa objekto kaj kune heroo de l' eposo estas la tuta popolo en sia propra, originala vivo, en sia honesta, bona naturo, en sia serena, bela karaktero, en sia tuta amo al patrujo kaj en la preteco de oferiĝo por ĝi. Alte super la sfero de idilia amo, kiu ligas kaj interesas precipe la geamantojn kaj iliajn zorgantojn, super la sfero de grava konflikto inter du familioj, kiu interesas la ĉirkaŭaĵon, la tutan distrikton, alte super tiuj hejmaj kaj interfamiliaj rilatoj, staras en „Sinjoro Tadeo“ sfero tria, plej alta kaj plej larĝa, kiu ligas la rakonton kun la intereso de l' tuta nacio: dum la tuta rakonto ĉiuj okuloj turniĝas esperplene trans la riveron Njemen, kie staras, apud limo de Litvujo, la armeo de Napoléon, la longe atendita liberigonto de tuta Polujo. La popolo prepariĝas por lia akcepto kaj la junuloj rapidas en liajn vicojn. Ĉe l' fino de la poemo la oraj kaj arĝentaj agloj aperas efektive en Soplucowo kaj la idilia rakonto alprenas karakteron, indecon kaj grandecon de nacia eposo.

La politika situacio de Polujo, kiun ni donas por pli bona antaŭorientigo de legantoj, estis la sekvanta: En j. 1795, post la lasta dispartigo de Polujo inter la tri najbarajn regnojn, multaj polaj patriotoj forlasis la patrujon, por agi eksterlande por la restarigo de la perdita libereco. La generalo Henryk Dąbrowski iris en Italujon, kie militis Francujo, kaj li intertraktis (1797) kun Napoléon Bonaparte pri formado de pola armeo, kiu estis helponta al Francujo kaj poste penetronta en Polujon, por restarigi ĝian sendependecon. Multaj polaj milituloj sekvis la flaman alvokon de Dąbrowski kaj tiel estis formitaj la famaj polaj legioj, kiuj sub komando de Dąbrowski kaj Kniaziewicz venis la sangon por Francujo en Italujo, Germanujo, Hispanujo, atendente la momenton, kiam Napoléon helpos al ili en la batalo pri sendependeco. En la paco de Luneville (1801) Napoléon ne

memoris pri Polujo, kaj li sendis baldaŭ grandan parton de la legioj sub komando de princo Jablonowski kontraŭ la ribelantaj negroj en San Domingo. Nur post la eksplodo de franc-rusa milito en j. 1806 Napoléon rememoris siajn polajn aliancantojn. Dąbrowski ree milithelpis al N. kaj post la batalo ĉe Jena li enmarŝis en Poznanion. Dum la paco de Tilzit (1807), Napoléon, indulgante Rusujon, faris nur el parto de prusa Polujo la sendependan Varsovian Grand-duklandon. La poloj esperis, ke post milito kun Rusujo Napoléon tute reunuigos la dismembrigitan patrujon; kaj efektive en j. 1812 li elmarŝis kun siaj armeoj kontraŭ Moskvo, sekvate de polaj soldataroj sub komando de marŝalo Józef Poniatowski kaj generalo Dąbrowski. Enpaŝinte en Litvon, Napoléon anoncis, ke li faras sian duan polan militon. La lastaj du libroj de „Sinjoro Tadeo“ prikantas la ĝojan tempon, kiam la polaj generaloj aperas kun siaj armeoj en Litvo.

La traduko de la tuta epopeo en lingvon Esperanto ŝajnis al mi, pro la grandegaj malfacilecoj, afero preskaŭ ne ebla; almenaŭ mi neniam kuraĝis pensi, ke miaj fortoj por tia tasko povus sufiĉi. Sed en j. 1916 kiam mi kolektis malgrandan aldonon por mia „El Parnaso de popoloj“, tiam tentite de samideano S. K., post longa ŝanceliĝado mi decidiĝis aldoni kelkajn belegajn fragmentojn el ĉi-tiu verko. Vizitante la malsanan, neforgeseblan karan Majstron, mi rakontis al li ĉi-tion kaj mi montris la tradukitajn fragmentojn, solajn kaj lastajn laŭ mia opinio. Tiam mi ricevis la respondon: „Traduku la tutajon“. Mi ekridis, ĉar al mi ŝajnis, ke la Majstro naive postulas neblajon. Sed doktoro Zamenhof ne ĉesis min emigi ĉe ĉiu mia nova vizito, ĝis mi fine subiĝis kaj komencis en Decembro de l' j. 1916 la tradukadon, kun malfido ke mi iam ĝin finos. Tamen komencinte, mi jam ne ĉesis. La Majstro, kiun mi konsultadis pri kelkaj novaj vortoj, formoj kaj esprim-manieroj, legis antaŭ sia morto preskaŭ la unuajn kvar librojn. Poste, malgraŭ mia malbona sanostato, mi daŭrigis la laboron, kiu postulis streĉon de ĉiuj miaj anim-fortoj, por plenumi la lastan deziron de mia kara amiko, la granda kreinto de nia lingvo. Nun mi prezentas la verkon al la Esperantistaro en la konvinko, ke mi faris bonan servon al la patrujo kaj al nia tutmonda afero.

La tradukon mi faris kun granda pietismo por la pola originalo kaj la lingvo Esperanto, penante eble plej fidele transdoni la enhavon kaj ĝian formon. Kvankam la esperantaj vortoj estas ĝenerale pli longaj ol la polaj, la fleksebleco kaj elasteco de Esperanto permesis al mi koncizigi la lingvon kaj konservi la formon de l' originalo preskaŭ sen pligo de versoj; nur en kelkaj lokoj oni trovas version aldonitan, kiu tiakaŭze ne estas nombrita en la dekversa kalkulado.

En lingvo E., kiu havas konstantan akcenton, verso ĉiam egalritma, en granda eposa verko kiel „Sinjoro Tadeo“

estus unutona kaj ĝi ne transdonus la muzikon de l' originalo. La skemon de la uzata verso 13-silaba, kun konstanta akcento nur sur la 6-a kaj 12-a silabo, mi donis jam en „El Parnaso“. La leganto baldaŭ alkitimiĝos kaj sentos kiel moviĝeme la ritmo sekvas la penson kaj kiel bele ĝi ilustras la enhavon: Ekzemple kiam en L. XII v. 855 la suno, kun osceda hiatuso

„Ekdormante, per varma aero ekspiras“,

la ritmo kvazaŭ „balancante, kantante ĝin lulas al dormo“; sed jen formiĝis legioj (L. XII v. 720)

„Kaj jam laŭtakte marŝas harmoniaj sonoj“.

Ĉe la tradukado mi ofte devis admiri, kiel sonopentraĵas estas la vortoj de Esperanto. Tute fidela, preskaŭ laŭvorta traduko permesis konservi ankaŭ la poezian onomatopeon de l' originalo, kiel la atenta leganto rimarkos tion en la Koncerto de Jankjel, en la Tempesto, en la Ĉaso k. t. p.

Mi intencis doni la verkon kun portreto de l' poeto kaj kun 24 ilustraĵoj de Andriolli. La nuna tempo, kiu multoble pligrandigis ĉe ni la eldonokostojn, tion jam ne permesis. Eble iam mi prosperos aperigi apartan albumon.

Al la Esperantista Rondeto, kiu dum la malfacila milita tempo per sia helpo ebligis la eldonon de l' verko, mi esprimas mian plej koran dankon.

*La tradukinto.*

Varsovio, en Februaro 1918.



## LIBRO I.

### MASTRUMADO.

Reveno de l' sinjorido. — Unua renkonto en ĉambreto, aua ĉe la tablo. — De l' Juĝisto grava instruo pri ĝentileco. — De l' Ĉambelano politikaj rimarkoj pri modoj.—Komenco de disputo pri Stumpulo kaj Falko.—Plendoj de Vojski.—La lasta Vokisto de l' tribunalo.—Ekrigardo je la tiamaj politika stato en Litvo kaj Eŭropo.

**L**ITVO! Patrujo mia! simila al sano;  
Vian grandan valoron ekkonas litvano<sup>1)</sup>,  
Vin perdinte. Belecon vian mi admiras,  
Vidas ĝin kaj priskribas, ĉar mi hejmsopiras.

Sankta Virgin'! Vi gardas Ĉenstoŝovon helan,  
En Ostra-Brama lumas! Vi, kiu kastelan  
Novogrodek defendas kaj pian urbanon!<sup>2)</sup>  
Kiel Vi al infano redonis la sanon —  
(Kiam mi, de l' patrino al Vi oferite,  
La malvivan palpebron eklevis subite

10

<sup>1)</sup> La sendependa Polujo konsistis el du ĉefaj partoj: Pola Krono kaj Litvo. La pola poeto estis naskita „litvano“, kion oni ne konfuzu kun „litovo“, ano de la litova gento en parto de Litvo.

<sup>2)</sup> En tuta Polujo estas konata la mirakla bildo de la Sankta Virgulino, troviĝanta en la monaĥejo sur la Hela Monto (Jasna Góra) en Ĉenstoŝova (Częstochowa). En Litvo troviĝas la famaj miraklobildoj de la Diopatrino en la preĝejo super la „Ostra-Brama“ (Pinta Pordego) en la ĉefurbo Vilno, kaj en la antikva kastelo de Novogrodek.

Kaj povis tuj al Via sanktejo ekiri,  
Por redonita vivo Dion dankodiri),  
Tiel Vi nin mirakle portos hejman limon!... <sup>1)</sup>  
Dume transportu mian sopiran animon  
Al montetoj arbaraj, herbejoj verdantaj,  
Larĝe apud lazura Njemen tiriĝantaj,  
Al la kampoj, per greno diversa pentritaj,  
De sekalo arĝentaj, de tritik' oritaj,  
Kiujn la neĝe-blanka poligon' ornamas,  
Kie per virga ruĝo trifolio flamas, 20  
Kaj ĉion zonas, kvazaŭ per verda rubando,  
Kun maldensaj pirarboj la kampa limrando.

Inter ĉi kampoj, antaŭ jaroj, sur monteto,  
Staris apud rivero, en betulareto,  
Nobela domo ligna, sube masonita;  
De malproksime brilis murar' blankigita,  
Pli blanka eĉ, kontraste al verdo maljuna  
De poploj, ĝin ŝirmantaj kontraŭ vent' aŭtuna.  
La ĉiuflanke pura, negranda loĝejo 30  
Havis tri garbaregojn ĉe granda garbejo,  
Kiu ne povis ilin ampleksi tegmente.  
Ĉirkaŭaĵo abundas per gren' evidente;  
Kaj montras fojnaretoj densaj sur herbaro,  
Brilantaj kiel steloj, — montras plugilaro,  
Tranĉanta nigroterajn kampojn, kiuj trenas  
Sin vastege kaj certe al dom' apartenas,  
Bonkulture, kiel bedaro ĝardena,  
Ke en domo bonhavo loĝas ordoplena.  
Malfermita pordego anoncas ĉiame,  
Ke ĝi invitas ĉiujn pasantojn gastame. 40

Ĵus veturile tien venis juna homo,  
Ĉirkaŭveturis korton, haltis antaŭ domo  
Kaj desaltis. — Ĉevaloj, ne tenataj bride,  
Al pordeg', pinĉi herbon, iris malrapide.  
Neniu estas dome: frontpordo — fermita

---

<sup>1)</sup> Sian epopeon verkis Mickiewicz kiel politika elmigrinto en Parizo. La poeto mortis en eksterlando, neniam revidinte sian amatan hejmon.

Per paliseto, en la riglujon ŝtopita.  
 La veninto servistojn demandi ne iris,  
 Sed malfermis; li hejmon saluti deziris.  
 Li ne vidis ĝin longe, ĉar en urbo, fore,  
 Li studis, ĝis li finon atingis ĝojkore, 50  
 Enkurinte, li vidas malnovan muraron  
 Kortuŝe, kiel sian bonan konataron.  
 Samaj mebloj, drapiroj aperas renkonte,  
 Kun kiuj de naskiĝo li ludis volonte.  
 Nur pli grandaj, pli belaj ili ŝajne estis;  
 Kaj la samaj portretoj sur la muroj restis:  
 Kosciŝko<sup>1)</sup>, en laĉita vesto, krakovane,  
 Okullevante, tenas glavon ambaŭmane;  
 Per ĉi glavo li juris, sur ŝtupo altara,  
 Tri potenculojn peli el Polujo kara, 60  
 Aŭ mem sur glavon fali.—Plu, en vesto pola,  
 Post perdo de libero, Rejtan<sup>2)</sup> senkonsola,  
 Turnas al sia brusto tranĉilon por bato;  
 Apud li kuŝas Fedon<sup>3)</sup> kaj vivo de Kato<sup>4)</sup> —  
 Plu Jasiński, junulo malsemena, bela,  
 Apude Korsak, lia kunulo fidela,  
 Defendante remparojn kontraŭ la moskvuloj,  
 Sabras la malamikojn; jen Praga en bruloj!<sup>5)</sup>  
 Li rekonis eĉ lignan ŝrankon kun malnova

1) Kościuszko Tadeusz, nask. en j. 1746 en Litvo, mort. en j. 1817 en Svisujo; pola generalo kaj ĉefa armeestro dum la nacia leviĝo en j. 1794.

2) Rejtan Tadeusz, unu el plej noblaj viroj kaj patriotoj polaj. Post la unua dispartigo de Polujo (1773), li finis vivon per memmortigo en malespero kaj melankolio (1780).

3) Fedon, verko de la greka filozofo Platon pri la senmorteco de l' animo.

4) Kato el Utika, roma brava kaj virta civitano; ne volante postvivi la pereon de la roma respubliko, li memmortigis sin en Utika en j. 46 antaŭ Kristo.

5) Jasiński Jakób, ĉefo de la pola leviĝo en Vilno kaj en Litvujo, generalo en la nacia milito en j. 1794. — Korsak Tadeusz, ĉefo de la ĝenerala leviĝo de l' Vilna vojevodlando. Ambaŭ partoprenis en la nacia insurekcio de Kościuszko kaj pereis en la sanga batalo ĉe Praga (antaŭurbo de Varsovio) en j. 1794, defendante ĝin kontraŭ la rusoj sub komando de Suvorov.

Ludhorloĝo, staranta ĉe l' enir' alkova, 70  
Kaj, kun infana ĝojo, li ektiris ŝnuron  
Por aŭdi la malnovan Dombrovskl-mazuron.<sup>1)</sup>

Li, trakurante domon, ĉambron serĉis vane,  
Kie, antaŭ dek jaroj, li loĝis infane.  
Li enkuras, reniras, vidas mirigita:  
La ĉambro por virino estas aranĝita!  
Kiu loĝas? La onklo ne havis edzinon,  
Petersburg' antaŭ jaroj gastigis onklinon.  
Nek estas mastrinejo. Jen la klavikordo! 80  
Sur ĝi notoj kaj libroj, sed ĉio sen ordo,  
Senzorge disjetita: agrabla senplano!  
Tiel ĉion disjetis ne maljuna mano.  
Jen, el hoko prenita robet' blanke brila!  
Por vestiĝo etendas ĝin seĝ' apogila.  
Sur fenestroj en potoj aromas floretoj:  
Geranio, levkojo, astroj, violetoj.

El fenestro li novan mirajon ekvidis:  
Ĉe l' frukt-arbaro, kie urtikoj insidis,  
Nun estis vojetara ĝardenet' malgranda 90  
Kun florbukedoj, mento, herbo anglolanda.  
De l' eta, cifereforme ligita barilo  
Brilis da helkoloraj lekantetoj milo;  
Ĉe l' freŝe surverŝita bedaro ĝardena  
Staris ankoraŭ lada vazo, akvoplenu;  
Ĝardenistino tamen nenie vidiĝas;  
Ŝi eliris, ankoraŭ pordet' balanciĝas,  
Ĵus puŝite: sur sablo jen de piedeto  
Postsigno: ŝi sen ŝuo estis, sen ŝtrumpeto.  
Sur sablo delikata, seka, blanka pure,

---

<sup>1)</sup> Dombrovski-mazurko, kanto de la polaj legioj, batalintaj, sub la generalo Dąbrowski, por Napoleono en Italujo (1797), la fama „Ankoraŭ Polujo ne pereis“; jen ĝia unua strofo:

„La Polujo ne pereis, dum ni vive spiroj;  
Kion fremda forto prenis, ni per fort' akiros.  
Marŝu, marŝ', Dombrovski! el itala lando  
Al patruj' nin gvidos via ĉefkomando!“

Postsigneto preciza, vi divenos: kure 100  
Ĝin ĉi tie malgrandaj piedetoj lasis  
De iu, kiu teron tuŝetante, pasis.

Li longe en fenestro staris, meditante,  
Per aromaj blovetoj de floroj spirante.  
La vizaĝon li klinis ĝis la violetoj,  
Per okuloj scieme vagis sur vojetoj;  
Kaj li ree al etaj postsignoj revenis,  
Pripensante, al kiu ili apartenis.  
Li levis la okulojn: sur tabul' barila  
Staris juna knabino; vesto, blanke-brila, 110  
Ĝis la brusto nur kovras figuron gracian,  
Ne kaŝante la ŝultrojn, cignan kolon ŝian.  
Tiel vestite, sole por matena iro,  
Litvanino neniam vidiĝas al viro.

Do, eĉ sen atestanto, per manoj-surmeto  
Sur bruston, ŝi aldonis ŝirmon al robeto.  
La haroj, ne en bukloj, sed node-tordite  
Kaj, en blankaj papero-silikvoj, kaŝite,  
Mirornamis la kapon, ĉar, de sun' radia,  
Ili lumis per nimbo ĉielana ia. 120

Vizaĝo — nevidebla. Al kampo turnite,  
Ŝi iun serĉis fore, malsupre. Subite  
Ŝi ekvidis, ekridis, kaj, manojn plaŭdinte,  
Kiel bird', el barilo sur herbon, fluginte,  
Tra-l' ĝardeno, tra floroj, ŝi pasis en kuro.  
Sur tabul', apogita ĉe la ĉambra muro,  
Antaŭ ol li rimarkis, ŝi flugis facile  
Tra-l' fenestro, subite, mallaŭte, lunbrile.  
Trilante, ŝi robeton kaptis, kaj spegulon  
Enrigardi kuretis. Vidinte junulon, 130

Ŝi faligis robeton — pala de hororo  
Kaj miro. Li ekfiamis per roza koloro,  
Kiel nubo, renkonte kun maten'-aŭroro.  
Li modeste okulojn kovris, ekbalbutis,  
Volis sin senkulpiĝi, sed nur klinsalutis  
Kaj reniris. Virgino ekkriis dolore,  
Malklare, kiel ido, sonĝe timigita.  
Li time rerigardis; ŝi jam estis fore;  
Lia kor' laŭte batis, kaj li, konfuzita,

Eliris, ne sciante mem, ĉu la renkonto  
Estas inda de rido, de ĝojo aŭ honto. 140

Dume oni rimarkis bone en bieno,  
Ke antaŭ dom' okazis nova gast-alveno.  
Jam al stalo ĉevalojn forkondukis oni  
Kaj ne avaris, fojnon kaj avenon doni.  
Juĝist' ne volis novan modon rekomendi:  
Gast-ĉevalojn al juda gastejo forsendi.  
Servistar' ne eliris saluti respekte,  
Ne tial, ĉar ĝi servis en domo neglekte,  
Sed nur, ĉar ĝi atendis de Vojski <sup>1)</sup> alvenon: 150  
Li ekster dom' aranĝis vesperan festenon.  
Li anstataŭas mastron; se mastro 'as fore,  
Gastojn li mem akceptas kaj amuzas kore;  
(Dom-amiko de-l' mastro, forparencio ia.)  
Vidinte gaston, kuris li al ĉambro sia;  
(Li ne povis renkonte iri en tolvesto),  
Do li prenis rapide vestaĵon, por festo  
Preparitan, ĉar sciis li ekde mateno,  
Ke li kun multaj gastoj sidos ĉe-l' festeno.

Vojski al gasto brakojn etendis de fore, 160  
Kaj krie ĉirkaŭprenis lin kaj kisis kore.  
Rapide kaj konfuze ili ekparolis:  
Kelkjaran historion vort-resumi volis  
Plej mallonge; demandojn sekvis rakontado,  
Ekkrioj, eksopiroj, nova salutado.  
Kiam Vojski demandis kaj esploris ĉion,  
En fino li rakontis tago-historion.

„Bone, mia Tadeuŝ“ (ĉar la juna homo  
Estis bapte nomita per Kosciŭska nomo,  
Pro sia milittempa naskiĝo, memore), 170  
„Bone, mia Tadeuŝ, vi venis ĝusthore,  
Ĉar ni havas en domo fraŭlinar'-ĉeeston.

---

<sup>1)</sup> Vojski (tribuno), antaŭe en Polujo oficisto, kies devo estis, gardi la sekurecon en la konfidita al li distrikto, kaj zorgi pri la edzinoj kaj infanoj de l' nobelaro dum la milito. Tiutempe (j. 1811a) la ofico estis nur titola.

Onklo por vi pripensas jam edziĝofeston.  
 Do elektu; ariĝas societo granda  
 Ĉe ni, de kelkaj tagoj, pro juĝo limranda, <sup>1)</sup>  
 Por fini kun la Grafo malnovan proceson.  
 La Grafo, morgaŭ veni mem, donis promeson.  
 Ĉambelan' <sup>2)</sup> kun edzino, filinoj, jam venis.  
 Junular' ĉaspafilojn en arbaron prenis;  
 Maljunuloj, virinoj rikoltatan grenon  
 Rigardante, atendas junular'-revenon.  
 Se vi volas, renkontos ni apud arbaro  
 Onklon, Geĉambelanojn kun sinjorinaro.

180

Vojski kun Tadeuŝo al arbaro iras,  
 Kaj ĉiam satparoli ankoraŭ deziras.  
 Suno al ĉiellimoj aliradis laste,  
 Malpli forte ol tage, sed lumis pli vaste,  
 Tutruĝa, kiel sana vizaĝ' de kampulo,  
 Kiu finis laboron sur grenkampo sia  
 Kaj revenas ripozi. Jam rondo radia  
 Falas arbaran supron; krepuska nebulo  
 Jam la pintojn kaj branĉojn de arboj plenigas,  
 Kaj tut-arbaron kvazaŭ kunverŝas kaj ligas;  
 Arbaro nigras, kvazaŭ domo grandegulo,  
 La suno ruĝas, kiel sur tegmento brulo;  
 Ĝi falis suben, jetis tra branĉegoj brilon,  
 Kiel kandel' tralumas fenestro-kovrilon,  
 Kaj estingiĝis. Tiam en greno falĉiloj  
 Sonantaj, kaj en herbo ŝovataj rastiloj  
 Silentis, haltis: tiel ordonas Juĝisto;  
 Ĉe li, kun tago finas laboron kampisto.  
 „Kiel longe labori, Mondoestro diras;  
 Kiam la suno, Lia laborist', foriras,

190

200

<sup>1)</sup> Limjuĝo estis juĝo, kiu ekskluzive decidis procesojn pri bienlimoj. Ĝin plenumis la ĉambelano (kamerestro), supera oficisto de l' distrikto, en loko de disputo, kaj li verdiktis, kolektinte ĉiujn dokumentojn.

<sup>2)</sup> Ĉambelano (kamerestro), antaŭe supera dignulo kaj oficisto en sendependa Polujo; li plenumis devojn de la reĝa kortego. La distrikta ĉambelano juĝis limprocesojn (vidu supre). Sub la rusa regado tiu ĉi ofico perdis sian signifon kaj restis nur titola.

Ankaŭ kapolaboron devas fini homo\*.  
La sinjoro Juĝisto paroladis jene.  
Lian volon respektas sankte ekonomo,  
Ĉar eĉ veturigiloj, ne ŝarĝitaj plene,  
Kun duona garbaro al garbej' veturas:  
Bovoj, pro nekutima malpezo, ĝojkuras.

Ĵus el arbaro iris tuta societo, 210  
Gaje, orde. Antaŭe, infanoj-areto  
Kun guvernist'; Juĝisto kun Ĉambelanino;  
Ĉambelan', ĉirkaŭita familia-krone;  
Post ili la fraŭlinoj; junular', en fino,  
Flanke, post la fraŭlinoj, eble paŝ-duone.  
(Tion ordonas deco). Neniu parolis  
Pri ordo, kaj neniu vicordon kontrolis,  
Kaj ĉiu, malgraŭvole, la ordon observis,  
Ĉar Juĝist' malnov-morojn en domo konservis.  
Por aĝo, nask', prudento, ofico, respekton 220  
Flegante, ne toleris li ĝian neglekton,  
„Orde, li diris, staras domo kaj nacio,  
Senorde ili falas, kaj pereas ĉio.“  
Do al ordo kutimis anoj de la domo,  
Servistoj, gast', parenco, kaj eĉ fremda homo;  
Ĉar, se iu vizite al Juĝisto venis,  
Li baldaŭ la kutimon de l' domo alprenis.

La Juĝisto salutis kore nevon sian,  
Donis por kiso manon, kisis frunton lian,  
Sed parolis malmulte, pro gastoj laŭvide; 230  
Tamen la larmoj, kiujn li viŝis rapide  
Per tranĉita maniko de sia kontuŝo,<sup>1)</sup>  
Vidigis lian amon al Pan Tadeuŝo.

Post la mastro al korto iris sekvantaro:  
El rikolto, herbejo, paŝtejo, arbaro.  
Tie interpretiĝas la ŝafoj blekante,  
Kaj densan polvan nubon sur vojo levante;  
Kaj poste, malrapide paŝas, kun latuna

<sup>1)</sup> Kontuŝo (kontusz), longa nobela supervesto kun dis-  
tranĉitaj manikoj.



Tintilar', la tirola bovinaro juna;  
Jen el herbejo kuras ĉevaloj henante.  
Ĉio al put', al ĝia ligna brako, kuras, 240  
Kiu knare en trogojn trinkajon mezuras.

Juĝisto, kvankam laca, kaj inter gastaro,  
Gravan devon de mastro ne lasis pretere;  
Li iris mem al puto. Plej bone vespere  
La mastro vidas staton de sia brutaro.  
Li neniam inspekton fidas de servulo,  
„Ĉar la brutaron nutras de mastro okulo“.

Kun Vokisto<sup>1)</sup> Protazo, Vojski, ĉe kandelo,  
En vestiblo disputis, iom en kverelo;  
Ĉar, dum forest' de Vojski, Vokisto sekrete 250  
El dom' forigis tablojn, jam kovritajn prete,  
Kaj rapide starigi en kastel' ordonis,  
Kies ruinojn rando de l'arbaro zonis.  
Vojski, pro la transportoj malkontenta, iris  
Praviĝi al Juĝisto. Juĝisto ekmiris,  
Jam ne povante ŝanĝi, preferis en fino,  
Sin ekskuzi kaj gvidi gastojn al ruino.  
Vokist', dumvoje, ĉiam al Juĝist' klarigis,  
Pro kio li disponon mastran aliigis;  
En domo ne ekzistas ĉambro tiel vasta, 260  
Por tiel estiminda, granda aro gasta;  
En kastel' as vestiblo, bone konservita,  
Arkajo sendifekta, unu mur' fendita,  
Fenestroj, sen vitraĵoj, ne ĝenas somere,  
Proksimeco de keloj oportuna vere.  
Sed li dume Juĝiston per okul' sciigis,  
Ke li pli gravajn siajn kaŭzojn sekretigis.

Dumil paŝojn post domo estis situita  
Kastelo, grandioze, vaste konstruita,  
De Horeŝko antikva hered' familia. 270

<sup>1)</sup> Vokisto (Woźny), antaŭe malsupera juĝa oficisto en Polujo; lia devo estis disporti juĝajn invokojn, anonci verdiktojn k. t. p. Tiun ĉi oficon plenumis kutime la nobel-taro.



Li mem pereis en la temp' insurekcia;  
 La bienojn detruis sekvestraj ediktoj,  
 Senordo de l' zorgado, kaj juĝaj verdiktoj.  
 Parencoj de l' patrina flank' heredis parte,  
 Kreditoroj la reston dividis aparte.  
 Neniu volis preni dum kalkul' kastelon,  
 Kies subten' per kostoj troŝarĝus nobelon.  
 Sed la Grafo, najbaro, post plenkresko sia,  
 Riĉa sinjor', Horeŝka forparenco ia,  
 El vojaĝoj veninte, ekŝatis la murojn,  
 Klarigante gotikan la arĥitekturon;  
 Kvankam Juĝist' asertis, laŭ antikva plano,  
 Ke arĥitekt' ne Goto estis, sed Vilnano.  
 Nu, Graf' volis kastelon. Ĝuste sama-date  
 Juĝist' ekvolis samon; kial? nesciate.  
 Do proces': en distrikto, en ĉefa juĝejo,  
 Senat', ree distrikto, provinc'-oficejo.<sup>1)</sup>  
 Fine, post mult-verdiktoj, multaj kostoj grandaj,  
 La afero revenis al juĝoj limrandaj.

280

Vokisto diris prave, ke vestiblo vasta  
 Ampleksos la palestron<sup>2)</sup> kun la aro gasta:  
 Halo, kiel manĝejo, volbo sur kolonoj,  
 Konvekŝa; planko estis sternita per ŝtonoj.  
 Sur muroj senornamaj, puraj, sin etendis  
 Kapreolaj kaj cervaj kornoj, kiuj pendis  
 Kun surskrib': kie, kiam estis akiritaj,  
 Sub ĉasistaj blazonoj, nomoj gravuritaj.  
 Sur la arkajo brilis en supre, kun krono,  
 Duonkapro, antikva Horeŝkoj-blazono.

290

Gastoj eniris orde, kaj ronde ekstaris  
 Ĉe tabl'; unuan lokon Ĉambelano prenis,  
 Laŭ aĝ', ofic', la digno al li apartenis;  
 Li, irante, al ĉiuj klinsalutojn faris.

300

<sup>1)</sup> Polujo konsistis el vojevodlandoj (kvazaŭ provincoj, posteaj gubernioj), kiuj dividiĝis en distriktojn.

<sup>2)</sup> Juristoj, advokatoj kaj iliaj lernantoj. La palestro estis praktika lernejo de leĝoscienco kaj advokateco.

Ĉe li, antaŭ Juĝisto, Pastro Bernardina<sup>1)</sup>  
Diris mallongan preĝon en lingvo latina.  
Viroj ricevis brandon; tiam, sidigante,  
Ĉiuj manĝis malvarman supon,<sup>2)</sup> silentante.

Tadeuŝ, gastorajte, kvankam li junulo,  
Sidis apud fraŭlinoj, ĉe Pastro-moŝtulo;  
Inter li kaj la onklo unu loko restis 310  
Libera, kvazaŭ iun atendanta estis.  
Onklo ofte ĉi lokon kaj pordon okulis,  
Kvazaŭ certa pri ies veno, ĝin postulis.  
Tade', rigardon onklan al pordo sekvante,  
Revenadis, malplenan lokon rigardante.  
Strange! ĉirkaŭe estas de fraŭlinoj sido,  
Kiujn plezure povus rigardi reĝido:  
Ĉiuj noble naskitaj, bela, juna ĉiu;  
Tade' rigardas, kie sidas ja neniu.  
Enigma lok', junuloj ŝatas enigmajon. 320  
Li, distrite, la belan sian najbarinon,  
Apenaŭ alparolis, Ĉambelanidinon.  
Li ne ŝanĝas telerojn ŝiajn, nek trinkajon  
Enverŝas, nek ĝentile-parole amuzas,  
Nek li sian ĉefurban edukon fruktuzas.  
Nur ĉi loko malplena lin logis kaj ligis...  
Jam ne malplena, li ĝin per pensoj plenigis;  
Sur ĉi loko jam kuris mil' da supozetoj,  
Kiel, post pluv', sur sola herbejo, ranetoj.  
Unu figuro reĝas, kiel, belvetere, 330  
Lilio frunton levas, sur lago, fiere.

Ĉe la tria manĝajo, guton da ruĝvino  
Ĉambelano enverŝis al Rozo, filino,  
Al pli juna li ŝovis kukumoj-teleron,  
Kaj diris: „Vin, filinoj, servos, ĉi vesperon,  
Mi maljuna, mallerta“. Tuj saltis de-table  
Kelk-junuloj, por servi fraŭlinojn afable.  
Juĝist' flanke-rigardis al Pan Tadeuŝo,  
Ĝuste-metis manikojn de sia kontuŝo,

<sup>1)</sup> Monaĥo, kolektanta almozon por sia monaĥejo.

<sup>2)</sup> Chołodziec, manĝajo el betfolioj kaj malvarma kremo.

Enversis hungarvinon kaj diris: „Junuloj  
 Por instruo sendiĝas, laŭ nunaj postuloj,  
 En ĉefurbon. Ke niaj filoj nun ricevas  
 Pli da libra instruo, ni konfesi devas;  
 Sed por junuloj mankas lernejoj, domaĝe,  
 Kiuj, kun homoj vivi, instruus junage.  
 Al kortegoj veturis nobelid' antaŭe;  
 Mi mem dek jarojn estis tia kortegano<sup>1)</sup>  
 De l' Vojevodo, via patro, Ĉambelano!  
 Danke, viajn genuojn mi prenas ĉirkaŭe!  
 Vojevod' min al servoj publikaj preparis, 350  
 El zorgado ne lasis, ĝis min homo faris.  
 Do ĉiam lin memoros kare dom' mia;  
 Por li korpreĝajn sendas mi al trono Dia.  
 Se mi ne tiel grandan elportis utilon  
 Kiel aliaj, hejme postiras plugilon,  
 Dum aliaj, pli indaj de liaj favoroj,  
 Aliris al plej altaj en lando honoroj,  
 Almenaŭ mi profitis, ke, en mia domo,  
 Neniu min riproĉos, ke al iu homo  
 Mankas de mi ĝentilo, afablo. — Ĝentila 360  
 Eco ne estas eta instruo, facila;  
 Ĝentileco ankoraŭ ne finiĝas tuta  
 Per lerta piedŝovo, ekrido saluta  
 Al ĉiu: jen ĝentilo komercist'-popola,  
 Laŭ mi, sed nek nobela, nek antikve pola.  
 Ĝentilecon al ĉiu! ne al ĉiuj samo:  
 Ne estas senĝentila de l' infano amo,  
 Respekt' inter geedzoj, de l' mastro al sia  
 Servist'; sed ĉie estas diverseco ia.  
 Oni lernu tre longe ĝin, por ne erari, 370  
 Kaj al ĉiu la ĝustan afablaĵon fari.  
 Eĉ maljunuloj lernis: ĉe sinjoro granda,  
 Interparolo estis — historio landa,  
 Ĉe nobeloj — distrikta, hejma historio;  
 Do la frato nobelo sciigis per tio,

<sup>1)</sup> En Polujo estis la kutimo, ke nobelaj junuloj, precipe malpli riĉaj, iris sur la kortegojn de grandaj sinjoroj, tie lernis la societajn manierojn kaj prepariĝis por la publikaj oficoj kaj por la arma servo.

Ke la homoj lin konis, ne malŝat'rigardis;  
 Tial nobelo zorge siajn morojn gardis.  
 Nun ne demandu: Kiu? de kia deveno?  
 Kion li faris? — Ĉiu eniru sen ĝeno,  
 Escepte mizerulon, registar'-spionon. 380  
 Kiel Vespaziano<sup>1)</sup> ne flaris la monon,  
 Ne demandis: el kiaj manoj, landolimoj?  
 Tiel oni ne scias pri deven', kutimoj;  
 Sufiĉas valideco kaj stampo; konkludo:  
 Oni ŝatas amikojn, kiel monon judo“.

Juĝist' ĉirkaŭrigardis la gastojn atente,  
 Ĉar, kvankam li parolis flue kaj prudente,  
 Li sciis, ke enuas la nunaj junuloj  
 Ĉe parolad', dirata eĉ plej elokvente;  
 Sed ĉiuj lin aŭskultis profunde-silente. 390  
 Ĉambelanon demandis Juĝist' per okuloj; }  
 Sed, por ne interrompi, Ĉambelan' ne laŭdis,  
 Nur silente, per ofta kapklino, aplaŭdis.  
 Juĝist' haltis; responde al jesa kapklino,  
 Li por ambaŭ plenverŝis kalikojn per vino,  
 Kaj diris: „Ne malgrava estas ĝentileco;  
 Ĉar, kiam homo pesas konvene, laŭ speco,  
 La aĝon, naskon, virtojn, morojn de aliaj,  
 Li samtempe sciiĝas pri valoroj siaj:  
 Por ekkoni, pri nia pezo, ĝustan veron, 400  
 Ni devas iun meti sur kontraŭteleron.  
 Tre atentinda estas ĝentilec' modela,  
 Kiun ŝuldas junuloj al la sekso bela,  
 Des pli, se dom' honesta, donoj de l' fortuna,  
 Denaskajn ĉarmojn, ecojn, briligas en suno.  
 Jen vojo al korsentoj, vojo al splendoro  
 De familiaj ligoj — laŭ malnova moro.  
 Do...“ Ĉi tie Juĝisto, la kapon turnante,  
 Sur Tadeo severan rigardon ektenis,  
 Videble al konkludoj de l' parolo venis. 410

<sup>1)</sup> Roma imperiestro (69 — 79 p. K.), kiu impostis la  
 urinon, aplikatan de fulistoj; li diris, ke la mono el tie  
 devenanta „non olet“ (ne odoras):

Tiam diris, per ora tabakuj' sonante,  
 Ĉambelan': „Ho, Juĝisto! estis ja antaŭe  
 Pli malbone! Ĉu modo nin ŝanĝis ankaŭe,  
 Ĉu junuloj boniĝis; sed, laŭ mi, konstante  
 Skandaloj malpliĝas. — Kiam, al Patrujo,  
 Ho, ma' memoras, modoj venis el Francujo!  
 Tiam junaj sinjorcj, el la fremdaj landoj,  
 Horde al ni invadis, kiel Nogaj'-bandoj<sup>1)</sup>  
 Persekutante Dion, de prapatroj kredon,  
 Leĝojn, morojn, de vestoj naciaj posedon. 420  
 Kompaton junulaĉoj vekis, flaviĝintaj,  
 Parolantaj tra nazoj, ofte sen-nazpintaj,  
 Kun proviz' da broŝuroj, diversaj gazetoj,  
 Anoncoj de nov-kredoj, leĝoj, tualetoj.  
 Grand-forton super mensoj havis tiuj bandoj:  
 Ĉar, kiam la popolon punas Dia mano,  
 La prudenton forprenas ĝi de l' civitano.  
 Pli saĝaj ne kuraĝis rezisti al dandoj;  
 Tuta popolo timis ilin, kiel peston,  
 Ĉar ĝi, interne, sentis jam malsano-neston. 430  
 Oni mokis modanojn, modelojn prenante,  
 Kredon kaj lingvon, leĝojn kaj vestojn ŝanĝante:  
 Post tiu maskobalo, karnaval' petola<sup>2)</sup>,  
 Venis la granda fasto — malliber' popola.

„Mi memoras, ankoraŭ estis mi infano,  
 Kiam al mia patro, en distrikt' Oŝmjano<sup>3)</sup>  
 Alveturis, sur franca veturil', subite  
 Pokalestrid',<sup>4)</sup> unua laŭfrance vestite.  
 Post li, kiel post falko birdoj, ĉiuj saltis,<sup>5)</sup>  
 Kaj enviis la domon, antaŭ kiu haltis 440  
 La dando kun du-rada sia fiakreto,

<sup>1)</sup> Nogajoj, tataroj el la nomada hordo apud la Azova Maro.

<sup>2)</sup> Koncernas la korupton de naciaj moroj, kiu antaŭiris la pereon kaj dispartigon de Polujo.

<sup>3)</sup> En Vilna gubernio.

<sup>4)</sup> Filo de reĝa pokalestro (podczaszy), titolo.

<sup>5)</sup> La sakerfalkon are postflugas birdetoj, precipe hirundoj; el tie devenas la pola proverbo: „Postkuri iun kiel sakerfalkon“.

Kiu franclingve nomis sin karioleto:  
 Anstat' lakeoj, poste, sidis du hundetoj;  
 Gvidside: svab', tabule malgrasa, ostvangoj,  
 Kruroj maldikaj, longaj, kiel lupol-stangoj,  
 En ŝtrumpoj, kaj en ŝuoj kun arĝent-krampetoj;  
 Peruko, en har-sako ligita. Ĉe l' vido  
 De l' ekip', maljunuloj eksplodis per rido,  
 Kampuloj krucosignis sin time kaj diris:  
 Ke diablo en franca kaleŝo vojiris. 450  
 Skizi Pokalestridon — longa historio;  
 Al ni li ŝajnis kiel papago, simio.  
 Perukon sian nomis li ora lanaro;  
 Laŭ ni, kun pliko estis pli ĝusta komparo.  
 Se iu polajn vestojn eĉ pli belaj sentis,  
 Ol imito de fremda modo, li silentis;  
 Ĉar junularo krius laŭte, ke li faras  
 Malhelpojn al kulturo, la progresojn baras,  
 Perfidas! Tia estis antaŭjuĝ'-potenco!

Pokalestrid' anoncis pri sia intenco 460  
 Reformi, civilizi nin laŭkonstitue,  
 Klarigis, ke ĉe francoj aperis unue  
 Pri homoj-egaleco la granda invento;  
 Kvankam tion jam skribis Dia testamento,  
 Kaj ĉiu pastro tion diras en prediko.  
 Scienc' malnova estas, mankas nur apliko!  
 Sed tiam tiel granda blindeco ekregis,  
 Ke oni malnovajon ne kredis, ne flegis,  
 Se en franca gazeto oni ĝin ne legis.  
 Pokalestrido, malgraŭ egalec', markizo 470  
 Titoliĝis; titoloj venas el Parizo,  
 Kaj tiam estis moda titolo markizo;  
 Do, kiam aliĝis poste moda stato,  
 Ĉi markizo titolon prenis — demokrato;  
 Fine, kun modo-ŝanĝo, sub Napoleono,  
 Demokrat' el Parizo revenis barono.  
 Se li vivus pli longe, eble nova dato  
 El barono lin farus ree demokrato.  
 Famo de modo-ŝanĝoj al Parizo flatas,  
 Kaj kion franc' elpensas, tion polo ŝatas. 480

„Dank' al Dio, ke nia nuna junularo  
 Veturas eksterlanden jam ne pro vestaro,  
 Ne por serĉi leĝdonon en presaj vendejoj,  
 Lerni elokventecon en pariz-kafejoj.  
 Sub Napoleon, homo saĝa, rapid-aga,  
 Ne temp' al modo-serĉo, babilo papaga.  
 Tondras glavoj, do niaj koroj releviĝas,  
 Ke la famo pri poloj en mondo laŭtiĝas;  
 Estos la Respubliko, ĉar jam estas gloro:  
 El laŭroj ĉiam kreskas libereco-floro. 490  
 Nur malĝoje, ke jaroj treniĝas senlime  
 En senagec'! kaj ili ĉiam malproksime!  
 Atendado! novajoj malofte aliras!...  
 Pastro! (li al moŝtulo pli mallalte diras),  
 Mi aŭdis: el post Njemen vi havas skribajon;  
 Ĉu pri nia armeo ĝi portas novajon?“  
 „Ne, nenion“, respondis Verm' <sup>1)</sup> indiferente,  
 Kiu interparolon aŭdis malkontente,  
 „Politik' enuigas min, venis letero  
 El Varŝavo, pri nia monaĥa afero; 500  
 Ĉu dum la vespermanĝo pri tio babili?  
 Ĉeestas ja mondanoj, afer' ne por ili“.

Tion dirante, strabis li al festenano,  
 Gasto rusa, sinjoro Rikov, kapitano,  
 En vilaĝo loĝanta soldato maljuna,  
 Gentile invitita al manĝo komuna,  
 De l' Jugŝt. Li bonguste manĝis, parolante  
 Malmulte; sed li levis la kapon, aŭdante  
 Pri Varŝavo, kaj diris: „Ho! Pan Ĉambelano!  
 Sciemas pri Varŝavo! Bonaparte-ano!  
 Nu! Patrujo! Mi pole scias, ne ŝpionas.  
 Patrujo! tion sentas mi ĉion kaj konas!  
 Vi, poloj, kun mi, ruso, ne militas nune,  
 Batalhalto! do manĝas ni kaj trinkas kun.  
 Rus' kun franc', avangarde, ofte ĉe babiloj  
 Trinkas brandon, ĝis krio: hura! — pafegiloj!  
 Ni diras: mi lin batas, ĉar mi amas kore;

<sup>1)</sup> Vermo, pole Robak, kaŝnomo de l' monaĥo.



Do karesu amike, aŭ batu fervore.  
 Ni havos la militon! Al majoro Plut-o,  
 Stab-adjutant' hieraŭ venis kun saluto: 520  
 „Pretiĝu al marŝado!“ Kontraŭ turk' ordono,  
 Aŭ franco? Ho, ruzulo, ĉi Napoleono!  
 Sen Suvorov<sup>1)</sup> li povas nin frapi per batoj.  
 Kontraŭ francoj marŝante, rakontis soldatoj,  
 Ke Suvorov sorĉadis, same Bonaparto;  
 Do estis tiam sorĉoj kontraŭ sorĉa arto:  
 Bonapart' malaperis foje dum batalo,  
 Kien? Li iĝis vulpo, do Suvorov — hundo;  
 Bonapart', kiel kato, en sama sekundo,  
 Unge-gratas; Suvorov tuj iĝas ĉevalo. 530  
 Rigardu, kion faris lia sorĉ-rivalo...“  
 Li haltis; ĉar manĝaĵon, la kvaran laŭ ordo,  
 Portis servist'. Subite malfermiĝis pordo.

Venis nova persono, juna kaj gracia.  
 Ŝia aper' subita, bela kresko ŝia,  
 La vest', okulojn turnis; ĉiuj, ŝin konante,<sup>1)</sup>  
 Ekster Tadeuŝ, klinis kapojn, salutante.  
 Ŝi havis ĉarman bruston, la talion belan,  
 Robon el silka ŝtofo, rozkoloran, helan: 540  
 Kun dekolt', maniketoj mallongaj, kolumo  
 El punktoj. Ŝi, ludante, turnis ventumilon,  
 (Ĉar ne estis varmege); ventumil'-orumo,  
 Svingate, ĉirkaŭjetis da fajreroj milon.  
 Kapo belforma: haroj, en buklojn volvite,  
 Kaj, per rozaj rubandoj, inter si plektite,  
 Ŝajnkaŝis brilianton, kiu lumis brile,  
 Al stelo, en kometa harligo, simile.  
 Kelkaj flustris, ke troe eleganta vesto  
 Por vilaĝo, kaj tago labora, ne festo.  
 Piedetojn okulo ekvidi ne povis, 550

<sup>1)</sup> Suvorov Aleksandro, rusa generalo, nask. en j. 1729, mort. 1800. Post la malvenko de Kościuszko ĉe Maciejowice li ekokupis Pragon (1794), masakrinte 12,000 loĝantojn, kaj poste Varŝavon. Li batalis ankaŭ venke kune kun la aŭstroj kontraŭ francoj en Italujo (1799). La rusa popolo rakontis multe pri la sorĉaĵoj de Bonaparte kaj Suvorov.

Ĉar ŝi kuris rapide, pli ĝuste, sin ŝovis,  
 Kiel figuroj, kiujn, dum Trireĝoj-festo,  
 Knaboj kaŝe transŝovas en sia mirkesto.  
 Ŝi kuris, kapokline ĉiujn salutante,  
 Sur lok', por si lasita, sidiĝi volante;  
 Malfacile; ĉar seĝoj mankis por gastaro,  
 Sur kvar benkoj, da gastoj sidis vicoj-kvaro.  
 Transsalti benkon devis ŝi, aŭ vicon movi;  
 Ŝi lerte, inter benkoj, sciis sin traŝovi,  
 Poste, inter gast-vico kaj tablo apuda, 560  
 Ŝi rond-ruliĝis, kiel globo bilard-luda.  
 Kure, nian junulon trafis ŝia tuŝo;  
 Per falbalo al ies genucj kroĉite,  
 Ŝi glitfaletis iom, kaj tiel, distrite,  
 Sin apogis sur brako de Pan Tadeuŝo.  
 Ŝi ekskuzis sin, prenis lokon, klinsalute,  
 Inter li kaj la onklo, sed ne manĝis tute.  
 Ŝi nur ventumis sin, aŭ turnis prenileton  
 De ventumil'; jen ŝia mano kolumeton  
 El la brabantaj punktoj iom ĝuste-metis, 570  
 Jen har-buklojn kaj helajn rubandojn tuŝetis.

Interparoloj paŭzis ĉirkaŭ kvar minutoj.

Dume, ĉe tabla fino, mallaŭtaj disputoj  
 De viroj plilaŭtiĝis: interparolado  
 Juĝis pri hodiaŭa leporoj-ĉasado.  
 De l' Asesor', Rejento <sup>1)</sup>, disput' nefinita  
 Daŭriĝis pri Stumpulo, hund' veste-tranĉita.  
 Pri leporul', fiere, Rejento sinjoro  
 Asertis, ke ĝi estis kaptint' de leporo;  
 Dume, al li refutis, spite, Asesoro, 580  
 Ke al vertrago Falko apertenas gloro.  
 Do ĉirkaŭe demandis oni opinion;  
 Ĉiu prenis de Falko aŭ Stumpul' partion,  
 Kiel konul' aŭ kiel atestant'. — En fino  
 Dua, de tabl', Juĝisto al nov-najbarino

<sup>1)</sup> Asesoroj prezentis la distrikтан vilaĝan policon kaj estis elektataj de l' registaro aŭ de civitanoj.—Rejentoj (notarioj) administris la kancelarion, gardis la aktojn kaj enskribis en ilin dekretojn kaj privilegiojn.

Diris: „Pardonu, ke ni sidiĝis pli frue,  
Ne povante prokrasti vespermanĝon plue;  
Gastoj malsataj, fore en kamparon iris;  
Mi pensis, ke vi veni al tabl' ne deziris“.  
Poste Juĝist' mallauĝe, ĉe plena kaliko,  
Kun Ĉambelan' parolis pri la politiko. 590

Ĉe tablo, ambaŭflanke tiel okupata,  
Tade' rigardis al la person' nekonata.  
Pri lok' li rememoris, ke, ĉe la ekvido,  
Li divenis, por kiu estis tiu sido.  
Lia kor' nekutime batis, li ruĝiĝis,  
Vidante, ke misteraj konjektoj solviĝis:  
Sekve, ĉe lia flanko sidis, laŭ destino,  
Vidita, en krepusko, lia belulino!  
Vere, ke pli belkreska ŝi estas ĉi tie, 600  
Ĉar la kreskon vestaĵo prezentas alie.  
Tie estis hararo mallonga, hel-ora,  
Jen: longa, plekt-volvita kaj korvo-kolora?  
Ŝajne, kolor' devenis de suna radio,  
Per kiu, ĉe l' subiro, ruĝetiĝas ĉio.  
Vizaĝon li ne vidis tiam, ĉar tro frue  
Ŝi foriĝis; ĝin penso divenas unue:  
Li pensis, ke ŝi havis nigrajn okuletojn,  
Blankan vizaĝon, ruĝajn lipojn-ĉerizetojn.  
Ŝi similas, laŭ buŝo, okuloj, vizaĝo; 610  
Plej grandan diferencon prezentus la aĝo:  
Ĝardenistino ŝajnis malgranda knabino,  
Kaj ĉi tiu, jam aĝe matura virino;  
Sed junul' ne demandas belecon pri aĝo;  
Al junul' ŝajnas juna, ĉiu belvizaĝo,  
Samaĝulin', al knabo, ĉiu belulino,  
Kaj al ĉastulo, ĉiu amatin', virgino.

Tadeuŝ, kvankam preskaŭ dudekjar'-junulo,  
Kaj loĝis en ĉefurbo<sup>1)</sup> ekde infaneco,  
Li havis pastron, kiu, laŭ malnov-regulo, 620  
Inspektis kaj edukis lin en severecco.

<sup>1)</sup> Vilno, kiu havis faman polan universitaton, fermitan de rusoj en j. 1832-a; tie studis interalie Mickiewicz.

Do kun Tadeuŝ venis, al lia hejmlimo,  
Kor' senkulpa, pens' vigla, kaj pura animo;  
Sed kune petolemo eta, de junaĝo.  
Antaŭe jam projektis li, ke, en vilaĝo,  
Li ĝuos je veninta libereco nuna;  
Li sciis, ke li estis vigla, bela, juna,  
Kun gepatroj-heredo, fortiko kaj sano.  
Li nomiĝis Soplica: ĉiu Soplicano  
Estas, sciante, brava, forta, korpulenta,  
Bona soldat', science malpli diligenta.

630

Tade' ne degeneris el prapatroj-speco:  
Li pied-iris brave, rajdis kun firmeco;  
Ne malkapabla, grandajn progresojn ne faris,  
Kvankam onklo nenion por eduk' avaris.  
Li preferis pafadi, sabr-ekzercojn fari,  
Ĉar oni lin intencis al arme' prepari;  
Ĉi volon testamente la patro eldiris;  
Do li, jam en lernejo, al tambur' sopiris.  
Subite onklo ŝanĝis unuan destinon:  
Ordonis hejmveturi kaj preni edzinon,  
Kaj promesis donaci vilaĝet'-mastrajon,  
Kaj poste doni tutan sian posedajon.

640

Ĉi virtoj de Tadeo, kaj ecoj-kombino,  
Altiris la rigardon de la najbarino.  
Ŝi mezuris belforman kaj altan figuron,  
Larĝan bruston, fortikajn ŝultrojn, la staturon,  
Rigardis la vizaĝon, kiu ruĝetiĝis,  
Kiam junul' kun ŝia okul' renkontiĝis.  
Libere de unua timem', li rigardis  
Kuraĝe per okuloj, kiuj fajre ardis.  
Egale ŝi rigardis: kaj pupiloj-kvaro  
Kontraŭ si flamis, kiel frumes'-kandelaro.

650

Ŝi unue Tadeon france alparolis.  
Li revenis el Vlnio, do ŝi aŭdi volis  
Pri aŭtoroj kaj novaj libroj opinion,  
Kaj, laŭ respond', sekvigis demandoj-serion.  
Ŝi poste ekparolis pri arta pentrado,  
Pri muziko, pri dancoj, kaj eĉ pri skulptado!

Pruvis konon de notoj, pres' en ĉia speco: 660  
 Ĝis Tade' konsterniĝis je l' instruiteco,  
 Timis, por ne fariĝi celo de mokanto,  
 Balbutis, kiel, antaŭ instruist', lernanto.  
 Feliĉe, instruisto bela, nesevera,  
 Divenis, kia estis terur'-kaŭzo vera.  
 Do ŝi al pli facilaj transiris objektoj:  
 Vilaĝa viv', enuo, penoj kaj projektoj,  
 Kiel oni distriĝu, la tempon partigu,  
 Kaj, en vilaĝo, vivon al si agrabligu.  
 Tadeo, respondante, parolis sentime; 670  
 Post duonhoro ili estis jam intime,  
 Kaj komencis malgrandajn ŝercojn, disputetojn;  
 Fine ŝi metis antaŭ li tri panglobetojn  
 Por elekt': plej proksiman li tuŝis per mano.  
 Frunt-sulkiĝis filinoj de la Ĉambelano;  
 Najbarino ekridis, tamen ŝi silentis,  
 Kiun tiu feliĉa globeto prezentis.

Ĉe dua tablo-fino, oni sin alie  
 Amuzis: Falko-anoj, fortiĝinte tie,  
 Senkompate atakis de Stumpul' partion. 680  
 Disputo bruis, oni manĝis plu nenion;  
 Ambaŭ flankoj kverelis stare, trinkis nure;  
 Rejento iritita estis plej terure:  
 Li ne ĉesis aferon sian prezentadi  
 Kaj ankoraŭ tre klare per gestoj pentradi.  
 (Antaŭe advokato, Rejento Bolesta,  
 Predikisto nomata, pro la emo gesta),  
 Manojn al flank', kubutojn posten elfleksinte,  
 El sub brakoj long-ungajn fingrojn elŝovinte,  
 Per ĉi bildo du hundojn li prezentis nune; 690  
 Ĵus li finis paroli: „Pel!<sup>1)</sup> ellasas kune,  
 Mi kun Asesor'; kvazaŭ' du ĉanojn al subo,

<sup>1)</sup> Imitante la ĉasistan lingvon, la traduko uzas en ĉi tiu rakonto de l' Rejento kelkajn senfleksiajn interjekciojn: Pel!=pelu, postkuru (voko al hundoj, liberigataj de l' kondukrimeno); tuj tuŝ! = preskaŭ tuŝas, jam estas tre proksime; salt!=faras salton; salt! salt!=faras du saltojn; sving!=svingas, turnas sin; kapt!=kaptas.

Faligus unu fingro ĉe pafil'-dutubo;  
 Pel! Kiel kord' leporo en kampon flankiris,  
 Hundoj tuj tuŝ! (sur tablo li manojn long-firis,  
 Per fingroj imitante de hundoj movecon),  
 Hundoj tuj tuŝ! forpelis de l' arbar' jam pecon.  
 Falk' antaŭen! rapida hund', sed teravorulo,  
 Eliĝis tiom, fingron, antaŭ la Stumpulo:  
 Mi sciis, ke maltrafos li. Lepor', ruzulo, 700  
 Kuris, ŝajne, en kampon, post li hundoj; nune  
 Lepor', ruzulo! kiam hundojn sentis kune,  
 Salt! dekstren, kapriolon! hundar', malprudente  
 Samflanken; li maldekstren ŝving! salt! salt! momente.  
 Hundoj tuj ŝving! arbaren li, kaj la Stumpulo:  
 Kapt!!\* Rejento, sur tablon klinite, kun tia  
 Kri', per fingroj alkuris ĝis al flank' alia,  
 Kaj „kapt“ en la orelon kriis al junulo.  
 Per ĉi voĉo-eksplodo, Tadeo kaj lia  
 Najbarin', timigitaj, mez-interparole, 710  
 Ambaŭ de si forŝovis kapojn, malgraŭvole,  
 Kiel suproj de arboj, ligitaj kupole,  
 Kiujn disŝiras vento; kaj manoj, metite  
 Proksime sub la tablo, diskuris subite,  
 Kaj du vizaĝojn kovris unu ruĝetiĝo.

Tade', por ne konfesi pri sia distriĝo,  
 Diris: „Vere, Rejento, sendube kaj certe,  
 Stumpul' as bela hundo; se li kaptas lerte...“  
 — „Lerte? kriis Rejento — do kaptus mallerte  
 Mia hund'-favorato?...“ Do Tadeo nia 720  
 Ĝojis, ke bela hundo estis sen mank' ia;  
 Domaĝe, li nur vidis ĝin apud arbaro;  
 Mankis tempo, koniĝi kun bona ecaro.

Nun Asesor' kalikon tremfaligis plenan,  
 Kaj turnis al Tadeo rigardon venenan.  
 Li, ol Rejento, malpli moviĝema, kria,  
 Malpli dika li estis kaj malpli statura,  
 Sed en balo, distrikta kunveno, terura.  
 Laŭ dir', pikilon havis li en lango sia;  
 Li sciis tiel spritajn ŝercetojn komponi, 730  
 Ke ilin kalendaroj povus prese doni:

Ĉiuj malicaj, akraj. Iam en bonstato,  
 Li disipis post patro heredon, de l' frato  
 Bienon, figurante en la granda mondo;  
 Nun, oficist', graviĝis en distrikta rondo.  
 Li amis tre ĉasadon, parte por amuzo,  
 Parte, ĉar kornoj-sono, de pelistoj uzo,  
 Al li rememorigis, kiam, en juneco,  
 Li havis pafistaron kun fama hund-speco:  
 Nun al li, el hundaro, du vertragoj restis, 740  
 Kaj, kontraŭ glori de unu, oni nun protestis!  
 Do li alproksimiĝis, glatis malrapide  
 Vangoharojn, kaj diris, malice-ekride:  
 „Hundo sen vosti — nobelo sen ofica ago;  
 Vosti ankaŭ multe helpas, dum kuri, al vertrago.  
 Laŭ vi, stumpeco pravas pri boneco ia?  
 Ni povas lasi juĝon al onklinjo via,  
 Telimen'. En ĉefurbo ŝi loĝis antaŭe,  
 Ne delonge distriĝas ĉi tie ĉirkaŭe,  
 Sed ĉason, pli ol junaj ĉasistoj, komprenas: 750  
 Jen tiel, kun la jaroj, sperteco mem venas“.

Tadeuŝ, kiun trafis tondrobat' subite,  
 Momenton senparole staris, konfuzite,  
 Sed rigardis rivalon terure severe...  
 Ĉambelan' tiam ternis, ĝustatempe vere:  
 „Vivu!“ ekkriis ĉiuj; li dankis kapkline,  
 Kaj, per fingroj, sonigis tabakujon fine;  
 La tabakuj' el oro, brilliant'-kadreto,  
 Kaj, en mezo, de reĝo Stanislav<sup>1)</sup> portreto.  
 Reĝo, al lia patro, ĝin donis favore, 760  
 Ĉambelano, post patro, ĝin vartis honore;  
 Per ĝi donante signon, li paroli volis:  
 Do ĉiuj eksilentis, neniuj parolis.  
 Li diris: „Moŝtaj fratoj, moŝta nobelaro!  
 Ĉasist'-juĝejo estas herbej' kaj arbaro;  
 Mi, pri-l' afer', en domo ne donas decidon,  
 Tial ĝis morgaŭ solvas mi nian kunsidon,  
 Kaj partiaj refutoj ne trovos toleron.  
 Vokisto! vi en kampon revoku aferon;

1) Stanisław August, lasta reĝo de Polujo (1764—95).

Morgaŭ ĉi-tien venos Graf' kun ĉasistaro, 770  
Vi ankaŭ tien iros, Juĝisto, najbaro!  
Kun estrinoj, fraŭlinoj ĉiuj, bel-eskorte;  
Ni apartan grand-ĉason faros, unuvorte;  
Ankaŭ Vojski honoros nin per akompano.“  
Tabakujon transdonis al li Ĉambelano.

Vojski, inter ĉasistoj, ĉe tabla angulo,  
Aŭskultis, senparole, kun fermit-okulo.  
Ofte oni demandis lian opinion,  
Ĉar neniu pli bonan havis ĉaso-scion. 780  
El tabakuĵ' pinĉprenon li pesis, silente  
En fingroj, kaj ĝin fine enflaris atente;  
Li ternis, ke resonis ĉambrego eĥante,  
Kaj diris, kun maldolĉa rido, kap-skuante:  
„Ho, kiel min ĉagrenas, mirigas ĉi tio!  
Kion dirus maljunaj ĉasistoj pri ĉio,  
Ke, en nombra nobelroj-, sinjoroj-ĉeesto,  
Oni juĝos disputojn pri hunda vost-resto?  
Kion, reviviĝinte, Rejtan al ni dirus?  
En sian Laĥoviĉan tombon li reirus!  
Kaj kion Njesjoloŭski<sup>1)</sup>, vojevodo Ianda, 790  
Posedant' de plej fama ĉashundejo granda?  
Ducent pafistojn tenas tiu grand-nobelo,  
Cent ret-veturigilojn havas ĉe kastelo;  
Monaĥe, jarojn sidas li en domo sia,  
Ne akceptas invitojn al ĉasado ia;  
Al Bjalopjotroviĉa<sup>2)</sup> li rifuzis peto!  
Kion li povus kapti dum via ĉaseto?  
Bela estus la famo, se tia moŝtulo,  
Laŭ nuna modo kurus post lepor'-grizulo! 800  
En mia temp', nomataj estis, ĉasparole,  
Nobelaj bestoj: apro, urs', alk', lupoj, sole.  
Sen kojndentoj, ungegoj, sen kornoj bestaro

<sup>1)</sup> Niesiołowski Józef, grafo, lasta vojevodo de Novogrodek, prezidanto de revolucia juĝejo, dum insurekcio, kiun, kontraŭ Rusujo, organizis en Litvo Jasiński en j. 1794-a.

<sup>2)</sup> Białopiotrowicz Jerzy (Georgo), ŝtat-viro ĉe reĝo Stanisław August, lasta „Skribisto“ de Litva Grand-Duklando, partoprenis ankaŭ en la litva leviĝo kontraŭ rusoj en j. 1794.



Restis por la servistoj kaj la dungataro.  
 En manon preni volus neniu sinjoro  
 Pafilon, kiun ŝroto igis sen honoro!  
 Oni tenis vertragojn, ĉar, post ĉaso, vere  
 Okazas, ke elkuras, sub ĉeval' senpere,  
 Lepor'. Amuze, oni solvis hundoj-ŝnuron,  
 Sinjoridetoj faris ĉevale postkuron,  
 Ĉe okul' de ĝepatroj, kiuj vidi pelojn  
 Bonvolis, sed ne farus pro ili kverelojn!  
 Do, Ĉambelana moŝto, revoku ordonon,  
 Kaj al mi ne rifuzu favoran pardonon,  
 Ke mi ne partoprenos en ĉasado tia;  
 Neniam paŝon faros tien pied' mia!  
 Mi nomiĝas Hreĉeĥa: ekde reĝo Leĥo<sup>1)</sup>  
 Post la leporoj kuris neniu Hreĉeĥo.\*

810

Junularo ekridis tiam superbrue;  
 De tabl' oni levigis, Ĉambelan' unue:  
 Laŭ aĝ', ofico, lia estis digno tiu;  
 Irante, klinsaluton faris li al ĉiu;  
 Pastro post li, Juĝisto apud Bernardino.  
 Ĉe pord' Juĝist' brakdonis al Ĉambelanino,  
 Tade' al Telimena, al Tranĉist'-filino<sup>2)</sup>  
 Asesor', kaj Rejento al Hreĉeĥidino.

820

Tadeuŝ kelkajn gastojn al garbej' gvidante,  
 Sin konfuza, kolera, malgaja sentante,  
 Iris, kaj okazajojn pripensis sen fino:  
 Renkonton, vespermanĝon apud najbarino;  
 Ĉirkaŭ lia orelo precipe vorteto  
 „Onklinjo“ zumis, kiel trudiĝa muŝeto.  
 Li dezirus Vokiston demandi explore  
 Pri Telimen', lin kapti ne povis ĉi-hore;  
 Vojski ankaŭ forestis, ĉar, post vespermanĝo,  
 Ĉiuj iris post gastoj, zorgi pri aranĝo

850

\_\_\_\_\_

1) Lech, fabela protoplasto de leĥidoj (poloj), fondinto de urboj Gniezno kaj Poznań.

2) Reĝa tranĉisto (krajczy), antaŭe en Polujo kortega oficisto, plenumanta servon ĉe la reĝa tablo. Tiu ĉi ofico fariĝis poste nur titola.

En domo, kiel ĉambrojn por ripoz' reformi.  
Virinoj, maljunuloj, en dom' povis dormi;  
Junularon Tadeuŝ gvidis en garbejon,  
Mastron anstaaŭante, sur fojno-kuŝejon.

En domo mallaŭtiĝis post duona horo, 840  
Kiel en monaĥejo, post preĝa sono;  
Silenton interrompis nur voĉ' de gardisto.  
Ĉiuj dormas. Ne fermis okulojn Juĝisto:  
Li, kiel maestr', ekskurson en kampojn preparis  
Kaj en domo aranĝojn por amuzo faris;  
Kaj li, al ekonomoj, voktoj, garbejestroj,  
Skribistoj, domestrino, pafistoj, ŝtalestroj,  
Donis ordonojn, tago-kalkulojn kontrolis,  
Nun, kun help' de Vokisto, senvestiĝi volis.  
Vokist' malligis Sluckan<sup>1)</sup> zonan, or-teksitan, 850  
Per densaj kvastoj, kiel faskoj, lumigitan.  
Unuflanke orŝtofo kun purpur'-floraro,  
Inverse silko nigra, arĝent'-karearo;  
Ambaŭflanke metebla estas zono tia,  
Ora—solene, nigra—ĉe funebro ia.  
Nur Vokist' sciis zonan malligi, kunmeti;  
Li, ĉe-l' okupo, finis tiel bableti:

„Ĉu malbone, ke tabloj en kastelo staris?  
Neniu perdis; eble, ke vi gajnon faris.  
Ĉi kastelon koncernas ja procesaj aktoj: 860  
Por kastel', de hodiaŭ, nin rajtigas faktoj;  
Kaj, malgraŭ obstineco, la kontraŭpartia,  
Mi pruvos, ke okazis posed-preno nia.  
Se iu en kastelon gastojn peti pravas,  
Li pravas, ke posedon li prenas aŭ havas;  
Mi eĉ kontraŭpartion ateste proponas;  
Similajn okazaĵojn miaj tempoj konas.“

Juĝist' dormis. Vokisto en vestiblon iris  
Kaj, ĉe kandel', el poŝo libreton eltiris,

<sup>1)</sup> En Sluck (nun en Minska gubernio) estis fabriko, fondita de princo H. Radziwiłł en j. 1750-a, kie oni faris famajn orteksajn zonojn.

Kiu, kvazaŭ preĝaro, al li servas ĉiam; 870  
 Li forjetas ĝin hejme, vojaĝe, neniam.  
 Ĝi estis tribunala „vokando“: 1) laŭ vico  
 Tie sekvis procesoj, kiujn, ĉe-l' ofico,  
 Vokisto, propravoĉe, antaŭ jaroj vokis,  
 Aŭ kiujn li ekkonis kaj en libron lokis.  
 Al simpluloj „vokando“ ŝajnas nur nomaro,  
 Al Vokist', grandioza de bildoj skizaro.  
 Li legis kaj meditis: Oginski—Vizgird-o,  
 Dominikanoj—Rimŝa, Rimŝa—Visogird-o,  
 Radzivil—Vereŝĉaka, Gedrojĉ—Rodultovski, 880  
 Obuĥoviĉ—Kaĥalo 2), Juraha—Pjotrovski,  
 Maleski kun Mickjeviĉ, fine Graf' sinjoro  
 Kun Soplica; legante, en sia memoro  
 Li vidis grand-procesojn, okazaj'-seriojn,  
 Juĝejon, atestantojn kaj kontraŭpartiojn;  
 Kaj li sin mem rigardis en blanka jupano 3),  
 Kontuŝ' blunigra, antaŭ tribunal', kun mano  
 Unu sur sabro, dua al partioj donas  
 Alvok'-signon, kaj lia: „Silentu!“ eksonas.  
 Revante, fine de la vesper-preĝo sia, 890  
 Ekdormis lasta litva Juĝ-Vokisto nia.

Tiaj estis amuzoj, disputoj en rondo  
 De kvietaj vilaĝoj litvaj, dum la mondo  
 Resta dronis en sango; kaj vir', di' milita, 4)  
 En regimentoj-nuboj, milkanon'-armita,  
 Aglojn orajn, arĝentajn, al batala ĉaro  
 Junginte, de Libia dezert' ĝis Alparo,

1) Mallarĝa longforma libreto, en kiun oni enskribis la nomojn de la procesantaj partioj laŭ difinita ordo. Ĉiu advokato kaj ĉiu juĝa vokisto devis havi tian vokandon.

2) Estraro de izraelida komunumo.

3) Malsupra vestaĵo, sur kiun oni metis la kontuŝon (vidu antaŭe).

4) Napoleono I, Bonaparte, granda imperiestro de francoj (1804—1815), kiu militis en Egipto (1798) kaj en Sirio, kie lia generalo Kleber venkis la turkojn sur la monto Tabor (1799); same li venkis la aŭstrojn ĉe Marengo en Italujo (1800) kaj ĉe Ulm en Virtembergio (1805), kaj aŭstrojn kaj rusojn ĉe Aŭsterlic en Moravio (1805), fine li marŝis kontraŭ Rusujo (1812).

Flugis kaj tondre-jetis li fulmon post fulmo,  
Ĉe Piramidoj, Tabor, Marengo, ĉe Ulmo,  
Aŭsterlic. Post kaj antaŭ li, kuris Konkiroj 900  
Kaj Venko. Glor' de faroj, kaj de kavaliroj  
Heroaj nomoj, bruis de Nilo al Nordo,  
Sed kiel rokoj ilin, ĉe Njemena bordo,  
Rebatis vic', gardanta Litvon, feromura,  
Kontraŭ famo, por Moskvo, <sup>1)</sup> kiel pest', terura.

Tamen, kiel ĉiela ŝton', iam novaĵo  
Falis sur Litvon: Venas, peti pri manĝaĵo,  
Senkrura, aŭ senbraka iu almozulo;  
Nutrite, li rigardas per atent-okulo;  
Se li en domo vidas nek judan ĉapeton, 910  
Nek soldaton, nek rusan ruĝan kolumeton,  
Tiam, legionisto, li konfesas veron,  
Ke li portis maljunajn ostojn sur hejm-teron,  
Ne povante defendi ĝin plu...—Tiam tuta  
Famli', servistaro, kun alpren' saluta  
Lin akceptis ploregi! Kaj, ĉe tabl', al rondo,  
Li, kvazaŭ mirfabelojn, rakontis el mondo:  
Ke general' Dombrowski, <sup>2)</sup> ĉefo de komando,  
Al Poluj' penas marŝi el itala lando;

<sup>1)</sup> En senco de Rusujo; la nomo restis parte en la pola lingvo kiel mallongigo de la malnova nomo „Moskva Grand-Duklando“

<sup>2)</sup> Post la tria dispartigo de Polujo en j. 1795-a, polaj elmigrintoj, diskurinte en Eŭropo, pensis pri restarigo de la sendependeco de sia patrujo per armita forto. Henryk Dąbrowski, generalo en la insurekcio de Kościuszko, organizis en j. 1797-a, kun permeso kaj helpo de la franca registaro, en Italujo polan armeon (polaj legionoj) kaj preparis planon, por batale trapenetri kun ili en Polujon. Kiam tio ne prosperis, li restis plue en franca servo, partoprenis honore en la itala milito kaj enmarŝis (1798) en Romon. Lia subkomanda generalo Kniaziewicz, kreinto de t. n. apudnuba legiono, ricevis (1799) rekompence de siaj meritoj la distingon komision, enmanigi al la franca registaro la standardojn, konkiritajn de la tuta armeo ĉe-l' malamiko. Malgraŭ la brilaj faroj ne plenumiĝis la esperoj, kiujn oni alligis al la legionoj. Francujo disigis ilin en j. 1801-a, kaj parton de ili, kontraŭ ilia volo, ĝi elsendis sub komando de princo Jabłonowski sur la insulon San Domingo, igante ilin viktimo de malsanoj kaj de negraj bataliloj.

Ĉe li, sur kamp' lombarda, ariĝas la poloj; 920  
 Ke Knjazjeviĉ ordonas el la Kapitulo;  
 Ke li jetis, venkinte Cezar'-posteulojn,  
 Cent sangantajn standardojn al franc' en okulojn;  
 Ke Jablonovski kuris, kun legi', ĝis tero,  
 Kie kreskas la pipro, la kan' de sukero,  
 Kaj arboj, en eterna printempo, elspiras  
 Aromojn; li, venkante negrojn, hejmsopiras.  
 Ĉi rakont', en vilaĝo, rondiris kaŝite;  
 Junulo, ĝin aŭdinte, el domo subite  
 Malaperis; tra marĉoj, arbar', ŝteliĝante, 930  
 Antaŭ rusa postkuro en Njemen saltante,  
 Naĝis, sub akvo, ĝis la bordo de Varŝava  
 Dukland',<sup>1)</sup> por aŭdi voĉon: Ho, kolego brava!  
 Sed li saltis sur rokon, antaŭ ol foriris,  
 Kaj al rusoj trans Njemen: „Ĝis revido!“ diris.  
 Tiel iris Gorecki, Pac kaj Obuŝoviĉ,  
 Pjetrovski, Obolevski, Rujicki, Janoviĉ,  
 Mjejejevski-j, Broĥocki, Kupŝĉ kaj Gedimin-o,  
 Bernatoviĉ-oj, multaj aliaj sen fino:  
 Ili lasis gepatrojn en hejmlando kara, 940  
 Kaj bienojn forprenis trezorejo cara.

Okazis, ke al Litvo venis, de translime,  
 Almozist'; ekkoninte domon pli proksime,  
 Li malkudris gazeton el ŝkapulario;  
 Tie estis soldatoj-nombro, kaj, krom tio,  
 De ĉiu legiestro la nomo kaj sorto,  
 Kun priskribo de ĉies venko, aŭ de morto.  
 Post jaroj tiel venis al la familio,  
 Pri vivo, glori, pri morto de filo ekscio:  
 Pro timo silentante, dom' funebregon prenis, 950  
 Sed kiun ĝi funebriŝis, oni nur divenis

<sup>1)</sup> Varsovia Duklando, tiam (1811) pola ŝtato sendependa kun saksa dinastio, estis formita de Napoleono en j. 1807-a, post lia venko je Prusujo kaj Rusujo, el la partoj de Polujo, kiujn la prusoj forprenis post la lasta dispartigo en j. 1795-a. Tiu ĉi Varsovia Duklando, nomita tiel laŭ sia ĉefurbo, ekzistis ĝis la j. 1812-a, kaj post la Viena kongreso, ĝi transiris, kiel Pola Reĝlando, sub la rusan sceptron.

Ĉirkaŭe; kaj de mastroj mallaŭta ĉagreno,  
Aŭ ĝoj' mallaŭta, estis gazet' de bieno.

Vermo estis, laŭdire, tia almozisto:  
Li aparte parolis ofte kun Juĝisto;  
Post ĉi interparoloj disvastiĝis kure  
la famo ĉirkaŭe. Monaĥ', laŭfigure,  
Perfidis, ke ne ĉiam en kapuĉo sia  
Li iris, nek en servo maljuniĝis dia.  
Super dekstra orelo, en tempi'-alteco, 960  
Li havis haŭt-cikatron de mano-larĝeco,  
Kaj, en barbo, postsignon de paŝ', ponardego;  
Ĉi vundojn ne ricevis li ĉe meso-lego...  
Ne nur en vid' minaca, en cikatroj-speco,  
Sed en voĉ', movo, estis ia soldateco.

Ĉe meso, kun levitaj manoj, turniĝante  
Al popol', kaj „Sinjoro kun vi!“ eldirante,  
Li ofte, post lertega turniĝo, ekstaris,  
Kvazaŭ li „dekstren-posten“ laŭ komando faris; 970  
Kaj liturgio-vortojn li diris per tono  
De oficir', staranta antaŭ eskadrono:  
Servo-knaboj rimarkis ĝin, ĉe meso lia.  
Pri politiko estis Vermo pli konscia,  
Ol pri Sanktuloj-vivo; pro kolekto sia  
Veturante, li ofte havis mult-aferojn  
En urb' distrikta: jen li ricevis leterojn,  
Kiujn li ne malfermis ĉe fremdulo ia;  
Li sendis kurierojn, sed kien ne diris.  
Tre ofte li sekrete, dum nokto, eliris  
Al biendomoj, kun la nobelar' murmuris, 980  
Ĉirkaŭe kampovojojn piede-mezuris,  
En drinkej' kun kampuloj diskutis intime,  
Kaj ĉiam tion, kio okazis translime.  
Nun Juĝiston, jam ekde unu hor' en dormo,  
Li vekas; ŝajne venis li kun nov-informo.

## LIBRO II.

### KASTELO.

Ĉaso kun vertragoj je observita leporo. — Gasto en kastelo. — Lasta el korteganoj rakontas historion de lasta el Horeŝkoj. — Ekrigardo en frukto-ĝardenon. — Knabino inter kukumoj. — Matenmanĝo. — Petersburga anekdoto de sinjorino Telimena. — Nova eksplodo de disputoj pri Stumpulo kaj Falko. — Intervo de Vermo. — Parolado de Vojski. — Veto. — Iru kolekti fungojn.

Ĉiu el ni memoras, kiam, juna bubo,  
Li fajfante, en kampon iris kun paftubo;  
Rempar', baril' neniŭ lacigis piedon,  
Lim-pasante, ne konis vi fremdan posedon!  
Ĉar en Litvo ĉasisto, kiel ŝip' sur maro,  
Kien volas, libere vagas tra-l' vastaro:  
Profete li rigardas nubojn sur ĉielo;  
Multaj signoj vidiĝas al ĉasist'-okuloj;  
Sorĉiste li babilas kun ter': por urbuloj  
Muta, ĝi voĉojn flustras al lia orelo. 10

En herbej' krias kreko, ne serĉu en loko,  
Ĝi naĝas herbe, kvazaŭ en Njemen ezoko;  
Supre sonas printempa la sonorileto:  
Kaŝita, en ĉiela profund', alaŭdeto.  
Aglo, larĝa-flugile batante eterojn,  
Kiel kometo carojn, timigas paserojn;  
Akcipitro, sub helaj bluaĵoj pendante,

Kiel pingle-fiksita papili' flirtante,  
Ekvidis jen leporon aŭ birdon en valo:  
Falas sur ĝin rapide, kiel stelo-falo.

20

Kiam Dio permesos al ni, hejmreveni  
Kaj ree, sur patruja kampo, loĝon preni?  
Servi rajdiste, kontraŭ leporoj-grizuloj,  
Kaj pafi birdojn, kiel piedo-iruloj;  
Krom falĉil', rikoltilo, ne havi aliajn  
Armilojn; por gazetoj — dom-kalkulojn niajn!<sup>1)</sup>

Jam super Soplicovo la suno leviĝis,  
Falis sur pajltegmentojn, tra fendoj ŝteliĝis  
En garbejon; sur freŝa, aroma fojnaro,  
El kiu la sternajon faris junularo,  
El aperto tegmenta, per oritaj strioj,  
Kiel harlig'-rubandoj, fluis sun-radioj;  
Suno incitas buŝojn, per maten' brilanta,  
Kiel knabin', per spiko, amaton vekanta.  
Jam, saltante, ekĉirpis sub tegment' paseroj,  
Jam trifoje ekkriis laŭte la anseroj,  
Kaj eĥis meleagroj-ĥor' kaj anasaro,  
Kaj ekmuĝis, iranta en kampon, brutaro.

30

Leviĝis junularo. Tade' dormas plue:  
Li ekdormis hieraŭ post festen' malfrue,  
Veninte maltrankvila; ĝis krio de koko  
Li ne fermis okulojn, kaj, sur sia loko,  
Li turniĝis, ĝis tute en fojnon sin ŝovis.  
Li dormis, ĝis okulojn liajn vent' alblovis,  
Kaj malfermiĝis pordo de garbej', kun krako:  
Eniris, kun nodara zono, Verm'-Robako,  
Al Tade' „Surge puer!“<sup>2)</sup> severe vokante,  
Kaj ŝerce, super ŝultroj, la nodojn ŝvingante.

40

Jam sur korto ĉasistoj krias; oni kuras,  
Elkondukas ĉevalojn, gastoj alveturas;

50

<sup>1)</sup> Oni ne forgesu, ke Mickiewicz, skribante tiujn vortojn, estis ekzilito el patrujo.

<sup>2)</sup> Leviĝu, knabo! (latine).



Apenaŭ kort' ampleksos tiel grandan aron.  
 Sonas trumpetoj, oni ellasas hundaron:  
 Elkurinte, hurletas vertragoj, ĝojplenaj,  
 Ĉe vido de ĉasistoj, gvidiloj rimenaj.  
 Hundoj, kiel frenezaj, ŝvingiĝas sur korto,  
 Poste, por meti kolojn sur kolumojn, kuras;  
 Kaj ĉi-tio bonegan ĉasadon aŭguras.  
 Al vojir', Ĉambelana sonas signo-vorto:  
 Instigistoj ekiris unu post alia;  
 Post pordego, diskuris longa vic' ilia.  
 Meze rajdis, apude, Rejent', Asesoro;  
 Iam sin rigardinte kun malamo forta,  
 Nun, parolis amike homoj de honoro,  
 Irante al decido de disputo morta:  
 Eĉ vorto ne perfidis obstinon de koro.  
 Rejent' Stumpulon gvidis, Falkon—Asesoro  
 Sinjorinoj veturis poste, kaj ĉe ili  
 Galopis junularo, por kune babili.

60

La Pastro malrapide korton paŝ-mezuris,  
 Finante maten-preĝojn; li rigardojn jetis  
 Al Tade', jen sulkigis frunton, jen ridetis,  
 Fine li ŝvingis fingron; Tade' alveturis.  
 Fingron al nazo metis Verm', por minaceto;  
 Sed malgraŭ de Tadeo demando kaj peto,  
 Ke li eldiru klare, kion li ekvolis,  
 Monaĥo nek rigardis lin, nek alparolis,  
 Nur surtiris kapuĉon kaj preĝon murmuris;  
 Do Tade' al ceteraj gastoj forveturis.

70

Ĉasistoj tiam hundojn ĵus haltigis tute,  
 Kaj staris sur la lokoj senmove kaj mute;  
 Ĉiuj ripetis signon de silent'-ordono,  
 Kaj ĉiuj turnis siajn okulojn al ŝtono,  
 Kie staris Juĝisto. Li ekvidis beston  
 Kaj, por ordon', klarigan faris manogeston.  
 Ĉiuj komprenis, staras; Asesor', Rejento,  
 En kampo malrapide trotras en silento.  
 Tadeo, pli proksima, alvenis antaŭe,  
 Ekstaris ĉe Juĝisto, rigardis ĉirkaŭe.  
 Jam longe li ne ĉasis; sur grizaj spac-fonoj

80

37

Malfacile grizulon vidi inter ŝtonoj. 90  
 Montris al li Juĝisto: Sidis mizerulo,  
 Sub ŝtono platiĝante, orel-pintigante,  
 Kaj renkontis rigardojn per ruĝa okulo;  
 Kvazaŭ sorĉite, sian destinon sentante,  
 Time, ĝi eĉ ne turnis okulojn en loko,  
 Kaj, sub roko, senvive sidis, kiel roko.  
 En kampo proksimiĝas dume polvo-trenoj,  
 Kuras Stumpul', rapida Falko, ĉe rimenoj;  
 Rejent' kun Asesoro, ambaŭ krias nune:  
 „Pel! pel!“ kaj en polvajo malaperas kune. 100

Nun, kiam post grizulo komenciĝis pelo,  
 Grafo aperis, apud arbar' de kastelo.  
 Oni sciis ĉirkaŭe, ke tiu sinjoro  
 Nenie venas en la difinita horo.  
 Hodiaŭ, malfruante, li grumblis servistojn,  
 Kaj en kampon galopis, vidinte ĉasistojn,  
 En surtut' angla, blanka, longa, vent-flirtanta  
 Per baskoj; post li trotis servistar' rajdanta  
 En nigraj, brilaj, fungo-formaj ĉapeletoj,  
 Blank-pantalon', laĉitaj botoj, en jaketoj. 110  
 Servistojn, kiujn vestis Graf' per formo tia,  
 Oni nomis ĵokeoj en palaco lia.

Galopantaro kuris en eriko-valon;  
 Graf' ekvidis kastelon, haltigis ĉevalon.  
 Li, vidante kastelon, matene unue,  
 Apenaŭ ĝin rekonis: tiel, matenfrue,  
 Freŝiĝis kaj beliĝis konstruaj'-konturoj.  
 Grafon mirigis nova aspekto de muroj.  
 Tur' altiĝis dufoje, sur nebul' levite;  
 Lada tegmento brilis, de supre orite; 120  
 Sub ĝi, en kradoj flagris vitraĵoj rompitaĵ,  
 Per leviĝo-radioj ĉielarkigitaj;  
 Subajn etaĝojn kovris tego de nebulo,  
 Kiu breĉojn, fendegojn kovris por okulo.  
 Sonis ĉasistoj-krio, per vent' alpelite,  
 Kelkfoje de kastelaj muroj rebatite,  
 Kvazaŭ kastelo krius; sub nebul'-vualoj  
 Rekonstruiĝis muroj, hom-pleniĝis haloj.

Grafo amis vidajon, nekutiman ian;

Li nomis ĝin romana, same kapon sian 130  
 Romana; vere estis li granda strangulo.  
 Tre ofte li, pelante post vulp' aŭ grizulo,  
 Subite haltis, ĉiel-rigardis sopire,  
 Kiel kat', observanta paserojn ŝtelire,  
 Sur pino. Sen pafilo, rekrut'-forkurule,  
 Li vagis en arbaro; aŭ sidis silente,  
 Senmove, kun klinita kapo, ĉe-torente,  
 Kiel arde', manĝanta fiŝaron okule.  
 Tia estis sinjora Grafa stranga moro;  
 Ĉiuj diris, ke mankas io al sinjoro. 140  
 Tamen estis ŝatata: prapraav-moŝtulo,  
 Riĉega, tre humana por najbar', kampulo,  
 Eĉ por judoj.

Ĉevalon Grafo turnis bride,

Kaj alrotis, tra kampo, ĝis kastel' rapide.  
 La Grafo, sopirante, rigardis la murojn,  
 Eltiris paperujon kaj skizis figurojn.  
 For ducent paŝojn, vidis li, flank-rigardinte,  
 Homon, kiu egale vidajoj-ŝatulo,  
 Kun kap' levita, manojn en poŝojn metinte,  
 Ŝajnis, ke li kalkulas ŝtonojn per okulo. 150  
 Grafo tuj lin rekonis, sed kriis kaj plaŭdis  
 Kelkfoje, ĝis alvokon Gervazo ekaŭdis.  
 Nobel', de kastel-estroj servist' iam estis,  
 Kaj lasta el Horeŝkaj korteganoj restis;  
 Maljunul' alta, griza; vizaĝ' malsevena,  
 Severa, freŝa, sana, de suiketoj plena.  
 Iam, inter nobeloj, li fama ĝajulo,  
 Post batalo, en kiu kastel'-heredulo  
 Pereis antaŭ jaroj, li iĝis alia, 160  
 Iris al indulgenco-, edzofest' nenia;  
 Neniun li gajigis per sprita ŝerceto,  
 Nek aperis, sur lia vizaĝo, rideto.  
 Li iris en malnova livreo sinjora:  
 Jako, kun baskoj, flava; kadro el galono,  
 Kiu nun flava, iam certe estis ora,  
 Ĉirkaŭe, silkbrodite, Horeŝkoj-blazono:

Duonkapro<sup>1)</sup>; do, en la ĉirkaŭ' de kastelo,  
 Duonkapro nomatis maljuna nobelo.  
 Iajoje, pro lia senĉesa ripeto  
 De l' ĉevort', oni ankaŭ lin nomis Moŝteto; 170  
 Aŭ, pro la fendoj-plena kalvajo, Fendulo;  
 Gervazo mem sin nomis Rembajlo, Sabrulo.  
 Laŭ blazon' ne konate, kun titol'—Ŝlosisto,  
 Ĉar antaŭ jaroj tia kastel'-oficisto,  
 Li portis ŝlosil'-faskon, sur la pasamenta  
 Ligil', ĉe sia zono, kun kvasto arĝenta;  
 Kvankam li ion ŝlosi en kastel' ne povis,  
 Ĉar mankis pordoj; tamen li du-pardon trovis,  
 Kiun li mem ripari igis, propra-page,  
 Kaj sin, per ŝlos'-malŝoso, distris ĉiutage, 180  
 En unu el malplenaj ĉambroj ekloĝinte.  
 Manĝi favoran panon, ĉe l' Grafo, povinte,  
 Li ne volis, kaj, kvazaŭ malsana, sopiris,  
 Kiam li per kastela aero ne spiris.

Ekvidinte la Grafon, li deprenis ĉapon,  
 Antaŭ estroj-parenci li klinis la kapon  
 Kun grandega kalvajo, brilanta de fore,  
 De multaj sabroj dense signita memore;  
 Li glatis ĝin per mano, kaj, ankoraŭ foje,  
 Sin klininte: „Moŝteto!“ li diris malĝoje. 190  
 „Pardonu, Grafa moŝto! alparolo tia,  
 Ne malrespekto estas, sed kutimo mia:  
 „Moŝteto“, diris ĉiuj Horeŝkoj; Tablestro<sup>2)</sup>  
 Lasta, tiun ĉevorton uzis, mia estro.  
 Do, ĉu vere, Moŝteto, ke vi mon-avaras  
 Por proces'? al Soplicoj kastel'-cedon faras?  
 Mi ne kredis, distrikte oni tion diris.“  
 Rigardante kastelon, Gervazo sopiris.

<sup>1)</sup> Duonkapro (Pólkozic), blazono, havanta en ruĝa kampo (ŝildo) azenan kapon kaj, super kasko (helmo), duonon de virkapro.

<sup>2)</sup> Tablestro (stolnik) antaŭe en Polujo ofico, komence kortega, poste krona, al kiu estis ligita la devo, servi al la reĝo ĉe tablo; plenumantoj ĝin fariĝis kelkfoje senatoroj, kaj Stanisław August Poniatowski, antaŭ kiam li fariĝis reĝo, estis litva tablestro.

„Ĉu strange?—diris Grafo—granda kost', enue  
 Jam fariĝas; mi finos, ĉar nobelo plue 200  
 Obstinas, kaj min volas tute enuigi:  
 Do plu mi ne rezistos kaj volas pac-igi,  
 Akceptante de l' juĝo kondiĉoj-donacon.“  
 „Pacon? kriis Gervazo: kun Soplicoj pacon?  
 Kun Soplicoj, Mošteto?“ Ĉi tion dirante,  
 Li kurbigis la buŝon, mem vortojn mirante.  
 Pac', Soplicoj! Mošteto, Estreto! laŭ vido  
 Vi ŝercas? La kastelo, de Horeŝkoj sido,  
 Transiros al Soplicoj? Deiru, bonvole,  
 El selo. Ni kastelon iros. Vidu sole. 210  
 Ne rifuzu! Dirajon vi mem ne komprenis...“  
 Kaj li, por elseliĝo, piedingon tenis.

Sur kastel-sojlo, diris Gervazo: „Antaŭe,  
 Ĉi tie la Tablestro, domanoj ĉirkaŭe,  
 Ofte sidis en seĝoj, posttagmanĝa-hore.  
 Li pacigis kampulojn, aŭ, bona-humore,  
 Al gastoj historiojn diris belrakonte,  
 Aŭ per iliaj ŝercoj distriĝis volonte;  
 Junularon, en korto, skermiloj amuzis,  
 Aŭ ĝi turkajn ĉevalojn dresante rajd-uzis.“ 220

En vestiblo li diris: „Ĉi vestiblo, nune  
 Ne havas, en pavimo, tiom ŝtonojn kune,  
 Kiom, bontempe, krevis ĉi tie bareloj;  
 Nobelar', tiris tinojn sur zonoj el keloj,  
 Invitite al seĝmo<sup>1)</sup> distrikta aŭ landa,  
 Al nomfesto sinjora, aŭ ĉasado granda.  
 Sur ĉi ĥorejo staris kapel' dum festeno  
 Kaj sur instrumentaro ludis kaj orgeno<sup>2)</sup>;  
 Trumpetoj tondris, kiel en juĝ-tago lasta,  
 Dum vivukrioj sekvis laŭ ordo toasta: 230  
 Je l' san' de reĝa moŝto toaston unue,  
 Kaj poste de primaso,<sup>3)</sup> de moŝto reĝina,

<sup>1)</sup> Leĝdona kunveno de delegitoj (parlamento).

<sup>2)</sup> En malnovaj kasteloj oni starigis sur ĥorejo orgenon.

<sup>3)</sup> Primaso, titolo de Gniezna ĉefepiskopo en Polujo;  
 li estis respektata kiel pola Ekleziestro, unua princo en la  
 ŝtato, kaj, post la morto de reĝo, lia anstataŭanto.

De nobelar', de tuta Respubliko plue;  
Fine, post eltrinkita vinpokalo kvina,  
Oni levis: Ni amu nin! Vivu' senfina,  
Ĝi tage ekkriita, sonis ĝis mateno:  
Kaleŝoj, veturiloj staris sur posteno,  
Por hejmen veturigi ĉiun post festeno.

Ili trairis ĉambrojn; Gervaz', silentante,  
Jen sur muro, arkajo, rigarde haltante, 240  
Alvokis rememorojn, agrable, malĝoje;  
Kvazaŭ: „Ĉio finiĝis!“ li dirus kelkfoje,  
Li balancis la kapon, manon svinge movis;  
Ŝajne li, en memoro mem, turmenton trovis,  
Kaj volis ĝin forpeli. Ili halton faris  
Supre, en granda, iam spegula salono.  
Post spegularo, kadroj nur, malplenaj staris,  
Sen vitr' fenestroj; kontraŭ pordego, balkono.  
Maljunul' tie kapon klinis plenmedite,  
Kovris per man' vizaĝon; ĝi, re-malkovrite, 250  
Esprimis malesperon kun melankolio.  
Grafo, kvankam ne sciis signifon de ĉio,  
Rigardante lin, havis emocian senton,  
Kaj premis lian manon; maljunul' silenton  
Interrompis, skuante per levita mano:  
„Ne estos pac', Moŝteto, inter Soplicano  
Kaj sango de Horeŝkoj, fluanta ĝis horo  
En vi, parenc' Tablestra, post patrino via,  
Ĉasestrino,<sup>1)</sup> filino de la Kastelano,<sup>2)</sup>  
Kiel sciate, onklo de mia sinjoro. 260  
Auskultu: historio, via familia,  
Okazis en ĉi tiu ĉambro, ne alia,

<sup>1)</sup> Ĉasestrino, edzino de la Ĉasestro (Łowczy), kortega reĝa oficisto, kiu devis zorgi pri konservado de la ĉasbestaro kaj pri la aranĝado de ĉasoj por la reĝo. Ĉi tiu ofico fariĝis poste titola.

<sup>2)</sup> Kastelano, antaŭe supera oficisto en Polujo; li havis sidon en senato kaj li estis, laŭ digno, malsupera ol vojevodoj, kun escepto de la Krakova kastelano, havanta rangon antaŭ vojevodo, kaj de la Vilna kaj Trokia, egalaj al la vojevodoj.

Mia sinjor', Tablestro, alt-familiano,  
 Riĉulo, estis patro de unu infano,  
 Filin' anĝele bela; pri fraŭlin' tiela  
 Svatigis grand-sinjoroj kaj aro nobela.  
 Inter nobeloj estis brulkapulo granda,  
 Jacek Soplica, ŝerce Vojevodo landa  
 Nomata; li graviĝis en vojevodlando,  
 Havante Soplicanojn kvazaŭ sub komando: 270  
 Tricent famili-voĉojn li regis laŭvole,  
 Kvankam li mem posedis ter-peceton sole.  
 Kaj sabron, kaj lipharon grandan, ĝis orelo.  
 Tablestro kuraĝulon, dum sejm', al kastelo  
 Alvokis kaj regalis ofte, malavare,  
 Parencojn, partianojn, traktis populare.  
 Lipharul' fieriĝis, pro akcept' favora,  
 Ke li imagis iĝi bofilo sinjora.  
 Al kastel', nepetite, tre ofte li venis,  
 Kaj fine, kiel hejme, kvazaŭ loĝon prenis. 280  
 Li volis jam deklari: ĝin rimarkis oni,  
 Kaj igis nigran supon<sup>1)</sup> ĉe la tablo doni.  
 Laŭ dir', Tablestridino Soplicon korsentis,  
 Sed, al gepatroj, tion profunde silentis.

„Tio estis Kosciŭska temp’; sinjor’ protektis  
 Leĝon de Tria Majo<sup>2)</sup>, nobelojn kolektis,  
 Por elmarŝi al helpo de konfederuloj,  
 Kiam, nokte, kastelon ĉirkaŭis moskvuloj.<sup>3)</sup>”

<sup>1)</sup> Nigra t. e. sango-suppo, donita ĉe la tablo al fraŭlo, svatiĝanta pri fraŭlino, signifis rifuzon.

<sup>2)</sup> Leĝo de Tria Majo, t. e. Konstitucio de la 3-a de Majo, 1791 j., trovis kontraŭulojn en kelkaj grandsinjoroj polaj, kiuj samtempe kun Rusujo konspiris, por nuligi ĉi tiun tre liberalan ŝtatan reformon, povantan savi Polujon de minacanta fina perejo, kaj ili formis la kontraŭ-konfederacion (unuigon) en Targovica (1792) kun Feliks S. Potocki kiel ĉefo. Kontraŭ la rusa armeo, kiu invadis en Litvon kaj Ukrainon, kaj estis subtenata de la Targovicanoj, marŝis princo J. Poniatowski, Kościuszko, Zająček kaj princo Ludoviko Virtembergia. La Tablestro ne apartenis al la perfiduloj Targovicanoj.

<sup>3)</sup> Moskvulo (moskovito, moskal), malnova nomo por grand-ruso, same kiel Moskvo por Grand-Rusujo (komparu p. 32).

Nur estis temp', alarme elpafi pistujon,  
 Fermi malsupre pordojn, kaj ŝtopi riglujon. 290  
 Dome estis: Tablestro, mi, Estrino nia,  
 Kuirist', du helpantoj, ĉi trio ebria,  
 Prepost', lake', hajdukoj kvar, kuraĝeguloj:  
 Do pafiloj fenestren! Ĵus moskva amaso  
 Kun „hura!“ de l' pordego kuras sur teraso;  
 Kaj ni el dek pafiloj tondras: „For, kriuloj!“  
 Oni vidis nenion; servistoj senhalte  
 Pafis malsupre, Estro, mi, balkone-alte.  
 Ĉio iris belorde, kvankam en teruro:  
 Dudek pafiloj kuŝis ĉi tie, ĉe muro; 300  
 Post elpafo de unu ni havis alian.  
 La preposto helpante faris servon tian,  
 Estrin', Fraŭlin', kortega fraŭlinaro, same:  
 Do estis tri pafistoj, pafantaj ĉiame.  
 De malsupre, moskvuloj kuglojn hajle pafis;  
 Ni, el supre, malofte, sed pli bone trafis.  
 Trifoje rusoj pordon jam tuŝis alsalte,  
 Sed ĉiufoje trio levis krurojn alte.

Do ili en tenejon rifuĝis matene.  
 Tablestro sur balkonon eliris serene: 310  
 Se el tenejo kapon eligis soldato,  
 Estro pafis, neniam maltrafis la bato;  
 Ĉiufoje kaskedo nigra falis teron,  
 Do jam malofte iu montris vizieron.  
 Estro volis, vidante timegon ilian,  
 Fari ekskurson, kaptis karabelon <sup>1)</sup> sian,  
 Kriante el balkono, servistojn ordonis,  
 Kaj, al mi turniĝante: „Sekvu min!“ proponis.  
 Ĵus pafo el pordego... Tablestr' ekbalbutis,  
 Li ruĝiĝis, paliĝis, sangokraĉe sputis; 320  
 Mi vidas: jen trafita Brust'! Ŝanceliĝante,  
 Falis Sinjor', per fingro pordegon montrante;  
 Mi rekonis ĉi tiun friponon! Soplica!  
 Laŭ kresko kaj lipharoj! Lia paf' malica  
 Mortigis Estron, vidis mi! Li ne fortiris

1) Karabelo, malpeza kurba sabro kun ornamita tenilo.



Levitan tubon, fumo ankoraŭ eliris!  
Mortigint', kiel ŝtono, staris! Mi elpafis,  
Lin celante, dufoje, sed pafoj maltrafis  
Dufoje, pro kolero aŭ malĝoj' en koro...  
Mi aŭdas virin'-krion — malvivis Sinjoro.“ 330

Eksilentis Gervazo, kun larmaj okuloj,  
Poste li finis: „Pardon jam rompis moskvuloj;  
Ĉar mi, post mort' de-l' Estro, staris senkonscie,  
Jam ne sciante, kio okazis ĉi-tie.  
Feliĉe, helpe venis Pan Parafjanoviĉ  
Kun ducent Mickjeviĉoj, ĉi el Horbatoviĉ,  
Kiu estas multnombra, brava nobelaro,  
Kaj malamas Soplicojn, pli ol de centjaro.

„Tiel mortis potenca estro, justa, pia;  
Havis seĝojn,<sup>1)</sup> rubandojn, bastonegojn lia 340  
Dom'; li, kampuloj-patro, frato nobelara,  
Ne lasis, kiu venĝon tombe-jurus, filon!  
Sed fidelajn servistojn. Mi, en sango kara,  
Tremis mian rapiron, mian plum-fendilon,  
(Verŝajne, ke vi aŭdis pri mia rapiro,  
Fama en ĉiu sejmo, sejmeto, foiro);  
Mi juris, ke ĝin fendos nuk' de Soplicano,  
Serĉis ĝin dum invadoj,<sup>2)</sup> sejm', foir'; kverele  
Mi morthakis per sabro du, kaj du duele;  
Unu-n mi ekbruligis en ligna kabano, 350  
Kiam ni Koreliĉojn kun Rimŝa invadis,  
Li rostiĝis misĝurne<sup>3)</sup>; mi ne kalkuladis  
De kiuj mi fortranĉis orelojn. Ĉi-hore  
De mi ricevis unu nenion memore!  
Naska fratet' de tiu lipharul' fripona  
Vivas ĝis nun, pro sia riĉec', fanfara;“

<sup>1)</sup> Tiu ĉi verso signifas, ke la Tablestro havis en sia familio senatorojn (seĝojn senatorajn), virojn ornamitajn per ordenaj rubandoj kaj hetmanojn (kun komandestraj bastonegoj).

<sup>2)</sup> Invado (zajazd) posedopreno de juĝe-rajtigito, per helpo de armita nobelaro, kiu plenumis la juĝan verdikton, anstataŭante la nesufiĉan policon.

<sup>3)</sup> Tiu ĉi graso fiŝo rostiĝas laŭdire en propra graso.

De Horeŝkoj kastelon li tuŝas lim-strie,  
Respektata distrikte, Juĝisto ĉi-tie!  
Al li kastelon cedos vi? piedo lia,  
Malinda, viŝos planke la sangon de mia 360  
Estro? Ne! kiel longe animon sentantan  
Havas Gervaz', kaj forton, ke li mane levos  
Ŝian fendilon, nune ĉe muro pendantan,  
Tiel longe kastelon Soplic' ne ricevos!\*

— „Ho! — kriis Grafo, manojn alsupre levante,  
Mi antaŭsentis bone, ĉi murojn ŝatante!  
Kvankam mi ne suspektis ilin pri tiela  
Trezor' da dramaj scenoj por rakonto bela!  
Kiam mi el kastelo forpelos Soplicon,  
Vi ricevos, en muroj, kastelestr'-oficon. 370  
Via rakont', Gervazo, interesas vere;  
Domaĝe, vi ne gvidis min malfru-vespere;  
Per mantel' drapirite, mi sur ruinaĵoj  
Sidus, kaj vi rakontus pri sangaj farajoj.  
Domaĝe, vi rakontan talenton ne flegis!  
Similajn tradiciojn mi aŭdis kaj legis;  
En Anglujo, Skotujo, ĉiu lord-sidejo,  
En Germanuj', grafkorto — mortigoj-scenejo!  
Ĉiu nobla, potenca ligo familia

Estas fama pro sanga perfidaĵo ia, 380  
Post kiu, heredate, venĝo iras plue;  
En Poluj' ĉi okazon mi aŭdas unue.  
Mi sentas, ke Horeŝka sang', en mia koro,  
Ion ŝuldas al gento kaj al propra gloro!  
Jes! kun Soplica rompos mi ĉian traktadon,  
Se eĉ pistolon preni mi devus aŭ spadon!  
Honor'-ordon'...\* Ekiris li, per paŝ' solena,  
Kaj Gervazo lin sekvis, en silento plena.  
Antaŭ pordego, Grafo rigardis kastelon;  
Al si mem parolante, li saltis sur selon, 390  
Kaj, al parol', distrite, tian donis finon:  
„Domaĝe, ke Soplica ne havas edzinon,  
Aŭ de filino ĉarmojn adori mi devus!  
Kaj, amante, mi ŝian manon ne ricevus;  
Estus nova konflikto de sentoj en dramo:  
De koro kun la devo—de venĝo kun amol\*“

Li spronis, la ĉevalo al bieno kuris;  
Duaflanke ĉasistoj el arbar' veturis.  
Graf', ĉas-amant', apenaŭ pafistojn ekvidis,  
Ĉion forgesis, rekte al ili rapidis; 400  
Ĉe pordego, ĝardeno, barilo, pasante,  
Li, ĉe baril', vojturne, haltis rigardante.  
Frukt-ĝardeno:

En vicoj staris frukt-arbaro,  
Ombrante vastan kampon; malsupre bedaro.  
Tie griza brasiko, kun kalvajo-klino,  
Sidas, ŝajne meditas pri legom'-destino.  
Silikvojn, en verdajon de karot', plektante,  
Staras fabo, okulojn mil al ĝi turnante.  
Aliloke maiza or-tufo leviĝas;  
Ie akvomelono dikventra vidiĝas, 410  
Kiu for, malproksime de siaj trunketoj,  
Ruliĝis, kiel gasto, al la ruĝaj betoj.

Bedojn tranĉas limetoj. Sur fosajoj ĉie  
Staras, kvazaŭ sur gardo, kanabo serie —  
Ĉi cipres' de legomoj, rekta kaj verdanta;  
Bedojn gardas kanaba odor' penetranta:  
Tra folioj ŝoviĝas vipero nenia,  
Raŭpoj, insektoj, mortas de odor' ilia.  
Plu, de papav' leviĝas blanka trunketaro;  
Vi pensus, ke sidanta papilioj-aro 420  
Flirtas sur ĝi flugile, ĉielarke-brile,  
Diverskoloro, hele, juvelar'-simile:  
Pupilon logas tiom papavo-koloroj.  
Kiel plenluno inter steloj, meze floroj  
Ronda sunflor', kun granda vizaĝo orflama,  
Sekvas suno-iradon per alturn' ĉiama.

Ĉe barilo, mallarĝaj levoj de tereno,  
Sen arboj, sen arbustoj; kukumoj-ĝardeno.  
Ili belkreskis; granda, vasta foliaro  
Kovris la bedojn, kvazaŭ tapiŝa faldaro. 430  
Meze iris knabino, en vesta blankaĵo,  
Kaj dronis, ĝis genuoj, en maja verdajo;  
Klinante sin, el bedoj ĝis sulketoj fore,

Ŝi kvazaŭ sur folioj naĝis, verd-kolore.  
 Pajlĉapel' ŝirmis kapon de suna radio,  
 Du rozaj rubandetoj flirtis de tempio,  
 Kaj kelk bukloj de blondaj, malplektitaj ruloj;  
 Sur brak' ŝi havis korbbon, mallevis okulojn;  
 Kvazaŭ por kapt' leviĝis ŝia dekstra mano.  
 Kiel knabino pelas fiŝetojn en bano, 440  
 Kun ŝia piedeto ludantajn, simile  
 Ŝi kun korbo, al frukto, sin klinas facile,  
 Laŭ puŝo de piedo, aŭ okul'-elekto.

Graf', ravite de tiel mirinda aspekto,  
 Aŭdante for huf-batojn, al anoj li faris  
 Mano-signon por halto; do ili ekstaris.  
 Li, eltirinte kolon, fiksis la rigardon;  
 Kiel gruo, de l' aro for, farante gardon,  
 Staras unupiede, vigl-atenti penas,  
 Por ne ekdormi, ŝtonon en la dua tenas. 450

Grafon vekis sur ŝultroj kaj tempi' susuro:  
 Jen estis Pastro Vermo; en lia manplato  
 Balanciĝis, levita supren, nodoj-ŝnuro.  
 Li kriis: „Vi kukumojn volas? jen salato!  
 For, sinjor', de l' domaĝo! sur ĉi-tiu bedo,  
 Ne por vi estas frukto; ne helpos rimedo“.  
 Minacinte per fingro, kapuĉon alie  
 Li ŝovis kaj foriris. Grafo restis tie;  
 Pro subita obstaklo, ride kaj malbene,  
 Ĝardenon rerigardis li, sed jam ĝardene 460  
 Ŝi forestis; lumetis nur, en fenestreto,  
 Ŝia roza rubando kaj blanka robeto.  
 Kian vojon ŝi kuris, tion montras bedo:  
 Verda foli', puŝita kure, de piedo,  
 Leviĝis, tremis, fine restis en trankvilo,  
 Kiel akvo, fendite de birdaflugilo.  
 En loko, kie staris ŝi, jus forjetite,  
 Korbet' pigmesalika, funde renversite,  
 Perdinte siajn fruktojn, sur foli' pendiĝis 470  
 Kaj ankoraŭ, sur verda ondo, balanciĝis.

Post moment', ĉie estis solece, silente.

Graf', rigardante domon, aŭskultis atente;  
 Li meditis; pafistoj senmove, senbrue,  
 Staris post li. La domo, mallaŭta unue,  
 Ekurmurmis, ekbruis, kiele malplena  
 Abeluj', dum enflugo de svarmo revena.  
 Jen signo, ke el ĉaso gastoj reveturis,  
 Kaj servistoj, ĉe tabloj, laboreme kuris.

Efektive movado ekregis ĉambraron:

Oni portis botelojn, manĝojn, manĝilaron. 480  
 Viroj, kiel eniris, en vestoj de ĉaso,  
 Iradis tra la ĉambroj, kun teler' aŭ glaso,  
 Manĝis, trinkis, aŭ, apud fenestr'-apogiloj,  
 Diskutis pri vertragoj, leporoj, pafiloj.  
 Juĝist', Geĉambelanoj — ĉe tabl'; en angulo  
 Flustris fraŭlinoj; mankis ordo, laŭ regulo,  
 Observata ĉe taga kaj vespera manĝo;  
 Tio estis, en pola domo, nov-aranĝo:  
 Ĝin sinjoro Juĝisto toleras matene,  
 Kvankam li la senordon ne aprobas plene. 490

Diversa ankaŭ estis de manĝaĵoj vico;  
 Por sinjorinoj, pletoj kun kafo-servico.  
 Sur pletoj, ornamitaj per floroj-pentrado:  
 Arome vaporantaj kafkruĉoj el lado;  
 Taso, oritaj, el la porcelan' sakslanda,  
 Kaj por ĉiu, kun kremo, poteto malgranda.  
 Kafon, kiel la pola, ne konas translimo;  
 En pola dom' bonstata, laŭ malnov-kutimo,  
 Estas, por kaf-preparo, aparta virino,  
 Kafistin'; ŝi, el urbo aŭ el ŝip' vicino,<sup>1)</sup> 500  
 Prenas plej bonan specon de kafa grajnaro,  
 Kaj konas la sekretojn de trinkaj'-preparo;  
 Karbe-nigra, ĝi havas de sukcen' klarecon,  
 Aromon de la mokko kaj miel'-densecon.  
 Bonan kremon bezonas kafo, mem-komprene;  
 Ĝi ne mankas vilaĝe; kafistin', matene,

<sup>1)</sup> Vicinoj (wiciny), grandaj riverŝipoj sur Njemenō, per kiuj la litvanoj faras komercon kun Prusujo, flosigante ĝrenon kaj prenante intersanĝe koloniajn komercaĵojn.

Kruĉojn alfajriginte, en laktejon iras,  
Kaj, delikate, freŝan lakt-floron detiras,  
En apartan, por ĉiu taso, belpoteton,  
Ke ĝi ricevu propran sian krem-ŝeleton. 510

Maljunulinoj trinkis kafon jam pli fruan;  
Ili por si preparis nun manĝajon duan:  
El varmega biero, kreme blankigita,  
En kiu naĝis, floke, kaze' pecigita.

Por viroj, fumajitaj kuŝas viandajoj:  
Anseraj brustoj, ŝinkoj, de lango tranĉajoj;  
Ĉio bonega, ĉio domo-maniera,  
Kamene-fumajita, en fum' junipera.  
Oni enportis zrazojn<sup>1)</sup> por lasta donajo:  
Ĉe Juĝisto, jen estis matena manĝajo. 520

En du ĉambroj, diversaj rondoj sin kolektis:  
Ĉe tableŭ, maljunuloj sidejon elektis,  
Parolis pri mastrajoj progres'-manieraj,  
Kaj pri caraj ukazoj,<sup>2)</sup> ĉiam pli severaj.  
El la novajoj, kiuj pri milit' rondiris,  
Ĉambelan' politikajn konkludojn eltiris.  
Preninte okulvitrojn, de Vojski filino  
Amuze kart-aŭguris al Ĉambelanino.  
De junuloj diskuto pri ĉaso, en dua  
Ĉambro, ĝi estis malpli, ol kutime, brua; 530  
Ĉar Asesor', Rejento, grandaj parolitoj,  
Konuloj de ĉasarto, plej bonaj pafistoj,  
Ambaŭ sidis kontraŭe, kaj grumble koleris:  
Instiginte vertragojn, ili cert-esperis  
Venkon de siaj hundoj, kiam, sur ebena,  
Troviĝis ia bedo de kampula greno.  
Tien kuris leporo; Stumpul', Falk' ĝin tenas,  
Kiam Juĝist' rajdantojn ĉe limo retenas.  
Ili devis obei, kvankam grand-kolere;  
Hundoj revenis solaj; kiu scias vere: 540

<sup>1)</sup> Zrazoj (zrazy), stufitaj frapviando-ruletoj.

<sup>2)</sup> Ukazoj, dekretoj, ordonoj en la nomo de l' rusa imperiestro.

Ĉu la besto forkuris? kiu ĝin akiris?  
Ĉu Stumpulo ĝin manĝis, ĉu Falko disŝiris?  
Ambaŭ kune? Diversa estis punkt' de vido,  
Kaj la disputo daŭris plue, sen decido.

Maljuna Vojski ambaŭ ĉambrojn trairante,  
Kaj, distrite, partiojn ambaŭ rigardante,  
Ĉasistojn, maljunulojn preterpasis mute;  
Videble, ke alio lin okupas tute.  
Li portas led-klakilon, haltas kun murmuro,  
Meditas, fine — muŝon mortigas sur muro. 550

Tade' kun Telimeno, inter ĉambroj, sole,  
Staris sur porda sojlo, mez-interparole.  
Ĉar estis, ĝis aŭdantoj, nur interspaceto,  
Ili flustris. Nun scias Tade': Onklineto  
Telimen', sinjorino estas riĉostata,  
Kaj, kun li, ŝi ne estas kanone-ligata<sup>1)</sup>  
Per troa parenceco; kaj eĉ dube restas,  
Ĉu Telimen', por nevo, parencino estas.  
Onkla fratin'? ĉar nomis ŝin tiel, sen senco,  
Kunaj gepatroj, malgraŭ aĝo-diferenco. 560  
Kaj poste, en ĉefurbo, tre longe vivante,  
Ŝi, al Juĝisto, faris komplezojn konstante;  
Tial ŝatas Juĝisto, ŝin tre estimante,  
Ĉe la homoj, sin nomi frato, — eble vante;  
Pro amikec', ne donis ŝi la malpermeson.  
Tade', malpeza-kore, elaŭdis konfeson.  
Mult-aliajn aferojn ili nun deklaris,  
Kaj ĉion ĉi en unu momenteto faris.

Sed en la ĉambro dekstre, kun incita tento,  
Asesor', preterpase, diris al Rejento: 570  
„Ne povis ja sukcesi ĉaso en bieno  
Tiel frue: ankoraŭ trunke-staras greno,  
Kaj de kampuloj bedoj kun gren' nefalĉita;  
Do la Grafo ne venis, malgraŭ kart' invita.

<sup>1)</sup> Tio signifas, ke ili ne estas tiel proksimaj geparencoj, ke, laŭ katolikaj ekleziaj reguloj (kanonoj), ili ne povus geedziĝi.

Grafo pruvis pri ĉaso tre bonan komprenon,  
Priparolante ĉaso-tempon kaj terenon;  
Li trans lim' edukigis, ekde infaneco,  
Kaj li diras, ke tio estas barbareco,  
Ĉasi, kiel ĉi-tie, kun plena neglekto  
De statut'-artikoloj, sen ia respekto  
De ies kampolimoj, sur la fremdaj grundoj,  
Sen posedant'-permeso; rajdi kun ĉashundoj,  
Printempe kaj somere, tra kampoj, arbaroj;  
Mortigi vulpon dum la ŝanĝado de haroj;  
Pri leporin' graveda tute ne atenti,  
Kaj permesi al hundoj, ŝin morte-turmenti,  
Kun domaĝ' al bestaro. Grafo plend-atestas,  
Ke, ĉe rusoj, pli granda civilizo estas:  
Tie, pri ĉaso, estas ukazoj de caro,  
Inspekto de polico, por kulpoj — punaro\*.

580

590

Telimen', al maldekstra flanko turniĝante,  
Per batista tuketo ŝultrojn ventumante,  
Diris: „Kiel mi panjon amas, Grafo pravis;  
Mi konas ja Rusujon. Gesinjoroj havis  
Dubojn, kiam mi diris: en multa rilato,  
Laŭdon meritas vigla severec' de l' ŝtato.  
En Petersburg' mi estis ne foje, multfoje!  
Ĉarma memor' de bildoj, forpasintaj ĝoje!  
Kia urb'! Vi ne estis en Petro-urbeto?  
Urboplanon mi havas en la skribtableto.  
Petersburganoj loĝas en „daĉo“ somere;  
Daĉ' — vilaĝo, vilaĝa palacet', pli vere.  
Mi loĝis palaceton tian, ĉe-rivere,  
De l' urbo nek tro fore, nek ĉe l' urb' senpere,  
Sur negranda, intence ŝutita monteto:  
Ho, kia dom'! Mi havas planon en tableto.  
Jen, malfeliĉe, luis domon, ĉe la mia,  
Suboficist', polica esploranto ia;  
Li havis kelk-vertragojn: vera turmentaro  
Estas tia, kun hundoj, oficist', najbaro!  
Kiam, kun libro, iris mi ĝarden'-trankvilon,  
Ĝui vesper'-malvarmon, kaj de luno brilon,  
Tuj alkuris kaj svingis voston hundo lia,  
Orelojn pintigante, kiele furia.

600

610



Mi timis, mia koro aŭguris multfoje  
Pro hundoj malfeliĉon; finiĝis malĝoje:  
Tra l' ĝardeno promenis mi, en iu tago,  
Kiam amaton mian sufokis vertrago.

Bolonjan' estis ĉarma ido de hundino! <sup>1)</sup>

Mi havis ĝin donace de princo Sukin-o.

620

Hundet' prudenta, vigla, kiel sciureto;

Ĝian portreton havas mi en skribtableto;

Ĝi kuŝis nun senvive; do min, pro ĉagreno,

Atakis korbatao, spasmoj, naŭzo, sveno.

Mi eble pli suferus, sed min, por feliĉo,

Vizitis Kozodusin, <sup>2)</sup> Kiril' Gavrilĉ-o,

Kortega Grand-Ĉasestro, kaj, en ĝusta horo,

Demandis min pri kaŭzo de malbon-humoro,

Kaj igis oficiston per ore! aliri:

Li venis pala, trema, pen-kapabla spiri.

630

— Graved-cervinon, tondris Kiril', per hundaro

Vi ĉasis, en printempo, sub nazo <sup>3)</sup> de caro? —

Oficist' konsterniĝis kaj juri komencis,

Ke li, ankoraŭ ĉason fari, ne intencis;

Ke, kun granda permeso de Ĉasestro Granda,

Besto ŝajnas ne cervo, sed hund' itallanda.

— Kion? kriis Kirilo, kanajl'! arogecon

Vi havus, koni ĉason, kaj de bestoj specon,

Pli, ol mi, Kozodusin, cara Jegermajstro? <sup>4)</sup>

Do, inter ni, tuj juĝon faros Policmajstro! —

640

Al Policmajstro oni esploron ordonas:

— Mi, diras Kozodusin, ateston eldonas,

Kontraŭ li, ke jen estas ne hundo, sed cervo;

Juĝu, kiu pli bone ĉasobestojn konas! —

Policmajstro komprenis devon de la servo,

Pri malrespekto de la oficisto miris,

Kaj lin, flanke, per frata konsilo inspiris:

Do li, por lavi pekon, la kulpon konfesis.

<sup>1)</sup> Bolonjano, speco de italaj hundetoj; la vortoj „de hundino“ kaj „Sukin-o“ estas samsignifaj.

<sup>2)</sup> La ĉasestra ŝerce-fantazia nomo Kozodusin signifas: Kaprinsufokanto.

<sup>3)</sup> Vulgare anstataŭ „tiel proksime (de l' rezidejo).“

<sup>4)</sup> Jegermajstro, ĉasestro; policmajstro, poliestro en Rusujo.

Ĉasestro, pacigite, propeton promesis  
Ĉe-l' caro, kaj pli mildan el punoj-serio. 650  
Finiĝis, ke vertragoj iris ligoŝnuron,  
Kaj oficist', por unu monato, en turon.  
Tutvespere amuzis nin la historio;  
Sekvatage rondiris anekdot' pri tio,  
Ke en juĝon pri hundo miksiĝis Ĉasestro,  
Kaj mi scias, ke ridis mem imperiestro.“

Rid' eksonis en ĉambroj. Juĝist' kun amiko  
Verm', ludis mariajon<sup>1)</sup>; per atuta piko,  
Ĵus al Verm' penspiranta, Juĝisto atencon 660  
Minacis, sed li aŭdis de l' rakont' komencon,  
Kaj, levinte la kapon, ekinteresita,  
Preta por bato, sidis kun karto levita,  
Silentis kaj la Pastron timigis obstine,  
Kaj, fine de l' rakonto, damon metis fine,  
Kaj diris ride: „Laŭdu kiu ajn de l' pruso  
Germanan civilizon, kaj ordon de l' ruso;  
La grandpoloj<sup>2)</sup> respektu prusan ĉas-oficon,  
Procesadu pri vulpo, alvoku policon,  
Por aresti ĉashundon, trans fremda kamplimo;  
En Litvo, dank' al Dio, laŭ malnov-kutimo, 670  
Ĉasobestoj sufiĉas por ni kaj najbaroj,  
Do, ĉe ni, malnecesaj estas ĉasobaroj;  
Ankaŭ greno sufiĉas; ne malsatos homoj,  
Se hundoj iom iras tra gren' aŭ legomoj;  
Nur de kampuloj bedojn mi ŝirmas severe“.

Ekonom', el maldekstra ĉambro, diris: „Vere,  
Kaj ne mire: vi kare pagas ĉason tian.  
Kampuloj eĉ kontentas, kiam en ilian  
Grenon saltas vertrago, skuas spikoj-dekon:  
Vi redonas al ili por tio sesdekon. 680  
Ofte kampul' ricevas taleron aldone.  
Kredu, ke tio homojn influas malbone,  
Arogantigas...“ Kiel ekonomo plue

<sup>1)</sup> „Mariage“, speco de kartludo.

<sup>2)</sup> Grandpolujo, la okcidenta parto de Polujo, kiu ampleksas ankaŭ la nunan prusan Provincon Poznanian.

Argumentis, Juĝisto ne aŭdis, ĉar brue  
Komenciĝis babiloj inter la diskutoj,  
Anekdotoj, rakontoj kaj fine disputoj.

Tade' kun Telimeno, tute forgesite,  
Pri si memoris. — Tree sinjorin' kontentis,  
Vidante, ke Tadeon ŝi amuzas sprite;  
Junulo, reciproke, ŝin bel-komplimentis. 690  
Telimen' ekparolis plimallaŭta-tone,  
Tade' similis aŭdi apenaŭ duone;  
Flustrantoj proksimiĝis do, pro bruoj-svarmo,  
Ke lin vizaĝe ĉarmis ŝia frunto-varmo;  
Tenante spiron, kaptis li per buŝo ŝian  
Sopiron, per okuloj rigardon radian.

Inter la buŝoj fulmis subite ekbrilo:  
Unue muŝ', tuj poste, de Vojski klakilo.

En Litvo, muŝ-abunda, ekzistas tiela  
Aparta muŝoj-speco, nomata nobela; 700  
Laŭ kolor', form', simila al vulgara ia,  
Sed dikventra; pli larĝa estas brusto ĝia.  
Fluge netolereble ĝi zumas kaj bruas,  
Kaj arane'teksajon per forto traskuas;  
Enfalinte, tri tagojn ĝi zume sin movas,  
Ĉar ĝi, kun araneo, interlukti povas.  
Tion Vojski observis; laŭ lia parolo,  
El ĉi muŝo naskiĝas pli eta popolo:  
Ĝi, inter muŝoj, kiel patrino abela;  
Muŝoj pereos post la eksterm' de-l' nobela. 710  
Vere, ke domestrino kaj prepost' vilaĝa  
Ne kredis je ĉi tiu konkludo kuraĝa,  
Havante, pri muŝ-gento, komprenon alian;  
Tamen Vojski ne lasis for kutimon sian,  
Vidante tian muŝon, postkuris nobelon.  
Ĵus al li tia muŝo zumis en orelon;  
Dufoje Vojski svingis, bat' maltrafe pasis,  
Triafoje li preskaŭ fenestron frakasis;  
Ĝis muŝo, surdigite de krakoj-teruro,  
Vidante sur la sojlo homojn, ĉe forkuro, 720  
Sin, malespere, inter du vizaĝojn ĵetis,

Kaj, tuj poste, de Vojski mano ekbriletis.  
Bat' estis forta, kapoj disiĝis forsalte,  
Kvazaŭ fulm' duonigus arbotrunkon alte:  
Ili forte batigis ambaŭ pordofoste,  
Tiel, ke ambaŭ havis blujajn signojn poste.

Sed neniu rimarkis ĉi-tion, feliĉe,  
Ĉar ĝisnunan diskuton laŭtan, sed sufiĉe  
Ordan, finis eksplodo de bruoj-amaso;  
Simile en arbaro, dum la vulpo-ĉaso, 730  
Aŭdiĝas arboj-krako, bojado, pafanto;  
Kaj jen, subite apron movis postrajdanto  
Kaj signalis: ekbruis pafistoj, hundaro,  
Kvazaŭ brue aŭdiĝus la tuta arbaro.  
Same interparolo: malrapida iro  
Ĝia trafas objekton, kiel apro-viro.  
Ĉasistoj-apro estis nun disput' furia  
De Rejent', Asesoro, pri hundar' ilia;  
Ĝi daŭris nur mallonge, sed faris tre multe;  
Ili eljetis tiom da vortoj insulte, 740  
Ke, fine de kutimaj punktoj de l' debato:  
Pikvort', koler', provoko—sekvus pugnobato.

Do al ili ruliĝis, el la ĉambro dua,  
Ĉiuj tra l' pordo, kiel ondo rapidflua,  
Forportis junan paron, sur sojlo starantan,  
Al Janus, <sup>1)</sup> duvizaĝa dio, similantan.

Tadeuŝ, Telimena, antaŭ ol sukcesis  
Ordigi harojn, voĉoj minacaj jam ĉesis.  
En ĉambroj sonis ride-miksita brueto;  
Post kverel', dank' al Vermo, ekregis kvieto: 750  
Li, maljunul', sed ŝultre-vasta, korpulenta,  
Kiam Asesor' kuris al moŝto Rejenta,  
Kiam ili minacis sin geste kaj vorte,  
Li ambaŭ, je kolumoj, dorse kaptis forte,  
Batis dufoje kapojn fortikajn iliajn,  
Unu al dua, kiel pasko-ovojn iajn,  
Kiel vojo-montrilo brakojn krucetendis,

<sup>1)</sup> Antikva roma diaĵo.

Kaj en du ĉambr-angulojn la partiojn sendis.  
Momenton brak-etende li staris en loko,  
Kaj „Pax, pax, pax vobiscum!“<sup>2)</sup> tondris lia voko. 760

Ekmiris, eĉ ekridis ambaŭ kontraŭuloj,  
Kaj, pro estim', ŝuldata al pastroj-dignuloj,  
Ne isultis monaĥon, kaj, post tia provo,  
Ne inklinis komenci kverelon de-novo.  
Almozisto, vidante, ke iĝis silente,  
Li ne serĉis triumfon por si, evidente,  
Ne mallaŭdis partiojn per riproĉa tono,  
Nur ordigis kapuĉon, kaj manojn al zono  
Metinte, tuj eliris el ĉambro silente.

Ĉambelano, Juĝisto, sidiĝis momente 770  
Inter ambaŭ partioj; kaj Vojski, vekita  
Kvazaŭ el ia revo, profunde-medita,  
Stariĝis en la mezo, kaj iom tordinte  
Sian grizan lipharon, jakon ordiginte,  
Al societo turnis la fajran pupilon.  
Kie laŭtiĝis, kiel pastro aspergilon,  
Li, kvietige, ŝvingis la ledan klakilon,  
Kaj fine, grave supren levinte tenilon,  
Kvazaŭ marŝal'-bastone<sup>2)</sup> ordonis silenton:

„Silentu! li ripetis, kaj havu atenton, 780  
Vi, plej bonaj ĉasistoj en distrikto nia!  
Ĉu vi pensis pri sekvoj de skandalo tia?  
Jen esper' de Patrujo, nia junularo,  
De kiu novan ĝloron havu ĉas-arbaro,  
Domaĝe, jam preferas la ĉason neglekti,  
Eble trovos motivon, por ĝin malrespekti,  
Se tiuj, kiuj ŝuldas por imit' modelojn,  
El ĉaso nur alportas malpacon, kverelojn!  
Ankaŭ volu respekti mian grizan haron;  
Ĉar mi konis pli bonan ol vi ĉasistaron, 790  
Kaj juĝis ilin, kiel arbitraciano.

1) Latine: Paco, paco, paco kun vi!

2) Marŝal'-bastono, insigno de marŝalo, t. e. de seĝma prezidanto.

Kiu ĉasist' egalis tiam al Rejtan-o?  
 Por aranĝi pelĉason, renkonti bestaron,  
 Ĉu por Bjalopjotroviĉ vi trovus komparon?  
 Kie pafisto, kiel Ĵegota, nobelo,  
 Pistol'-kugle trafanta leporon dum pelo?  
 Terajeviĉon konis mi; li aproviron  
 Iris renkonti, sole prenante rapiron;  
 Budreviĉon: kun urso lukti, li maltimis;  
 Tiajn virojn rigardi, arbaroj kutimis!  
 Kiel pacigis oni tiam disputantojn? 800  
 Prenis vet-garantion, elektis juĝantojn.  
 Oginski arbar-hubojn cent, pro lup-kverelo,  
 Njesjolvovski, vilaĝojn kelk, perdis por melo!  
 Do vi, sinjoroj sekvu malnovan modelon,  
 Per malpli granda veto decidu kverelon.  
 Vorto — vento, neniam finiĝas diskuto;  
 Domaĝe eĉ, sekigi buŝon per disputo.  
 Do arbitracianojn elektu komence;  
 Kion ili verdiktos, fidu konscienc.  
 Ke Juĝisto permesu, kuri eĉ tritikon, 810  
 Al postrajdant', mi petos Juĝiston amikon.  
 Mi esperas ricevi la grandan favoron\*.  
 Dirante, je genuoj li premis sinjoron.

-- „Ĉevalon mi, Rejento, metas kun jungaĵo,  
 Kaj promesas ankoraŭ, kun ofic'-skribajo,  
 Al Juĝisto ĉi tiun ringon garantian\*.  
 — „Mi, Asesor', demetas or-kolajon mian,  
 Lacertlede-kovritan, kun ringoj el oro,  
 Kun silk-teksa gvidilo, de arta laboro;  
 Sur ĝi juvelo lumas per mirinda brilo. 820  
 Mi volis tion doni herede al filo,  
 Se mi edziĝus; tiun memorajon lasis  
 Al mi princo Dominik,<sup>1)</sup> kiam ni pelĉasis

<sup>1)</sup> Dominik princo Radziwill, granda ŝatanto de ĉaso; li elmigris en la Varsovian Grand-Duklandon kaj proprakoste li formis kavalerian regimenton, kiun li mem komandis. Li mortis en Francujo en j. 1813. Kun li estingiĝis la vira linio de princoj en Olyka kaj Nieŝwież, plej eminentaj grandsinjoroj en Polujo kaj eble en Eŭropo.

Kun princ' marŝal' Sanguŝko, Mejen generalo, <sup>1)</sup>  
 Kaj mi ĉiujn provokis al hund-vetbatalo.  
 Ĉas-histori' ne aŭdis pri tia kombino:  
 Mi kaptis ses leporojn per unu hundino!  
 Ni ĉasis en Kupiska erikeja valo;  
 Princo Radzivil saltis de sia ĉevalo,  
 Emocie alpremis gloran Milvon mian, 840  
 Kaj, fervore, trifoje kisis kapon ŝian,  
 Kaj trifoje, sur buŝon, frapinte hundinon,  
 Li diris: Mi vin nomas de Kupisk' princinon. —  
 Tiel Bonapart' siajn ĉefestrojn princigas,  
 Laŭ lokoj, kiujn ili per venkoj glorigas\*.

Telimen', por ne aŭdi pluan disputaron,  
 Volis iri en korton, sed ŝi serĉis paron;  
 El hok' ŝi prenis korbon. „Sinjoroj deziras,  
 Ŝajne, resti en ĉambro; mi — al fungoj iras:  
 Kiu bonvolas, sekvu!“ Ĉi-tion dirante, 840  
 Ruĝan kaŝmiran ŝalon ĉirkaŭ kap' volvante,  
 Ĉambelanan ŝi prenis je man' filineton,  
 Ĝis maleol', per dua, levante roboton.  
 Tade', post ŝi, silente al fungoj rapidis.

Juĝist' promen'-intencon ĝojigite vidis,  
 Kiel rimedon, rompi krian disputaron;  
 Do li vokis: „Sinjoroj, iru en arbaron!  
 Kun plej bela ruĝfungo, kiu tablen venos,  
 Ĉe plej bela fraŭlino sidlokon li prenos:  
 Kaj ŝin, li mem elektos. Se fraŭlino trovos, 850  
 Plej belan fraŭlon preni, ŝi mem al si povos.

---

<sup>1)</sup> Generalo Mejen distingigis en la nacia milito dum la tempo de Koŝciuszko. Ĝis nun oni montras en Vilno la remparojn de Mejen.

### LIBRO III.

#### KOKETADO.

Ekskurso de Grafo en ĝardenon. — La mistera nimfo paŝtas anserojn. — Simileco de fungo-kolektado al promenado de elizeaj ombroj.—Specoj de fungoj.—Telimena en la sanktejo de meditado. — Interkonsiliĝo pri la estonteco de Tadeo. — Grafo kiel pejzaĝisto. — De Tadeo pentristaj rimarkoj pri arboj kaj nuboj. — De Grafo opinioj pri arto. — Sonorilo. — Bileto. — Urso, sinjoro!

Graf' ĉevalon haltigis ĉiam, dum reveno,  
Kaj rigardis, turnante kapon, al ĝardeno;  
Al li refoje ŝajnis, ke, el fenestreto,  
Ekbrilis pure blanka, mistera robeto,  
Kaj, ke io malpeza defalis el-alte,  
Kaj momente trakuris tut-ĝardenon salte;  
Inter verdaj kukumoj ree lumis io:  
El nubeto eliĝas tiel sun-radio  
Kaj, inter glebo, trafas silikan buleton  
Aŭ, sur verda herbejo, akvan vitrajeton.

10

Graf' desaltis, hejmsendis servistaron sian,  
Kaj mem sekrete iris ĝardenon magian:  
Li alkuris barilon, apertajon trovis,  
Kiel lup' en ŝafejon, mallaŭte sin ŝovis.  
Malfeliĉe, li puŝis sekan gros-arbeton:  
Ĝardenistino kvazaŭ ektimis brueton;  
Ŝi rigardis ĉirkaŭe, sed nenion vidis,



Tamen, al dua flanko de l' garden', rapidis:  
Grafo, flanke, tra granda ĉeval'rumeksaro,  
Tra lap-folioj, herboj, sur finajoj-kvaro, 20  
Rampis mallaŭte, kiel rano eksaltante.  
Li vidis mirindajon, kapon elmetante:

Kelk-ĉerizujoj kreskis tie en ĝardeno;  
Inter ili, intence kunmiksita greno:  
Tritik', horde' liphara, fabo kaj maizo,  
Eĉ arbustoj kaj floroj, milio kaj pizo.  
Al sia kort-birdaro, tian, kort-estrino  
Elpensis ĝardeneton: fama domestrino  
Kokoŝnicka, kun patra Jendikoviĉ-nomo.<sup>1)</sup>  
Ŝia invent' epokon prezentas en domo- 30  
Mastrumado; hodiaŭ jam ĉie konata,  
Tiam ankoraŭ, kiel novaĵo, donata  
Al nemultaj personoj, kaj kiel sekreto,  
Ĝis kalendar' ĝin presis, sub titol': „Rimedo  
Je akcipitroj, milvoj, aŭ nova procedo  
Eduki kort-birdaron\* — jen la ĝardeneto.

Do, apenaŭ la koko, kiu gardon faras,  
Supren levinte bekon, senmove ekstaras,  
Kaj al flanko deklinas kapon la krestulo,  
Ke pli facile celu ĉielon okulo, 40  
Ekvidas akcipitron inter nubetaro  
Kaj krias: — tuj ĝardenon kuras kokinaro;  
Eĉ anseroj kaj pavoj, kaj, alarm'-terure,  
Kolomboj el tegmento rifuĝas forkure.

Sur ĉiel' ne vidiĝis, en momento nuna,  
Malamiko. Nur, kontraŭ fajrobrulo suna,  
Birdoj per grena bosko sin ŝirmas agrable,  
Kuŝas sur herbokovro, aŭ baniĝas sable.

Inter la birdaj, homaj sin levis kapetoj,  
Senkovraj, kun mallongaj haroj, kiel lino; 50  
Koloj nudaj ĝis ŝultroj; inter infanetoj,

<sup>1)</sup> Nomoj ŝerce-fantaziaj; kokosz = kokino, klukulino;  
jędyk (indyk) = meleagro.

Pli alta kape, haroj pli longaj -- knabino.  
Post idoj sidis pavo; ringoj de plumajo  
Disvastiĝis en arkon koloran, ĉielan,  
Sur kiu blond-kapetoj, kiel sur pentraĵo,  
Brilis, jetite sur la fonon blu-malhelan,  
Konturite de pavaj okuloj, en greno,  
Kiel sfeloj-kroneto en aer'-sereno,  
Meze de la maizaj bastonetoj oraj,  
Angla herbo, en strioj arĝento-koloraj, 60  
Merkurial' korala, alteoj verdantaj,  
Kies formoj, koloroj, kune miksiĝantaj,  
Kunplektis kvazaŭ kradon, el or' kaj arĝento,  
Kiel kurten' malpeza, moveblan de vento.

Super densaj', kolora, spik-, trunketoj-plena,  
Papili'-helnebulu pendis baldakena:  
Ĉi „avin'-papilioj“ kun kvar flugiletoj,  
Malpezaj, diafanaj, kiel vitrajetoj,  
Pendente en aero, pen-videblaj estas,  
Kaj, kvankam zumas, ŝajne tut-senmovaj restas. 70

Knabino swingis tufon per mano levita,  
Similan al pav-pluma fasko kunplektita;  
Ŝi forpelis, laŭŝajne, el kap' de infano  
Papilian or-pluvon. En la dua mano  
De ŝi, lumetas io kornforma, or-brila,  
Al vazo por infanoj-nutrado simila:  
Ĉar ĝin vice al buŝoj almetis knabino,  
Kvazaŭ oran abundo-kornon de feino.

Sed ŝi turnadis kapon, kvankam okupata,  
Al gros-arbusto, pro la bruet', memorata, 80  
Sen sci', ke atakanto, tra l' bedar', silente,  
El kontraŭflank', proksime alrampis, serpente:  
Ĝis, el lapoj saltinte, li staris proksime,  
For kvar bedojn. kaj kline-salutis estime.  
Ŝi jam deturnis kapon, levis brakojn alte,  
Kiel garul', ektime, por forflugi salte;  
Jam foliojn alblovis piedetoj-spiro,  
Kiam infanoj, time, pro fremdul'-eniro,  
Kaj pro knabin'-forkuro, ekkriis momente.

Ŝi, aŭdante, eksentis, ke, tre malprudente 90  
Estus, lasi idetojn en terur' kaj sole,  
Kaj, haltante, revenis, kvankam kontraŭvole,  
Kiel laŭ sorĉalvoko spirit', malvolonte;  
Ŝi alkuris, kun ido plej kria ludonte,  
Sidiĝis kaj sur sinon prenis la infanon,  
Sur duan, karesvorte, ŝi metis la manon:  
Ili, trankviliĝinte, premis per manetoj  
Kaj kapetoj genuojn ŝiajn, laŭ birdetoj  
Sub flugil' de patrino. Ŝi diris: „Ĉu bone,  
Ĉu bele, tiel krei? Timos senbezone 100  
Vin la sinjor'. Ne venis kun sak' almozulo,  
Sed gast', sinjoro bona, vidu, jen belulo!“

Ŝi ekrigardis: Grafo, per ridet' atabla,  
Ŝajne dankis por tiom da laŭdo agrabla;  
Ŝi mallevis okulojn, tion rimarkinte,  
Kaj, kiel roz-burĝono, tute roziĝinte.

Vere, li estis bela: mezkreska, ovalan  
Havis vizaĝon, freŝan, kvankam iom palan;  
Okuloj—bluaj, mildaj; helblonda longharo:  
Sur ĝi folioj, viloj, kiujn, el herbaro, 110  
Graf' deŝiris, tra bedoj rampante vizite,  
Kaj kiuj verdis, kiel krono, malplektite,

„Ho vi! li diris, kia vin honoras nomo,  
Ĉu diaĵo aŭ nimfo, spirit' aŭ fantomo!  
Diru: ĉu propra-vole vi sur teron venis,  
Aŭ vin, sur valo, fremda potenco katenis?  
Ho! mi divenas: certe rifuzit' amanto,  
Potenca grandsinjoro, jaluza zorganto,  
En ĉi parko vin gardas, kiel ensorĉitan!  
Vi indas kavaliroj-batalon armitan, 120  
Kaj iĝi de romanoj heroino; bela!  
Malkovru la misterojn de sorto kruela:  
Jen savonto! Al gesto via, de ĉi horo  
Obeas mia brako, kiel mia koro.“  
Li etendis la brakon.

Ŝi roziĝis honte,

Sed, kun gaja vizaĝo, aŭskultis volonte;  
Kiel infanon logas bildar' helkolora,  
Kaj ludmarkoj amuzas ĝin per brilo ora,  
Ĝis ekkon' de valoro: same ŝi, aŭskulte,  
Kaptis belvortojn, kiujn komprenis malmulte. 130  
Kaj fine ŝi demandis: „Vi venas el kie,  
Sinjor'? kaj kion serĉas sur bedoj ĉi-tie?“

Graf' malfermis okulojn, konfuze, mirante,  
Silentis; alparolo-tonojn mallevante,  
Li diris: „Fraŭlineto, pardonu! Laŭvide  
Mi ĝenis ludojn; kuris mi tiel rapide  
Matenmanĝi; malfrui tro mi ne dezirus;  
Vi scias, ke, sur vojo, mi ĉirkaŭe irus;  
Tra l' ĝardeno pli rekte al domo bona...“  
Knabino diris: „Tie estas voj' ebena; 140  
Jen voj'et'; ne difektu, moŝto, la bedetojn...“  
„Ĉu dekstre aŭ maldekstre?“ la moŝto sinjora  
Demandis. Ŝi, levinte blujajn okuletojn,  
Rigardis lin, laŭŝajne, kun sciem' esplora;  
Ĉar domo, for mil paŝojn, tut-videble staris,  
Kaj Graf' demandis voj'ojn? sed li tion faris,  
Por ion diri, serĉe je motivo ia. —  
„Fraŭlin', vi tie loĝas, proksime de via  
Ĝardeno, aŭ vilaĝe? Mi, en domo, laste,  
Vin ne vidis... Vi eble ĵus alvenis gaste?“ 150  
Knabino skuis kapon. — „Pardon', fraŭlineto,  
Vi loĝas tie ĉambron, kun ĉi fenestreto?“

Li pensis: ne estante roman'-heroino,  
Ŝi tamen estas juna, belega knabino.  
Ofte granda animo, granda pens', kaŝite,  
En solec', kiel rozo en arbar', subite  
Ekfloras; ĝin elportu en mondon, sunbrilon,  
Kaj rigardantoj miros da koloroj milon!

Ĝardenistino dume stariĝis silente;  
Idon, sur brak' pendantan, ŝi levis atente; 160  
Duan ŝi mane-prenis, kaj kelkajn postiris,  
Kiel anseridaron, pele, tra l' ĝardeno.

Turniĝinte: „Ĉu povas sinjoro, ŝi diris,  
Mian birdaron ree peli al la greno?“  
— „Mi birdojn pelu?“ kriis Grafo, mirigite...  
Ŝi dume malaperis, per arboj kovrite.  
Momenton, el spaliro, tra verdaĵo maja,  
Tralumis io, kvazaŭ okulparo gaja.

La Grafo staris sole, antaŭ la spaliro.  
Lia animo, kiel ter', post sun-subiro, 170  
Malvarmiĝis, prenante kolorojn malhelajn;  
Li ekreviŝ, sed sonĝojn li havis nebelajn.  
Vekite, li ne sciis, kiun li koleris:  
Domaĝe, li malmulte trovis, tro esperis!  
Kiam tra bedoj rampis li, al paŝtistino,  
Brulis en lia kapo, saltis kor' en sino:  
Mil ĉarmojn por mistera nimfo li elektis,  
Ŝin vestis en miraĵojn, tiom li konjektis!  
Ĉion trovis alie. Jes, vizaĝo ŝia —  
Bela, tali' — gracia, sed senproportia! 180  
Kaj vizaĝa moleco, ruĝiĝa viveco,  
Pravas pri simplanima, troa feliĉeco!  
Penso ankoraŭ dormas, kor' — nenionfara;  
Ĉiu respondo — tiel vilaĝa, vulgara!  
„Kial iluziĝi? li kriis, misterojn  
De l' nimfo mi divenas: ŝi paŝtas anserojn!“

Kun malaper' de nimfo, tuta sorĉ-vidaĵo  
Aliiĝis: rubandoj, la ĉarma kradajo  
El or', arĝent', domaĝe! estis pajl' en vero?

Grafo, manojn plektante, rigardis al tero, 190  
Al herbe-kunligita agrostaj garbeto,  
Kiun li opiniis plumofasko pava.  
Li ne forgesis vazon: ora verŝileto,  
Abundo-korno — estis karoto ruĝflava!  
Li vidis, kiel ido ĝin manĝis avide!  
Do pasis for mirajo! ĉarmo! sorĉ'! rapide.

Tiel knabo, ĉe vido de flor' cikoria,  
Logite de silkajo mola, blua ĝia,  
Kareseme aliras, blovas: tuj, forfluge,

Tuta flor', en aero, disfalas lanuge; 200  
Kaj, en mano, ekvidas esplorant' scivola:  
Nuda trunk', de grizverda herbo, restis sola.

Graf' surpremis ĉapelon, same revenante,  
Kiel li venis, sed la vojon rektigante,  
Li sur legomoj, floroj, grosarbustoj, iris.  
Transsaltinte barilon, fine li ekspiris!  
Al knabin' li parolis pri manĝo matena:  
Eble ĉiuj jam scias pri lia ĝardeno  
Renkonto, antaŭ domo? eble serĉi iros?  
Rimarkinte forkuron, kion ili diros? 210  
Do, revene, klinante sin apud barilo,  
Ĉirkaŭ limetoj, herboj, post turniĝoj-milo,  
Li troviĝis, kontente, sur vojo ebena,  
Kiu rekte kondukis al domo bona.  
Rigardi la ĝardenon, li zorge evitis,  
Kiel ŝtelist' grenejon; ke ne pensu iu,  
Ke li volas viziti ĝin, aŭ jam vizitis;  
Sed singardeman Grafon observis neniu.  
Li vidis flanke, dekstre: estis situita

Betularo maldensa, herbkovre-sternita. 220  
Sur la herba tapiŝo, tra blanka trunkaro,  
Sub tendo de pendiĝa, majverda branĉaro,  
Svarmis multo da formoj, strange moviĝantaj,  
Kvazaŭ dancus, ĉe luno, fantomoj vagantaj;  
En nigra kaj malvasta, stranga vest', kelk-iaj,  
En longa, dislasita, neĝblanka, aliaj,  
Tiu kap' sub ĉapelo, vasta barelringe,  
Alia nuda; tiuj kvazaŭ nubon pasas,  
Kaj, post kapo, laŭ vento, vualojn dislasas,  
Tiratajn, kiel vosto de kometoj, svinge. 230  
Ĉiu alia-poze: tiuj, terfiksitaj,  
Turnas nur per okuloj siaj mallevitaj;  
Tiu rigardas rekte, dormeme paŝante,  
Kiel sur ŝnur', neniel al flanko turniĝas:  
Kaj ĉiuj, al diversaj flankoj, alkliniĝas  
Ĝis al ter', kapoklinojn kvazaŭ dediĉante.  
Se ili renkontiĝas, ili preteriras,

Nek parolas, nek ian saluton eldiras,  
En sin profundiĝinte. Grafo, por komparo,  
Vidis en ili bildon: elize'-ombraro, 240  
De doloroj kaj zorgoj jam libera plene,  
Vagas trankvile, mute, tamen malsere.

Kiu divenus, ke la malmulte sinmovaj,  
Silentaj homoj estas konatoj malnovaj?  
Ili iris, post brua manĝado matena,  
Al fungokolektado, laŭ rito solena.  
Kiel homoj prudentaj, ili moderigas  
Siajn parolojn, movojn, ilin konformigas,  
En ĉiu cirkonstanco, al loko kaj horo.  
Do, antaŭ ol ekiri post mastro sinjoro, 250  
Ili prenis la pozojn kaj vestojn aliajn:  
Servantajn al promeno, blankajn lin-mantelojn,  
Kiuj ŝirmas desupre kontuŝojn iliajn;  
Kaj, sur la kapojn, ili metis pajlĉapelojn,  
Do similas animojn, la purgatoriajn.  
Junular' samvestita, ekster Telimeno  
Kaj kelkaj, sin vestantaj france.

#### Nova sceno

Por Graf': li ĝin ne konis, la moron ne vidis,  
Do li, tre mirigite, en boskon rapidis.

Fungoj estis abunde. De fraŭlar' ŝatataj: 260  
Ruĝovangaj „vulpinoj“,<sup>1)</sup> en kanto glorataj  
Simboloj de virgeco, sen verma difekto;  
Strange, neniam sidas sur ili insekto.  
Fraŭlinoj „arbaranon“ ĉasas la gracion,  
Kiun fungoj, en kanto, nomas ĉefon sian.<sup>2)</sup>

<sup>1)</sup> La traduko imitas la popolajn nomojn; la botanikaj latinaj estas: Vulpino — cantharellus cibarius; arbarano — boletus edulis; ruĝulo — lactaria deliciosa (agaricus deliciosus); muŝomorto — agaricus (amanita) muscarius; rusuleto — russula; kaprido — boletus luteus; funelete — cantharellus aurantiacus; blankulo — lactaria piperata; polvulo — lycoperdon.

<sup>2)</sup> Unu el litvaj popolkantoj parolas pri fungoj, militarantaj sub komando de „arbarano“.

Ĉiuj serĉas „ruĝulon“; kreske ĝi modestas,  
Malpli fama en kantoj, plej bongusta estas,  
Ĉu aŭtune aŭ vintre, freŝa aŭ salita.  
Vojski ĉasas je „muŝo-morto“ amanita.

Aliaj fungoj estas malŝatataj juste, 270  
Kiel san-malutilaj, aŭ malbonaj guste.  
Sed eĉ ili utilas: ĉar, nutrante bestojn,  
Ornamas boskon, donas al insektoj nestojn.  
Sur verda herbotuko, kvazaŭ da malgrandaj  
Tablovazetoj vico, staras rondo-randaj  
„Rusuletoj“ arĝentaj, flavaj kaj ruĝhelaj,  
Kvazaŭ, kun vin' diversa, pokaletoj belaj;  
„Kaprido“ renversita funde belpoteto;  
„Funeleto“ gracia ĉampan'-kaliketo;  
Plue „blankuloj“, rondaj, blankaj, larĝaj, plataj, 280  
Kiel laktplenaj tasoj, en Saksuj' farataj;  
Globoforma, per nigra polvo, plenigita  
„Polvul“ kiel piprujo; — de aliaj, nomoj  
Konataj nur al lupoj, leporoj; de homoj,  
Ilia granda nombro estas ne baptita.  
Al lupaj kaj leporaj neniuj rapidas;  
Se iu, kliniĝinte, eraron ekvidas,  
Kolere piedbatas: li, fungon rompante,  
Faras nesaĝe, belan herbkovron difektas.

Telimenon nek lupajn, nek homajn kolektas, 290  
Distrite kaj enue ĉirkaŭrigardante,  
Kun kapo alt-levita. Do Rejent', kolere,  
Diris: ŝi fungojn serĉas sur arboj prefere;  
Asesor', pli malice, ŝin iĝis kompari  
Al in', serĉanta lokon, kie neston fari.

Solecon kaj silenton serĉante laŭvide,  
Ŝi, for de societo, iris malrapide  
Tra l' bosko, sur monteton, deklive levitan,  
Kaj, per arboj pli densaj, ĉirkaŭe ombritan. 300  
En mezo grizis ŝtono; torent', el sub roko,  
Bruis, ŝprucis kaj, serĉe je ombrara loko,  
En densaj, altaj herboj, sin kaŝis subite,  
Kiu ĉirkaŭ-flugpendis, akvo-trinkigite:



Tie la petolulo, en herba vindajo,  
Sen movo kaj sen bruo, sur foli'-sternajo,  
Kaŝite, pen-aŭdeble flustris; laŭ similo,  
Kiel ido kriema, kiun, al lulilo,  
Metis patrino, ligis super ĝi kurtenon,  
Kaj papavo-foliojn ŝutis sub kusenon.  
Loko kvietaj; ofte ĉi tie kaŝita 310  
Telimeno, ĝin nomas „Sanktejo medita“.

Ŝi dejetis, sur herbo-kovron ĉe torento;  
El ŝultroj ruĝan ŝalon, flirteman laŭ vento;  
Kaj, kiel naĝantino, antaŭ ol kuraĝas,  
Sin mergi en malvarman banon, kaj eknaĝas,  
Ŝi ekgenuis, klinis sin flanke al ŝalo;  
Fine, kvazaŭ kaptite de torent'-koralo,  
Ŝi falante, laŭlonge etendis korp-tuton,  
Tempiojn man-apogis, sur herbo kubuton,  
Kun malsupren klinita kapo; ĉe kuseno, 320  
Brilis, de franca libro, papero-veleno,  
Kaj, super alabastraj, libro-paĝaj randoj,  
Plektiĝis nigraj bukloj kaj rozaj rubandoj.

En smaragda herbar', sur sangoherba<sup>1)</sup> ŝalo,  
En longa robo, kvazaŭ tego de koralo,  
De kiu refleksiĝis har' el unu fino,  
El dua — nigraj suoj, dum, ĉe flankoj brilis  
Neĝblankaj ŝtrumpoj, tuko, manoj, blank-vizaĝo.  
Ŝi, malproksime, raŭpon makulan similis,  
Rampintan sur acero-folion.

Domaĝo! 330  
Ĉiuj, de tiu bildo, ĉarmoj en kombino,  
Van-atendis konulojn; rigardis neniuj,  
Per fungo-kolektado sin okupis ĉiu.  
Tamen Tade' atentis flanke per okulo;  
Ne kuraĝante rekte, flank-iris junulo;  
Kiel pafist', en sia budo, sur du-rado,  
Branĉ-kovrite, veturas al otis'-ĉasado,<sup>2)</sup>

1) Sangoherbo — aĥileo.

2) Otiso, birdo granda kiel meleagro, malfacile alirebla.

Aŭ Ĥaradrioj-ĉase <sup>1)</sup> sur selo pafilon  
Kaŝas aŭ sub ĉevala kolo; la erpilon  
Ŝajne, sur kamplimeto irante, li trenas,  
Kaj ĉiam pli proksime al birdaro venas:  
Tiel Tade' ŝteliris.

340

Juĝist' konfuzante  
Embuskon, tranĉis lian vojon, rapidante  
Al fonto. Vente-flirtis la blanka mantelo  
Kaj granda tuk', ligita ĉe zono; ĉapelo  
El pajlo, subligite, moviĝis sur kapo,  
Ŝanceliĝante, kiel folio de lapo;  
Jen ĝi falis sur ŝultrojn, jen okulojn kaŝas;  
En mano — grand-bastono: Juĝist' tiel paŝas.  
Li kliniĝis, kaj, manojn en fonto lavinte,  
Ĉe Telimen' eksidis sur ŝton', apoginte  
Sin per manoj sur globo, el ost' elefanta,  
De baston'; kaj aŭdiĝis alparol' sekvanta:

350

Aŭdu, moŝtin', de tempo, kiam Tadeeton  
Ni gastigas, mi havas grandan malkvieton.  
Mi — senida, maljuna; ĉi bubet' petola  
Estas mia, en mondo, konsolajo sola  
Kaj mia heredonto. Laŭ favor' ĉiela  
Li havos belan pecon da pano nobela:  
Pripensi lian sorton, venas jam momento;  
Sed konsideru kaŭzon de mia turmentol!  
Vi scias: de Tadeo patro, frato mia,  
Jacek, strangul', silentas pri intenco sia,  
Ne volas hejmeveni kaj sin kaŝas ie;  
Pri sia vivo, filon lasante sencie,  
Ĉiam lin administras, pensis en komenco  
Pri legion', afliktis min per la intenco,  
Poste konsentis: restu li hejme trankvile  
Kaj edziĝu. Edzinon li trovus facile;  
Partion mi elektis. Kiu civitano,  
Laŭ nomo, parenceco, al la Ĉambelano  
Egaliĝas? Jen lia pli aĝa filino,  
Anno, bela, dothava, estas jam fraŭlino.

360

370

1) Ĥaradrio, birdo vadanta, nestas en vastaj marĉoj.

Mi volis svati...<sup>\*</sup> Tiam Telimen' paliĝis,  
Fermis libron, leviĝis iom kaj sidigis.

„Kiel mi panjon amas, ŝi diris, ĉu, frato,  
Via koro sen Dio estas, sen kompatato?  
Vi pensas de Tadeo iĝi bonfaranto,  
Se vi la knabon faros poligon'-semanto!<sup>1)</sup>  
Vi baros al li mondon! li iam malbenos, 380  
Se vi tian talenton en arbaroj tenos!  
Mi ekkonis: la ido havas kapablecon  
Kaj indas, en grand-mondo, pluan polurecon.  
Frato, vi bone knabon en ĉefurbon sendus,  
Varŝavon? Aŭ mi, frato, kion rekomendus?...  
Petr-urbeton? Verŝajne, pro afer', aŭtune  
Tie mi estos; tial ni pripensos kune,  
Kion fari. Mi tie mult-personojn konas,  
Havas influojn, tio karieron donas.  
Kun mia help' en gravajn domojn li eniros, 390  
Kaj kiam li, kun altaj dignuloj, akiros  
Konatecon, li havos oficon, ordenon;  
Tiam li lasu servon, faru hejmevenon,  
Post akir' de signifo kaj de mondo-kono.  
Do kion frato pensas? — „Vere, ne malbono,  
Diris Juĝist', se iom junulo veturas,  
Rigardas mondon, inter homoj sin poluras;  
Ne malmulte en mondo mi veturis june:  
Al Pjotrkov,<sup>2)</sup> Dubno, kiel palestrano, kune  
Kun tribunalo'; aferojn proprajn akcelante, 400  
Mi estis en Varŝavo, multe profitante!  
Tial mi ankaŭ volus, la nevon junaĝe  
Elsendi inter homojn, jen simple vojaĝe,  
Kiel metihelpiston, kiu migri iras  
El hejm', kaj mondo-konon per tio akiras;  
Ne pro rangoj, titoloj! Pardon', Telimeno,  
Kian signifon havas moskva rang', ordeno?

<sup>1)</sup> Moknomo por bienposedanto, vilaĝa mastrumanto.

<sup>2)</sup> Piotrków, urbo en Pola Reĝlando, estis en malnovaj tempoj loko de kunvenoj kaj kronlandaj sejmoj; poste sidejo de plej supera juĝo aŭ Kronlanda tribunalo. — Dubno, urbo en Volinio, antaŭe fama per foiroj kaj kontraktoj (negocaj interkonsentoj).

Antaŭe, nun eĉ, kiu sinjoro pli grava,  
Aŭ, en distrikt', nobelo, iom bonhava,  
Zorgas pri similajoj? tamen ĉiu homo 410  
Lin estimas, respektas, pro deveno, nomo  
Aŭ ofico, sed ia civitan'-elekta,  
Kaj ne danka al ies favoro protekta.“

Telimen' interrompis: „Sekve bone, frato:  
Tra la mondo vojaĝi, iru la zorgato.“

Juĝist', skrapante kapon diris: „Jes, fratino,  
Mi volus, sed mi havas novan malfacilon!  
Ĉar Jacek ne ellasas el zorgado filon;  
Kaj jus al mi, sur kolon, venis Bernardino 420  
Vermo el-transvistule, kiu konfidato  
Estas, konanta ĉiujn intencojn de l' frato;  
Do ili, pri Tadeo, jam decidis ĉion  
Kaj volas, ke edziĝe li prenu Zofion,  
Edukatan de via moŝt'. Ambaŭ havajon  
Ricevos mian, kröme, de Jacek dotajon,  
En kapitaloj; ilin havas ja sinjoro  
Jacek, kaj mi plejparton el lia favoro:  
Do li rajtas disponi. — Pensu pri metodo,  
Ke ĉio kun malgranda fariĝu klopodo. 430  
Ili interkoniĝu; vere, junaj aĝe,  
Precipe ŝi, sed tio estas nedomaĝe.  
Estas tempo eligi ŝin el fermiteco,  
Ĉar Zosja jam elkreskas ja el infaneco.“

Telimeno ekmiris kaj preskaŭ timiĝis,  
Leviĝante, sur ŝalo ree genuiĝis.  
Komence ŝi aŭskultis, poste, ĉe orelo,  
Neante skuis manon, kvazaŭ por forpelo  
De malagrablaj vortoj, returne en buŝon  
De parolanto, kiel trudiĝantan muŝon.

„Ha! novaĵo, sinjoro! ŝi diris kolere, 440  
Ĉu bona por Tadeo, juĝu mem prefere!  
Min Tade' ne koncernas; mem pri li decidu,  
Faru lin ekonomo, en drinkej' li sidu,

Vendu brandon, ĉasbestojn en arbar' insidu:  
 Kun li laŭvole agu. Sed Zonjon — mi flegas!  
 Ĉu Zosja vin koncernas? Ŝian manon regas  
 Nur mi mem! Se sinjoro Jacek donis monon  
 Por eduko de Zonjo, promesis aldonon  
 Al malgranda tutjara pensieto ŝia:  
 Li Zonjon ne aĉetis. Cetere konscia 450  
 Vi estas, kaj memoras homoj ĝis momento,  
 Ke ne senkaŭza estas malavaro via...  
 Ŝuldas ion Soplicoj al Horeŝkoj-gento.\*  
 (Tiujn vortojn aŭskultis Juĝist' kun ĉagreno,  
 Konfuzo kaj videbla ia abomeno;  
 Kvazaŭ li timus reston de parol', klinante  
 La kapon, li per mano jesis, ruĝiĝante).

Telimen' finis: „Estis mi la vartistino  
 Kaj nun sola, de Zonjo, parenc'-zorgantino.  
 Krom mi, neniu pensos pri feliĉo ŝia.“ 460  
 — „Se ŝi feliĉon trovos en edziĝo tia?  
 Okullevante diris li; se Tadeeto  
 Plaĉos al ŝi?“ — „Ĉu plaĉos? Restu en kvieto!  
 Plaĉos, ne plaĉos: tute afero malgrava!  
 Vere, Zosja ne estos partio dothava;  
 Sed ankaŭ ne vilaĝa ia nobelino,  
 Sed ekscelenca moŝto, vojevodidino!  
 Edzon trovos nepino Horeŝko-devena!  
 Ŝia eduko estis tiel zorgoplena!  
 Ŝi eble sovaĝiĝis ĉi-tie!“ — Atente 470  
 Rigardis ŝin Juĝisto, ŝajne jam kontente,  
 Ĉar li diris gajete: „Nu, do kion fari!  
 Dio vidas, mi iris al negoc' sincere;  
 Nur sen koler'. Se volas fratin' kontraŭstari,  
 Ŝi rajtas; nu, domaĝe, tamen senkolere.  
 Mi konsilis, ĉar frato ordonis; ne uzas  
 Iu devigon: se vi Tadeon rifuzas,  
 Mi reskribos al Jacek, ke, pro kulp' ne mia,  
 Ne povas fianĉiĝi Tade' kun Zofia.  
 Nun mi zorgos mem. Ŝajnas, ke kun Ĉambelano 480  
 Ni svatos kaj konsentos pri cetera plano!“

Dume ŝi malvarmiĝis el fervor' laŭvide:

„Mi nenion rifuzas, fratet', malrapide!  
Vi mem diris: tro frue, kaj tro juna paro —  
Ni pripensu, atendu, ne estos ja baro;  
Interkoniĝi povas gejunuloj niaj,  
Sed ni laŭ traf' ne risku sorton de aliaj.  
Nur mi frue avertas: ke frat' ne emigu  
Tadeon kaj lin ami Zonjon, ne devigu;  
Kor' ne estas servisto, ne konas sinjoron:  
Neniam superforto katenos la koron.“

490

Juĝisto, leviĝinte, foriris medite.  
Tade', el kontraŭflanko, alvenis subite,  
Ŝajnigante, ke fungoj-serĉo lin altiris.  
Samdirekte la Grafo malrapide iris.

Grafo, kiam disputis Juĝist', Telimeno,  
Staris post arboj, ege mirante pri sceno.  
Paperon kaj krajonon el poŝ' eliginte,  
Kiujn li ĉiam havas, — sur trunk' fleksiĝinte,  
Li fiksis etenditan desegno-karteton  
Kaj diris: „Kvazaŭ mem vi pozigus grupeton:  
Li sur rok', ŝi en herbo, pentrindaj en vero,  
Laŭ vizaĝoj-kontrasto, kapoj-karaktero!“

500

Li aliris, haltadis, frotis la lorneton,  
Rigardis, ĉe okuloj svingante tuketon:  
„Ĉu belega vidaĵo, inda je admiro,  
Malaperos, sin ŝanĝos ĉe proksim-aliro?  
Ĉu herb-velur' — papavo, verdaj' betfolia?  
En nimfo ĉu vidiĝos kortestrino ia?“

Kvankam Graf' Telimenon antaŭe vidadis 510  
En domo de Juĝisto, kie li estadis,  
Li malmulte atentis ŝin; do kun surprizo  
Li rekonis modelon sian de la skizo.  
Loko, ĉarma staturo, gusta vest-fasono,  
Ŝanĝis ŝin, faris pene ebla al rekono.  
En okuloj kolero ne tut-estingiĝis;  
La vizaĝo, sub freŝa ekblovo, viviĝis,  
Kiam subite venis junuloj proksime,  
Per ruĝeco pli forta, viva, ol kutime.

„Estrino, diris Grafo, kuraĝon pardonu, 520  
 Permesu senkulpiĝi, dankemon rekonu:  
 Ekskuzas sin de viaj paŝoj esplorinto,  
 Kaj dankas, de medito via, atestinto.  
 Tiom mi vin ofendis! tiom ŝuldas sento!  
 Mi ĝenis meditado, ŝuldas por momento  
 De l' inspiro, momento feliĉa! personon  
 Kondamnu, sed artisto atendas pardonon!  
 Mi tre multe kuraĝis, jen pli da kuraĝo:  
 Juĝu!“ — Li genuiĝis kun sia pejzaĝo.

Do Telimeno juĝis la skizojn per tono 530  
 Ĝentila, kiel arton konanta persono;  
 Ŝi, avarante laŭdojn, vigligon ne ŝparis:  
 „Mi gratulas, ŝi diris, vi ĝin brave færis,  
 Sed vi flegu talenton, serĉu por modelo  
 Belan naturon! Ho! vi feliĉa ĉielo  
 Itala! de Cezaroj vi ĝardenoj rozaj!  
 Kaskadoj, de klasika Tibur,<sup>1)</sup> grandiozaj!  
 Terura Paŭzilipa<sup>2)</sup> roka voj! Jen tio  
 Pentristoj-lando, Grafo! Nin, kompatu Dio!  
 Muz-id', ĉe Soplicovaj nutristinoj, certe 540  
 Mortos. Mi tion, Grafo, enkadrigos lerte,  
 Aŭ lokos en albumon, al desegnareto,  
 El ĉie kolektita de mi, en tableto.“

Ili interparolis pri ĉiel'-bluajoj,  
 Mar-bruoj, vent-aromoj, pri rokaj supraĵoj,  
 Kaj intermiksitis, laŭ la vojaĝul'-kutimo,  
 Ridon, mokon pri aĵoj en patruja limo.  
 Tamen ilin ĉirkaŭis la litvaj, malhelaj  
 Arbaroj, seriozaj kaj mirinde belaj! —  
 En krono de lupoloj, la padoprunujoj; 550  
 Kun freŝa, paŝtistina ruĝiĝo, sorpujoj;

1) Tibur, urbo proksima de Romo, hodiaŭa Tivoli; tie loĝis la glora roma poeto Horaco.

2) Pausilippo, monto, fama per grandega groto, proksime de Neapolo.

3) Menadoj, virinoj el sekvartaro de greka dio Bakho, portis en manoj bastonojn, ĉirkaŭvolvitajn per hedero kaj vinberaj branĉetoj,

Aveluj', laŭ menado, <sup>3)</sup> kun verdaj scepretoj,  
Kvazaŭ uv-ornamitaj de noksaj perletoj;  
Arbaridoj: kratagon viburn' ĉirkaŭprenas;  
Rubuso, nigran buŝon al framboj premanta.  
Per folioj sin arboj, arbustoj mantenas,  
Kiel por danc' fraŭlinoj, junular' staranta  
Ĉirkaŭ geedzoj. Meze de l' rond' staras paro,  
Levite, super tuta amas' de l' arbaro,  
Per ĉarmo de koloro, graciaĉ' talia: 560  
Betulo, amatino, — karpen', edzo ŝia.  
Plue kvazaŭ infanojn, nepojn, maljunuloj  
Rigardas en silento: jen fagoj, aĝuloj,  
Tie poploj, matronoj; jen muske barbhora,  
Kun sia ĝiba nuko, kverko kvincentjara,  
Kiun apogas, kvazaŭ rompitaĉ' kolonoj,  
Kadavroj de kverk-avoj, kiuj iĝis ŝtonoj.

Tadeuŝ, enuante, turnis sin kaj movis  
Pro diskuto, en kiu part-preni ne povis.  
Kiam laŭdon de fremdaj boskoj kaj belecoj 570  
Sekvis, vice-nomate, ĉiuj arbo-specoj:  
La cipresa, oranĝa, oliva, migdala,  
Citrona, mahagona, juglanda, santala,  
Aloa, kakta, fika, eĉ fine hedera,  
Kaj sonis glori' de ĉies formo, trunko, floro,  
Tiam Tade' fariĝis ĉiam pli kolera  
Kaj ne povis reteni indignon de l' koro.

Li simplul', sed kapabla por natur'-admiro,  
Rigardante arbaron, diris kun inspiro:  
„En Vilna botanika ĝarden', mi atente 580  
Observis famajn arbojn, kiuj oriente  
Kreskas, kaj en la suda bela ter' itala;  
Kiu el ili estas al niaĉ' egala?  
Ĉu fulmoforigiloj — aloaĉ' bastonoj?  
Ĉu pigmeo, kun oraĉ' globetoj, citronoj,  
Mallonga, dikotrunka, kun laka folio,  
Kiel virin' malbela, sed riĉa por tio?  
Ĉu maldika, malgrasa kaj longa cipreso?  
Enua, ne malĝoja arbo, laŭ impresoj:



Ĝi aspektas malĝoje sur tomb' jen lakeo, 590  
Germano, en funebra kortega livreo,  
Ne kuraĝanta levi manojn, nek moveton  
De l' kapo, por neniel rompi etiketon.

„Ĉu ne pli bela nia honesta betulo,  
Ploranta kampulino, pro filo, mortulo,  
Aŭ pro edzo vidvino, kiu man-plektante,  
Ĝis al tero etendas harligon torente:  
Muta malĝoj', stature ploras elokventel'  
Kial sinjoro Grafo, pentradon ŝatante,  
Ne pentras arbojn, inter kiuj li mem sidas? 600  
Vere, pri vi najbaroj eble ŝerco ridas,  
Ke, loĝante fertilan litvan ebenajon,  
Vi pentras rokoplanan ian dezertajon.“

„Amiko, diris Grafo, estas bel-naturo:  
Formo, fon', materio, sed anim' — inspiro,  
Kiun levas alsupre fantazi'-flugiro,  
Kaj apogas reguloj; gusto 'as poluro.  
Ne sufiĉas naturo, nek ia fervoro:  
Ideal'-sferon flugi devas nia koro! 610  
Ne ĉio bela estas pentrebla, ne ĉio!  
Vi sciig'os pli vaste el libroj pri tio.  
Koncerne pentro-arton: pejzaĝoj bezonas  
Vidpunktojn, grupojn, kunon, ĉielon, ĝin donas  
Italuj'! Do en pentra arto, Italujo  
Estis, estas kaj estos: pentristoj-patrujo!  
Tial ekster Breŭghel-o,<sup>1)</sup> sed ne Van der Hell-o,  
Nur pejzaĝisto, (nome estas du Breŭghelo),  
Kaj krom Rujsdal-o,<sup>2)</sup> kie, en tuta nordlando,  
Ekzistis pejzaĝisto de unua granda? 620  
Do ĉielon!“ — „Orlovski<sup>3)</sup> nia, estis ĝuste,  
Telimen' interrompis, Soplican' laŭĝuste,

1) Breughel, Brueghel Jan, nask. 1568, mort. 1625, fama nederlanda pentristo de pejzaĝoj. Lia frato „de helsehe Brueghel“ pentris scenojn inferajn.

2) Rujsdael Jakob, fama holanda pejzaĝisto.

3) Orłowski Aleksander, fama pentristo kaj desegnisto pola; nask. 1777 en Varsovio, mort. 1832 en Petersburgo,

(Tio estas Soplĉoj-malsano, laŭ scio,  
 Ke, krom patrujo, plaĉas al ili nenio).  
 Orlovski ĉiam vivis en Petro-urbeto;  
 Fama pentrist', (mi havas skizojn en tableto):  
 Li loĝis apud caro, kiel en edeno:  
 Graf', vi kredos? li revis pri hejmo-reveno!  
 Li ĉiam pri juneco sia rememoris,  
 Polajn: teron, ĉielon kaj arbarojn gloris..“

„Kaj li pravis! ekkriis Tadeo fervore: 630

Ĉiel' itala estas, laŭ dir', ĉiuhore  
 Blua, pura, do kvazaŭ akvoj glaci-ŝelaj;  
 Ĉu vent', malbonvetero, ne estas pli belaj?  
 Ĉe ni, vi levu kapon: kiom da vidaĵoj!  
 Kiom da scenoj, bildoj, ludas la nubajoj!  
 Ĉiu nubo — alia: aŭtuna ĉi-tie  
 Pluve-graveda rampas, laŭ maldiligenta  
 Testudo, kaj delasas ĝis ter', longostrie,  
 Malplektitajn harligojn da pluvo torenta;  
 Vento pelas hajl-nubon, al balon' similan, 640  
 Rondan, malhele-bluan, meze flave-brilan;  
 Granda bruo ĉirkaŭe; vidu, eĉ en niaj  
 Ĉiutagaj nubetoj, ŝanĝoj estas kiaj!  
 Komence anseraro, blankaj cignoj velas,  
 Dorse vent', kiel falko, ilin kune pelas:  
 Ili premiĝas, kreskas — nova mirindaĵo!  
 Ricevas kurbajn nukojn, dislasas kolharon,  
 Elŝovante piedojn, sur ĉiel'-arkajo,  
 Kiel ĉeval'-tabuno, trakuras steparon;  
 Ĉiuj, arĝente-blankaj, miksiĝis; — subite 650  
 El koloj kreskas mastoj, el kolhoro — veloj:  
 Tabun', en grandiozan ŝipon transformite,  
 Naĝas, sen bru', sur blua eben' de ĉieloĵ!“

Graf', Telimeno staris, supren rigardante;  
 Tade', per unu mano al nubo montrante,  
 Per dua manon premis li al Telimeno.  
 Jam pasis kelk minutoj de silenta sceno;  
 Graf' dismetis paperon sur sia ĉapelo  
 Kaj eligis kraĵonon. Tiam, por orelo

Malagrabable, aŭdiĝis sonoril' biena; 660  
La silenta arbaro iĝis bruoplena.

Graf', balancinte kapon, serioza-tone  
Diris: „Ĉio finiĝas sonorila-sone!  
Kalkul' de granda penso, plan' de imageco,  
Ludoj de senkulpeco, ĝoj' de amikeco,  
Konfidoj de la koro: ĉe l' bronzo-sonoro,  
Ĉio sin miksas, rompas, for malaperante!  
Al Telimen' senteman rigardon turnante:  
„Kio restas?“ li diris, kaj ŝi: „Rememoro!“  
Kaj volante konsoli la malĝojan koron, 670  
Ŝi deŝiris por Grafo neforgeso-floron.<sup>1)</sup>  
Grafo kisis ĝin kore kaj fiksis ĉe l' sino;  
Duaflanke, Tadeo, post arbet'-disklino,  
Vidis, ke tra folioj, al li brilas io:  
Tio estis maneto, kiel blank-lilio;  
Li, kaptinte ĝin, kisis; en ĝi buŝo lia  
Dronis, kiel abelo en kalik' lilia.  
Li eksentis malvarmon sur buŝ': ŝlosileton  
Li trovis kaj da blanka papero ruleton;  
Li metis ĝin en poŝon, sciante nenion, 680  
Kion ŝlosil' signifas: kartet' diros tion.

Sonoro ĉiam sonis; eĥe el arbaroj  
Respondis mil da krioj kaj da bruofaroj.  
Tio estis resono de serĉo, vokado,  
Signalo de finita fungo-kolektado;  
Ne resono malĝoja, enterig'-aranĝa,  
Kiel ŝajnis al Grafo: kontraŭe, tagmanĝa,  
Subtegmente, en ĉiu-tagmezo, krianta,  
Al tagmanĝo servistojn, gastojn invitanta:  
Tia kutim' antaŭe en bienoj estis, 690  
Kaj ankaŭ en la domo de l' Juĝisto restis.  
Do iris ar' portanta bastajn skatoletojn  
Kaj, al fin' de tuketoj, ligitajn korbetojn  
Kun fungoj; ĉe fraŭlinoj, en la unu mano,  
Volvita ventumilo kvazaŭ: „arbarano“,

1) Miozoto.

En dua, kunligitaj, kiel kamp-floretoj,  
„Trunkanoj,“ <sup>1)</sup> kaj diversaj, „kolor-rusuletoj.“  
Vojski kun „muŝomorto.“ Kun mano malplena,  
Flanke de sinjoridoj, venas Telimena.

Gastoj eniris orde, kaj ronde ekstaris: 700  
Ĉe tabl' unuan lokon Ĉambelano prenis;  
Laŭ aĝ, ofic' la digno al li apartenis:  
Li irante, al ĉiuj klinsalutojn faris.  
Ĉe li, antaŭ Juĝisto, Pastro Bernardina  
Diris mallongan preĝon en lingvo latina.  
Oni donis la brandon; poste, sidiĝante,  
Ĉiuj manĝis malvarman supon, silentante.

Oni tagmanĝis ekster-kutime trankvile,  
Sen babil', kvankam mastro invitis ĝentile.  
Partianoj de hundoj manĝis sendispute, 710  
Morgaŭan vetbatalon pripensante mute;  
Granda pens' al silento devigas la buŝon.  
Telimen' alparolis ĉiam Tadeuŝon,  
Ankaŭ devis turniĝi al Grafo sinjoro,  
Kelkfoje okuleti eĉ al Asesoro.  
Same birdist' rigardas kaptilon, logante  
Kardelojn, kaj samtempe paserojn kaptante.  
Tade' kaj Grafo estis feliĉaj, kontentaj,  
Ambaŭ espero-plenaj, do ambaŭ silentaj.  
Graf' rigardis fiere al sia floreto, 720  
Kaj Tadeo ŝtelume palpis je l' poŝeto,  
Ĉu ŝlosil' ne forkuris? kaj turnis en mano  
Ne legitan karteton. Al la Ĉambelano  
Juĝisto alverŝadis hungar-ĉampan-vinon,  
Premis lin je genuoj, servis diligente,  
Sed por interparolo ne havis inklinon,  
Videble ian zorgon li sentis.

#### Silente

Pasadis de manĝaĵoj kaj teleroj ŝanĝo,  
Kiam rompis enuan iron de tagmanĝo,  
De gast' neatendita, subita enkuro; 730

<sup>1)</sup> Armillaria; pri ceteraj fungoj komparu p. 67.

Arbarist' eĉ tagmanĝo-finon ne atendis,  
Kuris al mastro; montris mieno, staturo,  
Ke grava, nekutima novajo lin sendis.  
Ĉiuj al li okulojn turnis. Li respiris  
Iomete kaj: „Urso, Sinjoro!“ nur diris.  
Reston ĉiuj divenis: el sia pranesto.<sup>1)</sup>  
En arbaron post Njemen, traŝteliĝas besto,  
Oni ĝin persekutu; tion sciis ĉiu,  
Kvankam nek konsiliĝis, nek pripensis iu;  
Kuna penso montriĝis en vokoj subitaj, 740  
Vivaj gestoj, diversaj ordonoj donitaj,  
Kiuj, el tiom buŝoj elirante kune,  
Tamen al unu celo rapidis komune.

„Vilaĝen rajdu! kriis Juĝist' al centulo!<sup>2)</sup>  
Tagiĝe morgaŭ ĉaso! ĉiu volontulo,  
Kiu iros kun lanco, de laboro tera<sup>3)</sup>  
Kaj kvintaga servuto estos tut-libera.“

„Selu grizulon, diris Ĉambelan' ekkrie;  
Galopu mian domon kaj prenu el tie  
Du hirudojn,<sup>4)</sup> la fame ĉirkaŭe konatan 750  
Hundoparon, Strapĉina kaj Spravnik, nomatan;<sup>5)</sup>  
Ŝtopu al ili buŝojn kaj en sakon ligu,  
Kaj ĉi-tien rapide sur ĉeval' venigu!“  
— „Vanjka! kriis al knabo Asesor' rus-tone,  
Larĝan glavon Sanguŝkan tuj akriĝu bone;  
Vi scias, kiu estas de la princo dono;  
Kuglo estu en ĉiu ŝargajo ĉe l' zono!“  
— „Pafilojn, kriis ĉiuj, igu en pretecon!

1) Pranestejo (matecznik), nealirebla loko en arbarego, kie la sovaĝaj bestoj naskiĝas kaj vivas sendanĝere.

2) Centulo aŭ centestro, estro super cent kabanoj.

3) Deviga komunuma laboro ĉe vojoj kaj pontoj; servuto, laboro por bienposedanto.

4) Speco de anglaj hundoj, malgrandaj sed fortikaj, servantaj en pelĉaso je granda sovaĝa besto, precipe urso (buldogoj).

5) Spravnik, landa policestro, kaj Strapĉi, speco de registara prokuroro; rusaj oficistoj, kiuj, pro abuzado de sia povo, estis malamataj de civitanoj; Strapĉina, la nomo de la hundino.

Asesor' ĉiam vokis: „Plumbon, plumbo-pecon!  
Kuglo-formil' en poŝo.“ — „Al prepost' bona,  
Diris Juĝist', sciigu, ke, en fru' matena,  
Morgaŭ li legu meson en kapel': oferto <sup>1)</sup>  
Por ĉasistoj; jen, meso de sankta Huberto.“ 760

Post donitaj ordonoj fariĝis silente.  
Ĉiuj meditis, ĉirkaŭ-rigardis atente,  
Kvazaŭ iun serĉante; ĝis rigardo kuna  
Ariĝis sur vizaĝo de Vojski maljuna:  
Jen tiel por elmarŝo ĉefon serĉis oni,  
Kaj decidis al Vojski estr-bastonon doni.  
Vojski stariĝis, volon de ĉiuj vidinte, 770  
Kaj, per man' serioze la tablon batinte,  
El ĉebrusto orbrilan ĉeneton ektiris,  
Kun poŝhorloĝo, dika kiel pir', kaj diris:  
„Morgaŭ, duon' de kvina, al arbar'-kapelo,  
Venos ĉasistoj kaj la anar' de ĉaspelo.“

Dirinte, li foriris de tabl'; arbarestro  
Lin sekvis: ili ĉason pripensos, aranĝos,

Kiel, post anoncita batal', armeestro.  
Soldatoj armilaron purigas kaj manĝos,  
Aŭ sur manteloj, seloj, senzorge jam dormas, 780  
Dum la ĉefoj en tendo batal'-planon formas.

Post manĝo, tago pasis je hufum'-forĝado,  
Hundoj-nutro, kolekto, armil'-purigado;  
Vespere estis preskaŭ neniu ĉe-table;  
Eĉ partioj de Falko kaj Stumpul', afable,  
Sian grandan disputon forgesinte plene,  
Prenis sin je la brakoj: Rejent', Asesoro,  
Serĉas plumbon. Ceteraj, lace de laboro,  
Iris dormi, por frue vekigi matene.

Al Tade' oni donis en domo ĉambreton. 790  
Li stariĝis kandelon en la kameneton,

<sup>1)</sup> Oferto, mallongigo de „offertorium“, dua parto de la meso kun preĝoj por la intencita celo.

Simulis dormon, tamen ne fermis okulon,  
Sed atendis meznokton. Enue, junulo  
Ĉe fenestrovila eltranĉo ekstaris,  
Por vidi, kion nokta domgardisto faris.  
Kiam gardist' foriris, Tade', elsaltinte,  
Fermis fenestron, kaj, al tero kliniĝinte,  
Laŭlonge de la muroj, ŝtelume forpaŝis.  
Kien? ĉi-tion densa nokt-vualo kaŝis.

---

## LIBRO IV.

### DIPLOMATIKO KAJ ĈASO.

Aperajo en papilotoj vekas Tadeon. — Tro malfrua rimarko de l' eraro. — Drinkejo. — Emisario. — Lerta uzo de tabakujo turnas la diskuton sur ĝustan vojon. — Pranestejo. — Urso. — Danĝero de Tadeo kaj de l' Grafo. — Tri pafoj. — Disputo, pri pafiloj Sagalasa kaj Sanguška, decidita aprobe por la Horeška unutubo. — Bigoso. — De Vojski rakonto, pri duelo inter Dovejko kaj Domejko, interrompita per instigo de hundoj kontraŭ leporo. — Fino de l' rakonto pri Dovejko kaj Domejko.

Samaguloj de litvaj grand-dukoj, arbaroj  
De Bialovjeja, Svitezj, Kušelev', Ponaroj!<sup>1)</sup>  
Kiuj ombris kronitajn kapojn de Vitino,  
De la Granda Mendogo kaj de Gedimino,<sup>2)</sup>

<sup>1)</sup> Bjalovjeja praarbarego en Grodna gubernio kun vilaĝo Bialowieża. — Switez, pentrinda lago en Novogrodeka distrikto, fama per la balado de Mickiewicz s. t. „Svitezja nimfo.“ — Ponary, montoj. — Kuszelewo, vilaĝo malproksime de Novogrodek.

<sup>2)</sup> Mendog aŭ Mindowe, Litva reganto en XIII-a jarcento; li celis al unuigo de ĉiuj litvaj landoj sub unu reĝa scepro.—Witenes, litva duko, mort. en komenco de l' XIV jc; li batalis dum la tuta vivo, precipe kun la germanaj Kruĉokavaliroj (krucistoj), por konservi sian landon en tuteco kaj sendependeco.—Gedymin, Granda duko litva 1315—1341, patro de Kiejstut kaj Olgierd kaj avo de Witold kaj Wla-



Kiam ĉe fajr' ĉasista, sur monto Ponara,  
 Li kuŝis sur la ursa felo vilo-hara,  
 Kaj, aŭskultante kantojn de saĝa Lizdejko,  
 Kaj, per Viljo-aspekto kaj bru' de Vilejko  
 Dorm-lulite, li sonĝis pri la lupo fera,  
 Kaj vekite, laŭ dioj-ordono supera, 10  
 Fondis Viln'-urbon,<sup>1)</sup> kiu sidas en arbaro,  
 Kiel lup' inter uroj, aproj kaj ursaro.  
 El ĝi, kiel el roma lupino reĝidoj,<sup>2)</sup>  
 Eliris Kejstut, Olgerd kaj la Olgerdidoj,  
 Grandaj ĉasistoj, same gloraj kavaliroj,  
 En postkuro de bestoj kaj en milit-iroj.  
 Al ni ĉasista sonĝo malkovris misteron:  
 Ke Litvo bezonados arbarojn kaj feron.

Arbaroj! vin rigardis al ĉaso veninta,  
 Lasta reĝ' en Vifolda kolpako la pinta, 20  
 Feliĉa Jagellona lasta militisto,<sup>3)</sup>  
 Kaj, en Litvo, la lasta monarĥo ĉasisto.  
 Hejmlandaj arboj miaj! se dispono Dia  
 Permesos hejmvrevenon, amikaro mia!  
 Ĉu vin mi trovos ree? ĉu vivas en sano  
 Vi, ĉirkaŭ kiuj rampis mi, kiel infano...

Władysław Jagiełło, kiu, alpreninte la bapton kaj edziĝinte kun  
 Jadwiga, nepino de la pola reĝo Kazimiro Granda, lasta vi-  
 ra posteulo el la Piasta dinastio, donis komencon al la Ja-  
 giellona dinastio, reganta en Polujo de 1386—1572 j. — Litvo,  
 doninte al la Pola Krono sian dinastion, kaj akceptinte kun  
 la roma-katolika Kristaneco la polan kulturon, post la liber-  
 wola unuiĝo de ambaŭ ŝtatoj, nacie tute kunkreskis kun Po-  
 lujo kaj dum la perfortaj dispartigoj de la komuna pola Res-  
 publiko kaj poste Litvo refoje heroe kunbatalis por la resta-  
 riĝo de ĝia tuteco kaj sendependeco. Multaj el plej eminent-  
 taj polaj viroj estis litvaj poloj.

<sup>1)</sup> Laŭ tradicio, Gedymin havis sur la Ponara monto  
 sonĝon pri fera lupo, kaj laŭ konsilo de Lizdejko (ĉefpastro  
 de la idolana Litvujo) li fondis la urbon Vilno, ĉe la enfluo  
 de l' rivero Wilejka en Wiljon.

<sup>2)</sup> Unuaj fondintoj de Romo: Romulo kaj Remo.

<sup>3)</sup> Zygmunt August, lasta pola reĝo el Jagiellona di-  
 nastio; li regis de 1548 — 1572 j., kaj estis levita laŭ antikva  
 kutimo sur la tronon de la Granda litva duklando: li ligis al  
 zono glavon kaj kronis sin per kolpako (alta pinta ĉapo ve-  
 lura kun zibelpelta borderaĵo). Li estis fervora ĉasisto.

Ĉu vivas grandegulo, Baŭblis ĝia nomo,<sup>1)</sup>  
Kies jarcent'-kavajo, kiel bona domo,  
Por dekdu homoj estis vespera manĝejo?  
Ĉu floras bosk' Mendoga, ĉe paroĥ'-preĝejo?<sup>2)</sup> 30  
Tie, en Ukraino, ĉu ankoraŭ bruas  
Ĉe dom' de Holovinski, kie Rosja fluas,  
Tilio diskreskinta, ke sub ombro ĝia  
Centpare iris dancon junular' gracia?

Monumentoj vi niaj! vin, kiom en jaro,  
Forhakas komercistoj, moskva registaro!  
Ne lasante azilon al la birdoj kantaj,  
Nek al bardoj, la ombron kiel bird' ŝatantaj:  
Ja tili' Ĉarnolesja al Jano sentema<sup>3)</sup>  
Inspiris tiom rimojn! kverko babilema 40  
Al bard' kozaka tiom da mirakloj kantas.<sup>4)</sup>

Arboj miaj, kiome mi al vi ŝuldantas!  
Pafisto, forkuranta mokojn de kolegoj  
Pro maltrafita besto, sub viaj branĉegoj  
Mi ĉasis revojn; kaj en sovaĝ-regiono,  
Forgesinte la ĉason, mi sidis sur ŝtono:  
Ĉirkaŭe brilis griza musko, surverŝita  
Malhelblue per nigra bero dispremita,

1) En Rosieñ-distrikta vilaĝo Bordzie, bieno de la litva „Landskribisto“ Paszkiewicz, kreskis kverko, konata laŭ nomo Baublis, kiu en idolanaj tempoj estis pie adorata kiel sanktaĵo. En interno de tiu elputrinta grandegulo (forhakita en j. 1812), la statviro Paszkiewicz aranĝis muzeon de litvaj antikvaĵoj.

2) Proksime de la Novogrodeka paroĥejo kreskis antikvaj tilioj; multaj el ili estis forhakitaj ĉirkaŭ la 1812-a j.

3) Czarnolesie, vilaĝo, en kiu loĝis Jan Kochanowski, plej eminenta poeto pola en XVI cj., (nask. 1530, mort. 1584). Sub branĉegoj de tilio, kiu ĉirkaŭombris lian domon, li ofte meditis kaj verkis multajn el siaj belegaj poemoj, inter-alie la famajn korskuantajn elegiojn „Treny“, post la morto de sia plej amata filineto Ursula.

4) Koncernas la ukrainan polan poeton Seweryn Goszczyński (1801—1876) kaj precipe lian poezian rakonton „Kanjova Kastelo“ (Zamek Kaniowski), kiu, laŭ enhavo kaj karaktero, estas vera kozaka kanto, plena de malserena, grandioza spirito de la stepoj.

Kaj tie flagris ruĝe erik'-altajetoj  
Kun ornam' el koralaj vakcini'-perletoj. 50  
Malhel' ĉirkaŭe; supre branĉoj sin etendis  
Kaj kiel verdaj, densaj nuboj suben pendis;  
Vent' furiozis, super arkaj' nemovata,  
Per ĝemo, hurlo, krako, frakas' tondrobata:  
Stranga, surdiga bruo! super kapo mia  
Kvazaŭ estus pendanta la maro furia.

Malsupre, urb-ruinoj kvazaŭ: renversita  
Kverko, kiel grandega trabajo rompita;  
Kaj sur ĝia apogo leviĝas kolone 60  
Branĉaraj trunkoj, traboj putrintaj duone,  
En ĉirkaŭbar' de herboj. Kun terur' vi vidas,  
Arbaro-mastroj meze de l' teraso sidas:  
Aproj, ursoj kaj lupoj; jen kuŝas, ĉe fostoj,  
Post nesingardaj gastoj, ekmorditaj ostoj;  
Iam elŝprucas supren, tra herbo verdanta,  
Kiel fontan', du kornoj de cervo kuranta,  
Kiu brilas tra arboj per flaveta strio,  
Kiel estingiĝanta en arbar' radio.

Ree silent' malsupre. Pego, sur-abie, 70  
Frapetas, poste flugas, malaperas ie,  
Sed ne ĉesas per beko frapi en kaŝ-loko,  
Kiel infano serĉi invitas per voko.  
Sciur', tenanta nukson, pli proksime sidas,  
Mordas; vosteto pendas super la okuloj,  
Kiel plumtufo super kask' de kirasuloj:  
Malgraŭ ŝirmil' atentas ĝi, kaj se ekvidas  
Gaston, saltas plej lerta el arbar'-saltuloj  
De la arbo sur arbojn, fulm-brile; en fino  
Ĝi nevideble kaŝas sin en trunko-sino,  
Kiel revenas hejman arbon driadino.<sup>1)</sup> 80  
Ree mallauĉe.

Branĉo skuiĝis puŝita,  
Kaj, inter la sorpuja berar' disŝovita,

<sup>1)</sup> Driado, antikva greka nimfo, loĝanta en arbo.

Ekbrilis, pli ol sorpoj, vizaĝo ruĝhela:  
Berojn, nuksojn kolektas junulino bela;  
En bast-korbeton metas ŝi la kolektatajn  
Freŝ-vakciniojn, kiel ŝia buŝ', skarlatatajn.  
Flanke junul' avelojn klinas; post deklino  
Briletajn nuksojn kaptas fluge la virgino.

Ĵus ili aŭdis kornoj-sonon, hund-bojadon,  
Kaj divenis proksime venantan ĉasadon; 90  
Do ambaŭ timoplene, en densaj branĉetoj  
For malaperis, kiel arbaraj dietoj.

Soplicovo moviĝas: sed, nek hundoj-bojo,  
Ĉevaloj-heno, knaraj kaleŝoj sur vojo,  
Nek de trumpetoj ĉaso-signalo donita,  
Povis tiri Tadeon el sternajo lita;  
En vest' falinte liton, dormegis jun-homo,  
Kaj neniŭ ekpensis serĉi lin tra l' domo;  
Ĉiuj, mem-okupite, laŭ ordon' rapidis,  
Pri dormul' forgesinte, foreston ne vidis. 100

Li ronkis. Tra l' aperto fenestrokovrila,  
Eltranĉita korforme, enfalis sunbrila  
Fajrokolono, rekte al frunto kaj buŝo  
De volanta ankoraŭ dormi Tadeuŝo.  
Li turniĝis, ŝirmante sin. Ĵus frapo ia  
Lin vekis. Gaja estis revekiĝo lia:  
Li estis birde vigla, facile respiris  
Kaj sentis sin feliĉa, al si ridetante:  
Pri ĉio, okazinta hieraŭ, pensante,  
Li sentis korbatadon, ruĝiĝe sopiris. 110  
Li rigardis fenestron: mirajoj! En klaro  
De tiu koro, brilis hela okulparo,  
Tre larĝe malfermita, al rigard' simila,  
Kiu penetras ombrojn el taglumo brila.  
Kaj li vidis: maneto, kvazaŭ ventumilo  
Al sun' turniĝis, kiel okuloj-ŝirmilo;  
Fingretoj, direktitaj al roza sun-helo,  
Ruĝiĝis trae, kiel rubena juvelo;  
Scieme disklinita buŝo kun dentetoj,  
Kvazaŭ, inter koraloj, lumantaj perletoj; 120

Vangoj, kvankam sirmitaj per roza manplato,  
Flamas mem, kiel rozoj, per viva skarlato.

Tadeo, ĉe fenestro, en ombro kuŝante,  
Kaj belegan aperon super si vidante  
Preskaŭ sur la vizaĝo, ne sciis, ĉu tio  
Estas vere maldormo, aŭ sonĝa vizio  
Pri aminda, helbrila infana vizaĝo,  
Kiun sonĝe ni vidis en senkulpa aĝo.  
Vizaĝeto kliniĝis: li time kaj ĝoje  
Tremante, ha! ekvidis precize, refoje. 130  
Rememoris, rekonis mallongan blond-haron,  
Volvitan en neĝblankan papilotoj-aron:  
Kvazaŭ arĝent'-silikvoj, ili suno-brile  
Lumis, al kron' sanktula en bildet', simile.

Li eksaltis; vidaĵo, pro krako timplene  
Forflugis, malgraŭ lia atend', senrevene!  
Nur aŭdiĝis denove trifoja frapado  
Kaj la vortoj: „Leviĝu, tempo por ĉasado!  
Vi malfruos.“ Li saltis el lit', ĉe foriro 140  
Puŝis la fenestrumojn, ke krakis ĉarniro,  
Kaj malfermitaj flankoj ekbatis la muron;  
Li elsaltis, rigardis, kun konfuzo, miro;  
Sed nenia postsigno perfidis forkuron.  
Proksime de l' fenestro estis frukt-arbara  
Bartil': sur ĝi lupoloj kun krono florara  
Ŝanceliĝis, puŝitaj de manet'? aŭ vente  
Movitaj? Li rigardis longe kaj atente.  
Ne kuraĝante iri ĝardenon, ĉe bara  
Palisar' apogite, li levis silente  
La okulojn, kaj fingron al buŝo alpreme 150  
Metis silent'-ordone, ke vort' rapideme  
Ne rompu la silenton; poste frunton frapis  
Li, kvazaŭ al memoro dormanta, admone,  
Fine ekmordis fingron, ĝis sango sin skrapis,  
Kaj laŭt-ekkriis: „Prave al mi, tiel bone!“

En domo, bruoplana nur antaŭ momento,  
Nun estis kvazaŭ tomba, obtuza silento.

Ĉiuj iris en kampon. Tade' alturnetis  
Orelojn, kaj al ili manojn tube metis;  
Aŭskultis, ĝis alportis vento el arbaro  
Trumpet-sonojn kaj kriojn de la ĉasistaro. 160

Lia ĉeval' en stalo atendis selite.  
Li, preninte pafilon, kiel obsedite  
Galopis al drinkejoj, kie, ĉe kapelo,  
Matene kolektiĝis anoj de ĉaspelo.

Du drinkejoj, duflanke ĉe l' voj' kliniĝante,  
Staris kvazaŭ fenestre al si minacante:  
Malnova estis juĝe kastela heredo;  
Nova spit-konstruita, Soplica-posedo.  
Tiu, kvazaŭ heredo propra de Gervazo,  
En ĉi-tiu ĉe tablo prezidas Protazo. 170

Nova drinkej' ne estis interes'-ekscita;  
Malnova, laŭ antikva model', konstruita,  
Kiun elpensis iam Tiraj ĉarpentistoj,<sup>1)</sup>  
Kaj poste judejanoj disportis sur-tere:  
Konstruo-speco, kiun fremdaj konstruistoj  
Ne konas; ni de judoj ĝin heredas pere:

Fronto kiel arkeo, kaj posto — sanktejo;  
Arke', kvazaŭ de Noe kvarflanka bestejo,  
Konata nun vulgare laŭ nomo de staloj,  
Kaj en ĝi bestoj: bovoj, bovinoj, ĉevaloj, 180  
Barbaj kaprinoj; supre da birdoj kolektoj,  
Ankaŭ rampuloj pare, ne mankas insektoj.  
Posta part' kiel stranga sanktejo; konstrue  
Memoriĝas, laŭ vido, templo Salomona,  
Kiun metio-sperte starigis unue  
Hiramaj ĉarpentistoj sur monto Siona.<sup>2)</sup>  
Nun judoj ĝin imitas en siaj lernejoj,  
Lernej'-modelon sekvas staloj kaj drinkejoj.

<sup>1)</sup> Tiro, urbo en antikva Fenicio.

<sup>2)</sup> Hiram, reĝo de Tiro, ŝatanto de grandiozaj konstruaĵoj, estis en rilatoj kun Salomono, kiu konstruis la faman templon.

El tabuletoj, pajlo: tegment', pintigita,  
Ĉifaja, kiel juda ĉapo difektita. 190

El supro ŝpruce-levas randojn galerio,  
Apogitajn sur ligna kolonoj-serio.  
Kolonar', kio estas miraj' arĥitekta,  
Daŭras, kvankam duone putrinta, malrekta,  
Kiel en Piza turo,<sup>1)</sup> sed ne laŭ modeloj  
De grekoj, ĉar sen bazoj kaj sen kapitejoj.  
Super kolonoj pendas duonrond-arkajo,  
Ankaŭ ligna, de gota arto imitado.

Supraĵe art-ornamoj, ne per skulpt-,ĉizilo,  
Sed lerte eltranĉitaj per ĉarpent'-hakilo, 200  
Kiel kurb-brakoj de la kandelabr' sabata;  
Fine-pendas globetoj, kvazaŭ la butono,  
De la judoj dum preĝoj frunte-pendigata,  
Kaj kiun ili nomas „cices“<sup>2)</sup> en jargono.  
Malproksime, drinkejo malrekta, ŝancela,  
Kvazaŭ preĝanta judo balancas per kapo:  
Taŭza pajlajo — barbo, tegment' kiel ĉapo,  
La fulgaj muroj kiel nigra teg' mantela,  
Kaj kiel „cices“ frunte — skulptajo antaŭe.

Drinkej-partoj laŭ juda lernejo ankaŭe: 210  
Kun ĉambretoj malvastaj, longformaj, unua  
Parto, por gesinjoroj, kiuj vojaĝiras;  
Kaj en grandega halo, ĉe muroj, en dua,  
Mulpiedaj, mallarĝaj lign-tabloj sin tiras,  
Kun malaltaj, al tablo similaj benketoj,  
Kiel idoj al patro.

Ronde, sur seĝetoj,  
Sidas parte kampuloj, nobeletej parte,  
Ĉiuj vice; nur sidas ekonom' aparte.  
Post fru-meso, ĉar estis dimanĉ', el kapelo  
Ili venis distriĝi, trinki ĉe Jankjelo. 220  
Antaŭ ĉiu jam ŝaŭmis kaliko griz-branda;

<sup>1)</sup> En itala urbo Piza troviĝas turo, kiu estas 59 metrojn alta, kaj 5 metrojn klinita.

<sup>2)</sup> Cices, fadenoj; ĉi-tie oni parolas pri „tefilim“, leda skatoleto kun la diaj dek ordonoj.

Drinkejstin' kuradis kun botelo granda.  
 Farmisto Jankjel portis longan sarafanon  
 Ĝis ter', kun hoketingoj arĝentaj; li manon  
 Unu al sia nigra silka zono metis,  
 Per dua sian grizan barbon glatumetis;  
 Li ĉirkaŭe rigardis, disponis, salutojn  
 Faris al enirantoj, ĉe gastoj diskutojn  
 Komencis, kverelantojn li emigis pace,  
 Sed servis al neniŭ, irante senlace. 230  
 Konata, pro honesto, judo muljunulo  
 De multjaraj drinkejon farmis; sed kampulo  
 Neniŭ, nek nobelo en bieno plendis.  
 Ĉar kial? Li drinkaĵojn ĉiam bonajn vendis;  
 Li kalkulis singarde, tamen sen trompeco,  
 Ne malhelpis gajiĝon, sed sen ebrieco!  
 Li ŝatis tre amuzojn, kaj oni solenis  
 Ĉe li edziĝojn, baptojn; en dimanĉoj venis  
 El vilaĝo drinkejon, laŭ lia dispono,  
 Muzik' kun sakfajfiloj kaj basviolono. 240

En muziko famigis lin granda talento;  
 Kun cimballo, de sia popol' instrumento,  
 Iam li domojn iris, per lud' mirigante  
 Kaj per kantoj; ĉar estis li tre lerta kante,  
 Havis sufiĉe puran elparolon polan  
 Kaj precipe ekamis kantaroon popolan:  
 Li alportis, farante trans Njemen veturojn  
 Kolomijkojn el Haliĉ, varŝavajn mazurojn.<sup>1)</sup>  
 Famo, ne ĉiam certa, ĉirkaŭe kolportis,  
 Ke li, el eksterlando, unue alportis 250  
 Kaj disvastigis tiam, en distrikta rondo,  
 Kanton, faman hodiaŭ en la tuta mondo,  
 Kiun unuafoje, sur ter' de Aŭzonoj,<sup>2)</sup>  
 Ludis polaj trumpetoj de la legioj.  
 Kanta talent' en Litvo akiras la amon

1) Kolomijkoj (Kolomyjki), rutenaj kantoj, kiel la polaj mazuroj aŭ mazurkoj (t. e. mazuretoj).

2) Aŭzonoj, antikva loĝantaro de la sudokcidenta parto de Italujo; ĉi tie en senco de Italujo. La kanto estas la marŝo de Dąbrowski, kies komenco troviĝas sur paĝo 8-a.



Ĉe la homoj, kaj donas riĉecon kaj famon:  
Jankjel, havante gloro-sufiĉon kaj monan,  
Pendigis ĉe la muro cimbalon belsonan,  
Loksidigis kun idoj en drinkej' bona,  
Krome, en urbo estis li helpant' rabena, 260  
Ĉie agrabla gasto, doma konsilanto.  
Li estis ankaŭ sperta grenkomerc'-konanto  
Kaj riversipa, kio vilaĝe tre gravis;  
Kaj li ankaŭ de bona polo famon havis.

Li kverelojn, eĉ sangajn, pacigis unue  
Inter ambaŭ drinkejoj: ambaŭ farmis plue;  
Lin estimis egale malnov-partianoj  
De Horeŝko, kaj ankaŭ Soplĉicaj domanoj.  
Lian aŭtoritaton respektis Ŝlosisto  
Minacema, kaj ankaŭ kverelant' Vokisto; 270  
Antaŭ li kvietigis kolerojn Gervazo,  
Minaca mane, kiel per lango Protazo.

Gervaz', foresta, iris pelĉasi la urson.  
Ne volante, ke gravan, danĝeran ekskurson  
Faru sole la Grafo, nesperta junulo,  
Li iris por konsilo kaj defend'-okazo.

Nune, plej for de sojlo, anstataŭ Gervazo,  
Inter du benkoj, sidis en drinkej'-angulo  
Honora,<sup>1)</sup> pastro Vermo; la lokon elektis  
Jankjel por li. Videble, ke li alt-respektis 280  
Bernardinon, ĉar kiam li sole ekvidis  
Mankon en lia glaso, li tuj alrapidis  
Kaj julian mielon alverŝi ordonis.  
Laŭ dir', kun Vermo ili junaĝe sin konis,  
Ie fremdlande. Vermo ofte dum vesperoj  
Lin vizitis, sekrete pri gravaj aferoj  
Kun judo konsiliĝis, laŭ dir': kontrabanda  
Komerc'; sed tio ŝajnas kalumnio granda.

<sup>1)</sup> Loko honora, originale „pokucie“: loko, kien antaŭe oni starigis la domajn diojn, kaj kie ĝis nun la rusoj pendigas la bildojn de sanktuloj. Tie litva kampulo sidigas sian gaston, volante lin honori.

Vermo, tabl-apogite diskutis, nobeloj  
Ĉirkaŭe lin aŭskultis per atent-oreloj, 290  
Kaj nazojn al monaĥa klinis tabakujo;  
Flarante, ili ternis kvazaŭ el pistujo.

„Ho! Reverendissime,<sup>1)</sup> Skoluba terninte,  
Diris, tabako iras la kapon ĝis-pinte!  
Ekde mi nazon portas (li glatis long-nazon,  
Ternis), mi tian flari ne havis okazon;  
Vere monaĥa, certe kun Kovna sigelo,  
Urbo, fama en mondo, pro tabak', mielo.<sup>2)</sup>  
Mi estis tie...“ Vermo enmiksas: „Por sanoj  
De ĉiuj viaj moŝtoj, sinjoroj litvanoj! 300  
Koncerne la tabakon, ĉi tiu devenas  
El pli fore, ol moŝto Skoluba divenas:  
Paŭlinoj de Hel-monta monaĥej' malnova  
Tian tabakon faras en urb' Ĉenstoŝova,<sup>3)</sup>  
Kie estas la bildo, per mirakloj fama,  
De Virga Dipatrino, Reĝino ĉiama  
Pola, nomata ankaŭ de Litvo Dukino, —  
Jes, Ŝi portas ankoraŭ kronon de reĝino,  
Sed en Litva Duklando la skismo<sup>4)</sup> eknestis!“  
„El Ĉenstoŝovo? diris Vilbik, tie estis 310  
Mi dum la indulgenco antaŭ tridekjaro.  
Ĉu vere, ke en urbo nun gastas francaro,  
Rabi trezoron, templon ruinigi volas?  
Ĉar Litva Kuriero<sup>5)</sup> pri tio parolas.“  
„Nevere, diris Vermo, ĉar franca majesta  
Moŝt', katoliko estas, modele honesta.

<sup>1)</sup> Latine: plej respektinda.

<sup>2)</sup> Kovno, urbo komerca en Litvo, ĉe riveroj Vilja kaj Njemen. Ĉi tie en j. 1819 la 21-jara Mickiewicz estis instruisto gimnazia.

<sup>3)</sup> Częstochowa apartenis tiam (1811) al la Varsovia duklando (komparu rimarkon sur p. 33). Pro la rus-franca milito la litvanoj esperis, ke Napoleon kiel venkanto reunigos Litvon kun Polujo kaj restarigos la polan regnon en la antaŭaj limoj.

<sup>4)</sup> La rusa eklezio; tio signifas: Litvo estas sub rusa regado.

<sup>5)</sup> Registara gazeto, eldonata tiam en Vilno.

Papo lin unktis, ili vivas en konkordo  
 Kaj konvertas la francojn, ĉe kiuj la ordo  
 lome difektiĝis. Ĉenstoĥovo, vere,  
 Donis multan arĝenton el trezor', ofere 320  
 Al patrujo, Polujo; laŭ ordono Dia:  
 Liaj altaroj estas trezorej' nacia.  
 Ja en Duklando, pola armeo laŭscie  
 Kalkulas jam cent milojn, baldaŭ estos plie:  
 Kiu pagos armeon? ĉu ne litvanaro?  
 Sed vi nur monon donas por la moskva caro.\*  
 „Ne donas, kriis Vilbik, oni prenas forte.“  
 „Bonfaranto, — aŭdiĝis kampul' humilvorte,  
 Kliniĝinte al pastro, skrapis kapoŝelon:  
 Mizero nur duone premas la nobelon; 330  
 Nin ili senhaŭtigas.“ — „Kampul', kriis laŭte  
 Skoluba, vi kutimis tion, kaj senhaŭte  
 Vivas plu, laŭ angilo; sed bone-naskitaj,  
 Al oraj liberecoj ni kutimigitaj!  
 Egalis ja nobelo, sur kampet' malgranda...  
 („Jes — kriis ĉiuj — al la vojevodo landa!“)  
 Nun ili, nobelecon neante, ordonas  
 Serĉi paperojn, ilin esplori proponas.“  
 „Pri vi, kriis Juraha, afer' malpli grava:  
 Kampul' nobeligita vi estas praava; 340  
 Sed mi el princoj! Ili demandas pri tio,  
 Kiam mi nobeliĝis? memoras nur Dio!  
 Moskvul', demandi kverkon, iru en arbaron,  
 Kiarajte ĝi kreskas super arbustaron.“  
 Princ', diris Ĵagjel, vi nin imponi ne pravas,  
 Ĉi-tie pli ol unu domo mitrojn<sup>1)</sup> havas.“  
 „Vi havas en blazono krucon, jen kaŝita  
 Alud', kriis Podhajski, al gent' neofita.“<sup>2)</sup>  
 „Fals'! interrompis Birbaŝ, mia grafa krono,  
 Tatara, havas krucojn super ŝip-blazono.“ 350  
 „Poraj,<sup>3)</sup> mitro or-kampa, princ-blazono, laste

1) Mitro, princa krono super princa blazono.

2) Por dokumenti sian sindonecon al la nova religio,  
 la konvertitoj kutimis meti krucon en la familian blazonon.

3) Poraj, la blazono de Mickiewicz, havis blankan ro-  
 zon sur ruĝa ŝildo.

Kriis Mickjevič, skribas ĝin Strijkovski <sup>1)</sup> vaste.“

Drinkejo ekbruegis; do pastro Robako  
Ree vice regalis per sia tabako  
Parolantojn. Post krioj fariĝis kviete,  
Ĉiu flaris ĝentile kaj ternis ripete.  
Profitante silenton, la Pastro daŭrigis:  
„Ho, grandajn virojn mia tabako ternigis!  
Jen, kvarfoje el tiu tabakujo same  
Generalo Dombrovski flarumis iame!“ 360  
— „Dombrovski?“ ili kriis. — „Jes, jes, li, litvanoj;  
Mi estis en tendaro, kiam de germanoj  
Li prenis Gdanskon; <sup>2)</sup> skribis li ion; timante  
Ĕkdormi, li flarumis, ternis; min frapante  
Sur la ŝultron, li diris: pastro Bernardino,  
Ni vidos nin en Litvo, antaŭ jaro-fino;  
Diru, ke min atendu litvanoj kun tia  
Tabako ĉenstoĥova, neniel alia!“

Parolado de Pastro elvokis magie  
Tian miron kaj ĝojon, ke ekregis ĉie 370  
Silento; poste sekvis duonlaŭte nova  
Demandado: „Tabako pola? Ĉenstoĥova?  
Dombrovski? Italujo?...“ Ĝis fine kuniĝis  
Penso kun pens', kaj vorto kun vort', kaj aŭdiĝis  
Unuvoĉe, kaj kvazaŭ laŭ ies komando,  
La krio: „Marŝ', Dombrovski, el itala lando!“  
Korpemis sin: kampulo kun grafo-tataro,  
Kruc' kun Mitro, Porajoj kun Grif' kaj Ŝiparo;  
Kaj forgesinte ĉion, eĉ la Bernardinon,  
Kantis, kriante: „Brandon, mielon kaj vinon!“ 380

Longe kanteton Vermo aŭskultis inkline;  
Por interrompi, prenis li en manojn fine

<sup>1)</sup> Strykowski, Maciej. pola historiisto, vivinta en la XVI-a cj.

<sup>2)</sup> Gdańsk, germane Danzig, urbo apud Vistulo, proksime de l' Balta maro, ekokupita de prusoj post la dua dispartigo de Polujo en j. 1793. En j. 1807-a la urbo kapitulacis al franca marŝalo Lefebvre (duko de Danzig, laŭ L. II v. 835).

Tabakujon, per terno melodion skue  
 Miksis kaj diris, antaŭ reagordo, plue:  
 „Laŭdante la tabakon, sinjoroj, vi pravas;  
 Vidu, kion interne tabakuj' enhavas!“  
 Li, frotinte per tuko la malpurigitan  
 Kovrilon, montris etan armeon pentritan,  
 Kiel muŝ-svarmo; meze, rajde-sidis viro,  
 Granda kiel skarabo, ĉef' de militiro, 390  
 Spronis, kvazaŭ por salti ĉielon okaze,  
 Manon tenis sur brido, kaj duan ĉe-naze:  
 „Rigardu, diris Vermo, tiel minaceme  
 Kiu teniĝas?“ — Ĉiuj rigardis scieme, —  
 „Granda imperiestro, ne de moskvularo,  
 Ĉar neniam tabakon flaris Moskva caro.“  
 „Granda vir', vokis Cidzik, kaj kapot'-vestite?  
 Mi pensis, tia iras per oro kovrite:  
 Ĉar ĉe moskvuloj iu general', sinjoro,  
 Brilas, kiel ezoko en safran', en oro.“ 400  
 „Nu, mi vidis Koscsjuŝkon, en juneco mia,  
 Diris Rimŝa, li estis ĉefestro nacia,  
 Granda vir', tamen iris en „sukmano“ sia <sup>1)</sup>  
 Krakova, aŭ „ĉamaro!“ — „En ĉamaro kia?  
 Diris Vilbik, ĝin oni nomis „taratata“.  
 „Sed tiu havis franĝojn, kaj ĉi-tiu glata“,  
 Kriis Mickjeviĉ. — Sekvis disputo-komenco  
 Pri ĉamar', taratanko, kaj form-diferenco.

Vermo, ĉar diskutado disvojiĝis tree,  
 Komencis al fajrujo ĝin kolekti ree, 410  
 Per tabak' regalante; oni ternis brue,  
 Al si deziris sanon; li parolis plue:  
 „Se franc-imperiestro dum batalo flaras  
 Tabakon, ĝi signifas, ke li venke staras.  
 Ekzemple kun kanonoj apud Aŭsterlico <sup>2)</sup>

<sup>1)</sup> Sukmano, vilaĝana drapsurtuto; ĉamaro aŭ ĉamar-ko, pola laĉvesto; taratato aŭ taratanko, mallonga pola kapoto kun laĉoj kaj franĝoj.

<sup>2)</sup> En la batalo ĉe Austerlitz (ĉeĥe Slavkov) en j. 1805, en kiu Napoleon venkis aliancan armeon aŭstro-rusan sub komando de Kutuzov, ĉeestis persone la imperiestroj Franco II kaj Aleksandro I kun sia frato Grand-duko Konstanto

Staris francoj, al ili kuris moskva vico.  
Li rigardis: Se francoj elpafis, momente  
Kiel herbo sterniĝis rusoj regimente;  
Kiam galope nova regimento falis,  
Napoleon, flarante tabakon, signalis, 420  
Ĝis fine Aleksandro kun Konstanto, sia  
Frat', kaj imperiestro Francisko aŭstria  
El kamp' forkuris: tion Napoleon vidis,  
Do, post batalo, fingrojn skuante, li ridis.  
Se, en lia armeo, ĉeesta sinjoro  
Iu servos, li tion havu en memoro“.

„Aĥ, ekvokis Skoluba, Almozisto mia,  
Kiam tio okazos? Ja por ĉiu dia  
Festo dum jaro homoj la francojn profetas!  
Ni rigardas, ĝis lace okul' sin fermetas; 430  
Kaj moskvulo je kolo nin tenas per forto:  
Antaŭ ol venos helpo, nin forprenos morto.“

„Moŝto, diris la Pastro, virino veplendu,  
Kaj, kunmetinte manojn, la judo atendu,  
Ĝis venos gast' aŭ pordon ekfrapos amiko;  
Venki kun Napoleon — eta artifiko:  
Li trifoje al svaboj draŝis felon, tredis  
Prusaĉojn, kaj trans maron anglojn forekspedis;  
Sekve moskvulojn certe li simile benos; 440  
Kio rezultos? moŝtoj, kio poste venos?  
Jen, litva nobelaro saltos sur ĉevalojn,  
Prenos sabrojn, post kiam li finos batalojn;  
Tiam, venkinte ĉiujn, moŝt' Napoleona  
Diros: kiu vi estas? helpo — malbezona.  
Ne sufiĉas atendi, gast-inviton fari,  
Oni devas domanojn kolekti, prepari  
Tablojn, kaj antaŭ festo purigi en domoj,  
Mi ripetas: balau kaj purigu, homoj!“

Sekvis silento, poste voĉoj are sonas:  
„Kiel domon purigi? Kiel vi proponas? 450  
Ni pretiĝos por ĉio, por ĉio prepare;  
Nur Pastro Bonfaranto parolu pli klare.“

Verm' rigardis fenestron, diskuti ĉesinte;  
El fenestro li metis kapon, ekvidinte  
Ion interesantan, kaj diris: „Ĉar nune  
Mankas temp', ni pli vaste priparolas kune  
Tion morgaŭ: En urbo pro afer' mi estos;  
Reveturante, voje mi ĉe moŝtoj kvestos.“<sup>1)</sup>

„Por nokto Njehrimovon bonvenu! en domo  
Standardestro <sup>2)</sup> kontentos, diris Ekonomo. 460  
En Litvo ja parolas proverbo malnova:  
Feliĉa homo, kiel kvestant' Njehrimova!“  
„Kaj nin, diris Zubkovski, vizitu favore;  
Estas tol-peco, buter-barelet' ĉi-hore,  
Ŝaf', bovinet'; memoru la vortojn por provo:  
Feliĉul', trafis kiel pastro al Zubkovo.“  
„Al ni“ diris Skoluba. „Al ni, Terajevič,  
Malsate ne eliris pastro el Puceviĉ.“  
Nobelaro promesis kaj invitis kore,  
Akompanante Vermon ekster pordon fore. 470

Antaŭe, tra fenestro, li vidis kiele  
Tadeo plengalopis sur voj', senĉapele,  
Kun kap' klinita, pala vizaĝ' malserena,  
Kaj spronis, vipis beston en galopo plena.  
Tiu aspekto pastron konfuzis laŭvide,  
Do li post la junulo ekpaŝis rapide  
Al praarbaro: kien okulo ĝisiris,  
Sur horizonta rando ĝi nigre sin tiris.

Kiu vin tutesploris, abisma profundo  
De litvaj praarbaroj, ĝis mezo, ĝis fundo? 480  
Fiŝisto borde sondas la fundon de l' maro;  
Ĉasist' rondiras ĉirkaŭ litva praarbaro;

<sup>1)</sup> Kvesti, kolekti almozon por bonfara celo; ĉi-tie por monaĥejo.

<sup>2)</sup> Standardestro (chorąży), antaŭe en Polujo ofico krona, kortega aŭ landa. Dum grandaj solenoj, militoj k. t. p. la standardestroj portis standardon ŝtatan aŭ landan. Poste ĉi-tiu ofico fariĝis titola.

Li konas nur supraĵe la formon, eksteron,  
 Sed neniel internan de l' koro misteron.  
 Kio en ĝi okazas? scias nur fabeloj;  
 Ĉar post arbaroj, densaj arbitaj'-manteloj,  
 Estas rempar' da trunkoj, ŝtupoj kaj radikoj,  
 Defendita de marĉoj kaj de mil torentoj,  
 De reto da herbaĉoj, ejoj de formikoj,  
 Vespoj-, krabroj-nestaro, volvoj da serpentoj. 490  
 Se ĉi obstaklojn venkus kuraĝ' homsupera,  
 Ĝin renkontus ankoraŭ baro pli danĝera:  
 Ĉiupaŝe insidas, lupkavoj-fasone,  
 Laĝetoj, putoj, herbe-kovritaj duone;  
 Homoj neniam sondos ilian profundon,  
 (Tre verŝajne diabloj okupas la fundon).  
 Vitre brilas la akvo, sangorusto-plena,  
 El intern' iras fumo, odor' abomena.  
 Arboj ĉirkaŭe perdas foliojn; senŝelaj,  
 Kalvaj, pigmeaj, vermaj kaj malsane-ŝvelaj, 500  
 Klininte branĉojn, kun la muska plik' sur nukoj,  
 Ĝibigante la trunkojn, kun fungaĉ'-verukoj,  
 Kvazaŭ sorĉistinaro ĉe kaldrono staras,  
 Varmiĝas, kaj kadavron kuire preparas.

Post ĉi laĝetoj plue, ne nur paŝ' ne povus,  
 Sed eĉ okulo vane enpenetri provus;  
 Ĉar tie kovras ĉion la nebula nubo,  
 Kiu leviĝas el la varma marĉa subo.  
 Sed post nebuloj (kiel fabelas popolo),  
 Etendiĝas fertila, bela regiono, 510  
 La besta kaj kreskaja regnoj-metropolo:  
 En ĝi, de ĉiuj arboj, herboj, sem-depono,  
 El kiu divers-specoj diskreskas sur tero;  
 Kaj, kiel en arkeo, de bestoj-genero,  
 Por multiĝo, almenaŭ konserviĝas paroj.  
 Ĝust-meze, en kortegoj loĝas fundamentaj;  
 Prabovo, uro, urso, praarbaraj caroj;  
 Sur arboj ĉirkaŭloĝas linkoj akrosentaj,  
 Kaj manĝegemaj guloj<sup>1)</sup>, ministroj atentaj;

<sup>1)</sup> Gulo, speco de urso.



Plue, kiel vasaloj, nobelaj subuloj, 520  
 Loĝas la aproj, lupoj kaj alkoj kornuloj;  
 Ensupre vivas falkoj kaj agloj sovaĝaj,  
 Ĉe la kortegaj tabloj, flatistoj kuraĝaj.  
 Ĉi tiuj patriarkaj, ĉefaj besto-paroj,  
 Kaŝitaj nevideble, meze de arbaroj,  
 Trans lim', por kolonizo, infanaron sole  
 Sendante, mem trankvilon ĝuas metropole,  
 Ne pereas de tranĉa aŭ pafa perforto,  
 Sed maljunuloj mortas de natura morto.  
 Ili havas tombejon; se mort' proksimiĝas, 550  
 Birdoj demetas plumojn, suĉbest' senhariĝas,  
 Kiam urso sendenta maĉi plu ne povas,  
 Cervo kaduka, kiam piedojn pen-ŝovas,  
 Leporo, kies sango, jam iĝas rigida,  
 Korvo, iĝante griza, kaj falko senvida,  
 Kiam aglon maljunan beko, kurbigite  
 En arkon, ĉesas nutri, eterne fermite,<sup>1)</sup>  
 Ili iras tombejon; eĉ best' malpli granda  
 Vundite, morti kuras al flanko hejmlanda. 540  
 Tial en loko, kie homo gastis povas,  
 De mortinta bestaro ostojn li ne trovas.<sup>2)</sup>  
 Laŭ dir', en metropolo ĉiuj bestoj flegas  
 Bonajn morojn, ĉar tie ili mem sin regas,  
 De homa civilizo ne vidas modelojn:  
 Ne konas, pri propreco-rajto, la kverelojn,  
 Ne konas la militan arton, nek duelojn.  
 Kiel edene avoj, vivas nepoj-gento,  
 Sovaj, hejmaj kune, en amo, konsento;  
 Nek sin kornpuŝas ili, nek mordas per dento.  
 Eĉ se homo enfalus tien senarmile, 550  
 Li, meze inter bestoj, trairus trankvile;  
 Ili rigardus homon kun tia mirado,  
 Kun kia, en la sesa tago de l' kreado,  
 Iliaj Praguepatroj, kiuj pace sidis  
 En paradiz', unue Adamon ekvidis.

1) Laŭ vulgara opinio la bekoj de grandaj rabobirdoj en maljuneco ĉiam pli kurbiĝas, kaj fine la supra pinto, fleksiĝinte, fermas la bekon kaj la birdo mortas de malsato.

2) Efektive oni neniam trovas skeleton de mortinta besto.

Feliĉe, homo tien el voj' ne eraras,  
Ĉar Pen', Terur' kaj Morto enirejon baras.

Nur iam en postkuro tro fervoraj hundoj,  
Troviĝinte sengarde en kavaj profundoj,  
Kies intern'-aspekto ilin ekteruras, 560  
Hurlete, kun freneza rigardo, forkuras,  
Longe poste, per mano homa karesate,  
Ĉe li piede, tremas time-obsedate.  
Mistera metropolo, bestoj-restadejo,  
Nomatas en ĉasista lingvo: „Pranestejo!“

Stulta urs'! se vi sidus en pranesto via,  
Vojski pri vi neniam fariĝus konscia.  
Sed, ĉu Abel-arbaro vin logis arome,  
Aŭ matura aveno vin tentis tiome? 570  
Vi eliris, trans rando densarbara, fore;  
Arbaristo vin tie spionis explore,  
Tuj sin, per sieĝantoj ruzaj, plen-informis,  
Kie vi tage-manĝis, kie nokte-dormis.  
Ĉaspelantoj de Vojski, jam antaŭ pranestoj  
Vice starante, baras reniron al bestoj.

Tade' eksciis: multe da tempo jam pasis,  
Kiam hundoj, en densa arbaro, ekĉasis.  
Mallaŭt'. — Ĉasistoj vane streĉas aŭdosenton,  
Vane scieme ĉiuj aŭskultas silenton, 580  
Kaj en loko longtempe, senmove atendas:  
Nur al ili muzikon praarbaro sendas;  
Hundoj ĝin sondas, kiel mergisto sub maro;  
Kaj pafistoj, turninte tubojn al arbaro,  
Rigardas Vojski-n, kiu per orelo teron  
Demandas. Kiel legas amikoj esperon  
De viv', aŭ mort-verdikton, pri kara persono,  
En kuracist'-vizaĝo, tiel al ĉaskono  
Lia fide, pafistoj lin rigardis time.  
Leviĝante, li diris: „Estas, jam proksime!“ 590  
Li aŭdis! — plu aŭskultis ili — jen unua  
Hundo ekbojis, poste la dua, dekdua;  
Diskurinta hundaro jam kune, amase.

Pelas, trovinte tracon, bojludas pelĉase,  
Ne tiel malrapide, kiel en ĉashoro  
Dum postkuro de cervo, vulpo aŭ leporo,  
Sed mallonge, tre ofte, akre kaj kolere;  
Do ili proksimiĝas, jam beston senpere  
Vidas, pelas, atingas — momenton atendas,  
Ree bojas, hurletas: besto sin defendas  
Kaj certe vundas; inter bojado kaj krio  
Aŭdiĝas ofte ĝemo de hund-agonio. 600

Pafistoj staris, ĉiu pafilo jam pretis;  
Ili fleksiĝis, kapojn antaŭen elmetis,  
Ne povas plu atendi! Iaŭ vic' el posteno  
Forkuras, en arbaron premiĝas kun peno,  
Por renkonti la beston: kvankam, avertante,  
Pan Vojski ĉirkaŭrajdis postenojn, kriante,  
Ke ĉiu, ĉu kampulo, ĉu sinjoro-filo,  
Lasinte lokon, sentos baton de gvidilo!  
Tutvane! Ĉiuj kuris, malgraŭ la konsiloj, 610  
En arbaron. Ekkrakis kune tri pafiloj;  
Poste ĉiam pafado, sed ĝin superbruis  
Muĝo de urso, eĥe tut-arbaron skuis;  
Terura muĝ'! doloro, malesper', furio!  
Poste bojo, trumpetoj, de pafistoj krio  
Tondris el arbar-mezo. Tien la ĉasanoj  
Kuras ĝoje aŭ tenas la fingrojn sur ĉanoj;  
Nur Vojski plendas: oni maltrafe celtiris.  
Unuflanke pafistoj, pelantoj ekiris 620  
Trae, inter arbaro kaj retoj de ĉaso,  
Kaj urso, antaŭ hundoj kaj homoj-amaso,  
Returniĝis al lokoj malbone garditaj,  
Al kampoj, de pafistoj plejparte lasitaj,  
Kie restis el tuta vico da ĉasantoj:  
Vojski, Tadeo, Grafo, kun kelkaj pelantoj.  
Tie arbaro estis maldensa rilate.

Aŭdiĝas muĝo, krakas rompaĵ', frakasate,  
Kvazaŭ el nub', ruliĝas urso tondrobate;  
Hundoj lin pelas, ŝiras. Urso, stariĝante  
Postpiede, timiĝas muĝe malamikojn,

Kaj frontpiede ŝiras el tero radikojn 630  
 Trunkojn, stumpojn de arboj, ŝtonojn, bategante  
 En hundojn, homojn. Fine li arbon elsiris;  
 Svingante bastonegon, li furie iris  
 Al lasta ĉas-posteno kaj atakon faras  
 Kontraŭ Graf' kaj Tadeo. Ili firme staras  
 Sen tim'; al besto ĉiu turnis la pafubon,  
 Kvazaŭ fulm-forigiloj du celas en nubon;  
 Ĝis ambaŭ unufoje ektiris per ĉanoj  
 Kaj kune (senspertuloj!) ambaŭ ili pafis;  
 La urs' antaŭen saltis: ambaŭ lin maltrafis. 640  
 Fiksitan lancon ili kaptas per kvar manoj,  
 Intertire; subite, ili vidas flanke:  
 El ruĝ-buŝego brilas du dentvicoj blanke;  
 Ungopied' sur fruntojn jam baton mezurlis.  
 Ili paliĝis, saltis posten kaj ekkuris  
 En maldensejon. Urso postkuras, leviĝas,  
 Unge-kroĉas, maltrafas, alkuras, stariĝas,  
 Jam al Grafa blondharo celas; cerboŝelon  
 Li certe ŝirus, kiel el kapo ĉapelon;  
 Sed Asesor', Rejento, alrapidis nune, 650  
 Gervazo antaŭ ili, ĉirkaŭ paŝoj-cente,  
 Kun Vermo, sen pafilo, kaj unumomente  
 Kaj, kvazaŭ laŭ komando: tri elpafis kune.  
 Best' supren saltis, kiel lepor' ĉe hundaro,  
 Krak-falis kape-suben, kaj, per piedkvaro  
 Pezajon de la sanga korpo renversante,  
 Rulis ĝuste al Grafo, teren lin jetante.  
 Urso ankoraŭ muĝas kaj leviĝi penas,  
 Sed lin furiaj Spravnik, Strapĉina jam tenas.

Tiam Vojski ekkaptis sian pasamente 660  
 Ligitan bubal-kornon, boao-serpente  
 Tordiĝan, longan, strian: al buŝo ĝin metis,  
 Plenblovis vangojn, sange en okul' briletis,  
 Duonfermis palpebrojn, la ventron entiris,  
 En pulmojn tutprovizon de l' aero spiris  
 Kaj ekludis. La korno, kiel vent' senhalta,  
 Portis muzikon eĥe tra l' arbaro alta.  
 Eksilentis pafistoj kaj bestopelantoj,  
 Mirante harmonion kaj forton de kantoj.

Maljunul' sian arton, faman en la mondo, 670  
Nun refoje prezentis al ĉasista rondo.  
Li plenigis, vivigis ĉasejon, kverkaron,  
Kvazaŭ li por komenco enlasus hundaron.  
Ĉar muzik' historion de la ĉaso donis:  
Vigla alvok' unue: jen signal' eksonis;  
Ĝem' post ĝemo hurletas: jen hundoj-ludado;  
Iam tono pli akre tondras: jen pafado!

Li ĉesis, korn-tenante; pensis aŭdantaro,  
Ke ludas li, sed ludis — eĥo tra l' arbaro.

Li blovis ree. Korno, kvazaŭ form-ŝanĝante, 680  
En bus' de Vojski malpli aŭ pli dikiĝante,  
Imitis bestajn voĉojn: jen lupo malsata  
Hurlas per ĝemo longa, terure trenata.  
Poste el ursa faŭko muĝo vaste bruas,  
Poste ura blekado aeron traskuas.

Li ĉesis, korn-tenante; pensis aŭdantaro,  
Ke ludas li, sed ludis — eĥo tra l' arbaro.  
Aŭskultinte la arton de korna ĉefverko,  
Ripetis ĝin la fagoj, kaj kverko al kverko.

Li blovas; ĉu en korno estas kornoj-cento? 690  
Aŭdiĝas mikse krioj, kolero, lamento,  
De homoj, hundoj, bestoj, ĝis Vojski korn-tubon  
Levis kaj, per triumfa himno, batis nubon.

Li ĉesis, korn-tenante; pensis aŭdantaro,  
Ke ludas li, sed ludis — eĥo tra l' arbaro.  
Kiom da arboj, tiom da kornoj sin trovis,  
Kaj kiel ĥoroj eĥe la kanton reblovis.  
Sonis muziko ĉiam pli vasta, pli hela,  
Kaj ĉiam pli mallaŭta, pli pura, pli bela,  
Ĝis ie, sur la sojlo ĉiela, ĝi svenis! 700

Vojski ambaŭ la manojn de l' korno deprenis,  
Kruc-etendis; korn' falis sur rimeno sia;  
Kaj Vojski kun vizaĝo ŝveliĝa, radia,  
Levis okulojn, staris kvazaŭ en inspiro,

Sekvante per orelo tonojn ĝis foriro.  
Dume ektondris laŭte miloj da aplaŭdoj,  
Miloj da vivu-krioj, gratuloj kaj laŭdoj.

Post mallaŭtiĝo turnis sin ĉies okulo  
Al la freŝa kadavro de l' urso grandulo,  
Kiu kuŝis, sangante, per kugloj borite, 710  
Kun brust' en herbo-plekton densan enbatite;  
Li frontpiedojn larĝe krucforme distiris,  
Tra naztruoj torenton da sango elspiris,  
Malfermadis okulojn, sen kapo-ŝancelo;  
Lin Ĉambelan'-hirudoj tenas sub orelo:  
Strapĉin' maldekstre, Spravnik dekstre pendiĝante,  
Suĉis la nigran sangon, gorĝon sufokante.

Vojski igis fer-stangon enmeti atente,  
Por malfermi al hundoj faŭkajn inter-dente,  
Kaj per kolboj renversi beston, dors' al subo; 720  
Ree vivu' trifoja ekbatis je l' nubo.

Asesoro ekkriis, turnante per tubo:  
„Nu? do diru! Ni venkis, mia pafileto!  
Nu, diru, pafileto! Malgranda birdeto,<sup>1)</sup>  
Kiel vi distingigis? Por mi ne novaĵo:  
El ĝi laŭ vento iras nenia ŝargajo.  
Mi ĝin de princ' Sanguŝko donace ricevis.“  
De mirinda laboro pafileton levis  
Li, montrante, kaj nomis ĉiun bon-kvaliton.  
Rejento interrompis lin, viŝante ŝviton: 730  
„Mi tuj post urso; Vojski krias: Staru loke!  
Kiel stari? Urs' kampon kuris kvazaŭ moke,  
Kiel leporo salte, pli, pli malproksime;  
Mi pen-spiris, atingi malesperis time...  
Mi ekrigardis dekstren: li kuras; por celo  
Lin prenante, mi pensis: haltu do Miĥelo!<sup>2)</sup>  
Kaj paf! nun kuŝas tie senviva amaso!

<sup>1)</sup> Birdeto, malgrand-kalibra pafilo, en kiun oni metas malgrandan kuglon. Bonaj pafistoj el tiaj pafiloj trafas flugantan birdon.

<sup>2)</sup> Kutime Miĉjo (Misio), nomo donata ŝerce al urso.

Jen Sagalasa, brava pafilo de ĉaso,  
Signo: Balabanovka, London Sagalas-o...<sup>\*</sup>  
(Serurist' tie loĝis, polo, kies famo: 740  
Polaj pafiloj, tamen kun angla ornamo).

Asesor' kraĉospiris: „Je ursoj-centmilo!  
Do kvazaŭ vi mortigis? Amuza babilo!<sup>\*</sup>  
„Aŭdu, diris Rejento, juĝ-esplor' ne estas  
Ĉi-tie, sed pelĉaso, do ĉiuj atestas.“

Do obstinan kverelon komencis pro tio  
Anoj de Asesoro kun Rejent'-partio,  
Gervazon forgesinte; ĉar ĉiuj rapidis  
El flanko, kaj en fronto farajon ne vidis.  
Vojski diris: „Almenaŭ disput' ne senkaŭza, 750  
Ĉar tio jam ne estas la leporo naŭza,  
Sed urso: ne domaĝe revenĝo-konsolon  
Serĉi per serpentino <sup>1)</sup> aŭ preni pistolon.  
Malfacile pacigi; laŭ malnovaj moroj,  
Ni permesas duelon al ambaŭ sinjoroj.  
En miaj tempoj vivis du najbaroj, bravaj,  
Honestaj viroj, ambaŭ nobeloj praavaj;  
Ili loĝis duflanke ĉe river' Vilejko,  
Unu nome Domejko, kaj dua — Dovejko.  
Al ursino pafante, ambaŭ kune celis: 760  
Kiu mortigis? ili terure kverelis  
Kaj juris tra urs-felo sin pafi duele,  
Preskaŭ tubo en tubon: jen vere nobele!  
La duelo bruegon faris, kaj eĉ kantoj  
Ĝin prikantis, mi estis inter sekundantoj;  
Kiel ĉio okazis, mi konante ĉion,  
De komenco rakontos tutan historion,“

Antaŭ komenc', Gervazo pacigis momente  
Disputon: ĉirkaŭiris li urson atente,  
Per hakilo buŝegon disduoniginte, 770  
En kapo-posto, cerbo-tavolojn tranĉinte,  
Trovis kuglon, eligis, per vest' purigetis,

---

<sup>1)</sup> Serpentino, sabro kurbigita.

Almezuris ŝargajon, al pafilo metis,  
 Poste diris, levante la kuglon sur mano:  
 „Sinjoroj, vi ne havis ĉi kuglon sub ĉano;  
 Jen Horeŝka pafilo solvas ĉian dubon!  
 (Li malnovan, laĉitan levis unutubon);  
 Pafis ne mi; ho, mankis kuraĝo por pafo;  
 En okuloj malhele fariĝis! terure  
 Rememori: Jen ambaŭ sinjoroj forkure 780  
 Sin savas; urs' tuj-tuŝe sur kapo de Grafo,  
 La lasta el Horeŝkoj! laŭ patrino sia.  
 Jezu-Mari'! mi kriis; anĝelaro dia  
 Sendis helpon en pastro Bernardino sava.  
 Li hontigis nin ĉiujn, ho, pastreto brava!  
 Kiam mi tremis, tuŝi eĉ timis je l' ĉano,  
 La pafilon elŝiris li el mia mano,  
 Ekcelis, pafis: inter du kapojn! paŝ-centon!  
 Trafis ĝust-meze faŭkon! elbatis la dentojn!  
 Moŝtoj! longe mi vivas, sed, dum vivo mia, 790  
 Nur unu vir' kapablis al celpafo tia:  
 Iam fama pro tiom da duelaj bruoj,  
 Kalkanumojn pafanta for de virin-ŝuoj,  
 Fripon' super friponoj, eterna-memore,  
 Lipharul' Jacek — patra nomo restu fore:  
 Sed li nun certe ursojn ĉase ne insidas;  
 Ĝis lipharoj kanajlo en infero sidas.  
 Glor' al Pastro! du homojn li savis plej lerte --  
 Eble tri; sin Gervazo ne laŭdos, sed certe,  
 Se el Horeŝkoj-sango la lasta infano 800  
 Falus en ursan faŭkon, mondon mi forlasus,  
 Ankaŭ mian ostaron la besto frakasus;  
 Venu Pastro, ni trinkos je via bon-sano.“

Vane serĉi la Pastron; oni scias nure,  
 Ke, post besto-mortigo, li aliris kure  
 Al Grafo kaj Tadeo, rigardis atente,  
 Kaj vidante, ke ambaŭ sanas, li silente  
 Ĉiellevis okulojn, sian preĝon diris,  
 Kaj tuj poste en kampon rapide foriris.

Dume ordonis Vojski eriko-faskaron, 810  
 Sek-branĉetojn kaj trunkojn jeti en ŝtiparon.



Flamegas fajro, kreskas griz-pino fulmplena  
Kaj supre etendiĝas en form' baldakena.  
Sur flam' oni kunmetis lancojn en ĉevronojn,  
Sur jetilojn pendigis dikventrajn kaldronojn;  
El veturiloj venas legomoj, panetoj,  
Farun', viand'.

Juĝisto keston kun faketoj  
Malŝlosis: de boteloj blank-kapoj elstaris;  
De kristalo plej granda elekton li faris,  
(Ĝin Vermo al Juĝisto donacis afable); 820  
Jen gdanska brando, polo ĝin trinkas agrable:  
„Vivu — krias Juĝisto kaj botelon levas,  
Urbo Gdansk! iam nia, ni ĝin rericivas!“<sup>1)</sup>  
Li kalikojn plenverŝis per arĝent'-likvoro,  
Ĝis en suno ekbrilis kaj ekgutis oro.<sup>2)</sup>

Bigos' kaldron'-varmiĝis. — Vana estus nomo  
De mireginda gusto, kolor', bel-aromo;  
Orelo nur rim-ordon, vortoj-tinton sentus,  
Sed enhavo urbanan stomakon ne tentus.  
Litvajn kantojn kaj manĝojn ĝuste nur komprenas 830  
Vilaĝul' sana, kiam li el ĉaso venas.

Sed eĉ sen tiaj spicoj bonegas aparte  
Bigoso, ĉar el bonaj legomoj ĝi arte  
Kunmetiĝas: hakita brasiko acida,  
Kiu, laŭ la proverbo, mem en buŝon iras;  
Fermite en kaldrono, per sino humida,  
Ĝi kovras elektitajn pecojn de viandoj,  
Kaj varmiĝas, ĝis fajro el ĝi plen-eltiras  
Nutrajn sukajn kaj ŝprucas brogaĵo el randoj,  
Kaj aero ĉirkaŭe per aromo spiras. 840

Bigos' preta. Pafistoj vivuas trifoje,  
Kuler-armite kuras, vazon frapas ĝoje;  
Tondras kupro, bigoso kiele kamforo

<sup>1)</sup> Vidu la rimarkon sur p. 96.

<sup>2)</sup> En boteloj de gdanska brando (likvoro), estas fun-  
de oraj folietoj.

Malaperas; el fundoj de kaldronoj iras,  
Kvazaŭ el estingiĝaj krateroj, vaporo.

Oni trinkis kaj manĝis, ĉiuj ĝis kontento,  
Metis beston sur ĉaron, kaj saltis sur selojn,  
Gaje kaj paroleme ĉiuj; nur kverelojn  
Siajn daŭrigis plue Asesor' Rejento,  
Disputante pri ecoj de pafilo ĉasa, 850  
Sanguŝka, kaj de fama tubo Sagalasa.  
Graf', Tade' ankaŭ rajdis malgaje kaj honte,  
Ke maltrafinte urson, forkuris renkonte:  
Ĉar, se dum ĉaso beston ellasas litvano,  
Li, antaŭ refamiĝo, long-penos je vano.

Graf' diris, ke unua li, per lanco-puŝo,  
Volis renkonti beston, sed lin Tadeuŝo  
Malhelpis; kaj Tadeo refutis aserte,  
Ke, pli forta, pez-lancon li svingas pli lerte,  
Kaj volis anstataŭi Grafon: do kun tia 860  
Disputo ili rajdis en amaso kria.

Vojski rajdis en mezo; maljuna sinjoro  
Revenis parolema kaj en bon-humoro.  
Amuzi kaj pacigi havante volonton,  
Pri Dovejko, Domejko, li finis rakonton:  
„Asesoro, se volis mi, ke kun Rejento  
Vi duelu, ne pensu, ke ĝi estis tento  
De homo sang-avida; ne, ne, timu Dion!  
Mi volis vin amuzi, kvazaŭ komedion 870  
Aranĝi, renovigi ŝercaĵeton spritan,  
De mi, jam antaŭ kvardek jaroj, elpensitan.  
Vi junaj ĝin ne konas; sed en miaj jaroj  
Ĝia famo laŭtiĝis tra litvaj arbaroj.

De Domejko, Dovejko, ĉiu kontraŭeco  
Devenis, strang-afere, de nom-simileco  
Neoportuna: Kiam oni sejm-elektis  
Kaj voĉojn por Dovejko amikoj kolektis,  
Al nobel' iu flustris: voĉu por Dovejko,  
Tiu, malbon-aŭdinte, voĉis por Domejko.

Dum festeno toastis marŝalo Rupejko: 880  
„Vivu Dovejko!“ — kriis aliaj: „Domejko!“  
Do kiu sidis meze, estis sen konsilo,  
Precipe ĉe tagmanĝa malklara babilo.

„Eĉ pli malbone, foje en Vilno, nobelo  
Ebria, kun Domejko sabris en duelo  
Kaj ricevis du vundojn; dum li hejm-rapidis,  
Strang-okaze ĉe pramo Dovejkon ekvidis,  
Kaj, kune veturante per pram' sur Vilejko,  
Li demandis najbaron: kiu? — kaj „Dovejko“  
Aŭdinte, li rapiron kaptis sub kirejko:<sup>1)</sup> 890  
Frap! Dovejkan lipharon tranĉis por Domejko.  
Fine, kvazaŭ aldone, eĉ okazi devis,  
Ke, dum ĉaso, proksime postenojn ricevis  
Kaj apude ia ambaŭ samnomanoj staris,  
Kaj al sama ursino kune pafon faris.  
Vere, ŝi post la pafotuj falinte mortis,  
Sed antaŭe jam kuglojn dek en ventro portis;  
Samkalibraĵaj pafiloj multaj tiam estis:  
Do, kiu ŝin mortigis? ili ne atestis.

Ili kriis: „Sufiĉe! ni du nin disigu; 900  
Di' aŭ diablo ligiŝ nin, kaj ni malligu!  
Nin du, kiel du sunojn, mondo ne bezonas.\*  
Tuj ili serpentinoj-duelon proponas.  
La honestulojn volis nobelar' pacigi,  
Sed tio la koleron ŝajnis nur instigi;  
Ili forjetis sabrojn, al pistoloj kuris,  
Stariĝis: „tro proksime“ ni krias; do juris  
Ili spite, celpafi sin tra urso felo:  
Mort' senduba! ĉar preskaŭ tub' en tubon — celo,  
Kaj ambaŭ pafis brave — „Estu sekundanto, 910  
Hreĉeh'!“ Konsent', mi diris, sed tombofosanto  
Faru kavon: disputo finiĝos kruele;  
Sed batalu, ne kiel buĉistoj, nobele;  
Cel' sufiĉe proksima, vi estas bravuloj;  
Sed ĉu tubojn apogu ventroj, celtabuloj?

<sup>1)</sup> Kirejka, turka surturo kun pelta subajo.

Mi ne permesas, tamen konsentas: cellime  
 Vi pafos, sed ne fore pli, nek pli proksime,  
 Ol tra urs-felo; ĉar mi sekundas duelon,  
 Sur tero mi etendos mem ĉi-tiun felon,  
 Kaj vin starigos, moŝtoj; vi staros: unua 920  
 Sur fino de buŝego, kaj sur vosto, dua.\* —  
 „Konsent!“ „Temp?“ — „Morgaŭ“. „Loko?“ — „Uŝ-  
 [Drinkej].“ Post tio  
 Ili disiris. Tiam mi al Virgilio...<sup>1)</sup>

Daŭrigon rompis krio: Pel! Saltis grizulo  
 El sub ĉevaloj; pelas jam Falk', jam Stumpulo.  
 La hundojn oni prenis, ĉar dum ĉas-reveno  
 Sur kampo renkontiĝas lepor'. Sen rimeno  
 Ili apud ĉevaloj iris, kiam vidis  
 Leporon, sen instigo ambaŭ ekrapidis.  
 Rajde postkuri volis Rejent', Asesoro, 930  
 Sed Vojski ilin tenis: „Halt! rigardi, stari!  
 Mi el loko eĉ paŝon ne permesos fari:  
 Tie ni bone vidas, kamp-iras leporo.“  
 Grizul', sentante poste ĉasistojn, hundaron,  
 Kiel du ĉam-kornetojn pintigis aŭdilojn,<sup>2)</sup>  
 Kursaltis, etendite longe, kaj saltilojn  
 Elstreĉis sube, kvazaŭ da stangetoj kvaron,  
 Ŝajne ilin ne movas, nur tuŝas je l' grundo  
 Supraĵe, kiel akvon kisanta hirundo.  
 Polvo poste, post polvo — hundoj; for aspektis, 940  
 Ke lepor', polvo, hundoj unu korpon plektis:  
 Kvazaŭ tra kampo ŝovus sin vipero ia,  
 Leporo — kapo, polvo — kolo bluestria,  
 Kaj la hundoj — duobla svingo-vosto ĝia.

Rigardante, Rejento, Asesor' retenas  
 Spiron, apertas buŝojn. Rejent' iĝas pala,  
 Asesor' ankaŭ, vidas... fariĝo fatala!  
 Vipero, ju pli fore, des pli sin distrenas,

<sup>1)</sup> Vojski aludas ĉi-tie la epopeon „Eneido“ de la fama roma poeto Publius Vergilius Maro.

<sup>2)</sup> Aŭdiloj — oreloj de leporo; saltiloj — piedoj de leporo, laŭ pola lingvo ĉasista.

Jam ŝiriĝas, forestas jam kolo-polvaro;  
Kap' tuj en bosko, vostoĵ — kie? ne atingis! 950  
Kap' malaperas, kvazaŭ laste kvaston ŝvingis,  
Ĥalis arbojn; ŝiriĝis vost' antaŭ arbaro.

Malfeliĉaj vertragoj kuris ĉirkaŭloke,  
Konsultis sin, kulpigis ŝajne reciproke:  
Malrapide tra bedoj saltante, revenas,  
Orel-mallevas, vostoĵn ĉe ventro prem-tenas,  
Ne kuraĝas eĉ levi okulojn, hontante,  
Ne iras al sinjoroj, deflanke starante.

Malserene la frunton mallevis Reĵento,  
Asesoro rigardis en malĝaj-silento; 960  
Kaj poste ili ambaŭ komencis pruvadi,  
Ke hundoj ne kutimis sen gvidil' iradi;  
Lepor' saltis subite; malbon-instigite,  
Hundoj, sur plugokampo, eble bot-vestite,  
Tra akraj ŝtonoj kuri povus sendomaĝe.

La spertuloj aferon klarigis tre saĝe;  
Ĉasistoj el paroloj profitus amason,  
Sed ili ne atentis. Ekfajfis kelk-iaj,  
Ĉi-tiuj ridis laŭte, babilis aliaj,  
Memorante la urson kaj freŝan pelĉason. 970  
Vojski apenaŭ foje rigardis grizulon,  
Vidante la forkuron, deturnis okulon  
Kaj finis la rakonton: „Ĝis kio mi venis?  
Ha! ĝis tio, ke ambaŭ mi je vorto prenis,  
Ke ili tra urs-felo pafos en duelo.  
Certa mort'! tub' en tubon! kriis nobelaro.  
Mi ridis, ĉar instruis min amiko Maro,<sup>1)</sup>  
Ke mezur' respektinda estas besta felo.  
Vi scias, moŝtoj, kiel Dido, la reĝino,<sup>2)</sup>

<sup>1)</sup> Vergilio, vidu rimarkon sur. p. 112.

<sup>2)</sup> Dido, filino de la reĝo de Tiro, devigite forlasi la patrujon, venis sur la bordon de Afriko, kie ŝi elpetis ĉe la reĝo tiom da tero por fondo de loksideo, kiom kovros bova felo. La reĝo konsentis; tiam Dido tranĉigis la felon en maldikajn strietojn kaj ĉirkaŭzonis per ili grandan spacon, sur kiu ŝi konstruis la urbon Kartago. — Vojski eraris, pa-

Venis al Liboj, tie, penege, en fino 980  
Al si ter-pecon tian elmarĉandis sprite,  
Kian povus bov-felo kovri etendite;  
Sur tiu teropeco Kartago ekstaris!  
Do mi nokte, zorgeme la planon preparis.

„Tagiĝe, el du flankoj, jam sur „taradejko“<sup>1)</sup>  
Alveturas Dovejko, kaj rajdas Domejko.  
Jen! tra rivero kuŝas vila ponto: zono  
El ursa fel', tranĉita tute laŭ ĉifono.  
Unuflanke, sur besta vosto, mi Domejkon  
Starigis,—duflanke, sur kapo, Dovejkon: 990  
Pafu, mi diris, pafu, ĝis la vivo pasos,  
Sed antaŭ repaciĝo mi vin ne ellasos...  
Ili koleras; preskaŭ nobelaro krevis  
De rido; mi, kun pastro, citas al partioj  
Parolojn el statutoj kaj evangelioj,  
Ĝis fine: ili ridis kaj — paciĝi devis.

„Poste ili, por tuta vivo, amikiĝis:  
Dovejko kun Domejka fratino edziĝis;  
Domejko edze-prenis fratinton bofratan;  
Ili egal-partigis havon posedatan, 1000  
Kaj en loko de stranga duelo-decido,  
Konstruinte drinkejon, nomis ĝin: Ursido“.

---

rolante, ke li legis tion en verkoj de Vergilio, ĉar ĉi tiu priskribo, kvankam Vergilio multe parolas pri Didono, ne troviĝas en lia Eneido. La maljunulo verŝajne sciigis pri tio el iaj klarigoj al la Eneido.

<sup>1)</sup> Skuiĝanta veturileto.

## LIBRO V.

---

### KVERELO.

Ĉasistaj planoj de Telimeno. — La ĝardenistino, ironte en grandan mondon, aŭskultas instruojn de la zorgantino. — La pafistoj revenas. — Granda miro de Tadeo. — Refoja renkontiĝo en la Sanktejo de meditado kaj paciĝo faciligita pere de formikoj. — Ĉe la tablo komenciĝas diskuto pri la ĉasado. — Rakonto de Vojski, pri Rejtan kaj la duko de Nassaŭ, estas interrompita. — Komenco de pacaj traktatoj inter la partioj estas ankaŭ interrompita. — Aperajo kun ŝlosilo. — Kverelo. — Grafo kun Gervazo faras militan interkonsiliĝon.

Vojski, laŭde fininte ĉason, hejmravenas;  
Telimen', en soleca domo, enterprenas  
Ĉason. Vere ŝi sidas senmove, kvietas,  
Kaj la brakojn sur brusto krucforme kunmetas,  
Sed pense ŝi postkuras du bestojn, rimedon  
Serĉante, kiel ambaŭ kapti en posedon:  
Grafon kaj Tadeuŝon. Grafo estas vere  
Grand-sinjor', heredanto riĉa, juna, bela,  
Jam ekaminta! Tamen ĉu restos fidela?  
Ĉu li edziĝi volos? Ĉu amas sincere? 10  
Ŝi pliaĝas kelk jarojn! neriĉa virino!  
Kion diros parencoj? la mondo en fino?

Telimen' tiapense el sofo leviĝis,  
Stariĝis piedfingre: ŝajne plikreskinte,  
Malkovris iom bruston; flanke-fleksiĝinte  
Ŝi mem sin ekrigardis per atent-okulo  
Kaj pri konsil' demandis ree en spegulo,  
Poste mallevis frunton, sopire sidiĝis.

Grafo — sinjoro riĉa! ŝanĝojn amas tiaj!  
Blonda! blonduloj estas ne troe pasiaj! 20  
Tadeo? — simplanima, honesta knabeto!  
Unue li ekamas! preskaŭ infaneto!  
Gardate, li ne rompos ligilojn sen peno;  
Krome, li havas devojn jam por Telimeno...  
Junuloj estas, kvankam pense ŝanĝiĝantaj,  
Sente, ol aĝulaĉoj, multe pli konstantaj,  
Ĉar konsciencaj. Longe de l' koro virgeco  
Restas danka por ama unua dolĉeco!  
Ĝi kun ĝojo volupton renkontas salute  
Kaj adiaŭas kiel amikan festenon. 30  
Nur maljuna drinkulo, kiu brogis tute  
Intestojn, por drinkaĵo sentas abomenon.  
Pri tio Telimeno estis tute certa,  
Ĉar ŝi havis prudenton kaj estis tre sperta.

Sed kion diros homoj?... Ni povas foriri  
El okuloj, kaj ien al flank' nin retiri;  
Pli bone ĉirkaŭaĵon forlasi, forkuri:  
Ekzemple por loĝado ĉefurbon veturi,  
La junulon en grandan mondon elkonduki,  
Direkti paŝojn, helpi, konsili, eduki 40  
Koron; kiel amikon aŭ fraton disponi,  
Kaj — ĝui mondon, kiam juna estas oni!

En alkov', tiapense, kuraĝe, gajete  
Promeninte — ŝi frunton mallevis ripete.

Ankaŭ de l' Grafo sorto indas konsideron.  
Ĉu svatado kun Zosja ne havus prosperon?  
Neriĉa, sed laŭ nasko ŝi estas egala,  
El digna, senatora domo familia.



Telimen', se edzigo fariĝus reala,  
Havus estont'-azilon en hejmo ilia; 50  
Parencino de Zosja, Grafa svatulino,  
Por jun-geedzoj estus ŝi kvazaŭ patrino.

Post tia memkonsilo vokas Telimeno,  
Tra fenestro, ludantan Zosjon en ĝardeno.

Zosja, en matenvesto, kun kap' nekovrita,  
Stare tenis kribrilon en mano levita;  
Al ŝi kuris birdaro: Tie kokinetoj  
Hirtaj volve-ruliĝas; jen tufaj koketoj  
Skuas kapojn, ke kaskoj ruĝkoralaj tremas: 60  
Ili tra sulkoj, herboj, per flugiloj remas,  
Larĝ-etendante spronajn kalkanojn; jen ŝovas  
Sin poste meleagro, grave sin plenblovas,  
Je ventanima sia edzino grumblante;  
Sur herbo pavoj, kiel flosoj, direktante  
Sin per long-vostoj, naĝas; ien, diversloke,  
Argent-pluma kolombo falas neĝo-floke.  
En mez' de verda, herba rond', ariĝas preme  
La rondo da birdaro, krie, moviĝeme,  
Zonite per kolomboj-rubando blank-hela, 70  
Meze diverskolora, punkta, stria, stela.  
Tie bekoj sukcesaj, koralaj tufetoj,  
Leviĝas el plumaro, kiel ond-fiŝetoj.  
Jen koloj sin elŝovas kaj movas, trankvile,  
Ŝanceliĝe, al akvaj tulipoj simile;  
Al Zonjo mil okuloj fulmas, laŭ stelaro.

Ŝi meze alt-leviĝas super kort-birdaro:  
Mem blanka, kaj en longa blanka vesto sia,  
Turniĝas kiel inter floroj ŝpruc-fontano,  
Ŝutante sur flugilojn, kapojn, per blank-mano, 80  
El kribril' densan hajlon da perlaro gria,  
Hordea: La indanta princ-tablojn grajnaro  
Por litvaj viandsupoj estas alpreparo;  
Zonjo el ŝrank' ĝin prenas sen mastrina scio,  
Farante al mastrajo domaĝon per tio.

Ŝi aŭdis vokon — „Zosja!“ onklinjo ripetis.

Do ŝi al birdoj reston da frandajoj jetis,  
Kaj, kribrilon tenante, kiel dancistino  
Tamburon, takt-batante, petola virgino  
Trans kokinoj, kolomboj, pavoj, kuris salte:  
Konfuzita birdaro ekflugis al-alte. 90  
Zonjo, apenaŭ teron piede tuŝanta,  
Inter ili plej alte ŝajnisflug-pendanta.  
Antaŭ ŝi, timigita flugis kolombaro,  
Kiel antaŭ volupto-diina la ĉaro.

Tra fenestro, kun krio Zonjo enkurante,  
Sur onklino-genuojn penspire eksidis;  
Telimeno kisante ŝin kaj karesante,  
Ĝoje ŝian viglecon kaj belecon vidis,  
Ĉar la edukatinon ŝi amis sincere. 100  
Sed ree ŝi agordis vizaĝon severe,  
Stariĝis, — larĝen, longen alkovon trairis  
Kaj, tenante ĉe buŝo fingron, tiel diris:

„Vi tute jam forgesas, mia Zonjo kara,  
Devenon, aĝon: via jaro deka-kvara  
Hodiaŭ komenciĝas. Do lasu en fino  
Kort-birdaron; fi! ludo de dignu'filino!  
Malpurajn kampulidojn sufiĉe ĝis horo  
Vi karesis! — vidante vin, doloras koro:  
Vi sunbrunigis haŭton, vera ciganino,  
Kaj vi paŝas, moviĝas, kiel kampulino. 110  
Kontraŭ tio mi trovis jam rimedon bonan:  
Mi hodiaŭ vin gvidos en mondon salonan;  
Ni havas multajn gastojn, do bone atentu,  
Ke, pro via konduto, mi honton ne seatu.“

Zonjo saltis, manplaŭdis, poste ĉe onklino  
Ekpendinte per ambaŭ brakoj sur la sino,  
Pro ĝojo ŝi laŭvice jen ploris, jen ridis.  
„Aĥ, onjo! tiel longe mi gastojn ne vidis!  
Ekde mi vivas tie-ĉi, kun birdoj, — gaste  
Nur sovaĝan kolombon mi ekvidis laste. 120  
Enue tiel sidi en ĉambro trankvile,  
Sinjor' Juĝisto diras: eĉ san-malutile.“

„Juĝist! diris onklino, tedas min terure,  
 Por vin konduki mondon; sub-naze murmure  
 Eabilas, ke vi estas jam plene-kreskinta;  
 Jen avo, en grand-mondo, neniam estinta!  
 Mi scias, kiel longe devas sin prepari  
 Fraŭlinet', por en mondo bon-impreson fari.  
 Sciu, ke, kiu kreskas inter homoj-rondo,  
 Eĉ bela, saĝa, restos sen efekt' en mondo 130  
 Kutiminta lin vidi ekde infaneto;  
 Sed edukita, plene-kreska fraŭlineto,  
 Se antaŭ mond' ekbrilas el ie momente,  
 Tiam ĉiu alkuras, observas atente  
 Ŝiajn movojn, kaj kiel ŝi rigardojn jetas;  
 Ŝiajn vortojn aŭskultas ĉiu kaj ripetas;  
 Kaj kiam ŝi modigas jam foje, aplaŭdi  
 Ĉiu ŝin devas tiam, eĉ neplaĉan laŭdi.  
 Vi kreskis en ĉefurbo, do kondutos saĝe;  
 Eĉ kvankam vi du jarojn jam loĝas vilaĝe, 140  
 Vi ne forgesis tute pri Petro-urbeto.  
 Nu, faru tualeton, prenu el tableto,  
 Vi ĉion pretigitan trovos por vestado.  
 La gastoj jam revenos baldaŭ el ĉasado.“

Vokitaj: ĉambristino, knabin' por akcelo,  
 En arĝent-vazon verŝis akvon el sitelo.  
 Zonjo,—kiel pasero flirtas sablobane,  
 Lavas vizaĝon, kolon, brakojn ambaŭmane,  
 Kun helpantin'. Eligas vazojn Telimeno 150  
 Kun parfumoj, pomadoj, el la magazeno  
 Sia ĉefurba, Zonjon aspergas parfume,  
 (Arom'-plenigas ĉambron), harojn unktas gume.  
 Zonjo surmetas blankajn, ajurajn ŝtrumpetojn,  
 Kaj la varŝavajn, blankajn, atlasajn ŝuetojn.  
 Dume al ŝi korsajon laĉis ĉambristino,  
 Poste sur korson jetis mantelon el lino;  
 Oni la papilotojn frizitajn kolektis,  
 Buklojn, kiel tro longajn, en du volvojn plektis,  
 Laŝante sur tempioj kaj frunto glat-haron.  
 Ĉambristin' kolektitan freŝe cejanaron 160  
 Kunligis en girlandon, kiun Telimeno

Al kap' de Zonjo pinglas, laŭ art' speciala,  
 De l' dekstra flank' maldekstren: flor', de haro pala,  
 Kontrastis bele, kvazaŭ de spikoj da greno!  
 Post mantelo-depreno, preta estis ĉio.  
 Zonjo, tra kapo, blankan surjetis robeton,  
 En mano volvas blankan, batistan tuketon,  
 Kaj ŝi tuta aspektas, kiel blank-lilio.

Harojn kaj veston oni al ŝi last-fasonis  
 Kaj iri longen, larĝen tra ĉambro ordonis. 170  
 Onklin' atentas, kiel konulino sperta,  
 Ekzercas la nevinon kaj grumblas kolere;  
 Fine, ĉe riverencoj, krias malespere:  
 „Mi malfeliĉa! Zonjo, jen influo certa  
 De anseroj, paŝtistoj! vi larĝe dismetas  
 Piedojn kiel knabo, rigardojn vi jetas  
 Kiel separatino! ĉio sengracia!“  
 Zonjo diris malĝoje: „Jen kulpo ne mia!  
 Fermite, mi ne povis flegi danco-arton:  
 Do ŝatis mi kort-birdojn kaj infanoj-varton; 180  
 Sed kiam inter homoj mi iom distriĝos,  
 Vi vidos, onjo, kiel mi tiam lertiĝos.“

„Cetere, diris onjo, mi eĉ kort-birdaron  
 Preferus, ol ĝisnunan, nian fi-gastaron;  
 Diru, kiu kutimis gaste alveturi:  
 Preposto, damojn ludi aŭ preĝojn murmuri,  
 Kaj palestro <sup>1)</sup> kun pipoj! Jen fraŭlaro nia,  
 Imitinda modelo de kondukt' gracia!  
 Nun almenaŭ sin montri povas fraŭlineto,  
 Ĉar ĉe ni kolektiĝas deca societo. 190  
 Atentu, juna Grafo nun estos en domo,  
 Vojevoda parenco, instruita homo;  
 Estu por li ĝentila.“

Ĉe pordego henas  
 Ĉevaloj, kaj ĉasistoj bruas: „Ili venas!“  
 Gvidante al salono nevinon, ŝi diris.

---

1) Vidu rimarkon sur paĝo 14-a.

Sed la ĉasistoj tien ankoraŭ ne iris,  
Sed en ĉambrojn, kaj ŝanĝis tie ĉaso-veston,  
Por ne iri en jakoj sinjorin'-ĉeeston.  
Tadeo, Graf', unuaj, vestite alie,  
Enkuris:

Telimeno mastrinas ĉi-tie, 200  
Salutas kaj sidigas gastojn, komplimentas,  
Kaj nevinon al ĉiuj laŭvice prezentas:  
Unue al Tadeo, kiel al parenco.  
Li kliniĝis malalte, ŝi kun riverenco.  
Li volis ekparoli, jam apertis buŝon,  
Sed vidinte okulojn de Zonjo, timeme  
Li mutiĝis kaj staris pale, flame, treme,  
Kaj li mem ne komprenis sian koro-tuŝon.  
Li estis malfeliĉa tree, — post rekono 210  
De Zonjo, laŭ lum-haroj, kresko, voĉa sono;  
Ĉi talion, kapeton, li vidis ĝardene,  
Ĉi voĉeto lin vokis al ĉaso matene.  
Sed Vojski lin eligis el konfuz': vidante,  
Ke li paliĝas, staras krur-ŝanceliĝante,  
Foriri al ripozo, donis la konsilon;  
Tadeo sin apogi iris al kameno,  
Poste, silente, larĝan, frenezan pupilon  
Turnadis jen al Zonjo, jen al Telimeno.  
Telimeno rimarkis, kaj ŝi ne eraris, 220  
Ke Zonjo sur Tadeon grand-impreson faris;  
Ŝi ne divenis ĉion, tamen ŝin konfuzas  
Lia aspekto, kiam ŝi gastojn amuzas.  
Elektinte momenton, ŝi alkuras fine:  
Ĉu li sanas? kaj kial malĝojas? obstine  
Ŝi demandas, aludas Zonjon, ŝerci provas.  
Sur kubut' apogite, Tade' sin ne movas,  
Mute sulkigas brovojn kaj buŝon kurbigas,  
Kaj des pli Telimenon konfuzas, mirigas.  
Do, ŝanĝinte vizaĝon, parol'-manieron, 230  
Ŝi komencis per akraj vortoj la koleron  
Eligi, pik-aludi, riproĉi. — Subite  
Tade' leviĝis, kvazaŭ de vespo pikite,  
Ekrigardis kolere, kraĉis, ne eldiris  
Eĉ vorton, piedŝovis seĝon kaj eliris,

Krake-fermante pordon. Feliĉe, pri l' sceno  
Neniu gast' atentis, ekster Telimeno.  
Li kuris en kamparon. — Kiele ezoko,  
Kiam trapikis ĝian bruston dentoj-hoko,  
Baraktas, subakviĝas kaj forkuri penas,  
Sed ĉie la feraĵon kaj ŝnuron kuntrenas: 240  
Tiel Tadeon sekvis mordanta malĝojo;  
Li saltis trans fosajoj, bariloj, sen vojo  
Kaj sen celo, ĝis kiam, tre longe vagante,  
Li eniris arbaran profundon, trafante,  
Intence aŭ okaze, altajeton saman,  
Kiu vidis feliĉon lian, kie aman  
Bileton li ricevis, amo-garantie,  
Lokon, „Sanktej' medita“ nomatan laŭscie.

Ĉirkaŭe rigardante, Tadeo ekvidas:  
Telimeno! solece, pens-profundiĝinte, 250  
Laŭ figur', vest' — alia ol hieraŭ sidas,  
En blankajo, sur ŝtono, kvazaŭ ŝtoniĝinte;  
La klinitan vizaĝon en manojn ŝi premas,  
Kaj, kvankam ne aŭdiĝas, videble plorĝemas.

Vane Tadea koro sin defendi provis:  
Li sentis, ke kompatato lian koron movis.  
Li mute rigardadis, fine eksopiris,  
Kaj mem al si kolere: „Stultulo! li diris,  
Ĉu estas ŝi la kulpa de mia eraro?...“  
Do li elŝovis kapon el post arbitaro — 260  
Ŝi subite leviĝas kaj en ĉi momento  
Ĵetiĝas ĉiufanken, saltas tra l' torento,  
Diskrucas brakojn, harojn dislasinte, palas,  
Kuregas en arbaron, ekĝenuas, falas,  
Ne povante leviĝi, sur herbo turniĝas,  
Kaj el movoj teruro de l' turment' vidiĝas:  
Ŝi kaptas bruston, kolon, genuojn; do time  
Saltis Tade', pensante pri epilepsia  
Atako aŭ frenezo. Sed kaŭzo alia  
Estis de l' movoj.

Apud betular', proksime, 270  
Estis grand-formikejo. Insekt' laborema

Ĉirkaŭe herbe svarmis, nigra, moviĝema;  
 la bezono, plaĉo aŭ celo kaŝita  
 Ĝin speciale logis al Sanktej' medita:  
 De l' ĉefurba altaĵo ĝis fonto flustranta  
 Eltredeis vojon ĝia vicaro marŝanta.  
 Telimen', malfeliĉe, sidis sur vojeto:  
 Formikoj, bril-logite de blanka ŝtrumpeto,  
 Dens-enkuris, komencis tikleti, mordadi;  
 Do ŝi devis forkuri, ilin forskuadi, 280  
 Fine sur herb' sidiĝi kaj insektojn ĉasi.

Ne povis ja Tadeo sen helpo ŝin lasi:  
 Purigante robeton, li teren kliniĝis,  
 Al ŝia frunt' okaze per buŝ' proksimiĝis. —  
 En ĉi amika pozo, ili ne parolis  
 Pri kvereloj, kaj tamen paciĝi bonvolis;  
 Eble pli longe daŭrus la interbabilo,  
 Sed ilin Soplicova vekis sonorilo:  
 Signo al vespermanĝo...

Temp' al revenado,  
 Precipe, ĉar aŭdiĝis branĉetoj-krakado. 290  
 Oni serĉas? ne decas kuna hejmvveno:  
 Do Telimen' ŝteliĝas dekstren, al ĝardeno,  
 Kaj Tadeo maldekstren kuras, sur la straton.  
 Ambaŭ sentis revene timan koro-baton:  
 Al ŝi, el post arbusto, foje kvazaŭ brilis  
 Vizaĝo kapuĉita, ĝi Vermon similis;  
 Tadeo vidis bone, ke, al li, refoje  
 Longa kaj blanka ombro montriĝis dumvoje:  
 Kiu estis? ne sciis li, sed antaŭsentis,  
 Ke, en angla surtuto, Grafo sin prezentis. 300

Oni manĝis kastele. Obstina Vokisto,  
 Malgraŭ, ke ne permesis tion la Juĝisto,  
 Ree sturmis kastelon kaj prenis posedon,  
 Kaj „intromitis“<sup>1)</sup> (kiel li diras) bufedon.  
 Gastoj eniris orde kaj ronde ekstaris:  
 Ĉe tabl' unuan lokon Ĉambelano prenis:

1) Enkondukis, enportis (leĝe).

Laŭ aĝ', ofic', la digno al li apartenis.  
 Irante, li al ĉiuj klinsalutojn faris;  
 Kvestant' forestis; lokon de la Bernardino  
 Havas, dekstre de l' edzo, la Ĉambelanino. 310  
 Juĝisto, stariginte la gastojn konvene,  
 Manĝotablon latine krucoŝignis bene.  
 Viroj ricevis brandon; poste sidiĝante,  
 Ĉiuj malvarman supon manĝis, silentante.

Sekvis kankroj, kokidoj, legom' asparaga,  
 En akompan' de vinoj, hungara, malaga.  
 Ĉiuj manĝas kaj trinkas sen parol'-murmuroj.  
 Ŝajne, de kiam staris la kastelaj muroj,  
 Kiuj regalis tiom da nobeloj frate,  
 Aŭdis tiom vivuojn, kaj elis rebate, 320  
 Ne estis vespermanĝo tiel malserena;  
 Nur ŝtopiloj-fragado, teleroj-tintsono  
 Aŭdiĝas en vestiblo granda kaj malplena:  
 Kvazaŭ la buŝojn laĉis spirit' de malbono.

Multaj estis silento-kaŭzoj. Ĉasistaro  
 Revenis babileme, gaje el arbaro;  
 Sed pensante pri ĉaso, kiam la fervoro  
 Malvarmiĝis, rimarkis ili, ke sen gloro  
 Ili revenis: iu pastraĉ', kapuĉulo,  
 El ie saltis, kiel el kanab' grizulo, <sup>1)</sup> 330  
 Kaj venkis la ĉasistojn de l' distrikt'? Fi, honto!  
 Kia estos en Lido, Oŝmjano, rakonto, <sup>2)</sup>  
 Kiuj kun ni batalas, de pli ol jarcento,  
 Pri ĉasart'? Tiel pensis ili en silento.

<sup>1)</sup> Originale: Kiel Filip el Konopie, t. e. malĝustatempe (proverbe). Laŭ tradicia klarigo de l' proverbo, iam la parlamenta delegito „Filip el Konopie“ komencis, dum kunsido, paroladon, kiu tute ne koncernis la objekton de l' debato. La delegitaro laŭte ekridis kaj la malĝustatempa ekparolo fariĝis proverba. Ĉar leporon oni nomas ankaŭ kelkdistrikte „Filipo“ kaj „Konopie“ signifas „kanabo“, do la proverbo povas esti pli simple klarigita, kaj ĉi tiun pli simplan klarigon sekvas la traduko.

<sup>2)</sup> Lida kaj Oszmiana, urboj en Litvo, en Vilna gubernio.



Krom komuna aflikto, Rejent', Asesoro,  
 Freŝan honton pri hundoj havas en memoro.  
 En okul' ili vidas: jen fripon', leporo,  
 Streĉas saltilojn, voston movas, per ŝvingilo  
 Mokas kaj vipas korojn, kiel per batilo;  
 Sidante, ili klinis vizaĝon al plado. 340  
 Asesor' havis novan kaŭzon de plendado:  
 Telimenon kaj siajn rivalojn li vidas.  
 Al Tade' flankturnite, Telimeno sidas,  
 Konfuzite, rigardi lin, al si ne fidas;  
 Ŝi volis iom distri la Grafon sinjoron,  
 Per diskuto bonigi lian senhumoron:  
 Ĉar Grafo malserene venis el promeno,  
 Pli ĝuste, laŭ Tadeo, el embusk'-posteno.  
 Fiere levis frunton Grafo, sin aŭdante,  
 Kuntiris brovojn, poste preskaŭ malestime 350  
 Rigardinte, sidigis ĉe Zonjo proksime,  
 Plenigas sian glason, telerojn ŝanĝante,  
 Kliniĝas kaj ridetas, ĝentilajojn diras,  
 Iafaĵe okulojn turnas kaj sopiras.  
 Tamen, kvankam li lerte simulis komence,  
 Vidiĝas, kiu-spite li Zonjon koketas,  
 Ĉar, kapon returnante, kvazaŭ neintence,  
 Al Telimen' rigardon minacan li jetas.

Telimeno ĉi-tion kompreni ne povis,  
 Ekpensis: jen strangulo! kaj ŝultrojn ekmovis. 360  
 Pri nova koketado de l' Graf' eĉ kontente,  
 Ŝi al dua najbaro sin turnis atente.

Tadeo ne aŭskultis, nenion manĝante,  
 Ne trinkis, al telero okulojn fiksante;  
 Telimen' al li verŝas vinon; li kolere  
 Je l' trudec', demandite pri sano — oscedas.  
 Li indignas (ŝanĝite tiel ĉi-vespere),  
 Ke tro da koketeco Telimen' posedas;  
 Tro dekolcita vesto skandalas junulon,  
 Kiel maldeca — dume, li levis okulon! 370  
 Li ektimis, li havis nun pupil'-spegulon  
 Pli klaran, ĉar, al ŝiaj vangoj rigardeton

Ĵetinte, tuj malkovris teruran sekreton:  
Ŝi estas ruĝumita!

Ĉu malbona speco  
De koloril'? ĉu iel viŝiĝis ruĝeco:  
Kelkloke haŭto estas maldense kovrita..  
Eĉ eble mem Tadeo, en Sanktej' medita,  
Parolante proksime, viŝis el blankilo  
Ruĝon, malpezan kiel polvet' de flugilo  
Papilia. Ŝi troe rapidis revene, 380  
Mankis tempo bonigi kolorojn konvene:  
Ĉirkaŭ buŝo vidiĝis lentugaj makuloj.  
Kiel ruzaj spionoj, de Tade' okuloj,  
Malkovrinte perfidon unu, la restajon  
De ĉarmoj vic-esploras kaj trovas falsajon:  
En buŝ' — du dentoj mankas; sur frunt', sur tempio —  
Sulkoj, mil sulkoj — sub la menton' antaŭ ĉio!

Tade', domaĝe! sentis, kia malbezono  
Atenti tro belajon; hontinde, spiono  
Esti de amatino sia; abomene, 390  
Ŝanĝi guston — sed kiu regas koron plene?  
Tutvane volas helpi konscienc' al amo,  
Revarmigi animon ĉe l' rigardo-flamo:  
Jam ĉi rigardo, kiel lun', senvarme estas,  
Do, ĝisfunde rigida, anim' ne delegas..  
Li tiel mem-riproĉis sin, kaj koro-pente  
Klinis kapon kaj mordis la lipojn silente.

Dume malbon-spirito lin allogas tente,  
Kaŝ-aŭdi, kion Zosja al la Grafo diras.  
Graŝ' afable favoron de l' knabin' akiras: 400  
Ŝi mallevas okulojn, roziĝas de honto,  
Sed poste ili ridis; sekvis babilado  
Pri ia, en ĝardeno, subita renkonto,  
Kaj pri ia, sur lapoj kaj bedoj, paŝado.  
Tadeo eble-longe orelojn streĉante,  
Glutis maldolĉajn vortojn, anim'-digestante  
La teruran festenon.—Kiel en ĝardeno  
Viper' pikile trinkas el herbaĉ'-veneno,

Poste, kunvolviĝinte, kuŝiĝas sur strato,  
Minace al sengarde-kura piedplato: 410  
Tiel, jaluz'-venenon trinkinte abunde,  
Li, ŝajn-indiferenta, koler'-ŝaŭmis funde.

Se gaja societo havas kelk kolerajn,  
Malserenec' ilia influas ceterajn.  
Ĉasistoj jam silentis; dua part' egale  
Eksilentis: Tadeo ĝin infektis gale.

Eĉ Ĉambelano sidis tree malserene,  
Sen babilem', vidante, kiel sidis jene  
Liaj dothavaj, belaj kaj junaj filinoj,  
Laŭ distrikt'-opinio unuaj fraŭlinoj, 420  
Silente, neglektite de la junularo.  
Juĝist' gastama same ĉi-tion atentis;  
Kaj Vojski, rimarkante, ke ĉiuj silentas,  
Diris: tiel ne manĝas poloj, sed luparo!

Hreĉeĥa je silento estis tre sentema;  
Li amis babilulojn, mem tre babilema.  
Ne miru! li pasigis vivon je festenoj,  
Sejmetaj konsiliĝoj, pelĉasoj, kunvenoj.  
Al li kutime io al orel' tamburis,  
Eĉ kiam li silentis aŭ muŝon postkuris 430  
Kun klakil', aŭ, ferminte okulojn, ekrevis;  
Tage — diskutoj, nokte — murmuradi devis  
Ies rozari'-preĝoj aŭ rakont' fabela.  
Do li sentis malamon al pipo malbela,  
Invento de germanoj, por nin fremdlandigi:  
Ĉar Polujon mutigi — estas ĝin mortigi.<sup>1)</sup>  
Aĝon trababilinte, li dormis en bruo;  
Silent' lin vekis.—Tiel mueliston skuo  
Kaj radoj-knar' dormigas; kiam aksoj haltas:  
Vort' karniĝis!<sup>2)</sup> li time kriante eksaltas. 440

1) Originale: mutigi estas, germanigi (mutuligi), vortludo malfacile imitebla, ĉar en slavaj lingvoj, laŭ muta — niemy, la nomo de germano (niemiec) signifas popol-etimologie „mutulo“; kvankam aliparte ekzistis iam apud Rejno la germana gento de „nemetoj.“

2) Citajo evangelia, proverbe kiel esprimo de mirego.

Vojski kapkline turnis sin al Ĉambelano,  
Al Juĝist' signodonis ĉe buŝo per mano,  
Petante voĉon. Ili ambaŭ kapokline  
Respondis, tio estas, invitis inkline.  
Vojski komencis:

„Volu, sinjoroj junuloj,  
Ĉe vespermanĝ' amuzi laŭ malnov-reguloj,  
Ne silenti kaj maĉi. Ĉu kapucenaro  
Ni estas? Silentanto, inter nobelaro,  
Similas al ĉasisto, ŝargon en pafilo,  
Rustiganta. De avoj emon al babilo 450  
Mi laŭdas: ne nur manĝi post ĉasado ili,  
Sed ankaŭ reciproke volis satbabili,  
Malpezigante korojn, laŭdis kaj mallaŭdis:  
Pri pafistoj, pelantoj, hundoj oni aŭdis  
Opiniojn; levigis, por ĉasist'-orelo,  
Bruo agrabla, kvazaŭ dua ĉasopelo.  
Mi scias: Nub' da nigraj zorgoj, viapense,  
El kapuĉo de Vermo eklevigis dense!  
Vi hontas pro maltrafoj! Ne hontu pri pafoj: 460  
Al plej bonaj ĉasistoj okazas maltrafoj;  
Trafi, maltrafi estas sort' de pafisteco.  
Vagante kun pafilo ekde infaneco,  
Mi maltrafis! Tuloŝĉik, fam-pafisto, same;  
Eĉ Rejtan, la mortinto, ne trafis ĉiame.  
Pri Rejtan mi rakontos poste. Koncernante  
Ellason el sieĝo: ke, lancon havante,  
Ambaŭ sinjoroj antaŭ best', kiel mi aŭdas,  
Ne staris firme, tion ja nek iu laŭdas,  
Nek mallaŭdas; forkuri kun ŝargo pafila  
Signifis ĉiam esti timul' sensimila; 470  
Kaj ankaŭ (kiel faras multaj), pafi blinde,  
De fore, sen celpreno, estas tre hontinde;  
Sed kiu al si beston allasas, mezuras,  
Kiel konvene, celon, kaj poste forkuras,  
Maltrafinte, li tute reniras sen honto;  
Li povis lanc-batali, sed nur laŭ volonto,  
Ne laŭ devo, ĉar lanco servas, ĉe pafilo,  
Ne por atak', sed sole kiel defendilo.  
Tia estis regulo. Do fidu, sinjoroj,

Al mi, kaj retirigon ne prenu al koroj, 480  
Kara Tadeo, same via moŝto, Grafo!  
Kiel ofte vi pensos pri tiu maltrafo,  
Rememoru averton de Vojski refoje:  
Neniam baru unu la alian voje,  
Kaj ne pafu duope al sama ursino...“

Kiam Vojski parolis la vorton: ursino,  
Asesor' duonlaŭte sufloris: knabino.  
Brave! kriis junuloj, kiel brua eŝo,  
Ripetante averton de sinjor' Hreĉeŝio, 490  
Nome vorton: ursino; aliaj; knabino,  
Vokis ridante. Flustris Rejento: virino.  
Koketulino, diris Asesor', rigardojn  
Al Telimen' jetante, kiele ponardojn.

Vojski neniun iel pik-aludi volis,  
Nek li atentis, kion flustrantoj parolis;  
Tre kontenta, ke povis li gastojn ridigi,  
Kaj volante ĉasistojn konsole gajigi,  
Li diris, en kalikon enverŝante vinon:

„Vane miaj okuloj serĉas Bernardinon:  
Al okazaĵo — turnus mi lian atenton, 500  
Similanta ĉi-tagan nian akcidenton.  
Nur unu viron konis Ŝlosisto ĝishore,  
Pafantan, kiel Vermo, celtrafe, de fore.  
Mi konis duan, kiu, per celtrafo, same  
Savis du vivojn; tion mi vidis; tiame  
Iris en Nalibokajn <sup>1)</sup> arbarojn al ĉaso  
Sendit' Tadeuŝ Rejtan kaj duko de Nasso: <sup>2)</sup>  
Sinjoroj ne enviis gloron de nobelo,  
Lian sanon ĉe tablo trinkis en kastelo.  
Grand-donacojn ricevis li, sen nombro iu, 510  
Kun fel' de mortigita apro. Pri ĉi-tiu

<sup>1)</sup> Naliboki, urbeto en Litvo, en distrikto Oszmiana.

<sup>2)</sup> Duko Karlo de Nassau-Siegen (nask. 1745, mort. 1808), fama militisto kaj aventuristo. Li estis rusa admiralo kaj venkis turkojn ĉe Lemano; poste li estis tute venkita de svedoj. Kelkan tempon li restadis en Polujo kaj havis polan civitanecan.

Apro kaj paf' rakontos mi, kiu atestas  
Okul-vide: afero tre simila estas,  
Kaj okazis al grandaj paf-majstroj de ĉaso,  
Al sejm-sendito Rejtan kaj duko de Nasso.\*

Tiam Juĝist', kun plena pokalo en mano,  
Diris: Vojski, mi trinkas por Verma bonsano!  
Ne povante Kvestulon rekompenci riĉe,  
Ni almenaŭ por pulvo lin pagos sufiĉe:  
Por urso, mortigita de Verm' en ĉasejo, 520  
Dujar'-kuirprovizon havos monaĥejo.  
Sed felon mi ne donos al Verm'; ĝin posedos  
Mi per fort', aŭ monaĥo humile ĝin cedos,  
Aŭ mi felon aĉetos, eĉ por dek zibeloj;  
Ni laŭvole disponos pri ĉi-tiu felo:  
La glorokronon prenis jam servisto dia:  
Felon donos moŝtulo, Ĉambelano nia,  
Al ĉi, kiu por dua rekompenc' meritis.\*

Ĉambelan', glatumante frunton, ekmeditis.  
Pafistoj ekmurmuris: ĉi-tiu sinjoro 530  
Trovis beston, alia faris al ĝi vundon,  
Tiu returnis beston al ĉasejo, hundon  
Tiu vokis. Kverelis Rejent', Asesoro,  
Unu, laŭdante ecojn de Sanguŝka ĉasa  
Sia pafil', kaj dua, de la Sagalasa.

„Juĝist', najbaro! fine Ĉambelano diris,  
Unuan rekompenccon la Pastro akiris.  
Kiu ricevu duan, juĝi malfacile;  
Ĉiuj ŝajne meritis ĝin tute simile 540  
Kaj egalas laŭ sperto, lerto, kuraĝeco.  
Du ĉasistojn distingis sort' per danĝereco,  
Du estis plej proksime de urs-ungoj-celo:  
Tade' kaj Graf'; al ili apartenas felo.  
Sinjor' Tade' (mi certas pri lia intenco),  
Cedos, kiel pli juna kaj mastra parenco;  
Do prenos moŝto Grafo „opima spolia“: 1)

1) „Spolia opima“ (latine), venko-signoj, akiraĵoj.

Ĉi ornamo de ĉambro ĉaspafista lia  
Estu de hodiaŭa amuz' rememoro,  
Signo de ĉasfeliĉo, impulso al gloro.\*

Li pensis, ke li Grafon ĝojigis konsole, 550  
Kaj, dume, lian koron li akre traboris;  
Ĉar kiam Graf' pafistan ĉambron rememoris,  
Li rigardis, levinte kapon, malgraŭvole  
Al cervaj kapoj, branĉaj kornoj: laŭr-arbaro,  
Kiun patroj al filoj semis por kronaro.  
La portret'-ornamitaj vicoj de kolonoj,  
En arkaj' Duonkapro, antikvaj blazonoj,  
Per voĉoj de pasinto ekparolis ĉie.  
Li vekigis: ĉe kiu li gastas? kaj kie?  
En propra dom', Horeška gastas heredanto! 560  
Ĉe malamik' Soplico, kiel festenanto!  
Kaj, kiun por Tadeo li sentis, envio  
Kontraŭ Soplicoj, Grafon movas ekster tio.

Do li diris maldolĉe: „Ĉar dometo mia  
Ne indas je donaco grandioza tia,  
Do inter ĉi kornuloj restu urso felo,  
Ĝis Juĝisto ĝin donos al mi kun kastelo.“

La Ĉambelano, kio minacas, vidante,  
Sonigis tabakujon, pri voĉo petante.

„Tre laŭdinde, li diris, mia Graf', najbaro, 570  
Vi, eĉ manĝante, zorgas pri negoc'-afero,  
Ne tiel, kiel moda, juna sinjoraro,  
Vivanta sen kalkulo. Laŭ dezir', espero,  
Mia juĝo finiĝos per paco bonvola;  
Pri grund' bona restas malfacilo sola.  
Interŝanĝon proponi tial mi intencis,  
Laŭ manier' sekvanta.“ — Paroli komencis  
Li orde, (laŭ kutimo), pri plan' intencita,  
Kiam, duonparole, mov' neatendita  
Komenciĝis en fino de tablo. Kelk-iaj 580  
Ion rimarkis, fingre ĝin montris aliaj,  
Ĝis fine kapoj, kiel spikoj, reklinite

De vent', al kontraŭflanko turniĝis subite,  
Al angul'.

Tie pendis Tablestro-portreto,  
De lasta el Horeŝkoj-gento; el pordeto,  
Tie kaŝita inter kolonoj, jen homo  
Mallaŭte elŝoviĝis, kiele fantomo:  
Gervazo, laŭ statur'o kaj vizaĝo grava,  
Kun arĝent'-Duonkaproj sur la jako flava.  
Li paŝis rekte, mute, severe, la ĉapon  
Ne depreninte, eĉ ne klininte la kapon;  
Kaj li, ponarde-brilan ŝlosilon tenante,  
Malfermis ŝrankon, ion en ĝi ŝraŭb-turnante.

590

En du vestibl'-anguloj, kolon'-apogite,  
Staris du lud-horloĝoj, en ŝrankoj fermite:  
La malnovaj stranguloj, en malpac' konstanta  
Kun sun', tagmezon montris ĉe sun' subiranta.  
Ripaŝi maŝinajon, Gervazo ne provis,  
Sed ankaŭ sen streĉado ĝin lasi ne povis,  
Kaj per ŝlosil' turmentis en ĉiu vespero;  
Ĵus nun okazis tempo de tiu afero.  
Do, kiam Ĉambelano okupis atenton  
De partioj, Gervazo pezilon ektiris:  
Grincigis rustaj radoj la fenditan denton;  
Ĉambelano skuiĝis kaj, haltinte, diris:  
„Vian urĝan laboron vi prokrastu, frato!“  
Kaj li daŭrigis planon. Ŝlosist', dum traktato,  
Duan pezilon forte-pli ektiris spite,  
Kaj tuj pirolo, super horloĝo lokite,  
Komencis sian kanton, kun flugiloj-bato.  
Birdo, arte-farita, difektita tute,  
Ekbalbutis kaj pepis, ĉiam pli balbute.  
Gastoj ridis; rompiĝis Ĉambelan'-traktato;  
Li ekkriis: „Ŝlosisto, pli ĝuste noktuo,<sup>1)</sup>  
Se vi ŝatas la bekon, sufiĉe da bruo!“

600

610

<sup>1)</sup> Ŝlosisto (klucznik) kaj noktuo (puszczyk) donas en lingvo pola riman asonancon, formante tiel vortludon, malfacile imiteblan. Por tio la Ŝlosisto, en sia respondo, vortludas kun noktuo' kaj nokte en v. 622.



Sed Gervazon minaco tute ne tuŝetis;  
 Dekstran manon li grave sur horloĝon metis,  
 Kaj ĉe kokso preninte sin maldekstra-mane:  
 „Ĉambelaneto! kriis li, vi ŝercas vane;  
 Paser', pli eta, hejme pli kuraĝa estas 620  
 Ol noktu', kiu fremdan kastelon eknestas.  
 Ne mi — noktu', sed kiu nokte sin enŝtelas  
 Fremdan domon -- noktuas, kaj mi lin forpelas.“

„For, for kun li!“ ekkriis Ĉambelan'.  
 „Sinjoro,

Grafo! vokis Ŝiosisto, kion vi aranĝis:  
 Sufiĉe makuliĝis jam via honoro,  
 Ke vi, kun ĉi Soplicoj, kune trinkis, manĝis;  
 Jen vi toleras: oni kastel'-oficiston,  
 Min, Gervazon Rembajlon, Horeŝkoj-Ŝlosiston,  
 Insultu, nepunate, en Tablestra domo?“ 630  
 Tiam vokis Protazo: „Silentu! En nomo  
 De leĝo! Mi Protazo, Baltazar' Bjeĥala,  
 Du-noma, Generalo iam tribunala,  
 Vulgo <sup>1)</sup> Vokisto, faras mian obdukcion <sup>2)</sup>  
 Vokistan kaj samtempe formalan vizion, <sup>3)</sup>  
 Mendante ĉeestantoj-ateston; sinjoro  
 Asesor'! mi alvokas vin por juĝ-esploro  
 Pro Juĝista Soplica moŝt'; pri inkursio  
 Aŭ lim-invado! estas superforto tio  
 Pri kastelo, en kiu Juĝist' leĝe sidas, 640  
 Ĉar tie li manĝadas, kiel ĉiuj vidas.  
 „Bjeĥaĉ!<sup>4)</sup> kriis Ŝlosisto, vi ĉesos, fripono!“  
 Kaj li, preninte ferajn ŝlosilojn ĉe zono,  
 Ĉirkaŭ kap' ilin ŝvingis, jetis el tut-forto;  
 La fasko flugis, kiel el jetilo ŝtonoj,  
 Certe Protazan kapon fendus je kvaronoj;  
 Sed Vokisto sin klinis kaj savis de morto.

<sup>1)</sup> Vulgo (latine), ordinare, kutime, aŭ.

<sup>2)</sup> Obdukcio, ago de juĝa oficisto, de li protokole farita.

<sup>3)</sup> Vizio, ofica vokista rigardado de l' loko kaj de la faritaj tie malutiloj.

<sup>4)</sup> Brzechacz, bojanto, kalumnianto, vortlude kun la samradika nomo de l' Vokisto Brzechalski.

Ĉiuj saltis el sidoj; mallaŭtiĝis plene,  
Ĝis Juĝisto ekkriis: „Ligu lin katene!  
Hola servistoj!“ — ili alvenis en kuro, 650  
Tra mallarĝa irejo inter benk' kaj muro.  
Sed Graf' per seĝ' al ili meze vojon baris,  
Kaj sur redut' malforta per pied' ekstaris:  
„Garde! Juĝist'! li vokis, neniŭ ofendu  
En mia dom' serviston; kiu volas, plendu  
Al mi, sed ne kuraĝu tuŝi maljunulon.“

Ĉambelano al Grafo strabis en okulojn:  
„Sen via help' mi scios puni senprokraste  
La impertinitecon de ĉi nobeleta;  
Graf', kastelon proprigas vi antaŭ dekreto; 660  
Ne vi ĉi-tie mastras, nek akceptas gaste:  
Se vi eĉ ne respektas kapon pro grizeco,  
Distriktan alt-oficon estimu laŭ deco!”

Graf' murmuris: „Sufiĉe da babilo via  
Pri respektoj, oficoj; enuu alia!  
Mi faris stulte, kiel kun moŝtoj miksata  
En drinkadon, kun fino tre maldelikata;  
Pri honoro-ofendo, respond' ĉe okazo  
De sopra revidiĝo! Sekvu min Gervazo!”

Ĉambelano respondon ne supozis tian. 670  
Ĝuste tiam plenigis li kalikon sian;  
Malrespekto lin trafis kiel fulmobato:  
Ĉe kalik' apogite, botel' en manplato,  
Kun kapo flankturnita, orelo streĉita,  
Larĝ-apertaj okuloj, buŝo malfermita,  
Li silentis, sed premis kalikon en mano  
Potence; vitro krevis, vinon ŝprucigante  
En okulojn, kaj kvazaŭ fajron enverŝante  
En animon: vizaĝe flamis Ĉambelano, 680  
Okuloj ardis; vorton li maĉis, post maĉo  
Ĝi elflugis tra dentoj: „Stultul'!.. Grafidaĉo!  
Mi vin tuj! Mi ĉi-tie! Tomaŝ, karabelon!  
Mi vin instruos „mores“<sup>1)</sup>! en karceron sendos!

1) Mores (latine), moroj; deca konduto, respekto. La senco de la frazo estas: Mi vin punos.

Respektoj enuigas delikat-orelon!  
Mi tuj ĉi oreletojn per sabro forfendos!  
For! ekster pordon! Sabron! Tomaŝ, karabelon!“

Tiam saltis amikoj al la Ĉambelano;  
Juĝist', vokante: „Haltu!“ kaptas lin je mano;  
„Antaŭe li provokis min! Protaz', palaŝon! 1)  
Kiel urs' ĉe bastono, li faros danc-paŝon.“ 690  
Sed Tade' Ĉambelanon kaj onklon retenas:  
„Moŝtoj, ĉu kun la dando hatiĝi konvenas  
Al vi, sinjoroj? estas ĉi-tie junuloj;  
Konfidu: mi lin punos laŭ ĉiuj reguloj.  
Kaj vi, kiu provokas aĝulojn kverele,  
Ni vidos, ĉu vi estas kavalir' duele:  
Ni morgaŭ fin-decidos pri loko, armilo;  
Nun kuru, dum vi sanas!“

Tre bona konsilo:  
Por Graf', Ŝlosisto, estis danĝera situo;  
Ĉe supra tablo-fino estis nur grand-bruo, 700  
Sed el malsupra, fluge boteloj zumetis  
Ĉirkaŭ kapo de Grafo. Ekploris, ekpetis  
Timigitaj virinoj; Telimen', kriinte:  
„Veel“ levis okulojn kaj falis, sveninte;  
Kolon, trans Grafaj brakoj, ŝi klinis kaj metis  
La cignan bruston sian al Grafo ĉe koro.  
Grafo, kvankam kolera, haltis en fervoro,  
Komencis elsvenigi, froti.

Dume celis  
Al Gervazo boteloj, seĝoj, jam ŝancelis  
Lin; servistaro levis jam pugnojn por bato, 710  
Atakante amase: feliĉe, kompato  
Movis Zonjon; vidante sturmon, ŝi alsaltis  
Kaj braketojn etendis ŝirme: oni haltis.  
Cedante, li foriĝis ien el okulo;  
Oni serĉis sub tablo: tiam maljunulo  
Eliris, duaflanke, el sub ter' kvazaŭe,

1) Speco de sabro, tranĉa kaj pikarmilo, iom kurbigita.

Per fortaj brakoj levis benkegon, ĉirkaŭe  
 Ĝin turnis muellile, vestiblon dumvoje  
 Duonpurigis, prenis Grafon, ŝirme ŝvingis  
 Benkon, ĝis ambaŭ tiel pord-sojlon atingis; 720  
 Li haltis, malamikojn rigardis refoje  
 Kaj pensis dum momento, ĉu cedi armite,  
 Aŭ kun armilo serĉi feliĉon milite:  
 Li batalos. Jam kiel rompilon de muro  
 Li posten ŝvingis benkon, jam kapon fleksinte,  
 Kun brust' antaŭstreĉita, kun levita kruro,  
 Atakis, sed ektimis... Vojski-n ekvidinte.

Pan Vojski kun okulo duone fermita,  
 Sidis silente, ŝajne profunde-medita;  
 Sed li alturnis kapon, kiam Graf' malpacis 730  
 Kun Ĉambelan' kaj poste Juĝiston minacis;  
 Vojski frotis palpebrojn, tabakon reflaris.  
 Kvankam li al Juĝisto forparence staris,  
 Sed, loĝante en lia domo gast-amema,  
 Por sano de l' amiko estis tre zorgema;  
 Do scieme rigardis li al ĉi-batalo,  
 Metis sur tablo manon, kaj sur ĝi tranĉilon;  
 Al ung' de montra fingro turninte tenilon,  
 Al kubut' li direktis akraĵon el ŝtalo;  
 Poste, per brak' klinita posten, balancante, 740  
 Li kvazaŭ ludis, Grafon fikse rigardante.

Tranĉil'-jet-art', terura en batalo mana,  
 Jam neglektita estis en lando litvana;  
 Nur maljunaj ĝin konis; Ŝlosist' iam ŝvingis  
 Tranĉilon dum kvereloj, Vojski sin distingis.  
 Ke li forte ekbato, montras man-impeto,  
 El okuloj vidiĝas: Grafon celas jeto,  
 (La lastan el Horeŝkoj, kvankam laŭ patrino).  
 Junuloj ne atentis pri movoj-destino:  
 Gervaz' paliĝis, Grafon post benk' ŝirme lokas, 750  
 Cedas al pordo. „Kaptu!“ krietaro vokas.

Kiel lup', ĉirkaŭite sur kadavro besta,  
 Hundojn, kiu malhelpis lin ĉe manĝo festa,

Atakas, pelas, ŝiras: jus, tra l' bojo, sonas  
 Kraket' de duon-ĉano: 1) lup' kraketon konas,  
 Ĉirkaŭrigardas, vidas: post hundoj, kaŝite,  
 Ĉasist' duon-klinite, genu'-apogite,  
 Turnas tubon, jam tuŝas ĉanon... Lup' orelojn  
 Mallevas, vost-alpremas kaj forkuras celon;  
 Hundaro, triumfante, sur lupon jetiĝas, 760  
 Pinĉas lin je vil-haroj; jen, besto furniĝas,  
 Rigardas, makzel-klakas, dentojn grincigante,  
 Minacas, — tuj forkuras hundoj, hurletante:  
 Tiel Gervaz', minaca stature, forkuras,  
 Atakantojn per benko kaj okul' teruras,  
 Ĝis, kun Grafo, en niĉon rifuĝi prosperis.

„Kaptu!“ ree laŭtiĝis. Triumfo — tro frua:  
 Ŝlosisto, super kapoj de l' amaso brua,  
 Sur fiorej', ĉe malnova orgen', reaperis,  
 Elŝiradis plumb-tubojn, kaj krakigis akre, 770  
 Jam, batonte el supre, minacis masakre;  
 Sed gastoj la vestiblon forlasis en kuro,  
 Kaj servistoj ne staris firme; pro teruro,  
 Kaptis vazojn kaj sekvis sinjoroj-postsignon,  
 Pri kovraĵoj kaj mebloj, farante rezignon.

Do kiu cedis lasta el kampo batala,  
 Malgraŭ minacoj, battoj? — Protazo Bjeĥala.  
 Li, post seĝo Juĝista, neskueble staris,  
 Kaj, per vokista voĉo, daŭrige deklaris,  
 Ĝis li el batalejo foriris, post fino; 780  
 Tie restis kadavroj, vunditoj, ruino.

Homoj-perdo ne estis, sed, dum militiro,  
 Benkoj perdis piedojn; lama tabl', apude,  
 Sen tuko, sur telerojn vin-makulajn, nude  
 Falis, kiel, sur sangajn ŝildojn, kavaliro,  
 Meze de meleagraj korpoj, kokidetoj,  
 En kies brustoj staris fiksitaj forketoj.

1) Duonĉano, parto de ĉano, subtenanta en fajroŝtonaj pafiloj la ŝtonon.

En Horeška, soleca kastel', post momento,  
 Ree ĉie ekregis kutima silento.  
 Mallum' densiĝis; restoj de festen' sinjora 790  
 Kuŝas, kiel ĉe nokta fest' Avoj-memora,<sup>1)</sup>  
 Al kiu la mortintoj venos, sorĉ-vokite.  
 Subtegmente ekkriis noktuo subite,  
 Kvazaŭ sorĉistoj, lunon salutas vespere:  
 Ĝi falis tra l' fenestro malsupren, trem-brilaŝ  
 Laŭ puriĝej'-animo; tra l' truoj, el-tere,  
 Elsaltas ratoj, kiuj damnitojn similas:  
 Mordas, trinkas; ekfrapas iam, en angulo,  
 Ĉampan'-botel', toaste al fantom', mortulo.

Sed supre, en spegula, nomata salono, 800  
 Kvankam mankis speguloj, — Grafo, sur balkono,  
 Turnita al pordego, sin al vent' elmetis,  
 Por freŝiĝi; sur ŝultron li surtuton jetis;  
 Duan manikon, baskojn, li falde kuntiris,  
 La bruston per surtuto mantele-drapiris.  
 Gervazo, en salono, faris grandajn paŝojn.  
 Ambaŭ al si, medite, ne ĉesis babili:  
 „Pistolojn, diris Grafo, laŭvole — palaŝojn.“  
 Ŝlosist': „Kastel', vilaĝo, niaj estas ili.“  
 Grafo: „Provoku onklon, nevon, familion!“ 810  
 Ŝlosist': „Kastelon, grundon, la vilaĝon, ĉion  
 Ni forprenu“. Li poste Grafon alparolas:  
 „Rabu ĉion, se moŝto paĉon havi volas.  
 Kial proces'? afero havas tago-helon:  
 Kvarcent-jare posedis Horeŝkoj kastelon;  
 Grundoj-parton, ŝirinte for, dum Targovica,  
 Kiel vi scias, oni donis al Soplica.  
 Ne nur ĉi parton — ĉion forprenu vi kune,  
 Por kostoj de proceso, por rabado pune.

<sup>1)</sup> Avoj (Dziady) festo de mortintoj, litva popola festo, konservita el idolanaj tempoj kelkloke ĝis hodiaŭ, por honori la animojn de mortintaj parencoj. La sorĉisto (guŝlarz) invokis la spiritojn kaj oni ilin regalis per manĝo kaj trinkaĵo. — Tiu-ĉi festo formas la centron de „Dziady“, unu el plej sublimaj poeziaj verkoj de Mickiewicz. Fragmento el ili, la „Improvizacio de Konrad“ ekzistas jam en Esperanto.

Mi ĉiam diris: ĉesu, ĉesu procesadi; 820  
Mi ĉiam diris: preni perforte, invadi!  
Antaŭe, kiu prenis, ekposedis teron:  
Gajnu en kamp', vi gajnos en juĝej' aferon.  
Kun Soplicoj, koncerne malnovan kverelon,  
Ne proces', fendileto atingos nur celon;  
Kaj se Mateo donos helpe la vergeton,  
Ni du Soplicojn tranĉos en pajl-hakajeton.

„Brave! diris la Grafo, plan' — gote-sarmata,  
Preferinda al ia disput' advokata.

Ĉu vi scias? ni tutan Litvon movos brue, 830  
Per neaŭdita longe jam ekspedicio,  
Kaj distriĝos. Du jarojn mi sidas enue:  
Nur kampuloj batiĝis foje pro lim-strio!  
Nia ekskurs' aŭguras finiĝi sang-flue.

Mi tian unu faris dum vojaĝo mia,  
Kiel gasto ĉe iu duko Sicilia.  
Montaj rabistoj kaptis lian bofileton  
Kaj postulis: parencoj pagu elaçeton.  
Kolektinte servistojn, kun aro vasala 840  
Ni atakis; rabistojn du, mi mem mortigis;  
Kaptiton, mi unua en tend', liberigis.

Gervazo! vere estis triumfon egala,  
Nia bela reveno, kavalir'-feŭdala!  
Kun floroj nin renkontis popol'; duk-filino,  
Danke por savo, larme premis min al sino.  
Pri mia ven', Palermon sciigis gazetoj,  
Per fingroj min montradis ĉiuj virinetoj;  
Eĉ romano aperis pri evento tia,  
Kie estas nomata mi, laŭ nomo mia.

Roman' titolon havas: Grafo aŭ mistera 850  
Kastel' Birbante-rokka. — Ĉu estas subtera  
Mallumej' en kastelo? — „Jes, malplenaj keloj!

Diris Ŝlosist', ĉar vinon Soplic' el bareloj  
Eltrinkis“. Grafo diris: „Ni armos jokeojn,  
Kaj vokos el bienoj vasalojn! — „Lakeojn?  
Interrompis Gervazo. Fi! ĉu friponajon  
Celas invado? Kiu faras similajon  
Kun kampuloj? Vi tion sekve ne komprenas!

Vonsaloj,<sup>1)</sup> lipharuloj, jes, tio konvenas.  
 Ne vilaĝe, sed serĉu ilin en „zascjankoj“,<sup>2)</sup> 860  
 En Dobjin, Ĵezikovo, Cjentiĉe, Rombankoj;  
 Nobela de jarcentoj sango kavalira,  
 F'avora por Horeŝkoj, sed malame-spira  
 Kontraŭ la malamika Soplicana gento!  
 El tie kolektiĝos liphara tricento;  
 Mi ĝin faros. Revenu palacon, sinjoro,  
 Dormu bone, ĉar morgaŭ estos grand-laboro;  
 Vi ŝatas dormi, kantas la koko jam due;  
 Ĝis tagiĝo mi gardos kastelon, kaj frue  
 Mi aperos en Dobjin, ĉe suna leviĝo.\* 870

Graf' el balkono cedis, sed, antaŭ foriĝo,  
 Li rigardis ankoraŭ tra l' breĉo por pafo;  
 Lumojn, en dom' Soplica vidante, la Grafo  
 Ekkriis: „Illuminu! morgaŭ, en kastelo,  
 Ĉi-hore estos lumo, kaj ĉe vi — malhelo!..“

Gervazo ter-sidiĝis; ĉe mur' apogite,  
 Al la brusto la frunton li klinis medite.  
 Luna lumo defalis sur kapo-kalvajon,  
 Sur ĝi Gervazo fingre faris desegnaĵon: 880  
 Estontan milit'-planon li al si prezentas.  
 Pezajon de palpebroj li ĉiam pli sentas;  
 Kol-balance, li vidis dormon jam proksiman,  
 Kaj komencis vesperan preĝaron kutiman;  
 Sed inter Patro-nia kaj Salut'-Mario,  
 Aperis volve-preme fantomoj-serio:

<sup>1)</sup> La Ŝlosisto ne komprenas la stilon de l' Grafo. Same kiel li konfuzas jokeojn kun lakeoj, li ne konas la vorton vasaloj (wasale) kaj anstataŭigas ĝin per vonsaloj (wasa-le) kiuj signifas lipharulojn, kaj estas sinonimo de nobeloj, flegantaj grandajn lipharojn.

<sup>2)</sup> „Zaścianek aŭ Okolica“ oni nomas en Litvo nobeletaran kolonion, por diferencigo de kampulara vilaĝo. La fierajn nobeleteojn-lipharulojn ni vidis jam en la drinkejo de Jankjel en Libro IV. La serce-fantaziaj nomoj de la nobeletejoj „Rzezikowo, Ciętycze, Rańbanki“ aludas la batalemcon de iliaj loĝantoj, (ĉar rzezik—tranĉeto, tranĉilo; cięty — tranĉita, akra, tranĉema; rańbanka—eta hakado, sabrado; nur Dobrzyń devenas de dobry — bona).



Jen li vidas Horeŝkojn: malnov-estroj liaj,  
 Kun karabel', kun estra bastono aliaj,  
 Ĉiu minac-rigardas, lipharojn tordante,  
 Skermas per karabelo, bastonon ŝvingante;  
 Silenta, malserena, unu ombro poste, 890  
 Kun sanga brust'... Gervazo rekonis, tremfoste,  
 Tablestron, kaj komencis kruco-signojn fari,  
 Kaj, por certe terurajn sonĝojn kontraŭstari,  
 Pri puriĝej'-animoj flustris litanion.  
 Okuloj kungluiĝis, sonor' en oreloj —  
 Li vidas nobelaron, brilas karabeloj;  
 Invado! Koreliĉojn! gvidas kompanion  
 Rimŝa! Sur griz-ĉevalo, mem Gervazo kuras,  
 Rapiron super kapo ŝvingante, teruras;  
 Malbutonite, vente bruas taratko,<sup>1)</sup> 900  
 El orel' posten falis la konfederatko;<sup>2)</sup>  
 Li renversas rajdantojn, pied-iran vicon,  
 Kaj fine, en garbejo, bruligas Soplicon.  
 Revoj-peze, sur bruston, falis kap' senmova;  
 Tiel ekdormis lasta Ŝlosist' Horeŝkova.

1) Vidu rimarkon sur p. 97.

2) Konfederatka, kvarangula ĉapo, kun borderaĵo el ŝafida pelto.

## LIBRO VI.

### NOBELETEJO.

Unuaj militaj movoj de l'invado. — Ekspedicio de Protazo. — Vermo kaj sinjoro Juĝisto interkonsiliĝas pri publika afero. — Daŭrigo de la senefika ekspedicio de Protazo. — Ĉapitro pri kanabo. — Nobeletara sidejo Dobjin. — Priskribo de la domajo kaj persono de Macjek Dobjinjski.

Eliri el humida krepusk' ne rapidas  
La mateno senruĝa; lum-okul' ne gvidas  
Tagon, kiu jam estas, sed ĝin al vidsento  
Kovras nebul' sur tero, kiel pajl-tegmento  
Super litva kabano. Nur blanketa helo,  
En orienta flanko, montras sur ĉielo  
Kie suno leviĝis, kaj, kvazaŭ malĝoje  
Irate super teron, dormetas dumvoje.

Ĉiel'-ekzemplo ĉion sur tero influis:  
Brutaro sur paŝtejon eliri malfruis,  
Kaj trafis ĉe matena manĝo leporaron; 10  
Ĝi kutimas pli frue reveni arbaron,  
Nun pinĉas en nebulo alsine'-herbetojn,  
Aŭ kolektiĝas pare, fosante kavetojn,  
Volas ĝui ripozon, freŝ-aeron spiri,  
Sed devas, antaŭ brutoj, arbaron reniri.

Arbar' silentas. Birdo ne kantas, vekite,  
Skuas roson el plumoj, al arbo premite,

Ŝovas kapon al ŝultroj, okulojn fermetas,  
Atendas sunon. Apud marĉeto klaketas  
Cikonio. Sur garboj sidas, tut-malseke,  
Kornikoj kaj babilon daŭrigas larĝ-beke:  
Abomene al mastroj pluvon antaŭdiris.  
Kampistoj jam delonge al laboro iris. 20

Falĉistinoj ekkantis kanteton matenan,  
Laŭ pluva tag' sopiran, des pli malserenan,  
Ĉar sen-eŝe ĝi sonas, nebulon sorbante.  
Ektintis rikoltiloj en gren'; respondante  
Sur herbejo, falĉistoj tintigas, kaj kante  
Fajfetas, — haltas fine de ĉiu strofeto, 30  
Akrigas ŝtalon: takte frapas marteletoj.  
Nebulo kovras homojn; sonas nur falĉantoj,  
Nevideble, per voĉoj de tintoj kaj kantoj.

Meze, sur grenata garbo, ekonomo sidas,  
Enue turnas kapon, laboron ne vidas,  
Sed rigardas al strato, disiĝo vojara,  
Kie okazas io eksterordinara.

Ekde mateno regas moviĝado ia  
Nekutima sur vojoj. Veturilo tie  
Kampula knare kuras; nobela el ie 40  
Pretergalopas klake ĉe dua kaj tria;  
El voj' maldekstra oni kurieron vidas,  
El dekstra voj' vetkure rajdantoj rapidas,  
Kaj ĉiuj al diversaj flankoj sin direktas:  
Kion signifas tio? ekonom' konjektas.  
Li leviĝis el garbo, ekiris al stratoj  
Kaj demandis, sed vane: ne haltis vokatoj;  
En nebul' preterkuras ĉiu, laŭ fantomo;  
Nur aŭdiĝas de hufoj obtuza frapado,  
Kaj, kio estas stranga, palaŝoj-tintado: 50  
Tial ĝojas kaj kune timas ekonomo;  
Ĉar, kvankam estis tiam en Litvo kviete,  
Pri milit' ĉirkaŭkuris jam famo sekrete,  
Kaj pri francoj, Dombrovski, pri Napoleono.  
Ĉu militon aŭgurus de armiloj sono?  
Ekonom' al Juĝisto kuris, diri ĉion,

En espero, ke ankaŭ mem li aŭdos ion.

Post kverel' hieraŭa, leviĝis matene,  
Pri si mem nekontente, ĉiuj malserene.  
Vane Vojski-idino kabalon proponas, 60  
Vane oni al viroj ludo-kartojn donas:  
Neniu volas ludi, distriĝi; silente  
Viroj fumas, virinoj trikas diligente;  
Eĉ muŝoj dormas.

Vojski klakilon forjetis,  
En kuirejon el la silentej' kuretis.  
Tie, de domestrino kriojn li aŭskultis  
Kaj, kiel kuiristo helpantojn insultis;  
Ĝis fine lin ekregis agrabla revado,  
Ĉe movo de rostiloj, rostajoj-turnado.

Sin ferminte en ĉambro, skribis la Juĝisto 70  
Ekde maten'; sur sojlo atendis Vokisto.  
Juĝist' invokon finis, al Protazo plendon  
Kontraŭ Grafo laŭt-legas, koncerne ofendon  
De honoro nobela, per insultaj vortoj,  
Kaj kontraŭ la Ŝlosisto pro battoj, perfortoj;  
Pro minac' ambaŭ ilin; pro kosto afera  
Meti en takt-registron<sup>1)</sup> ĉe l' juĝo supera;  
Invokon komuniki buŝe; memkomprene  
Antaŭ suno-subiro. — Vokisto solene 80  
Streĉis aŭdon kaj manon; li antaŭ invoko  
Staris grave, sed ĝoje li saltus en loko:  
Ĉe penso pri proceso, li june sin sentis,  
Kiel li, antaŭ jaroj, invokojn prezentis,  
Por ricevi tuberon, sed riĉe pagitan.  
Tiel soldato, kiu pasigis militan  
Vivon, maljune ĝuas hospital'kvieton,  
Ekaŭdas malproksime tamburon, trumpeton,  
Krias sonĝe el lito: „Moskvuloj, batalo!“  
Saltas per ligna kruro el la hospitalo,  
Ke lin apenaŭ kapti povas jun-flegisto. 90

<sup>1)</sup> Nomaro de la juĝataj aferoj.

Protazo tuj surmetis veston de vokisto.  
 Tamen li nek jupanon, nek kontuŝon prenas:  
 Al granda juĝ-parado ili apartenas;  
 Por vojaĝo lin vestas: rajdo-pantalonoj  
 Kaj jako, kies baskojn, pere de butonoj,  
 Oni refaldas supren aŭ genu'-pendigas;  
 Ĉapon, kun orelumoj, laĉo supre ligas:  
 Bonvetere por levo, pluve por surtiro.  
 Tiel vestite, prenis li, por pied-iro,  
 Bastonon; ĉar vokistoj, laŭ milit'-spionoj, 100  
 Antaŭ proces', kaŝiĝas sub divers-fasonoj.

Bone faris Protazo, akcelante vojon,  
 Ĉar ne longe li sentus pro l' invoko ĝojon.  
 En Sopltcovo ŝanĝas sin plano milita;  
 Al Juĝisto enkuris Vermo plenmedita  
 Kaj diris: „Ve, Juĝisto, pri tiu onklino,  
 Sinjorin' Telimeno, koket-flirtulino!  
 Kiam Zonjo malriĉa restis infaneto,  
 Jacek al Telimeno por eduk' ĝin donis,  
 Aŭdante, ke ŝi estas bona, mondon konis; 110  
 Kaj mi vidas: ŝi kaŭzas al ni malkvieton,  
 Intrigas kaj laŭŝajne logas Tadeeton:  
 Mi ŝin observas; eble ŝi Grafon koketas,  
 Aŭ ambaŭ. Do pripensu rimedojn, mi petas,  
 Por ŝin forigi: tiel povas kreski klaĉoj,  
 Skandalo kaj malpaco inter junulaĉoj,  
 Kio povas traktaton konfuzi subite\*.  
 „Traktat'? kriis Juĝisto, tree ekscitite,  
 Mi ĝin jam finis, ŝiris, kun traktatoj kvite\*.  
 „Jen kio? interrompis Vermo, kie senco? 120  
 Vi babilas pri nova malpaco-komenco?“  
 „Kulpo ne mia, diris Juĝist', juĝ' supera  
 Klarigos, ke malpacon kaŭzis Graf', fiera  
 Stultulo, kaj Gervazo, fripono. Ne plaĉis  
 Al vi, domaĝe, Pastro, kunmanĝi kastele;  
 Vi atestus, ke Graf' min ofendis kruele\*.  
 „Kial vi, kriis Vermo, kastelon iraciis?  
 Vi scias, mi malamas ĝin; piedo mia  
 Ne paŝos tien. Ree kverel'! puno Dia!  
 Rakontu! oni devas aferon glatigi. 130

Tiom stultajoj fine tedi min komencas:  
 Pligravajon, ol fari pacojn, mi intencas,  
 Sed vin ankoraŭ foje pacigos“. — „Pacigi?  
 — Piedfrape Juĝisto rompís — al damnito  
 Iru kun via paco! jen monaĝa sprito!  
 Ĝentile akceptate, naz-gvidi min volas!  
 Sciu, moŝto: Soplicoj pri pac' ne parolas,  
 Sed, invokinte, gajnas; ofte familio  
 Procesadís ĝis sesa la generacio.

Mi kunvokis, tre stulte, laŭ konsilo via, 140  
 La ĉambelanan juĝon, jam por fojo tria.  
 Paco de nun ne estos, ne estos! — Kun krio  
 Li marŝis, per piedoj frapante. — Krom tio,  
 Por sia malĝentila kondut' en kastelo,  
 Li devas min „depreki“ <sup>1)</sup>, aŭ estos duelo!“  
 „Sed, Juĝisto, se Jacek sciigós pri ĉio?  
 Li mortos malespere! Pri kastel', ĝis dato,  
 Ĉu ne sufiĉe kulpis Soplicoj? Ho, frato!  
 Mi eĉ ne memorigu terur-akcidenton.

Vi scias ankaŭ: grundoj-parton, Targovico<sup>2)</sup>, 150  
 Preninte de Horeŝko, donis al Soplico.  
 Jacek juris, por sia pek' farante penton,  
 Ĉe absolve, bienojn redoni, do prenis  
 Li Zonjon, el Horeŝkoj, malriĉan, subtenis  
 Ŝin, por eduko ŝia pagis karan renton,  
 Kun Tadeeto volis ŝin kunigi svate,  
 Ambaŭ malpacigiĝintajn domojn ligi frate,  
 Kaj al heredantino rabajon bonvole  
 Cedi“. — „Afero, kriis Juĝisto, ĉu mia?  
 Mi ne konis, ne vidis lin, pri Jacek sole 160  
 Iom aŭdis, pri vivo hajdamaka lia;

<sup>1)</sup> Depreki — peti pardonon.

<sup>2)</sup> Targovico, t. e. la ĉefoj de la Targovica Konfederacio, formita kontraŭ la Maja Konstitucio (komparu p. 43). La Targovicanoj opiniis, ke Jacek Soplica, la mortiginto de la Tablestro, estis ilia partiano, kaj rekompence por lia farajo donis al Soplicoj parton de bienoj, restintaj post la mortigito, kiu apartenis al la Maja Konstitucio. Tiu-ĉi favoro de la Targovicanoj estis kvazaŭ makulo sur la Soplica familio. La klarigo sekvas ne pli frue, ol en la Libro X.

Mi estis tiutempe retorik'-lernanto,<sup>1)</sup>  
 Poste, ĉe l' Vojevodo, kortega servanto.  
 Ricevinte bienojn, Zonjon kun volonto  
 Mi akceptis, edukis, zorgas pri estonto,  
 Laŭ lia vol'. Jam tudas min la historio  
 Virina! Kial Grafo miksiĝis krom tio  
 En aferon? kun kia rajto pri kastelo?  
 Li, al Horeŝkoj, deka akvo sur kishelo,<sup>2)</sup>  
 Min insultu? Mi cedu, por pacon proponi? "170  
 „Frato! gravaj motivoj estas por ĉi-tio;  
 Jacek ja volis filon al armeo doni,  
 Poste lin hejme lasis: kaŭzo estis kio?  
 Jen hejme lin Patrujo povos pli bezoni.  
 Vi aŭdis, kion ĉie jam rakontas oni,  
 Pri kio mi portadis famojn el ekstere;  
 Nun — tempo, diri ĉion, nun — jam tempo vere!  
 Gravajo, frat! tre baldaŭ — milit' de popoloj!  
 Milito pri Polujo! frat! ni estos Poloj!  
 Certa milit! Sendite ĉi-tien sekrete, 180  
 Antaŭpostenojn vidis mi, ĉe Njemen prete;  
 Napoleon grandegan armeon disponas,  
 Kian homoj ne vidis, histori' ne konas;  
 Apud francoj, armeo pola marŝas flanke:  
 Nia Juzef<sup>3)</sup>, Dombrovski, agloj flirtas blanke!  
 Sonu de Napoleon lasta vorto sola:  
 Trans Njemen! — kaj revivas, frat', Patrujo pola!“

Okulvitrojn demetis Juĝist', aŭskultante,  
 Ne parolis, la pastron fikse rigardante,

1) En jezuitaj mezaj lernejoj (kolegioj), la klasoj estis nomataj laŭ ĉefa instruata latina objekto: gramatiko, sintakso, poezio, retoriko (elokventeco).

2) Kishel, (acidajo), estas litva manĝaĵo, speco de gelato, preparata el avena pasto, kiun oni lavas per akvo, ĝis kiam ĉiuj farun-partetoj estas forigitaj. — El tio devenas la supra proverbo pri malproksima parenceco. Ĉi-tie ĝi signifas: Grafo estas tre malproksima parenco de Horeŝkoj; li havas en si malmulte da Horeŝka sango.

3) Princo Józef Poniatowski, nask. 1763, nevo de l' reĝo Stanisław August, generalo de pola armeo, post enmarŝo de Napoleon I en Polujon ĉefestro de nacia gvardio kaj organizanto de nova armeo pola; li pereis heroe ĉe Leipzig en la rivero Elster en j. 1813-a.

Eksopiris profunde; eklarmis okulo... 190

Fine li ĉirkaŭkaptis kolon de Kvestulo:  
„Mia Vermo, vokante, sed ĉu estas vere?  
Mia Verm', ripetante, sed ĉu estas vere?  
Tro ofte ni trompiĝis! Famo sin etendis:  
Napoleon jam venas! kaj ni jam atendis.  
Oni diris: En Krono<sup>1)</sup> — li, Prusuj' venkita,  
Li enpaŝas! Kaj iris li? — al pac' Tilzita!<sup>2)</sup>  
Estas ver'? Vi ne trompas vin mem pri ĉi-tio?“  
„Ver', vokis Vermo, kiel en ĉielo — Dio!“  
„Benata estu buŝo, tion anoncanta! 200  
Diris Juĝisto, manon alsupre levanta.  
Vi ne bedaŭros, Vermo, ĉi-tiun sendajon,  
Nek monaĥejo ducent ŝafojn, elektajon,  
Ricevos monaĥejo. Pastro, vi aplaŭdis  
Hieraŭ kaŝtanulon, brunĉevalon laŭdis:  
Do ambaŭ veturilo tirus la Kvestulon.  
Hodiaŭ vi laŭplaĉe petu, mi postulon  
Ne rifuzos! Sed Grafo min tree ofendis;  
Do lasu ĉi aferon; invokon mi sendis;  
Ĉu konvenas?“

Plektinte manojn, Pastro miris, 210  
Rigardis lin kaj, ŝultrojn movinte, rediris:  
„Dum Napoleon portas al Litvo liberon;  
Dum tuta mondo tremas, vi, proces'-aferon  
Pripensante, post ĉio aŭdita kvietos?  
Anstataŭ agi, frato, vi manojn kunmetos?“—  
„Agi, kiel?“ demandis Juĝisto. — „Do tion  
Vi ne legis el mia okulo? Nenion  
Ankoraŭ pri ĉi-tio via koro diras?  
Se da Soplica sango eĉ guto rondiras  
En vi, pripensu: Francoj batas el-antaŭe... 220  
Kaj, se leviĝus dorse popolo ĉirkaŭe?“

1) Krono estis nomata Polujo por diferencigo de Litvo.

2) En j 1807-a Napoleon I faris kun Prusujo kaj Rusujo en Tilsit (Tylża), apud Memel, (Njemen en Prusujo), paco, ĉe kiu estis fondita la Varsovia Duklando; Litvo restis ĉe Rusujo.



Ekhenu la Postkuro <sup>1)</sup>, muĝu samogita <sup>2)</sup>  
 La Urso! — Se almenaŭ milo bon-armita,  
 Eĉ kvincento atakus dorse la moskvulojn  
 Kaj ĉirkaŭe etendus de leviĝo brulojn;  
 Se ni kanonojn, signojn de Moskvo akirus,  
 Venkintoj al renkonto de savantoj irus?  
 Napoleon demandas, vidante taĉmentojn:  
 Kĉa arme'? — Ni krias: Polaj insurgentoj,  
 Imperiestro! Litva volontuloj-vico! — 230  
 Li demandas: Ĉefestro? — Juĝisto Soplico!  
 Kiu poste aludus eĉ pri Targovico?  
 Frat', dum Ponaroj staros kaj Njemeno fluos,  
 En Litvo de Soplicoj nomo fame bruos;  
 Nepojn, pranepojn montros Jagjel'-metropolo <sup>3)</sup>  
 Per la fingroj, dirante: jen Soplico, polo,  
 El farintoj unue la insurekcion!\*

Juĝist' rediris: „Malpli grave estas, kion  
 Homoj diras; mi laŭdojn neniam avidas,  
 Mi — senkulpas pri frato-pekoj, Dio vidas. 240  
 Mi nemulte miksiĝis politik'-aferon,  
 Plenumante oficon kaj plugante teron.  
 Nobel', mi volus lavi domo-makulaĵon,  
 Kiel polo, por lando mi farus gravajon,  
 Eĉ vivon donus. Estis mi sabrul' negranda,  
 Tamen de mi prenadis homoj ankaŭ batojn;  
 Oni scias, ke iam, dum sejmer' pollanda,  
 Mi provokis kaj vundis du Buzvikojn, fratojn,  
 Kiu... sed malpli grave. Do prefere diru,  
 Ĉu necesas, ke tuje ni en kampon iru? 250  
 Pafistoj kolektiĝos; pulvo — en tenejo;  
 Kelk kanonetojn havas pastr' en prepostejo.  
 Mi memoras, ke lanco-jetilojn Jankjelo  
 Havas kaj ilin doni promesis al celo.  
 Ĵetilojn li venigis en pakoĵ sekretaĵ

<sup>1)</sup> Postkuro (Pogoń), blazono de Litvo: kavaliro sur ĉevalo en plena kuro.

<sup>2)</sup> Samogitujo (Żmudź): parto de Litvo, apud Balta maro, havas urson en blazono.

<sup>3)</sup> Vilno; vidu rimarkon <sup>1)</sup> sur p. 85.

El Krolevjec <sup>1)</sup>; teniloj estos baldaŭ pretaj.  
Sabroj estas; nobeloj sidiĝos sur-sele,  
Mi kun la nevo fronte, kaj — estos iele!“

„Pola sango! — tuŝite vokis Bernardino  
Kaj, etendinte brakojn, premis lin al sino — 260  
Vera Scplic! Vi lavos, laŭ destino Dia,  
Pekojn de senhejmulo, vaga frato via!  
Mi ĉiam vin estimis; sed mi amas nune  
Vin tiel, kvazaŭ estus ni du fratoj kune!  
Tro frue por kampiro: ni ĉion preparos;  
Mi mem difinos lokon, temp-anoncon faros.  
Car' kurierojn sendis al Napoleono,  
Peti pacon; sed oni militon deklaras,  
Ĉar princo Juzef aŭdis de sinjor' Binjono, <sup>2)</sup>  
Franc', el imperiestraj konsil'-konfidatoj, 270  
Ke tute vanaj estas ĉi-tiuj traktatoj;  
Estos milito. Sendis min princ' por sekretaj  
Sciigoj, kun ordono, ke Litvanoj pretaj  
Estu pruvi, ĉe veno de Napoleono,  
Ke ili volas ree kuniĝi kun Krono,  
Kaj postulas starigon de Poluja trono.  
Dume, kun Graf' paciĝu. Li estas strangulo,  
Iom fantaziema, sed bona junulo,  
Honesta polo; estas necesa ĉi-tia;  
Strangulojn tre bezonas temp' revolucia. 280  
Mi scias ĝin laŭ sperto; taŭgas eĉ stultulo,  
Sed honesta, kaj kiam regas lin saĝulo.  
Graf' sinjor', ĉe nobeloj ĝuas grand-respekton,  
Tuta distrikt' leviĝos kun li al ribelo;  
Ĉar, konante lin, diros ja ĉiu nobelo:  
Certa afer', ĝi havas sinjoroj-protekton!  
Mi iros tuj...“ — „Unue li al mi turniĝu,  
Diris Juĝist', ĉi-tien venu, senkulpiĝu;  
Mi pliaĝas kaj estas ĉe ofico mia!

<sup>1)</sup> Królewiec, Königsberg, komerca urbo en Orienta Prusujo.

<sup>2)</sup> Barono Louis Bignon, diplomato, publicisto kaj historiisto franca; li estis ĉe flanko de Napoleono I-a, kaj loĝis en Varsovio 1811 — 13. Pri princo Józef v. p. 47.

Kaj, pri proceso, estos juĝ' arbitracia...“ 290  
Pastro krak-fermis pordon. „Bon-vojaĝon!“ diris  
Juĝist'.

En „kalamaŝkon“<sup>1)</sup> salte Verm' eniris,  
Vipas ĉevalojn, tiklas flanke per gvidilo;  
En nebul' malaperas flirte veturilo;  
Nur monaĥa brungriza kapuĉ', dum veturo,  
Iam levigās, kiel super nub' vulturo.

Vokist' pli frue iris jam al Grafa domo.  
Kiel vulp' sperta, kiun logas lard-aromo,  
Kuras, sed konas ruzan pafistoj-sekretan,  
Iam haltas, sidiĝas, levas vost-tufeton, 300  
Per ĝi ventume venton en naztruojn prenis,  
Demandas ĝin, ĉu manĝon pafist' ne venenis:  
Protaz' el voj' deiris, ĉe fojno irante,  
Ĉirkaŭ domo, en mano bastonon tenante,  
Ŝajne vidas, ke ie brut' domaĝon faras.  
Li tiel laŭirante, ĉe ĝardeno haltis,  
Kliniĝis, kuras, ŝajne krekon li postflaras:  
Ĝis, trans baril', subite en kanabon saltis.

En ĉi verda, odora, densa arbustaro,  
Ĉirkaŭ dom', estas certa rifuĝ' al bestaro 310  
Kaj homoj. Renkontite, ĉe brasik', leporo  
Saltas en kanabejon kaŝiĝi sekure:  
Pro densaĵo, ne sekvos ĝin vertrago kure,  
Nek ĉashundo postflaros, pro forta odoro.  
En kanabon servisto forkuras de bato  
Kaj sidas, ĝis sinjoro koleros ĝis sato.  
Forkurinta rekruto ofte tie sidas,  
Kiam lin registaro en arbar' insidas.  
Kaj tial dum batalo, invado kaj trado,<sup>2)</sup>

<sup>1)</sup> Kalamaszka, veturileto kun tili-sela plektajo.—Dum la litero „l“ havas en lingvo pola, kiel en Esperanto, molan sonon, „l“ sonas kiel „l“ kataluna aŭ bulgara. La transskribo anstataŭas „l“ per simpla „l“, kvankam oni povus ankaŭ skribi „ü“ (ekz. „kaŭamaŝka“), ĉar multaj poloj sian strekitan „l“ tiel nekorekte elparolas.

<sup>2)</sup> Tradi, ofice forpreni havaĵojn de ŝuldanto kaj doni ĝin al kreditoro en posedon.

Ambaŭ partioj celas, kun granda penado, 320  
Okupi pozicion en kanab'-tereno,  
Kiu tiriĝas fronte ĝis dom' de bieno,  
Kaj ŝirmas, tuŝiĝante poste kun lupolo,  
Atakon, cedon antaŭ malamik'-patrolo.

Protaz' ektimis, kvankam tre kuraĝa homo;  
Ĉar al li memorigis kanaba aromo,  
Kion, divers-okaze, li spertis ofice,  
Kaj kion kanabejo atestis laŭvice:  
Lin foje invokita nobel' Dzindoletto  
Devigis, per metita al brust' pistoletto, 330  
Rampi sub tablon, boji hunde, revokante,  
Ĝis Vokist' en kanabon saltis, pen-spirante.  
Kaj poste Volodkoviĉ,<sup>1)</sup> fiera brutalo,  
Perfortant' de seĝmetoj kaj de tribunalo,  
Akceptinte invokon, akton dispecigis,  
Hajdukojn kun bastonoj ĉe pordo starigis,  
Nudan rapiron levis super lian kolon,  
Kun kri': por savi kapon, manĝu protokolon!  
Ŝajne Vokisto manĝi komencis, prudente,  
Ĝis, ĉe fenestro, saltis kanabon momente. 340

Jam ne estis kutimo en litva bieno,  
Ŝirmi sin de invokoj per sabro, rimeno;  
Apenaŭ iam aŭdis vokisto insulton:  
Sed Protazo pri tio sciis nur malmulton,  
Delonge ne estinte invokoj-portisto,  
Kvankam li, ĉiam preta, petis kun insisto;  
Sed, respektite al aĝo, Juĝisto rifuzis  
Liajn petojn, hodiaŭ akceptinte, uzis  
Lin pro urĝa bezono.

Atentas Vokisto —  
Mallaŭto —; en kanabon manojn enŝovante, 350  
Li disklinas trunketoj-densajon, naĝante  
En legom', kiel akve mergiĝas fiŝisto.  
Li eliĝis — mallaŭto —; ĉe dom' li insidas —

<sup>1)</sup> Wołodkowicz, aventuristo, post multaj malpacaj skandaloj estis kaptita en urbo Mińsk kaj mortpafita laŭ tribunala verdikto.

Mallaŭto --; tra fenestroj internon li vidas —  
 Malplene —; time paŝas li al enirejo,  
 Levas anson — malplene, kiel en sorĉejo.  
 Li prenas akton, legas laŭte sian temon;  
 Ĵus li aŭdis radbruon kaj sentis kor-tremon,  
 Volis forkuri; trafis lin iu subite:  
 Feliĉe, ke konato! Verm'! Ambaŭ ekmiris. 360  
 Grafo, kun sekvantaro, videble foriris  
 Rapide, ĉar li pordon lasis malfermite;  
 Li armis sin: sur planko jen apog-pafiloj,  
 Kuŝas dutuboj, plue ĉanoj kaj ŝargiloj,  
 Serurist'-iloj: oni reparis armaĵojn;  
 Pulvo, papero: oni faris paf-ŝargaĵojn.  
 Graf' ĉas-iris kun tuta anar' de bieno...?  
 Sed kial man-armiloj? Rusta sabro tie  
 Kuŝas sen klingo, tie spado sen rimeno:  
 El difektajo oni elektis ĉi-tie, 370  
 Eĉ serĉis en malnova armil'-magazeno.  
 Vermo pafitubojn, spadojn rigardis atente,  
 Poste al bienkorto foriris silente,  
 Por demandi servistojn pri Grafo — malplene:  
 Du maljunajn virinojn li eltrovis pene,  
 Kaj aŭdis, ke sinjoro anaron kolektis  
 Kaj, armite, al Dobjin sur voj' sin direktis.

Fama estas, en Litvo, Nobelej' Dobjina,  
 Pro nobeloj-kuraĝo, belec' nobelina.  
 Iam riĉa, multhoma: ĉar kiam Jan Tria<sup>1)</sup> 380  
 Armeigon anoncis per vergoj,<sup>2)</sup> — kun sia  
 Standard', el Dobjin sole, aperis sescento  
 Da nobelar' armita. Hodiaŭ la gento

<sup>1)</sup> Jan III Sobieski, reĝo de Polujo, liberiginto de Vieno kontraŭ turkoj, regis 1647—1696.

<sup>2)</sup> Originale: Ĝeneralan movigon per vergoj, (branĉetajo, wici). Por kunvoki ĝeneralan enarmeigon, la reĝo ordonis en ĉiu paroĥejo starigi altan stangon, ĉe kies pinto estis fiksita balajlo aŭ branĉetajo. Tio estis nomata: disdoni branĉetajon. Ĉiu plenkreskinta nobelo havis la devon, aperi senprokraste, por ne perdi sian nobelecon, ĉe la vojevoda standardo.

Malpli nombra kaj riĉa. Kiel korteganoj,  
 En arme', ĉe invadoj, seĵmetoj, — gentanoj  
 Kutimis vivi iam facile-merite;  
 Hodiaŭ, mem labori por si, devigite,  
 Kiel kampuloj! sole kitelon ilian  
 Ne portas, sed kapoton blankan, nigre-strian,  
 Kaj dimanĉe kontuŝon. Vesto nobelina, 390  
 Plej malriĉa, alias ol ĵup' kampulina:  
 Irante en drelikaj, aŭ perkal'-robetoj.  
 Ili brut-paŝtas ne en bast'-, sed led-ŝuetoj,  
 Tranĉas grenon, eĉ ili ŝpinas en gantetoj.

Diferencis Dobjinaj de litva frataro,  
 Laŭ lingvo, kresko, kiel laŭ formo aspekta.  
 Pura sango leŝida <sup>1)</sup>; laŭ la nigra haro,  
 Alta frunt', nigr-okuloj, agla naz' malrekta;  
 El ter' Dobjina <sup>2)</sup> venis la antikva gento;  
 Kaj kvankam Litve sidis de jaroj-kvarcento, 400  
 Flegis mazurajn morojn kun lingva akcento.  
 Se al sia infano iu nomon donas,  
 Kutime al baptato Kronano <sup>3)</sup> patronas:  
 Sankta Bartolomeo aŭ Sankta Mateo;  
 Mate' nomiĝas filo de Bartolomeo,  
 Kaj Bartolo la filo de Mate'. Virinoj  
 Ĉiuj baptitaj estas Kaŝnoj kaj Marinoj.  
 Do, por orientiĝo en miksajo tia,  
 Oni donis alnomojn, laŭ merito ia  
 Aŭ difekto, al viroj, kiel al virinoj. 410  
 Nobelo estis ofte kelknome konata,  
 Por signo de estimo aŭ eco malŝata;  
 Okazis, ke samulo, en Dobjin alie,  
 Kaj alinome famis ĉe najbaroj ie.  
 Per imito, aliaj najbar'-nobeletoj  
 Ornamis sin alnome per ĉi „sobriketoj“,

<sup>1)</sup> Pola; komparu rimarkon sur p. 29.

<sup>2)</sup> Tero Dobjina, distrikto (hodiaŭ Lipna) en Mazovio, pra-pola lando kun centro Varsovio. La mazovianoj estas nomataj mazuroj. La Dobjinaoj, enmigrintaj el Mazovio en Litvon donis la nomon Dobjin (Dobrzyn) al sia nobeletara kolonio; la nomo Dobrzyński estas adjektiva kaj signifas Dobjina.

<sup>3)</sup> Sanktulo, adorata en la Kronlando (t. e. Polujo).

Nun ilin preskaŭ ĉiu famili' alprenis;  
Malofte iu scias ke ili devenis  
El Dobjin, laŭ neceso, dum lando cetera  
Stult-imitis kutimon, sen bezono vera. 420

Do Mateo Dobjinski, kiu en frontloko  
Staris ĉe l' gent', nomiĝis surpruĝeja Koko.  
Sed kiam jaro sepcent-naŭdek kvara venis,  
Li, ŝanĝinte, alnomon Ĉe-flanko alprenis;  
Ankaŭ Kuniklo <sup>1)</sup> nomas lin Dobjino-anoj,  
Kaj Mate' de Mateoj titolis litvanoj.

Kiel li genton, lia dom' al nobelejo  
Regis, starante inter drinkej' kaj preĝejo.  
Ŝajne malriĉo loĝas en lia bieno:  
Pordego — sen flugiloj, sen baril' — ĝardeno 430  
Nesemita; sur bedoj — betular' junaĝa.  
Tamen mastrajo ŝajnas rezidej' vilaĝa,  
Ĉar estas plej bonforma kaj plej etendita;  
Dekstra, loĝeja flanko, el brik' masonita;  
Flanke tenej', grenejo, staloj, tut-proksime,  
Amase, kiel estas ĉe nobel' kutime;  
Ĉio malnova, putra. De l' domo tegmento  
Brilis, kvazaŭ ladajo, per verda pigmento,  
Per musko, herbo, vente alt-balanciĝanta.  
Sur garbej'-pajltegmento — ĝardeno pendanta: 440  
Diversa herb', urtiko, krokos' ruĝ-korala,  
Flava verbask', kolora kvast' merkuriala,  
Nestoj de divers-birdoj; en mansardoj estas  
Kolombejoj; hirundoj en fenestroj nestas.  
Blankaj kunikloj saltas ĉe sojl', sur herbejo;  
Mallonge, domo: kvazaŭ kaĝ' aŭ kuniklejo.

Antaŭe fortikajo! Da postsignoj plene,  
Ke ĝi grandajn atakojn spertis kelk-revene:  
Ĉe pordego, en herbo, ĝis nun kuŝas granda,  
Kiel kapo, kuglego, el kanon' svedlanda. 450  
Antaŭtempe, pordega flugil', malfermata,

1) Povas formi en lingvo pola vortludon, ĉar la pola nomo de kuniklo (lat. cuniculus) „królik“ signifas ĝuste „re-ĝeto“, laŭ germana antikva „künigel“ (königlein).

Estis ĉe l' kuglo, kiel ĉe ŝton', apogata.  
Sur korto, el herbaĉo kaj foli' absinta,  
De kelkdek krucoj resto leviĝas putrinta,  
Sur nebenita tero: do, enterigite,  
Ĉi-tie kuŝas, kiuj pereis subite.  
De dom', tenej', grenejo muroj, rigarditaj  
Proksime, estis funde ĝis supre punktitaj,  
Kvazaŭ de nigr-insektoj: en makulo ĉia  
Sidiĝis kuglo, kiel burd' en kavo sia.

460

Ĉe l' pordoj: ansoj, najloj, hokoj—detranĉitaj  
Estas ĉiuj, aŭ dense per sabro signitaj:  
De Zigmunt-sabroj<sup>1)</sup> hardon oni tiel provis;  
Kaj per ili detranĉi najl-kapetojn povis,  
Aŭ tranĉi hokon, kiu klingon ne ekfendis.  
Super Dobjinaj pordoj, gent-blazonoj pendis;  
Sed armaturon<sup>2)</sup> kovris — fromaĝoj-bretaro  
Kaj dense superkrustis hirundoj-nestaro.  
En interno de domo, veturilej', stalo,  
Ĉie armaĵoj, kvazaŭ malnov-arsenalo.  
Sub tegmento da grandaj kaskoj pendas kvaro,  
Ornamoj de Mars-fruntoj; nun Venus-birdaro,<sup>3)</sup>  
Kolomboj, idojn nutras en ili. En stalo,  
Super krib', etendiĝas kiras'; por ĉevalo  
Kiel en ŝtupetaro, en kiras'-ringaro  
Kuŝas, de knab' metate, herbo trifolia.  
En kuirej', rapirojn virino malpia  
Malhardis, uzis ilin anstataŭ rostilon;  
Per bunĉuk',<sup>4)</sup> el Vieno, la ekspedicia  
Akir', ŝi senpolvigas mano-muelilon.  
Ĉie elpelis Marson Ceres, la mastrino,

470

480

1) Sabroj el tempo de Zygmuntoj, reĝoj de Polujo.

2) Armaturo, armaĵo kaj partoj al ĝi apartenantaj, ĉirkaŭ la blazono.

3) Mars, antikva dio de milito; Venus, diino de beleco kaj amo; al ŝi estis dediĉitaj la amekverantaj kolomboj.

4) Bunĉuk', ĉevalvosto, pendigita sur lancotenilon, estis uzata en la turka armeo, kiel hetmana (armeestra) insigno. La ĉi-tie menciita devenis el la Viena ekspedicio de Sobieski kontraŭ la turkoj en j. 1683.



Kun Pomon', Flor', Vertumno, <sup>1)</sup> regas en Dobjino,  
Super domo, garbejo kaj tenej' de greno.  
Sed hodiaŭ diinoj cedu: Jen reveno  
De Mars.

Sendit' en Dobjin tagiĝe aperis,  
De kaban' al kabano rajde kurieris  
Kaj, kiel por servuto, vekis. Nobel-fratoj  
Sin levas; hom-pleniĝas nobelejo-stratoj;  
En drinkej' oni krias, prepostejo helas;  
Ĉiuj kuras, demandas: kion oni celas?  
Maljunaj konsiliĝas, junaj ĉeval-selas; 490  
Virinoj baras, knaboj baraktas kaj krias,  
Volas kuri, batigi, kun kiu? ne scias,  
Do restas. En loĝejo de pastro Dobjina  
Daŭras konsil', terure konfuza, senfina,  
Ĝi decidis, ĉar oni ne povas konsenti,  
Tut-aferon al patro Mateo prezenti.

Mate', aĝulo vigla, jam sepdek-du-jara,  
Malalt-kreska, antaŭe konfederat' Bara. <sup>2)</sup>  
Anoj kaj malamikoj memoras tre bone  
Lian damaskan <sup>3)</sup> sabron, kurbiĝan duone, 500  
Per kiu lancojn tranĉis li, kiel pajleton,  
Kaj kiun ŝerc-modereste li nomis vergeton.  
Li fariĝis reĝano el konfederato,  
Tenis kun Tizenhaŭzo, <sup>4)</sup> trezorist' de l' ŝtato:  
Sed kiam reĝon gajnis Targovic'-partio,

<sup>1)</sup> Antikvaj romaj diajoj: Ceres, diino de grenoj kaj bonrikoltoj; Pomona, zorgantino de fruktarboj kaj ĝardenaj arbustoj; Flora, diino de printempo kaj floroj; Vertumnus, dio de fruktoj.

<sup>2)</sup> Ano de la Bara konfederacio, t. e. de la armita ligo, kiun la pola nobelaro formis en la Podola urbo Bar en j. 1768 kontraŭ la malforta, ŝanceliĝema reĝo Stanislaw Poniatowski kaj liaj rusaj aliancanoj, kiuj lastaj permesis al si indignigantajn perfortaĵojn en Polujo.

<sup>3)</sup> Damaska karabelo, fama speco de sabroj el vejnstria ŝtalo, faritaj en la malgrand-azia urbo Damasko.

<sup>4)</sup> Antoni Tyzenhaus, litva trezoristo, t. e. financa ministro de la Litva Grand-duk-lando, fama disvastiganto de industrio kaj fondinto de kalkaj instruaj institutoj en Litvo, mortis en j. 1785 en Varsovio.

Ree Mate' forlasis reĝon; kaj pro tio,  
 Ke li ofte partion ŝanĝis, li, per moko,  
 Nomita iam estis surpruĝeja Koko:  
 Ĉar li turnis flageton, kiel Kok', laŭvente.

510

Kaŭzon de ŝanĝoj vane vi serĉus atente:  
 Eble, Mate' militon tro amis; venkite,  
 El unu flank', al dua batali rapidis?  
 Eble li politikon penetris spirite  
 Kaj iris, kie bonon de l' Patrujo vidis?  
 Kiu scias! Sed certe, li neniam sentis  
 Laŭd-deziron, malnobla gajno lin ne tentis,  
 Kaj neniam li sekvis moskveman partion;  
 Eĉ vidi rusion, sentis li antipation,  
 Do, post lando-partigo, hejm-sidis konstante,  
 Kiel urs' en arbaro, ungegon suĉante.

520

Lastfoje li militi iris kun Ogiński,

En Vilnon, kie servis ambaŭ sub Jasiński;  
 Kun verget' li kuraĝo-miraklojn atingis,  
 El Prag-remparoj sola malsupren sin ŝvingis  
 Al defend' de lasita sinjoro Pocjejo <sup>1)</sup>  
 Kun siaj vundoj, dudek-tri, sur batalejo.  
 Litvo pensis, ke ambaŭ falis mortigite:  
 Revenis ambaŭ, kiel kribriilo, pikite.  
 Sinjoro Pocjeĵ havis honestan intencon,  
 Doni al defendinto riĉan rekompencan:

530

Por dumviva uzado kvin-kaban'-bienon  
 Kaj, kiel jaran renton, oran milflöronon.  
 Sed Dobjinski reskribis: „Pan Pocjeĵ Macjejon,  
 Bonofarinton havu, ne Macjeĵ Pocjejon.“  
 Li rifuzis bienon, pagon de sinjoro  
 Kaj, reveninte, vivis de propra laboro,  
 Farante abelujojn, bruto-kuracilojn,  
 Por foiro perdrikojn logis en kaptilojn  
 Kaj ĉasis bestojn.

Tute ne mankis Dobjine

<sup>1)</sup> Grafo Aleksander Pocjeĵ, subtenis malavare polajn elmigrintojn kaj la legianojn. Dobrzyński defendis lin, kiam Suvorov konkiradis Pragon (vidu rimarkon <sup>5)</sup> sur paĝo 7 kaj rimarkon sur p. 21)

Kleraj aĝuloj, kiuj sciis eĉ latine 540  
 Kaj june en palestro lertiĝis krom tio:  
 Estis pli riĉaj, sed en tuta familio,  
 Macjek, simplul' malriĉa, 'is plej estimata,  
 Ne nur sabrul', per sia verget', famigata,  
 Sed kiel homo saĝa, kun cert-opinio,  
 Kun kono de hejmlanda kaj gent-historio;  
 Li same konis leĝon, kiel mastrumadon,  
 Sciis pafist'-sekretojn kaj best-kuracadon.  
 Oni al li aljuĝis (pastro neas tion)  
 Strangan, de superhomaj aferoj, konscion. 550  
 Certe, ke veter-ŝanĝojn li bone komprenas  
 Kaj pli ofte, ol mastra kalendar', divenas.  
 Tial, ĉu por komenci semadon sur bedo,  
 Ĉu grenon ekrikolti, ĉu dum ŝip-ekspedo, <sup>1)</sup>  
 Antaŭ proces', aŭ iel interkonsentante,  
 Nenion oni faris sen konsilo lia.  
 Maljunulo ne celis al influo tia;  
 Kontraŭe, por seniĝi, gastojn mallaŭdante,  
 Plej ofte sen respondo puŝis for el domo.  
 Li konsilis malofte, ne al ĉiu homo; 560  
 Nur en aferoj gravaj eksterordinare,  
 Li diris opinion sian, vort-avare.  
 Supoze li hodiaŭ part-prenos volonte  
 Kaj persone stariĝos ekspedici'-fronte,  
 Ĉar li interbatiĝon amis en juneco  
 Kaj estis malamiko de la moskva speco.

Maljunul' sur soleca korto jus promene  
 Kantetis: „Kiam suno leviĝas matene“, <sup>2)</sup>  
 Kaj estis tre kontenta, ke iĝis serene;  
 Ĉar la densa nebulo al-supre ne iris,  
 Kiel kutime, kiam nuboj sin kuntiris, 570  
 Sed falis. Al nebulo manojn vent' etendis,

<sup>1)</sup> Vidu rimarkon pri „vicinoj“ sar paĝo 49.

<sup>2)</sup> Pia kanto matena, populara en tuta Polujo. Jen la unua strofo (laŭ Karpiński):

Ĉe matena sun-radio: — Vi laŭdatu, granda Dio!  
 Hore kantas elementoj, — Oceanoj, kontinentoj.  
 Kaj de homo, por favora — Donacaro ĉiuhora.  
 Al Kreinto kaj Savanto, — Ĉu ne sonus laŭda kanto?

Glatige tuŝis, sterne sur kamparon sendis;  
 Dume suno el-supre brilas milradie,  
 Teksas fonon arĝente, ore, ruĝo-strie,  
 Kiel paro da majstroj en Sluck faras zonon:<sup>1)</sup>  
 Virgino, ĉe teksilo, trasilkigas fonon,  
 Man-glatigas; el-supre teksisto, dum tio,  
 Ĵetas al ŝi fadenojn el oro, arĝento,  
 Purpur', kreante florojn: tiel teron vento  
 Per nebul' ĉirkaŭŝpinis, teksis sun-radio. 580  
 Mateo finis preĝojn kaj varmiĝis sune;  
 Jam sian mastrumadon li komencas nune,  
 Portis herbon, foliojn, ĉe domo sidiĝis  
 Kaj fajfis: tuj kunikloj-svarm' el ter' ŝpruciĝis.  
 Kiel narcisoj, super herbon ekflorante,  
 Blankas longaj aŭdiloj; sub ili, brilante,  
 Tralumas okuletoj, kiel sang-rubenoj,  
 Broditaj en veluron de herbo-kusenoj.  
 Kunikloj staras rekte, kaj ĉiu atente  
 Rigardas; blank-lanuga ar', fine momente, 590  
 Brasik'-logite, saltas al aĝulo kure  
 Sur piedojn, genuojn, ŝultrojn; li, plezure,  
 Mem blanka laŭ kuniklo, bestetojn arigas  
 Kaj per mano la varman lanugon glatigas;  
 Per dua man' li jetas el ĉapo milion;  
 Paseroj el tegmentoj falas, faras krion.

Subite, dum aĝulon amuzis festeno,  
 Kunikloj malaperis en herba tereno;  
 Paseroj, senhavuloj, flugis al tegmentoj,  
 Ĉar al bien' rapide paŝis nov-klientoj. 600  
 De nobelar'-amaso, el la prepostejo,  
 Senditoj, pro konsilo, venis al Macjejo,  
 Kaj de fore salutis malalte-kapklina:  
 „Laŭdatu Jezu-Kristo“. — „Eterne, senfine,“  
 Respondis maljunulo; poste, informite  
 Pri gravec' de l' sendajo, li gvidas invite  
 En kabanon, sur benko sidiĝi proponas.  
 Meze, stare, raporton ĉef-sendito donas.

<sup>1)</sup> Legu rimarkon sur p. 30.

Dume ĉiam pli dense venis nobelaroj,  
Dobjinski-j preskaŭ ĉiuj, krom multaj najbaroj 610  
El ĉirkaŭ-nobeledo, kun kaj sen armiloj,  
En kalamaŝkoj, briĉkoj<sup>1)</sup>, rajde, kaj starigas  
Veturilojn, ĉevalojn al betuloj ligas,  
Rondiras, volus aŭdi iron de konsiloj;  
Jam pleniginte ĉambron, en vestibl' ariĝas,  
Aŭskultas, en fenestrojn per kapoj premiĝas.

---

---

<sup>1)</sup> Bryczka, vojaĝveturilo; pri kalamaszka vidu rimarkon sur p. 151.

## LIBRO VII.

---

### INTERKONSILO.

Savaj konsiloj de Bartek, nomata Pruso. — Soldata voĉo de Macjek Baptisto. — Publika voĉo de sinjoro Buĥman. — Jan-kjel konsilas al konkordo, kiun Fendilo tratanĉas. — De Gervazo parolado, el kiu montriĝas grandaj efikoj de seĵma elokventeco. — Protesto de maljuna Macjek. — Subita alveno de milita sukursulo rompas la interkonsilon. — Hejse, kontraŭ Soplicoj!

Vice, Bartek sendito sian vorton diris.  
Ĉar li ofte per ŝipo en Prusujon iris,  
Tial de samgentanoj li Pruso nomatis,  
Laŭŝerce, ĉar li prusojn malamis, kaj ŝatis  
Nur preparoli. Homo, progresinta aĝe,  
Kiu multe da mondo vizitis vojaĝe,  
De gazetoj leganto, politik'-konscia,  
Povis multe klarigi per konsilo sia.  
Li tiel finis:

„Tio estas help' ne vanta,  
Sinjor' Mateo, mia frato, bonfaranta  
Patro kvazaŭ de ĉiuj ni. Mi al francaro  
Fidus milite, kiel al atutoj-kvaro:  
Nacio militema; post Koscjuŝko nia  
Ne estis en la mondo militist' genia,

10

Kiel imperiestro, granda Bonaparto.  
 Mi memoras de francoj transiron de Varto <sup>1)</sup>;  
 Mi estis eksterlande, pro komerco mia  
 Kun urbo Gdansk <sup>2)</sup>, en mila-okcent-sesa jaro;  
 En land' Poznanja loĝas mia parencaro,  
 Kiun mi vizit-iris; do kun Pan Jozefo  
 Grabovski <sup>3)</sup>, li nun estas regimenta ĉefo, 20  
 Kaj tiam en vilaĝo vivis oportune  
 Ĉe Objezjeje, ambaŭ ni ĉas-iris kune.  
 En Grand-Polujo estis paco; famo kura  
 Venis, foje subite, pri batal' terura.  
 Kuriere leteron alsendis Todven-o:  
 Grabovski, ĝin leginte, kriis: „Jena! Jeno! <sup>4)</sup>  
 Prusoj — kape batitaj, gajnita batalo!“  
 Mi tuj, por danki Dion, saltis de ĉevalo  
 Kaj genuiĝis... Urbon ambaŭ ni post tio 30  
 Veturinte, ŝajnigas scii pri nenio;  
 Kaj jen ni vidas: ĉiuj Landratoj, Hofratoj, <sup>5)</sup>  
 Komisarioj, ĉiuj similaj hundfratoj,  
 Salutas nin malalte; ĉiu tremas, palas,  
 Laŭ prusa blato, kiu sur brogajon falas.  
 Ni ridas, frotas manojn kaj humile petas  
 Novajojn: kion oni pri Jena ripetas?  
 Ili ektimis, miras, ke ni jam eksciis  
 Pri malvenko, kaj „aĥ-herr-gott-o-vee!“ <sup>6)</sup> kriis,  
 Mallevis nazojn, kuras domen, for el tie... 40  
 Konfuzo, interpuŝo! Polaj vojoj ĉie

<sup>1)</sup> Rivero, ĉe kiu estas situita la ĉefurbo Poznań de l' samenomata grandpola duklando, kaj poste prusa provinco Posen (komparu rimarkon sur p. 54).

<sup>2)</sup> Vidu rimarkon sur p. 96.

<sup>3)</sup> Grafo Józef Grabowski, posedanto de bienoj Łuków en grandpola Poznanja Duklando; dum la Napoleonaj militoj li estis kolonelo de l' generala stabo, poste li ludis grandan rolon en la publika vivo de l' Duklando. En Łuków, proksime de l' urbo Obiezierz, gastis Adam Mickiewicz kun sia frato Francisko.

<sup>4)</sup> Jena, urbo apud rivero Saale, memorinda pro la decida batalo, en kiu (1806) Napoleon I venkis la prusojn.

<sup>5)</sup> Titoloj de germanaj oficistoj.

<sup>6)</sup> Ho sinjoro Dio, ho ve! (germane).

Pleniĝis; forkurantoj svarmas formikare,  
 Tiras siajn vagenojn, ĉe ni populare  
 Nomatajn veturiloj; geprusoj kun vestoj,  
 Kun pipoj, kafokruĉoj, plumlitoj kaj kestoj  
 Forkuras. Ni mallaŭte faras konsiliĝon:  
 Sur ĉevalojn! konfuzi prusan retiriĝon!  
 Hej! Landratojn nuk-bati, Hofratojn rip-siri,  
 Kaj Herrojn oficirojn je harcopfoj tiri!<sup>1)</sup>  
 Generalo Dombrovski venis Poznanion: 50  
 Imperiestr' ordonis la insurekcion!  
 Dum semajno prusaĉojn leviĝo popola  
 Balais, ke ne restis eĉ nur unu sola!  
 Se tiel lerte, vikle, turniĝus litvanoj,  
 Por regali moskvulojn per tiaj ŝvitbanoj!  
 Nu, Mateo? Se Moskvo kverelas malsprite  
 Kun Bonaparte; tiu ne ŝercas milite:  
 Plej granda mond-heroo! sennombra armeo!  
 He, kion pensas patro, Reĝeto, Mateo?\*

Li finis. Ĉiuj tiam verdikton atendis 60  
 De Mate'. Li eĉ kapon ne movis, etendis  
 Nur manon kaj ĉeflankon ekbatis: laŭ vido  
 Li serĉis sabron. (Ekde pollando-divido  
 Jam sabron li ne portis, sed, ĉe rememoro  
 De Moskvo, manon metis, laŭ malnova moro,  
 Ĉe flanko: kvazaŭ „vergon“ li kaptus batale;  
 Do oni lin Ĉeflanko nomis ĝenerale).  
 Li levis kapon: ĉie ekregis silento;  
 Tamen Mateo, malgraŭ komuna atento, 70  
 Ree mallevis kapon kaj brovojn kuntiris.  
 Fine li, aŭdiĝante, ĉiun vorton diris  
 Malrapide kaj kapon balancis laŭ senco:

„Silentu! la novaĵo el kie devenas?  
 Kiel proksime francoj? ĉefkomandon tenas...?  
 Ĉu, kie, kial iĝis milito-komenco?  
 Kie tramarŝos francoj? kun kia potenco?  
 Arme'-specoj? scianto parolu pri jeno!“

<sup>1)</sup> Herr, sinjoro; Haarzopf, harplektaĵo, portata tiam de oficiroj.



Silente sin rigardis vice la kunveno.  
„Mi, diris Prus', konsilus la pastron atendi,  
Vermon, de li devenas ĉitiu novaĵo; 80  
Dume certajn spionojn al la limo sendi,  
Kaj mallauĉe armigi en la ĉirkaŭaĵo,  
Kaj dume tut-aferon singardeme gvidi,  
Por neniel al Moskvo intencojn perfidi...“

„Atendi? sendi? mendi?“ dua Macjek krie  
Interrompis, baptita Aspergist' alie,  
Laŭ bastonego, kiun li kunportis ĉie  
Kaj nomis aspergilo. Tiun li starigis  
Antaŭ si, ambaŭ manojn sur globo pendigis,  
Man-apogis mentonon: „Prokrasti! veturi!  
Konsiliĝi! Hem, trem, brem, kaj poste forkuri! 90  
En Prusuj' mi ne estis; prudento tiela  
Bona por prusoj, mia prudento — nobela.  
„Do mi scias: por bati — kaptu aspergilon,  
Kaj por morti — alvoku de pastro konsilon!  
Mi vivu, batu! Pastron? kvazaŭ ni — bubaro?  
Por kio Verm'? Antaŭen! ni estu vermaro,  
Mordu Moskvon! Spionoj? Hem, trem, brdem, por klaĉoj?  
Tio pravas? — ke estas vi maljunulaĉoj,  
Tut-netaŭgaj! He, fratoj! ĉashundo — postflaru,  
La Bernardino — kvestu! mi — aspergon faru! 100  
Aspergi!“ — Bastonegon sian li svingetis,  
Kaj krianter: „Aspergi! aspergi!“ ripetis.

Baptist'-partion prenis Bartek, la Razilo,  
Laŭ tre maldika sabro, kaj Mate', Verŝilo,  
Laŭ apogtub', el kies vast-gorĝo facile  
Dekdu kuglojn ŝprucigis li, kvazaŭ verŝile.  
„Vivu Baptisto!“ kriis ambaŭ. Prus' dum tio  
Ekparolis, sed ĉesis pro rido kaj krio.  
Oni kriis: „For! prusoj, timuloj, for paŝu!  
En bernardan kapuĉon timulo sin kaŝu!“ 110

Tiam Mate' maljuna ree kapon levis,  
Do bru-paroloj ree mallauĉiĝi devis:  
„Ne moku Vermon; konas mi pastraĉ'-ruzulon;  
Ol vi, pli grandan nukson ĉi vermet' mordetis.

Nur foje mi lin vidis: mi rigardon jetis  
Kaj rekonis birdeton; li turnis okulon,  
Time, ke mi konfese-prenos lin pro io;  
Sed — afero ne mia, longa historio!  
Li ne venos, do vane voki kapuĉulon.  
Se de tiu-ĉi venis tuta novajeto,  
Kion ĝi celas? estas diablo pastreto!  
Se, krom tiu novaĵo, vi scias nenion,  
Do kial vi alvenis, kaj volante kion?“

120

„Militon!“ kriis oni — „Kian?“ — „Kun la caro,  
Militon kun moskvuloj! Kontraŭ moskvularo!“

Pruso vokis kaj voĉon pli pli alte levis,  
Kapoklinis, ĝis fine aŭskulton ricevis,  
Parte per voĉo alta, kriema akiris.

„Mi volas bati! bruston frapante, li diris;  
Kvankam sen aspergilo, per ŝip-stango mia,  
De mi ricevis bapton prusoj-kvar' ebria,  
Volinta min dronigi, jeti en Pregelon.“<sup>1)</sup> 130  
„Bravul! diris Baptisto, bon-aspergis felon!“  
„Sed, dolĉa Jezu! oni havu la konscion,  
Kie batali? kial? homoj sciu tion,  
— Vokis Prus' — ĉu popolo volos kune iri?  
Kien iri? ni tion eĉ ne scias diri.  
Fratoj, nobelaj moŝtoj! ni agu prudente!  
Ni faru ĉion plane, bonorde, konsente!  
Por militi: ni ligu konfederacion,<sup>2)</sup> 140  
Sub ies estr-bastono; kie fari tion?  
En Grand-Polujo vidis ni la retiriĝon  
Prusan, do ni sekrete faris konsiliĝon,  
Armis nin kaj preparis kampular'-leviĝon;  
Prete, ni de Dombrovski ordonon ricevis:  
Sur ĉevalon! kaj ĉiuj samtempe sin levis!

„Mi petas voĉon! vokis Klecka Rajtigito,

1) Pregel, Pregola, rivero en Orienta Prusujo.

2) Armita unuiĝo de nobelaro sub estr-bastono t. l. prezido de marŝalo elektita.

En germana <sup>1)</sup> vestaĵo, homo juna, bela,  
 Nome Buĥman, sed polo, Poluja naskito;  
 Ne certe, ĉu devene li estis nobela; 150  
 Oni lin ne demandis, en ĉiu rilato  
 Estimante: li servis ĉe litva magnato,  
 Estis bon-patrioto kaj plena de scio;  
 El fremd-libroj lerninte pri ekonomio,  
 Bienojn administris li orde, kun plano;  
 Pri politik' prudente konkludis Buĥmano,  
 Bel-skribis, flu-parolis, lerte argumentis,  
 Do kiam li komencis, ĉiuj eksilentis.  
 „Mi petas voĉon!“ diris li, kraĉotusinte,  
 Kliniĝis kaj eksonis per vortoj bel-tinte: 160

„Preopinantoj <sup>2)</sup> miaj tuŝis elokvente  
 Ĉiujn decidajn punktojn, kaj, ĉefa-momente,  
 Diskuton sur pli altan levis pozicion;  
 Do en unu fajrujon mi kunprenu ĉion:  
 Trafe jetitajn pensojn, gravajn argumente,  
 Ke kontraŭ-opinioj kuniĝu konsente.  
 Du partojn en diskuto tuta mi ekvidis,  
 Kaj mi sekvos partigon, kiel vi dividis.  
 Unue: kial devas leviĝi la lando?  
 Kiasence? jen viva unua demando; 170  
 Dua koncernas regon kaj revolucion.  
 Divido — trafa; prenu mi inverse tion.  
 Ni esencon de rego komprenu unue,  
 El ĝi leviĝo-celon mi deduktos plue.  
 Pri rego, se okule homar'-historion  
 Mi trakuras, do tiam mi perceptas kion?  
 En arbaroj sovaĝe vagas hom-genero,  
 Kaj ĝin kolektas, ligas komuna danĝero,  
 Pripensu de defendo: jen konsil'-apero.  
 Ĉiu parton de propra liberec' demetas 180  
 Por bon' komuna: tiel statuto jam pretas;  
 El ĝi elfluas, kiel el fonto torento,  
 Ĉiuj leĝoj: formiĝas rego per konsento,

1) Mallonga, laŭ modo internacia.

2) Antaŭaj parolintoj; fremd-vorto lasita ĉi-tie intence laŭ originalo.

Neniel devenante el la volo Dia;  
Do regecon apogas kontrakto socia,  
Rego-divido estas nur sekva momento...“

„Kaj jen estas kontrakto!<sup>1)</sup> Minska aŭ Kijova?  
Diris Mate' maljuna, — Babin-rego nova!<sup>2)</sup>  
Sinjor' Buĥman, ĉu caron al ni trudis Dio  
Aŭ diablo, neniŭ kverelos pro tio; 190  
Vi diru, kiel caron forigu nacio“.

„Jen, kriis Aspergisto, malfacil' en kio!  
Se mi, ekzemple, povus salti pli facile  
Al tron', kaj plaŭd! surŝpruci caron aspergile,  
Tiam li ne revenus sur Kijova trakto,<sup>3)</sup>  
Nek sur Minska, nek ia Buĥmana kontrakto;  
Nek lin pop' dia-pove, nek mem Belzebubo  
Revivigus... Aspergas ĉiu brava bubo!  
Sinjor' Buĥman, vi moŝto, elokventon havas,  
Sed elokvento—ŝum, drum<sup>4)</sup>; kaj aspergo gravas.“

„Jes, jes! manojn frotante, Bartek la Razilo, 200  
De Baptisto al Macjek kuris, laŭ teksilo -  
Boben', el unu flank' al dua: „Nur, kun vergo  
Vi Macjek, kaj vi Macjek, kun il' de aspergo,  
Konsentu, kaj, je Dio, vere, moskvan bandon  
Ni splitigos; mi iros sub Vergo-komandon“.

„Komand', diris Baptisto, bona por parado;  
Ĉe ni estis komando en Kovna brigado,

<sup>1)</sup> Famaj estis siatempe la kontraktoj aŭ kunvenoj, en Kijov kaj Minsk; en certaj templimoj ili okazis por farado de diversaj ĉiuspecaj interkonsentiĝoj precipe pri komerca foiro.

<sup>2)</sup> Babina Respubliko. En j. 1568 fondis pola nobelo, nome Pŝonka, en sia bieno Babin ĉe Lublin, satiran societion kiu ricevis la nomon de Babina Respubliko. Ĝi vipis la morojn de samtempoj kaj sendis al ĉiu, kiu distingigis per difekto aŭ malsaĝeco, diplomon, per kiu li estis akceptita en la respublikon kaj ricevis en ĝi oficon: Kurac-fuŝulo fariĝis kuracisto, timulaĉo — armeestro, disipulo — ekonomo.

<sup>3)</sup> Trakto, ĉefa landvojo, kuniganta grandajn urbojn (soseo).

<sup>4)</sup> Vortoj son-imitaj, signifantaj sensencan bruon.

Tre konciza: Timigu, ne timu; atingu  
 Per bato, mem evitu baton; dense svingu;  
 Ŝaĥ, maĥ!<sup>1)</sup> — Razilo pepis: „Bona regularo! 210  
 Kial skribi, difekti inkon? — En ĉi loko  
 Nun ligi konfederon volas nobelaro?  
 Marŝalo — nia Macjek, estr-bastono — vergo!“  
 „Vivu, kriis Baptisto, surpruĝeja Koko!“  
 Oni respondis: „Vivu majstroj de aspergo!“

Meze mallaŭtigate, flanke bruis krioj:  
 Konsilo dispartigis, estis du partioj.  
 Buĥman kriis: „Konsenton ne laŭdi, jen mia  
 Sistemo!“ — „Ne permesas mi!“ kriis alia.  
 En angul' oni jesas. Fine voĉo tuba 220  
 Aŭdiĝis de veninta nobelo Skoluba:

„He sinjoroj Dobjinaj! kion vi komencas?  
 Nin senigi de nia rajto vi intencas?  
 Invitante el nia nobelar'-ejeto,  
 (Invitis nin Ŝlosisto Fendulo Moŝteto)  
 Oni diris, aferoj estas okazontaj,  
 Ne Dobjinon, sed tutan distrikton tuŝontaj,  
 Tut-nobelaron; ankaŭ Vermo murmuretis,  
 Kvankam neniam finis, ĉiam balbutetis,  
 Malklare parolante. — Fine de aferoj, 230  
 Ni kunvenis, najbarojn vokis kurieroj:  
 Ĉeestas jen ĉi-tie, krom Dobjinaj viaj,  
 Ĉirkaŭ ducent diversaj nobeloj aliaj;  
 Do ĉiuj ni konsilu! Se baston' marŝala  
 Necesas, ĉiuj voĉu, ĉiu voĉ'—egala.  
 Vivu egalo!“

Tiam du Terajeviĉoj,  
 Same kvar Stipulkovski-j kaj tri Mickjeviĉoj  
 Krias: „Vivu egalo!“ kiel li proponas.  
 Buĥman vokis: „Konsento estos fin-pereo!“  
 La Aspergisto kriis: „Ni vin ne bezonas: 240  
 Vivu nia marŝalo, Mateoj-Mateo!  
 Prezidu!“ — „Ni invitas!“ krias Dobjinanoj;

1) Vortoj sone-imitantaj la skermadon.

„Ni ne permesas!“ vokas aliaj litvanoj.  
Amas' disiĝas, en du grupojn sin kolektas,  
Kaj kapojn al du flankoj, kriante, direktas,  
Tiuj: „Ni ne permesas!“ — ĉi-tiuj: „Ni petas!“

Maljuna Macjek sidas meze kaj kvietas,  
Kaj sola lia kapo tute ne moviĝis.  
Kontraŭ li la Baptisto staris, man-pendiĝis  
Sur bastoneg', kaj kapon, sur glob' apogitan, 250  
Turnis, kiel kukurbon, sur stango fiksitan,  
Alterne sin antaŭen, posten balancante,  
Kaj senĉese: „Aspergi, aspergi!“ kriante.  
Razileto laŭlonge ĉambroun paŝ-mezuris,  
De benko Aspergista al Matea kuris.  
Kaj Verŝilo laŭlarĝe la ĉambroun trairis,  
De Dobjinaj al fremdaj, ŝajne pac-inspiris;  
Unu vokadis: „Razi!“ — dua: „Verŝi!“ tentis.  
Macjek, jam ekkoleris laŭ vid', sed silentis.

Post kvaronhora bruo, en amas' krianta, 260  
Super kapojn elsaltis kolono brilanta:  
Tio estis longega rapir', kun larĝeco  
De man-streĉo, kaj ambaŭ-flanke kun tranĉeco.  
Laŭvide glav' teŭtona, Nurnberg-ŝtal' forĝita:  
Ĉiuj silent-rigardis. Kiu glavon tenis?  
Ne vidiĝis, sed oni tion tuj divenis:  
Jen Fendil'! kaj leviĝis laŭt-krio subita:  
„Vivu Fendulo! Vivu Sabruloj-juvelo,  
Duonkapro, Moŝteto, Rembajlo nobelo!“

Baldaŭ Gervazo (estis li), trapremiĝinte 270  
En mezon, kaj ĉirkaŭe per fendil' fulminte,  
Klinis ĝian akraĵon suben, kaj salute  
Al Macjek diris: „Vergon salutas Fendilo.  
Frat-nobelar' Dobjina! kial por konsilo  
Mi vin arigis, diros mi, neniel tute,  
Kion fari; decidu, kiel vi deziras.  
Delonge famo inter nobelejoj iras,  
Ke grand-ajoj okazos en mond-historio;  
Pastro Robak parolis, vi scias pri kio?“  
— „Ni scias!“ oni kriis. — „Bone. Laŭ regulo, 280

Sufiĉas, ke du vortojn ekaŭda saĝulo;  
 Vere? li diris. — „Vere!“ — „Estro de francaro,  
 Diris Ŝlosist', almarŝas ĉi-tien kaj caro;  
 Do milit': car' kun estro, kaj reĝo kun reĝo  
 Kap-batiĝos, jen estas de monarĥioj leĝo.  
 Kaj ni kviete sidos? Se grandul' alian  
 Sufokos, ni sufoku etajn, ĉiu sian.  
 Ĉiuj supre, malsupre, ni interbatalos  
 Kaj hakos: tiam tuta kanajlaro falos  
 Kaj feliĉo florigos Respublikon nian. 290  
 Ĉu vere? — „Vere, kvazaŭ el libro legite!“  
 „Vere, diris Baptisto, aspergu kaj kvite!“  
 „Mi ĉiam razi pretas“, aŭdiĝis Razilo;  
 „Nur konsentiĝu, petas afable Verŝilo,  
 Baptisto kaj Mateo! kiu — komandulo?“  
 Sed Buĥman interrompis: „Konsentu stultulo;  
 Diskuto, por publika afer', jen utilo.  
 Silenton!“ — „Ni aŭskultas“. — „Gajne por decido,  
 Ŝlosisto opinias laŭ nova punkt-vido“.  
 „Jes, ekvokis Ŝlosisto, laŭ mia regulo, 300  
 Pri granda aĵo pensi devas granda ulo:  
 Imperiestro, reĝo, senat', deputatoj.  
 Tielajoj fariĝas en Krakov konvene,  
 Moŝtet', aŭ en Varŝava, ne ĉi-tie, fratoj;  
 Konfeder-aktojn oni ne skribas kamene  
 Per kret', ne sur vicino-ŝip', sed pergamene.  
 Por skribi aktojn estas en Poluj' skribuloj <sup>1)</sup>  
 Kronaj kaj litvaj: tiel faris antaŭuloj.  
 Mia afero — fendi“. — „Plaŭd-aspergi plene.“  
 Aldonis Aspergisto. — „Kaj fari pikadon“ 310  
 Kriis Bartek Aleno, elpreninte spadon.

„Ĉiujn, finis Ŝlosisto, mi ateste prenas,  
 Ĉu Vermo ne parolis: antaŭ ol litvanojn  
 Vizitos Napoleon, purigu kabanojn  
 De balaajo? Ĉiuj aŭdis, ĉu komprenas?

<sup>1)</sup> Skribistoj (pisarze), oficistoj en malnova Polujo,  
 apartaj por la Krono kaj Litvo; ili laboris flanke de reĝoj  
 kaj kancelieroj kaj kun ilia scio eldonis aktojn kaj diplo-  
 mojn.

En distrikt' — balaajo? Kiu 'as malica  
 Mortigint' de bravulo? Farinte rabajon,  
 Kiu de heredulo forŝiras restajon?  
 Kiu li? Ĉu mi diru? — „Fripono Soplica!“  
 Interrompis Verŝilo. — „Premegant' ofica!“ 320  
 Pepis Razil', — Baptisto: „Svingi aspergilon!“  
 Buĥman: „Se li perfidis, iru pendigilon!“  
 „Hejse!“ ekkriis ĉiuj, „hej, kontraŭ Soplica!“

Sed Juĝiston kuraĝe Pruso ekdefendis  
 Kaj al nobeloj brakojn levitajn etendis:  
 „Sinjoroj fratoj! vee! je vundoj de Kristo!  
 Ĉu obsedita estas vi, sinjor' Ŝlosisto?  
 Se li frenezan fraton havas, ekzilaton,  
 Ĉu tial oni punu la senkulpan fraton?  
 Jen kristane! En tio serĉu intrigaron 330  
 De Grafo... Ke Juĝisto premas nobelaron,  
 Ne vere! kiel estas? Vi mem, sen neceso,  
 Lin provokas: li serĉas pacon, kaj punajon  
 Pagante, li forcedas eĉ sian proprajon.  
 Se Juĝisto kun Grafo estas en proceso,  
 Riĉuloj interŝiru: ĉu nia afero?  
 Juĝist' — tiran'! Unua lia malpermeso:  
 Kampuloj ne kliniĝu antaŭ li ĝis tero,  
 Ĉar tio estas peko laŭ li. — Li afable 340  
 Kampulojn, mem mi vidis, sidigas ĉetable;  
 Pagas vilaĝ'-impostojn: ne laŭ Klecka moro,  
 Kie germane regas moŝt' Buĥman sinjoro.  
 Juĝist' — perfida! Kune, de infim'<sup>1)</sup>, ni estis:  
 Honesta ido, sama ĝis hodiaŭ restis;  
 Polujon amas, polajn morojn li deziras  
 Konservi; moskvaj modoj al li ne ĝisiras.  
 El Prusuj' revenante, lavi germanajon,  
 Mi kuras Soplicovon, kvazaŭ kern-polajon:  
 Sat-trinki kaj sat-spiri Patrujon! — Je Dio!  
 Mi — frat' Dobjina via, sed zorgos pri tio, 350  
 Ke, al Juĝist', neniu faru maljustajon!

1) Plej malalta (unua komenca) klaso en lernejo.



Grand-Polujo <sup>1)</sup> ne konas, fratoj, tian ordon:  
Agrable rememori — spiriton! konkordon!  
Per bagatel', neniŭ konfuzis konsilon.“

Ŝlosist': „Ne bagatelo! fripon' — pendigilon!“

Bruo kreskis. Ĵus Jankjel aŭskulton atingis;  
Li stariĝis sur benko, super kapojn ŝvingis  
Barbon kiel pajlfasko, pendantan ĝis zono;  
Per dekstra man' deprenis li sian vulp-ĉapon,  
Per maldekstra jarmulkon <sup>2)</sup> alpremis sur kapon, 360  
Post zon' maldekstran metis, pasis al propono,  
Per kolpak' salutante malalte laŭ vico:

„Nu, sinjoroj Dobjinaj! mi, judaĉo tia,  
Nek frato, nek svatano estas de Soplico,  
Tre ŝatinda sinjoro, bona, estro mia;  
Estimon al Dobjinaj Bartkoj, Mackoj! karaj  
Kiel bonaj najbaroj, sinjoroj bonfaraj.  
Malbone, se vi volas fari superforton  
Al Juĝisto; ĉar povas batiĝon, bat-morton  
Tio kaŭzi — kaj spravnik' asesor?... arestas. 370  
Ĉe Soplico, vilaĝe, soldataro estas:  
Jegroj! <sup>3)</sup> Asesor' — dome: li fajfsignon faras,  
Ili venas, intence kvazaŭ tie staras,  
Kio sekvos? — Se moŝtoj atendas je franco,  
La franco — malproksime, granda voj-distanco.  
Mi — judo, pri militoj ne scias, sed vidis  
En Bjelica <sup>4)</sup> judetojn, kiuj lime sidis;  
Aŭdiĝas: francoj — apud Łososna <sup>5)</sup> rivero,  
Kaj milit' — en printempo, se estos en vero.  
Nu, mi diras: Soplica dom' — ne butiketo 380  
Disprenebla, kaŝebla en veturileto.  
Biendom' ĝis printempo staros, ne veturos;  
Juĝisto — ne farmanta judet', ne forkuros:

1) Vidu rimarkon sur p. 54.

2) Malsupra ĉapeto, ne deprenata de l' kapo.

3) Jegroj, ĉasistoj; vorto germana, uzata en rusa armeo.

4) Bielica, urbeto apud Njemen.

5) Łosoŝna, afluŭo de Njemen.

Oni lin en printempo trovos kun facile.  
 Nun disiru, kaj laŭta ne estu babilo  
 Pri tiu, kiu estis, tuta historio!  
 Al favoraj nobeloj mi havas nun peton:  
 Mia Sjora malgrandan vindis Jankjeleton,  
 Do mi regalas ĉiujn, grand-muzik' ĉe tio!  
 Fajfiloj, violonoj, bas', formas kapelon: 390  
 Moŝto Macjek maljunan ŝatas trink-mielon,  
 Novan mazurkon; havas mi novajn mazurkojn,  
 Kaj mi instruis kanti „fejn“ miajn „baŭrkojn.“<sup>1)</sup>

De komune ŝatata Jankjel elokvento  
 Trafis korojn. Leviĝis ĝoj-kria konsento;  
 Bru' aplaŭda eĉ antaŭ la domon elkuris:  
 Kiam Gervaz' Jankjelon per fendil' mezuris.  
 Judo saltis amason. „For! kriis Ŝlosisto,  
 Fingrojn jud' inter pardon ne puŝu! afero  
 Ne via! — Prus', moŝteto! ĉar vi de Juĝisto 400  
 Kelk mizerajn vicinojn<sup>2)</sup> havas sur rivero,  
 Vi lin ŝirmas? pri via patro forgesante?  
 Horeŝkajn dudek ŝipojn al Prusuj' konstante  
 Li floris, do riĉiĝis kaj li kaj infanoj,  
 Kaj ĉiuj ĉeestantaj moŝtoj Dobjinoj.  
 Ĉiu aĝul' memoras, kaj aŭdis junulo:  
 Tablestro ĉies patro estis, bonfarulo!  
 Kiu en Pinsk-bienoj havis plenrajtecon?  
 Dobjinski! — Kalkulisto? same! — Marŝalecon<sup>3)</sup>  
 De bufed' al neniu alia li fidis, 410  
 Nur al Dobjinski-j; ĉie Dobjinskijn vi vidis!  
 Li protektis dobjinajn procesojn laŭ leĝo,  
 Por vi favoran panon klopodis ĉe reĝo,  
 Infanojn po sesdekoj lokis en konvikto<sup>4)</sup>  
 Ĉe Piaroj, je sia kosto, vesto, vikto;

<sup>1)</sup> Infanoj, pola etiga formo laŭ hebrea „baŭr“ junulo; fein, bele (germane).

<sup>2)</sup> Vidu rimarkon sur. p. 49.

<sup>3)</sup> Marŝaleco, administrado de l' domo kaj servistaro.

<sup>4)</sup> Piara konvikto, edukejo kaj instruejo, administrata de pastroj Piaroj, estis tiutempe plej bona instituto de publika edukado en Polujo. — Vikto, vivteno, nutraĵo.

Plenaĝulojn promovis <sup>1)</sup> li per kosto sia.  
Kaj pro kio? ĉar estis li najbaro via!  
Hodiaŭ vi Soplican tuŝas limo-strion;  
Kion bonan li faris al vi?''

— „Tut-nenion!

Vokis Verŝil', ĉar li el nobelet' devenas! 420  
Nun plenbloviĝas, phu, phu, nazon alte tenas!  
Mi lin al edzofesto petis de filino  
Kaj trinkigis; li diris: ne trinkas sen fino  
Mi, kiel vi nobeloj, funele! — Magnata  
Pupet', el marimonta <sup>2)</sup> farun' delikata!  
Ne trinkis; ni en gorĝon verŝas, do li krie:  
Perfort'! Nu, el Verŝilo, mi enverŝos plie.“

Baptisto kriis: „Mi lin aspergos, trompulon,  
Por mia filo, kiu estis saĝa ido,  
Nun stultiĝis, nomata estas Sak, <sup>3)</sup> bovido, 430  
Kaj kaŭze de Juĝisto iĝis li stultulo.  
Mi diris: Soplicovon vi vagas pro kio?  
Se mi vin tie kaptos, do gardu vin Dio!  
Li al Zonjo ŝteligas ree tra l' kanabo:  
Mi kaptis lin kaj ŝiris je orel' dolore;  
Kaj li ploras, ploreĝas, kiel eta knabo:  
Patro, mortigu, iros mi, li ĝemas plore —  
Kial? — li diras: Zonjon mi amas! kaj ŝatas  
Eĉ iom ŝin rigardi! Do mi lin kompatas  
Kaj al Juĝisto: donu al Sako Zofion. 440  
Li diras: tro malgranda, atendu jar-trion,  
Kiel ŝi mem ekvolos. Fripon', jam ŝin svatas  
Al iu; mi al tiu edzofesto venos,  
Per aspergil' al ili edzoliton benos.“

„Kaj ĉi kanajlo, vokis Ŝlosisto, regadu  
Kaj sinjorojn, pli bonajn ol li, ruinadu?  
Kaj Horeŝkoj-memoro, nom' pereos fine!

<sup>1)</sup> Promovi, antaŭenŝovi, levi sur pli altan pozicion.

<sup>2)</sup> Plej delikata kaj plej bona faruno en la tuta lando, devenis el mueliloj en Marymont apud Varsovio.

<sup>3)</sup> Sak, bovda ledo, sinonimo de stultulo.

Kie dankem' en mondo? forestas Dobjine!  
 Fratoj! batalon volas vi kun car' multpova,  
 Kaj vi timas militon kun dom' Soplicova? 450  
 Timas turon! Ĉu iun mi al raboj sendas?  
 Dio gardu! Ne, fratoj! mi leĝon defendas;  
 Graf' ja gajnis, obtenis dekretojn, atendas  
 Nur ilian ekzekvon! <sup>1)</sup> Laŭ malnovaj moroj  
 La dekreton plenumis nobeloj sinjoroj  
 Kaj precipe Dobjinski-j, do iĝis famuloj  
 En Litvo! Ja tut-sole Dobjinaj bravuloj,  
 Batalis, ĉe invado Miska, kun moskvuloj,  
 Kiujn alĝvidis rusa ĉefo Vojniloviĉ,  
 Kun fripono, amiko, Volk el Logomoviĉ. 460  
 Vi memoras: ni prenis Volk en arestejon  
 Kaj kondukis, pendigi sur trab', en garbejon,  
 Kiel kampul'-tiranon, serviston de caro;  
 Sed Volkon ekkompatis stulta kampularo!  
 (Mi lin ankoraŭ rosti sur fendilo volas).  
 Pri multaj grand-invadoj mi eĉ ne parolas,  
 El kiuj ni nobele-konvene eliris,  
 Profiton, ĝeneralan aplaŭdon akiris!  
 Kaj hodiaŭ? Najbaro Grafo vane penas  
 Fini sian proceson, dekretojn obtenas: 470  
 Neniu volas helpi al orf' mizerulo!  
 De Tablestro, nutrita milojn, heredulo  
 Jam ne havas amikojn, krom Ŝlosist' kastela  
 Kaj jen ĉi-tiu mia fendilo fidela!"

„Kaj aspergilon! diris Baptist'. Gervazeto,  
 Mi — kun vi, dum en mano plaŭdos plaŭdileto.  
 Du estas du! Je Dio! Gervazo, vi brave  
 Sabras, do mi aspergos kaj vi hakos glave:  
 Kaj tiel: ŝaĥ, maĥ, plusk, plask! <sup>2)</sup> anstataŭ babilo!"

„Vi Bartkon ne forpelos, diris la Razilo; 480  
 Do kion vi sapumos, mi razos tut-glate.“  
 — „Kaj mi, diris Verŝilo, kune iros frate,

<sup>1)</sup> Ekzekvi, plenumi juĝe.

<sup>2)</sup> Plusk, plask, vortoj sone-imitantaj plaŭdadon, laŭ originalo.

Se ili ne konsentas pri marŝalo ia;  
 Mi lasu voĉ-globeton! Jen globet' alia!  
 — Li tintis per prenitaj el poŝo kugletoj —  
 Jen globetoj! Juĝiston per ĉiuj globetoj!“  
 — „Al vi, vokis Skoluba, al vi ni aliĝas!“  
 — „Kun vi, kriis nobeloj, ni ankaŭ kuniĝas.  
 Vivu Horeŝkoj! Duon-kaproj! en ofico  
 Vivu Ŝlosist' Rembajlo! Hej, kontraŭ Soplico!“ 490

Kaj tiel ĉiuj sekvis Gervaz'-elokventon,  
 Ĉar al Juĝisto havis jam ofendosenton,  
 Kutiman ĉe najbaroj: domaĝo per brutoj,  
 Elhako de arbaro, pri limo disputoj.  
 Unujn koler', aliajn envio instigis  
 Kontraŭ riĉa Juĝisto: ĉiujn konsentigis  
 Malamo. Al Ŝlosisto levigas palaŝoj,  
 Bastonoj. —

Tiam Macjek, ĝis nun nubigita  
 Kaj senmova, levigis kaj per gravaj paŝoj  
 Iris mezon; ĉe koksoj mane-apogita, 500  
 Antaŭ sin rigardante, kapon balancante,  
 Li prenis voĉon, ĉiun vorton parolante  
 Kun halto kaj akcento: „Ho stultaj! ho stultaj!  
 Vi stultaj! Kulpa estos unu, pentos multaj!  
 Dum Poluj'-revivigon koncernis konsilo  
 Kaj publik-bonon, bruis malpaca babilo;  
 Ne estis eblo, stultaj, opinion diri,  
 Nek, por elekti super vi ĉefestron, ordo;  
 Tamen, stultaj! se iu volas vin inspiri  
 Per personaj rankoroj, stultaj, tuj konkordo! 510  
 Do, for, for! ĉar mi, Macjek, vin je milionoj,  
 Centmiloj, veturiloj, bareloj, furgonoj <sup>1)</sup>  
 Da diabloj!!!“

Silentis ĉiuj, fulm-trafite;  
 Sed kriego levigis antaŭ dom' subite:  
 „Vivu Graf!“ Li enrajdis korton de Mateo,

1) Ŝarĝa veturigilo.

Mem armita, armite sekvis dek jokeoj.  
Grafo, en nigra vesto, sidis sur-ĉevale:  
Sur vest' — nuksokolora mantel', laŭ itale  
Tre larĝa, sen manikoj, kiel grand-tegajo,  
Ĉe kol' bukite, falis ŝultrojn per faldajo; 520  
Li havis rond-ĉapelon kun plumo, kaj spadon  
En man' turnante, faris ĉirkaŭ-salutadon:

„Vivu Graf! oni kriis, kun li vivon, morton!“  
Nobelar', tra fenestroj, rigardis en korton  
Kaj, post Ŝlosist', premiĝis ĉiam pli al pordo.  
Ŝlosist' eliris, sekvis amaso sen ordo.  
Macjek reston elpelis, pord-riglön ektiris  
Kaj, tra feneŝtr', ankoraŭ foje: „Stultaj!“ diris.

Dume kun Graf' nobeloj drinkejon eniris.  
Gervaz' malnova-more faris la disponojn: 530  
Do, al si doniginte tri kontuŝo-zonojn,  
Sur ili tri barelojn el drinkeja kelo  
Eligas: da biero, brando kaj mielo.  
Malŝtopite, trinkajoj ŝprucis tri-torente:  
Sukcene, karneole kaj blanke-arĝente,  
Kaj supre per triobla ĉielark' radias,  
Zum-falas cent pokalojn, cent glasojn. Bruante,  
La nobelaro trinkas, al Graf' dezirante  
Cent jarojn; ĉiuj „Hejse je Soplico!“ krias.

Jankjel sen sel' forrajdis kaŝe. Pruso volis, 540  
Ne aŭskultite, kvankam li saĝe parolis,  
Forkuri; oni sekvis lin krie: perfidis.  
Mickjeviĉ staris fore, silente: sed vidis  
Nobelar' el mieno lia, ke konspiras  
Li ankaŭ; do al sabroj! Li skerme reniras,  
Jam vundita; premite al bariloj, haltas;  
Sed Zan kaj tri Ĉeĉotoj<sup>1)</sup> al li helpe-saltas.  
Oni batalhaltigis, sed, dum ĉi ribelo,

---

<sup>1)</sup> Zan kaj Czeĉot estis universitataj kolegoj kaj amikoj de l' poeto, do li metas ĉi-tie iliajn nomojn apud la sia.

☞ Du estis man-tranĉitaj, unu ĉe orelo.  
☞ Resto — sur selojn!

Graf' kaj Gervazo disponas, 550  
☞ Ordigas, kaj armilojn, ordonojn, disdonas.  
☞ Fine ĉiuj, tra longa Dobjina strat-vico,  
☞ Forgalopis, kriante: „Hejse, je Soplico!“

## LIBRO VIII.

---

### INVADO.

Astronomio de Vojski. — Rimarko de Ĉambelano pri kometoj. — Mistera sceno en ĉambro de Juĝisto — Tadeo, volante lerte malimpliki sin, falas en grandajn embarasojn. — Nova Dido. — Invado. — Lasta vokista protestado. — Grafo konkiras Soplicovon. — Sturmo kaj buĉo. — Gervazo kiel kelestro. — Invada festeno.

Antaŭ tempesto estas mallaŭta momento:  
Nubo super hom-kapojn transfluginte, haltas,  
Minac-vizaĝe spiron retenas de vento,  
Silentas, fulm-okule teron ĉirkaŭ-saltas,  
Signante lokojn, tondre-batotajn laŭ vico:  
Tia silent'-momento — en dom' de Soplico;  
Kaj, kvazaŭ antaŭsente de stranga apero,  
Buŝoj mutas, spiritojn levis revoj-sfero.

Post vespermanĝ' Juĝisto kun gastoj eliras  
Antaŭ domon kaj ĝui vesperon deziras, 10  
Sidiĝas sur pordsojla, herbkovra sterneto;  
Malserene, mallaŭte tuta societo  
Rigardas al ĉielo, kiu malaltiĝas,  
Malvastiĝas kaj ŝajne al ter' proksimiĝas,  
Ĝis ambaŭ sub vualon sin kaŝas vesperan,  
Kaj, kiel geamatoj, parolon misteran



Komencas, klarigante sentojn per tenataj  
Sopiroj, flustroj, vortoj duone dirataj.  
Strangan vesper'-muzikon formas tiu bruo.

Komencis ĝin, ĝemante en mansard', noktuo. 20  
Vespertoj flugas, flustre per molaj flugbatoj,  
Al domo, kie lumas fenestro-vitraĵoj;  
Svarmas noktpapilioj, laŭ vespertoj fratoj,  
Allogate de blankaj virino-vestaĵoj,  
Precipe tudas Zonjon, vizaĝeton batas  
Kaj de hel-okuletoj ŝiaj allogatas.  
Insektoj, kolektite ronde en aero,  
Turniĝas, ludas kiel harmoniko-sfero.<sup>1)</sup>  
Zonja orelo aŭdas, inter mil bruuloj,  
Muŝ-akordon kun falsa duonton' de kuloj. 30

Kampe koncert' vespera ĵus komencis ordon;  
La muzikistoj finis instrument'-agordon.  
Trifoje kriis kreko, herb-violonisto,  
El marĉoj lin sekundas botaŭro, basisto.  
Jam skolopoj, flirtinte supren, volviĝante,  
Blekas refoje, kvazaŭ tamburon batante.

Post muŝ-susuroj, birdo-krioj, por finalo,  
Du-hore du lagetoj aŭdiĝas en valo,  
Kiel kaŭkazo-monta ensorĉita lago, 40  
Dum-vespere ludanta, silenta dum tago.  
Unu, klar-akva, havis bordon sabloplenan,  
El brusto donis ĝemon mallalitan, solenan;  
Dua, kun kota fundo, el faringo sia  
Respondis per kriego malĝoje-pasia:  
En ambaŭ ĉi lagetoj kantis ranoj-hordoj.  
Ambaŭ ĥoroj konsentis en du grand-akordoj:  
Tiu fortege sonis, ĉi mallaŭte spiras,  
Tiu kvazaŭ lamentas, ĉi tiu sopiras.

<sup>1)</sup> Harmoniko, ĉi-tie muzika instrumento, konsistanta el vitraj diskoj kaj rulo (aŭ sfero), kiu, turniĝante kaj tuŝante disketojn, eldonas sonojn.

Trans kampoj inter ambaŭ sonas kunparolo,  
Kiel altern-ludantaj harpoj de Eolo.<sup>1)</sup>

50

Krepusk' densiĝis. Brilis nur el saliketoj,  
Ĉe l' river', lup-okuloj kiel kandeletoj.  
Ĉe horizonto-randoj malvastaj, pli fore,  
Paŝtistaj nokto-fajroj ie flamas ore.  
Fine luno arĝentan torĉon ekbruligis,  
El bosk' irante, teron, ĉielon lumigis,  
Kiu nun, el krepusko duon-malkovrate,  
Apude dormis, kiel geedzoj beate:  
Ĉielo, pura-brake, ĉirkaŭis silente  
Bruston de tero, kiu lumas lun-arĝente.

60

Jam, kontraŭ luno, stelo unu, dua, tria...  
Jam palpebrumas milo, milion' ilia.  
Kastor kun frato Polluks brilas fronte, hele,  
Nomitaj iam slave: Lele kaj Polele;<sup>2)</sup>  
Ilia nom' vulgara nun estas alia:  
Unu nomiĝas Litvo, dua — Krono nia.

Plu brilas du teleroj de Pesil' ĉiela:  
Sur ili, dum kreado, (laŭ diro fabela),  
Dio pesis laŭvice planedojn kaj teron,  
Antaŭ ol ilin puŝis en abism'-aeron,  
Poste oran pesilon fiksas sur ĉielon:  
Homoj havis por siaj pesiloj modelon.

70

Norde briligas rondo de Kribril'<sup>3)</sup> stelaron,  
Tra kiu Dio kribris sekalan grajnaron,  
El ĉielo jetante ĝin al patr' unua,  
Elpelita, por pekoj, el ĝardeno ĝua.

Davidaj veturilo <sup>4)</sup> iom pli levita,

---

<sup>1)</sup> Harpo de Eolo, korda instrumento muzika kiun tonigas ekblovoj de vento.

<sup>2)</sup> La steloj estas hodiaŭ nomataj „Ĝemeloj“ (dunaskitoj).

<sup>3)</sup> Kribrilo, konstelacio nomata „Harplektaĵo de Bereniko“.

<sup>4)</sup> Davidaj veturilo, konstelacio nomata de astronomoj „Granda Urso“.

Long-timone al polus-stelo 'as turnita;  
Pri veturilo scias litvanoj maljunaj;  
Ĝin malĝuste Davida nomas homoj nunaj, 80  
Ĉar ĝi estas Anĝela. Lucifer<sup>1)</sup> sin lokis  
Sur ĝin, kiam li Dion al lukto provokis;  
Tra laktvojo li kuris en ĉielan sferon,  
Sed Miĥael dejetis el ĝi Luciferon.  
Nun difektite, kuŝas ĝi inter stelaro;  
Ĉefanĝel' ne permesas je ĝia riparo.

La maljunaj litvanoj scias ankaŭ tion,  
(De rabenoj, laŭdire, preninte la scion)  
Ke tiu zodiaka Drako longa, dika,  
Ĉiele volviĝanta per stelar' artika, 90  
Kiun Serpent' erare baptis astronomo,  
Estas fiŝo: Levjatan — ĝia vera nomo.  
Dum diluvo ĝi loĝis maroj-profundaĵon,  
Akvo-manke ĝi mortis; sur ĉiel'-volbajon,  
Pro vidindec', por fari memoraj'-ateston,  
Anĝeloj elpendigis la malvivan reston.  
Same en Mir-preĝejo estas pendigitaj<sup>2)</sup>  
Grandegulaj tibioj kaj ripoj fositaj.

Tiel rakontis Vojski pri stel-historio;  
Li konis ĝin el libroj kaj el tradicio. 100  
Maljunulo jam vidis malforte vespere:  
Pri ĉielo ne helpus okulvitro lia;  
Sed stelo-formojn, nomojn li konis parkere  
Kaj montris fingre lokojn de vetur' ilia.

Hodiaŭ ne atentis iu al babilo  
Pri Pesilo-teleroj, Drako aŭ Kribrilo.  
Ĉies okulojn, penson, nova gast' altiris,  
Kiu ekde nelonge sur ĉiel' vojiris:  
Kometo de unua grando, forto hela,<sup>3)</sup>

<sup>1)</sup> Satano, ĉefdiablo.

<sup>2)</sup> Estis la kutimo pendigi en preĝejoj la elfositajn skeletojn, kiuj, laŭ opinio de l' popolo, estis ostoj de grandeguloj. — Mir, urbo en Litvo.

<sup>3)</sup> Memorinda kometo el j. 1811.

Kuris de okcidento al nordo ĉiela, 110  
Sang-okule malplenan kaleŝon mezuris,  
Kvazaŭ ĝin post Lucifer ekokupi kuris,  
Per treĵo envolvis ĉielo-trionon,  
Kvazaŭ rete forŝovis steloj-milionon,  
Kaj ilin posttrenante, mem per kapo celon  
Mezuras norde, rekte en polusan stelon.

Litva popol' rigardis stranga-antaŭsente  
Ĉiunokte miraklon tiun firmamente,  
Kaj malbonon aŭguris el ĝi kaj aliaj 120  
Signoj: tro ofte birdoj, malbon'-antaŭkriaj,  
Akrigis, sur malplenaj kampoj ariĝante,  
Bekojn, kvazaŭ kadavrojn tie atendante.  
Oni vidis, ke hundoj ofte kavojn faris,  
Terure hurlis, kvazaŭ morton antaŭflaris,  
Malsat'-, milit-aŭgure; arbaristoj vidis,  
Kiel pest-virgulino tra tombej' rapidis,  
Kiu frunte plej altajn arb-suprojn atingis  
Kaj en maldekstra mano sangan tukon ŝvingis.

Divers-konkludojn formis, apud palisaro,  
Laborestro, veninta kun tag-raportaro, 130  
Kaj spez-skribisto, flustre kun la ekonomo.

Ĉambelan', inter gastoj, sur sojl' antaŭ domo,  
Interrompis parolojn, mem parolos nune:  
Lia grand-tabakujo ekbrilis ĉe-lune,  
(Tuta el pura oro, brilant'-kadreto;  
Meze, post vitro, reĝa Stanislav-portreto).  
Li sonigis ĝin fingre, flarumis kaj diris:  
„Sinjor' Tade', pri steloj vi al ni inspiris  
Eĥe, kion vi devis en lernej' aŭskulti.  
Pri miraklo mi ŝatas simplulojn konsulti. 140  
Mi, pri astronomio, aŭskultis dujaron  
En Vilno, kie riĉa sinjorino, saĝa  
Puzina, <sup>1)</sup> el enspezo ducent-hom-vilaĝa,

<sup>1)</sup> Puzyna Elizabeto, fama fondintino kaj subtenantino de la astronomia observatorio en Vilno, mort. 1767.

Teleskopojn aĉeti igis kaj vitraron;  
 Pastro Poĉobut, <sup>1)</sup> fama vir', observatoro,  
 De tut-Akademio li estis rektoro,  
 Fine lasis katedron priastronomian,  
 Revenis monaĥejon, silent-ĉelon sian,  
 Tie mortis. Mi konas, ne sole laŭ nomo,  
 Snjadecki-n, <sup>2)</sup> viron saĝan, kvankam li mondano. 150  
 Jen planedon, kometon, ĉiu astronomo  
 Tiel rigardas, kiel karoson <sup>3)</sup> urbano:  
 Scias, ke rezidejon reĝan ĝi veturas,  
 Aŭ trans limon, tra urbaj barieroj, kuras.  
 Kiu veturis? kion kun reĝo parolis?  
 Ĉu reĝo pacon sendis? aŭ militon volis?  
 Oni eĉ ne domandas. Mi memoras tion,  
 Kiam Branicki <sup>4)</sup> iris en karos' Jassion; <sup>5)</sup>  
 Malhonestan karoson, da Targoviculoj  
 Trenajo sekvis, kiel kometon: Kampuloj, 160  
 Kvankam en publikajoj ili ne part-prenis,  
 El trenajo perfido-aŭguron divenis.  
 Ĉi-kometon popolo nomas balailo,  
 Diras, ke balaata estos miloj-milo“.

Tiam, ekparolonte, Vojski kapoklinis:  
 „Vere, mi rememoras, moŝta Ĉambelano,  
 Kion oni parolis al mi, al infano,

<sup>1)</sup> Pastro Poczobut Odolanicki, nask. 1728, fama astronomo pola, eldonis verkon „Pri zodiako en Dendera“, kaj li kunhelpis per siaj astronomiaj observoj al Lalande ĉe liaj kalkuloj pri rondiro de luno. Poczobut estis profesoro kaj rektoro de la Vilna Akademio 1764—1799. Lasinte sian instruistan okupon li revenis al la societo de Jezuitoj en j. 1808 kaj mort. 1810.

<sup>2)</sup> Jan Sniadecki, nask. 1756, eminenta matematikisto kaj astronomo pola, profesoro de la Krakova akademio, kaj post Poczobut, rektoro kaj profesoro de la Vilna, mort. 1830.

<sup>3)</sup> Karoso, kovrita kaleŝego.

<sup>4)</sup> Branicki, Francisko Ksavero, granda hetmano kronlanda kaj poste generalo rusa; li estis, apud Felikso Potocki kaj Severino Rzewuski, unu el formintoj de la Targovica konfederacio (komparu rimarkon sur p. 43).

<sup>5)</sup> Jassy, urbo en Rumunujo; en j. 1792 kunveturis tien la Targovicanoj.

Memoras, kvankam dekan jaron mi ne finis,  
 Kiam estis en nia domo vizitanto,  
 Sapjeha, de kirasa signo leŭtenanto,<sup>1)</sup> 170  
 Li poste estis reĝa marŝal' kortegana,  
 Kaj grand-kanceliero li mortis litvana,  
 Havinte cent-dek jarojn. Li, dum reĝo Jano  
 Tria, apud Vieno, estis sub hetmano  
 Jablonovski. Sapjeha rakontis pri tio:  
 Ĝuste kiam ĉevalen sidiĝis Jan Tria,  
 Kaj por voj' adiaŭis lin papa nuncio,  
 Reĝan piedon kisis sendito aŭstria,  
 Tenante piedingon, (de l' sendito nomo:  
 Graf' Vilček); reĝ' ekkriis: „Jen, rigardu homo, 180  
 Ĉielen!“ super kapoj treniĝis kometo,  
 Sur vojo, kiun marŝis ar' de Mahometo,<sup>2)</sup>  
 Orient-okcidenten. — Pastro Bartoĥova<sup>3)</sup>  
 Komponis panegiron<sup>3)</sup> pri triumf' Krakova,  
 Embleme „Orientis Fulmen“; pri-l' kometo  
 Ĝi traktas. Priparolas ĝin ankaŭ verketo  
 „Janina“ nome, kie estas priskribita  
 Tuta ekspedicio de l' reĝo farita,  
 Kaj gravurita granda flag' de Mahometo  
 Kaj sama, kiel nia hodiaŭ, kometo“. 190

„Amen, diris Juĝisto, pri aŭguro via  
 Mi konsentas: kun astro aperu Jan Tria!  
 En okcidento estas grand-hero' franclanda,  
 Kiun komet' alĝvidu, donu Dio granda!“

Vojski rediris, kapon klininte malĝoje:  
 „Kometo — jen milito, kverel' alifoje.  
 Ĝi aperis ĵus super Soplicovo nia:  
 Eble al ni minacas malfeliĉo ia.  
 Ni hieraŭ sufiĉe havis da kverelo,

<sup>1)</sup> Leŭtenanto de kirasa signo, rango oficira ĉe t. n. kirasaj standardoj en pola armeo.

<sup>2)</sup> Turkaj armeoj marŝantaj kontraŭ Vieno.

<sup>3)</sup> Pastro Bartochowski, jezuito, dediĉis sian laŭdan poemon sub titolo „Fulmen Orientis“ al reĝo Jan III, post lia reveno el la Viena ekspedicio.

Dum ĉaso kaj vespera manĝo en kastelo; 200  
 Matene remalpacis Rejent', Asesoro,  
 Kaj vespere Tadeo kun Grafo sinjoro.  
 Tiun disputon ŝajne kaŭzis urso felo;  
 Se mian buŝon tiam Juĝisto ne ligus,  
 Mi ambaŭ kontraŭulojn ĉe tablo pacigus,  
 Ĉar mi volis rakonti akcidenton tian,  
 Kiu tree similas hieraŭan nian;  
 Ĝi okazis al grandaj paf-majstroj de ĉaso,  
 Al sejm-sendito Rejtan kaj duko de Nasso.  
 Jen kiel:

Generalo de landoj Podolaj <sup>1)</sup> 210

Veturis el Volinjo al bienoj polaj,  
 Aŭ, se mi bon-memoras, al sejm' Varsovia;  
 Vizitante nobelojn, por amuzo sia,  
 Aŭ por populareco, venis al sinjoro  
 Tadeuŝ Rejtan, nun jam en sankta memoro.  
 Rejtan en Novogrodek iĝis sejm-sendito,  
 Kaj mi kreskis en lia dom' ekde infano.  
 Jen do, pro Generalo princo, al Rejtano  
 Multnombra nobelaro venis laŭ invito. 220  
 Estis „teatrum“ (princo — ŝatant' de teatro);  
 Fajraĵojn donis Kaŝic, loĝanta en Jatro;  
 Pan Tizenhaŭs dancistojn sendis, kaj kapelon  
 Ogiński kaj Pan Soltan, loĝanta Zdjencjelon:  
 Oni eksterkutimajn amuzojn preparis  
 En domo, kaj arbare grand-pelĉasojn faris.  
 Pri Ĉartoriski-j scias vi, ĉiu sinjoro  
 Princ', kiom ilin povas ampleksi memoro,  
 Kvankam Jagjello-sanga, sed por ĉasisteco  
 Ne tro fervora: ne pro maldiligenteco,  
 Sed pro gustoj fremdlandaj; same Generalon 230  
 Pli ofte libroj vidis, ol li hundoj-stalon,  
 Pli virinajn alkovojn li, ol lin pelĉaso.

En Princa sekvanto estis duk' de Nasso;

<sup>1)</sup> T. e. princo Adam Kazimir Czartoryski, ĉefestro de podolaj landoj, civitano meritplena por patrujo. Li naskiĝis en Gdansk (1734), mortis en Sieniawa (1823).

Pri li rakontis oni, ke en ter' Libia  
 Gaste, li ĉasis iam kun negra reĝ' ia,  
 Tie tigron renversis per lanco en mano,<sup>1)</sup>  
 Pro kio duko laŭdis sin tre fanfarone.  
 Kaj ni je aproj ĉasis ĉituu-sezone:  
 Grand-aprinon pafile mortigis Rejtano,  
 Kun grand-danĝero, ĉar li proksime cel-tiris; 240  
 Do paf-trafecon ĉiuj ni laŭdis kaj miris,  
 Nur germano de Nasso aŭskultis okazon  
 Tute indifereinte kaj flustris sub nazon,  
 Ke paf' kuraĝ-okulon pruvas, pik-armilo  
 Kuraĝan brakon; sekvis vasta rebabilo  
 Pri lia lanco puŝo en tero Libia  
 Pri lia negra reĝo kaj pri tigro lia.  
 Pro ĉi-tio Pan Rejtan ĉagreniĝis vere;  
 Li ekbatis je sabro kaj diris kolere:  
 Duk'! kuraĝ-batalanto prenas bone celon, 250  
 Aproj valoras tigrojn, lanco karabelon —  
 Komenciĝis diskurso impeta sufiĉe;  
 Sed General', rompante diskutojn feliĉe,  
 Pacigis france. Mi ne scias babilajon:  
 Sed pacigo nur metis cindron sur ardajon;  
 Ĉar Rejtan plu koleris kaj atendis sole  
 Okazon, por repagi al duko petole;  
 Li pagis petolajon preskaŭ sano-koste,  
 Sekvatage, kaj kiel, mi diros tuj poste“.

Ĉe tio, silentante, Vojski levis manon 260  
 Kaj pri la tabakujo petis Ĉambelanon.  
 Li longe flaras, fini ne bonvolas temon,  
 Kvazaŭ li de aŭdantoj akriĝus sciemon,  
 Fine komencis: tiam ree iĝis ĉeso  
 En rakont' aŭskultata kun grand-intereso!  
 Ĉar al Juĝist' subite homon iu sendis,  
 Kiu kun senprokrasta afero atendis.  
 Juĝisto al tut-rondo bonan nokton diris;  
 Do oni diversflanken tuj dormi disiris:

<sup>1)</sup> La duelo de l' duko de Nassaŭ (komparu rimarkon sur p. 129) kun tigro en Libio resonadis tiam en ĉiuj gazetoj eŭropaj.



Sur fojno en garbejo aŭ en biendomo; 270  
Juĝist' aŭskulton donis al vojaĝa homo.

Aliaj dormas. — Sole Tade', laŭ gardisto,  
Paŝas vestible ĉirkaŭ pordo de Juĝisto,  
Pri grav-ajoj konsilon de onklo serĉante,  
Hodiaŭ antaŭ dormo, sed frapi ne volas:  
Juĝisto ŝlosis pordon, sekrete parolas;  
Tade' atendas finon, orelon streĉante.

Li aŭdas ploron, anson ektuŝi sin gardas  
Kaj, tra ŝlosila truo, tra serur', rigardas:  
Vidas strangajon! Vermo, Juĝist', genuante 280  
Sin alpremas, per larmoj kortuŝe plorante:  
Al Juĝist' manojn kisis Verm'; Juĝisto forte  
Ĉirkaŭprenis, plorante, Vermon ĉirkaŭ kolo;  
Fine, post kvaronhora ĉeso de parolo,  
Mallaŭte ekparolis Vermo tiavorte:

„Frato! Dio ĝin scias, ke mi ne ekĉesis  
Kaŝi, kion pek-pente mi jure-promesis,  
Ke al Dio, Patrujo, tute dediĉite,  
Ne servante fieron, hom-laŭdon evite, 290  
Mi vivis; morti volis Bernardino ia,  
Silentante, pri nomo mia familia,  
Al ĉiuj, eĉ al frato kaj al filo mia!  
Tamen Provincialo <sup>1)</sup> donis la permeson  
In articulo mortis <sup>2)</sup> fari ĉi konfeson.  
Ĉu mi revenos viva? Kia iĝos fino?  
Frato, granda ĥaoso regas en Dobjino!  
Franc' — malproksime, antaŭ vintro-pas', ne venos;  
Ĉu io nobelaron ĝis tiam retenos?  
Eble mi, pri leviĝo, troagemon uzis!  
Oni min ne komprenis! Ŝlosisto konfuzis! 300  
Freneza Graf', mi aŭdas, al Dobjin ekpelis!  
Mi lin ne antaŭvenis, gravaj' min ŝancelis:  
Jen Macjek min rekonis; nur unu parolon

<sup>1)</sup> Ĉefo de samregulaj monaĥejoj en monaĥeja provinco.

<sup>2)</sup> En danĝero de morto (latine).

Li flustru, kaj mi donos al fendilo kolon:  
 Ŝlosisto ne hezitos! Mi ne zorgas sanon,  
 Sed komploto-malkaŝo ŝirus tutan planon.  
 Tamen mi tien kuras, ekscii pri ĉio!  
 Eĉ perej, ĉar kaptus nobelojn furio!  
 Adiaŭ, kara frato, adiaŭ, mi iros.  
 Post mia mort' vi sola al Dio sopiros; 310  
 Okaze de milito, vi finu laŭ plano  
 Komencita; memoru, ke vi — Soplicano!\*

Pastro larmojn devisis, kapuĉon surŝovis,  
 La postan fenestron mallaŭte formovis,  
 Kaj tra fenestro saltis ĝardenon; restinte  
 Sola, Juĝisto ploris, seĝon sidiĝinte.

Tade' atendis, antaŭ ol anson ektiris,  
 Post malsloso, mallaŭte, kapkline eniris,  
 Dirante: „Kara Onklo, kelk tagojn mi sidis 320  
 Ĉi-tie: tagoj, kiel moment', forrapidis;  
 Mankis tempo sat-ĝoji, vin kaj domon vidi,  
 Ĉar tuj mi forveturas; mi devas rapidi,  
 Tuj hodiaŭ, Onklete, morgaŭ plej malfrue.  
 Vi memoras, ni Grafon provokis unue;  
 Batiĝos — mi; provoko de mi jam senditas.  
 Ĉar en Litvo dueloj nun malpermesitas,  
 Mi veturos al limo de Dukland' Varŝava.  
 Grafo — fanfaronulo, sed kuraĝohava,  
 Sur lokon difinitan li certe alvenos,  
 Do ni interbatalos, kaj, se Dio benos, 330  
 Mi lin punos, kaj poste trans Łososna-bordoj  
 Mi naĝos, kie frataj atendas vicordoj.  
 Armean servon patra testament' ordonis,  
 Kaj mi ne scias, kiu alie disponis.

„Tadeo, diris onklo, ĉu vi fervorulo  
 Estas tia, aŭ turnas vin, laŭ vulp' ruzulo,  
 Kiu ne tien iras, kiel voston tenas?  
 Jes, ni provokis, certe dueli konvenas:  
 Sed veturi hodiaŭ, kial obstiniĝi?  
 Antaŭ duel' kutimas ni amikojn sendi, 340  
 Intertrakti. La Grafo povas senkulpiĝi,

„Depreki“: estas tempo, do volu atendi.  
Aŭ alia tabano vin pikis sub nazo?  
Tiam diru sincere ĝin, sen ĉirkaŭfrazo!  
Jun-koron mi maljuna kompreni ne ĉesis,  
Patris al vi (li nevon sub menton' karesis),  
Mia fingreto flustris al mi en orelon,  
Ke kun fraŭlinoj havis vi etan kverelon.  
Junuloj kun fraŭlinoj nun frue komencas!  
Nu, Tadeet', konfesu, kion vi intencas.“

350

„Vere, diris Tadeo, estas kaŭz' alia,  
Amata Onklo, eble eĉ pro kulpo mia!  
Eraro! malfeliĉo! ŝanĝi malfacile!  
Ne, mi ne povas resti ĉi-tie trankvile!  
Eraro de juneco! Ne demandu plie:  
Mi devas plej rapide iri el ĉitie.“

„Ho! diris onklo, certe amaj malkonsentoj!  
Jen lipojn vi hieraŭ mordetis per dentoj,  
Rigardante oblikve iun knabineton;  
Ankaŭ ŝi tre acidan havis mieneton. 360  
Mi konas ĉi stultajojn: amu idoj-paro,  
Tuj sekvas malfeliĉoj ekster ordinaro!  
Ili ĝojas, sin ree ĉagrenas malĝoje,  
Aŭ senkaŭze kverelas ĝis dentoj kelkfoje,  
Staras en anguletoj, grumblule murmuris,  
Ne parolas, eĉ iam en kampon forkuras,  
Se vin ĉi frenezeto atakas simile,  
Estu nur paciencaj, mi helpos konsile;  
Mi baldaŭ vin kondukos al paco komuna;  
Mi konas ĉi stultajojn: ja estis mi juna. 370  
Rakontu, moŝto, eble mi malkaŝos ion,  
Kaj tiel reciproke ni klarigos ĉion.“

„Onklo — diris Tadeo, kisis manon lian,  
Ruĝiĝante — jen vero: fraŭlineton, vian  
Edukatinon, Zonjon, mi tre ŝatas nune,  
Kvankam ni nur kelk-foje ambaŭ estis kune:  
Laŭ dir', destinis Onklo jam por mi edzinon,  
Belan, riĉul'-filinon, Ĉambelan-idinon.  
Mi ne povus fraŭlinon Rozon edzinigi,

Amas Zonjon: neeble koron aliigi! 380  
Preni unu-n, kaj ami duan — malhonesto,  
Eble temp' min kuracos dum longa foresto.

„Tade', enmiksitis onklo, stranga-maniere  
Vi amas — forkurante de amataj! Vere  
Bone, ke vi sinceras; vi farus sensencon  
Forirante, ĉar svati mi havas intencon  
Al vi Zonjon. Nu? kion? vi ne saltas ĝoje?“

„Tadeo diris: „Onkla boneco multfoje  
Min mirigas. Sed kion? Favora ofero  
Ne taŭgas jam por io! Ho! vana espero! 390  
Telimeno ne donos al mi Zofieton!“  
„Petu!“ diris Juĝisto.

„Vane fari peton,  
Interrompis Tadeo: ne, mi senprokraste  
Devas nun forvojaĝi, morgaŭ frue laste;  
Donu al mi, Onkleto, sole benon vian:  
Mi pretas tuj veturi landon Varsovian.“

Juĝist' lipharojn tordis, rigardis kolere:  
„Do tiel moŝto koron malfermis sincere?  
Unue la duelo, poste amo, via 400  
Forveturo; ho! estas komplikajo ia.  
Mi jam aŭdis, mi viajn paŝojn jam postiris!  
Deloganto, flirtulo, vi mensogojn diris!  
Kaj kion do hieraŭ vespere vi faris?  
Kaj kion vi ĉe domo ĉashunde postflaris?  
Ho, bubeto! se eble vi Zonjon inside  
Delogis kaj nun volas forkuri rapide,  
Tiam vi ne prosperos! Vi ŝatas, ne ŝatas,  
Sed Zonjon edzinigos, tion mi konstatas:  
Se ne, vapon — vi morgaŭ edziĝos, sinjoro!  
Li babilas pri sentoj, pri konstanta koro! 410  
Fi! mensogul'! pri moŝto mi faros esploron  
Kaj lin ankoraŭ bone je oreloj tiros!  
Hodiaŭ mi de zorgoj havas kapdoloron;  
Li malhelpas trankvile ripozi! vi iros

Tuj dormi!“ — Larĝe pordon malfermis Juĝisto  
Kaj por senvestiĝado vokis je l' Vokisto.

Tade' mallevis kapon, eliris silente,  
Malagrablan diskurson pripensis afente:  
Unue insultita tiel!... Li, sentante  
Pravecon de riproĉoj, ruĝiĝis hontante. 420  
Kion fari? se ĉion ekscios nun Zonjo?  
Peti manon? sed kion diros ŝia onjo?  
En Soplicovo resti plue — li ne povas.

Medito li kelk paŝojn antaŭen sin movas,  
Kiam voje lin baras nokt-fantomo ia  
En blankaĵo; maldika, longa kaj ĝracia  
Ĝi ŝoviĝas, kaj mano al li etenditas,  
De kiu sin reflektas luna brilo treme.  
„Sendankulo! mallaŭta voĉo plendas ĝeme,  
Vi serĉis la rigardon, kiun vi evitas; 430  
Por serĉitaj paroloj nun ore! fermitas,  
Kvazaŭ vortoj, rigardo, venenus per spiro!  
Bone al mi, mi sciis, ke vi estas: viro!  
Fremda al koketeco, mi vin ne turmentis,  
Feliĉiĝis; do tian dankemon vi sentis!  
Triumf' je mola koro vian koron hardis:  
Tre facilan akiron vi malŝat'-rigardis!  
Bone! Sed instruite per terura provo,  
Pli ol vi, mi malŝatas min el tuta povo!“

„Telimeno, li diris, ne hardiĝis mia 440  
Koro, nek vin evitas pro malŝato ia;  
Sed pripensu, nin oni vidas, spioniras:  
Pri tia malkaŝeco kion homoj diras?  
Tio estas maldeco, eĉ peko en fino...“  
„Ha, peko! — ŝi respondis kun maldolĉa rido —  
Senkulpa ŝafideto! Se mi, la virino,  
Pro amado ne zorgas pri ies insido,  
Eĉ ies kalumnio: kaj viro, sinjoro?  
Kio al li domaĝas, se li eĉ konfesas,  
Ke li dek amatinojn laŭvice karesas? 450  
Vi volas min forlasi?“ — ŝi diris kun ploro...

„Telimen', kion mondo parolus pri homo,  
 Kiu, en mia aĝo, nun sidus en domo  
 Sane, kaj amus, kiam tiom da junuloj,  
 Edzoj, for de edzinoj, infanoj, karuloj,  
 Ekster limon sub signojn naciajn rapidas?  
 Se mi eĉ volus resti, ĉu mem mi decidas?  
 Ke mi servu en pola armeo, ordonis  
 La patro testamente, onklo redisponis:  
 Mi veturas, farinte jam decidon mian, 460  
 Kaj, di-vero, ne povas mi fari alian.“  
 „Mi, diris Telimeno, ne volas ja bari  
 Vian glori-vojon, nek al feliĉ' kontraŭstari!  
 Vi estas vir! vi trovos pli indan de l' koro  
 Amatinon, pli riĉan, pli belan, sinjoro!  
 Antaŭ disiĝo sciu mi nur, por konsolo,  
 Ke amo estis via inklin', ne petolo,  
 Vera amo, ne ŝerco volupta, pasia;  
 Mi konsciu, ke amas min Tadeo mia!  
 Vorton „mi amas“ aŭdu mi el via buŝo, 470  
 En penson skribu, skulptu ĝin mia kortuŝo;  
 Pli facile pardonos mi: eĉ ami plue  
 Vi ĉesu, mi memoros!“ — Ŝi ploris korskue.

Tade' vidante, kiel ŝi petegas plore  
 Kaj nur bagateleto postulas memore,  
 Kortuŝiĝis; traigis lin kompata pento,  
 Kaj, se li sondus koron pri kaŝita sento,  
 Nun eble ne ekscius li mem efektive,  
 Ĉu li ŝin amis, aŭ ne. Do li diris vive:  
 „Telimeno, min trafu hela fulmobato, 480  
 Se malvere, ke estis mi plena de ŝato,  
 Aŭ am' al vi. Mallongaj nur pasis momentoj,  
 Sed pasis tiel dolĉe; pri agrablaj sentoj  
 Mi tre longe, neniam memori ekĉesos,  
 Kaj vin mi, diovere, neniam forgesos“.

Telimeno lin salte ĉirkaŭ kolo prenis:  
 „Mi esperis! Vi amas, do vivo revenis!  
 Propramane mi volis hodiaŭ frakasi  
 Mian vivon; vi amas min, do ĉu forlasi  
 Vi min povas? Mi donis koron al karulo, 490

Donos havon, vin sekvos: ĉiu mond-angulo  
Estos kun vi agrabla; kredu, amoplenu  
Sovaĝ-dezerton faros volupto-ĝardeno“.

Tade' el ĉirkaŭpreno perforte sin ŝiris.  
„Ĉu vi frenezas? kien? kial? li rediris;  
Vi sekvos min? Vin trenu mi, simpla soldato,  
Kiel provizistinon?“ — „Edziĝu, amato!“  
Respondis Telimeno. — „Neniam! sensenco!  
Vokis Tade'. Edziĝi, ami — nun intenco  
Ne mia. Ŝercoj! lasu ni tiun aferon!  
Kvietiĝu, mi petas, faru konsideron!  
Mi estas al vi danka, sed edziĝi — nune  
Ne eble. Ni nin amu, sed tiel — malkune.  
Plu mi resti ne povas; morgaŭ en mateno  
Mi veturos; adiaŭ, mia Telimeno!“

500

Surŝovinte ĉapelon, turniĝis junulo,  
Por iri; lin haltigis Telimen'-okulo  
Kaj vizaĝo Meduzo-kapa.<sup>1)</sup> Kun teruro  
Li restis, rigardante al ŝia figuro:  
Pala, sen movo, staris ŝi, sen viv', ne spiris,  
Ĝis, etendinte manon, laŭ glavo por puŝo,  
Fingre okulojn celis ŝi de Tadeuŝo:  
„Ha! drak-lango! lacerta kor'! ŝi krie diris,  
Ĝuste tion mi volis! tion mi deziris!  
Ke mi pro vi okupis mian koro-senton,  
Malŝatis Asesoron, Grafon kaj Rejenton,  
Ke vi orfinon lasis, sciinte delogi, —  
Jen nenio! vi — viro, vi konas kruelon;  
Mi scias, laŭ aliaj, vi rompas fidelon;  
Sed, krome, vi kapablas malnoble mensogi!  
Mi aŭskultis, ĉe pordo onkla... Do, la ido,  
Zonjo? al vi ekplaĉis? kaj via perfido  
Insidas ŝin?... Jus unu trompinte animon,  
Apud mi jam alian vi serĉis viktimon!  
Forkuru, sed atingos vin malbeno mia;  
Aŭ restu, mi malkaŝos al mondo pri via

510

520

1) Meduzo, ĉe antikvaj grekoj fabela, monstra virino,  
kun serpentaj haroj kaj rigardo ĉion ŝtoniganta.

Senhonor', vi ne trompos plue, perfidulo!  
For! vi estas mensoga homo, malnoblulo!“

Je l' ofendo, mortiga por ĉiu nobelo,  
Kiun neniam aŭdis Soplica orelo,  
Li ektemis, kun morta paleco vizaĝa,  
Piedfrapis kaj diris buŝ-preme: „Malsaĝa!“ 530

Li foriris; sed kore resonis esprimo:  
„Malnobla“; li skuiĝis, sentis en animo,  
Ke li meritis, faris ja al Telimeno  
Grandan maljuston; pravis ŝi, laŭ konscienco;  
Sed, post ĉi plendoj, kreskis al ŝi abomeno.  
Pri Zonjo, ve! ekpensi eĉ estus sensenco.  
Kaj Zonjo estis tiel bela kaj agrabla!  
Onklo svatis! ŝi estus edzino afabla:  
Sed satan' lin implikis en pekojn, kaj vice 540  
En mensogojn kaj cedis, ridante malice!  
Insultite, li perdis de ĉiuj estimon,  
Detruis estontecon! juste punis krimon!

En tempesto de sentoj, britis al Tadeo,  
Kiel ripozo-ankro, pri duel' ideo:  
„Morton al Graf', fripono! — kolere li kriis,  
Venĝi, aŭ mem pereil!...“ Kial? li ne sciis;  
Kaj la kolero, tiel granda, post momento  
Forflugis. Ree kaptis lin profunda pento;  
Li pripensis: „Se estis, laŭ observo mia, 550  
Inter Grafo kaj Zonjo konsentiĝo ia,  
Do sekve? eble Zonjon amas Graf' sincere,  
Eble, ke ŝi lin amas? kaj edzigos vere?  
Kiarajte mi volus rompi tiun ligon,  
Mem malfeliĉa, kaŭzi plu malfeliĉigon?“

Malesper'! li nenian vidis manieron,  
Nur forkuron; sed kien? en tombon, sub teron!

Do al klinita frunto li pugnon alpremis,  
Kuris herbejon, kie laĝetoj bril-tremis,  
Kaj li haltis ĉe l' kota; akvan verd-koloron 560



Avide rigardante, kotecan odoron  
Tra malfermita buŝo li enspiris ĝue;  
Ĉar memmortiĝo, kiel voluptem', unue  
Pripensas: en furia kaptur', laŭ dorloto,  
Nedireble lin tentis — droniĝi en koto.

Sed Telimen' divenis el lia staturon  
Malesperon; vidante al laĝetoj kuron,  
Kvankam al li tutprave ŝi ardis kolere,  
Ŝi ektimis, havante bonan koron vere.  
Ŝi bedaŭris, ke amis alian Tadeo; 570  
Punonte, ŝi ne pensis pri lia pereo.  
Do ŝi lin kure sekvis, levis manojn krie:  
„Haltu! stultajo! amu aŭ ne! eĉ alie  
Edziĝu, aŭ veturu for! sed haltu nure!“ —  
Sed li jam antaŭiris ŝin, rapida-kure,  
Malproksime, jam — haltis ĉe laĝeto-bordo.

Strang-dispone de sortoj, sur la sama bordo,  
Rajdis Grafo, lin sekvis jokeoj-vicordo;  
Kaj, ravite per ĉarmo de nokto serena,  
De orkestro subakva, harmonio-plena,  
De ĥoroj, kiuj sonis laŭ harpoj eolaj, 580  
(Neniaj ranoj ludas bele kiel polaj),  
Li haltigis ĉevalon, forgesis voj-celon,  
Kaj aŭskultis, turninte al laĝet' orelon,  
Okule vagis kampojn, sur ĉiel'-vastajo:  
Ŝajne, pense-komponis li noktajn pejzaĝojn.  
Efektive, pentrinda estis ĉirkaŭajo!  
Ambaŭ laĝetoj turnis al si la vizaĝojn,  
Laŭ geamantoj; dekstra akvo estis glata  
Kaj pura, kiel vangoj de virgin' amata;  
Maldekstra, malpli hela, laŭ vizaĝ' de juna 590  
Viro, jam barb-lanuga kaj iom sunbruna;  
Dekstra, per ora sablo, ŝajn-brilis ĉirkaŭe  
Blond-hare; de maldekstra frunt-haroj, kvazaŭe  
Per salika vergaro tufaj, hirtigitaj;  
Ambaŭ laĝetoj estis verdaje-vestitaj.

El ili riveretoj du, laŭ manoj kore  
Sin premas. Rivereto en kavon pli fore

Falas, ne malaperas: ĉar en kav-mallumon  
Ĝi forportas, sur ondoj, de luno orumon;  
Akvo tavolo falas; ĉiu tavolo  
Flagretas per plenmanoj da luna brileto;  
Lumo en mil splitetojn fendiĝas; kaptante  
Ilin, en profundajon portas ond' kurante;  
Kaj desupre plenmane falas lun' brilante;  
Kvazaŭ apud lageto sidas Svitezjanka, <sup>1)</sup>  
Senfine verŝas fonton el kruĉeto blanka,  
Per dua man' amuze disjetas, prenitane  
El la antaŭtuketo, oron ensorĉitan.

600

El fosajo kurinte for, sur ebenajo  
Torento kvietiĝas, laŭ-vide fluetas;  
Ĉar sur ĝia moviĝa, tremanta tegajo,  
Tremanta luna lumo laŭlonge flagretas.  
Kiel bela, „ĝivojtos“ nomata serpento  
Samogita, ŝajn-dorme kuŝas en eriko,  
Sed rampas, vic-brilante per oro, arĝento,  
Kaj subit-malaperas en musk' aŭ filiko:  
Tiel ankaŭ turniĝis torent', kaŝiĝonta  
En alnoj, kiuj nigris ĉe fin' horizonta,  
Kaj levis siajn formojn malpezajn malklare,  
Kiel duonvideblaj spiritoj nubare.

610

620

Inter lagoj, en foso, muelilo sidas;  
Kiel zorgant' maljuna amantojn insidas,  
Subaŭskultis parolojn, koleras malpace,  
Skuas kapon kaj brakojn, balbutas minace:  
Tiel sian musk-frunton muelilo skuis,  
Fingran pugnon rond-turnis, sed apenaŭ bruis  
Kaj klake dent-makzelojn movis, tuj ĝi same  
Superbruis lagetojn, parolantajn ame,  
Kaj vekis Grafon.

Grafo vidis, ke proksime  
Tade' aliris lian postenon sentime,

630

<sup>1)</sup> Ŝvitezianka; laŭ vulgara famo, sur bordoj de l' lago Switeż (vidu rimarkon <sup>1)</sup> sur p. 84) montriĝas nimfoj, kiujn la popolo nomas Svitezjankoj t. e. Svitezjaninoj.

Do li kriis: „Armilojn! kaptu!“ Tuj jokeoj,  
 Antaŭ ol, kio iĝas, komprenis Tadeo,  
 Kaptis lin, kuras domon.—Krias nokt-gardistoj,  
 Hundoj bojas, vekigas domo. Elrapidas  
 Juĝist' duonvestite; ĉar li bandon vidas,  
 Ĝis li Grafon rekonas, pensas pri rabistoj.  
 „Jen kio?“ li demandas. Spadon Graf' eltiris,  
 Sed vidis nearmiton, do grave li diris:  
 „Hereda malamiko! mi punos, Soplico,  
 Vi por malnovaj kulpoj kaj da freŝaj vico; 640  
 Vi respondos pri mia havaĵo rabita,  
 Kaj mi venĝos por mia honor' ofendita!“

Sed Juĝist', kruc-signante sin kriis: „Je Kristo,  
 Fi! Grafo, ĉu vi estas rabist', mortigisto?  
 Pro Dio! ĉu konvenas via entrepreno  
 Al via mond-signifo, eduko, deveno?  
 Maljuston ne toleros mi!“ — Servistoj liaj  
 Kure portis bastonojn, pafilojn aliaj;  
 Vojski de-fore Grafon rigardis scieme  
 Kaj en maniko tenis tranĉilon alpreme. 650

Komencotan batalon Juĝisto retenis;  
 Vana defendo: nova malamik' alvenis:  
 En alnaro ekbrilis, paf' aeron skuis!  
 De rajdistaj huf-frapoj river-ponto bruis,  
 Kaj „Hejse je Soplico!“ milvoĉe eksonis.  
 Juĝist' ektremis: signon de Gervaz' li konis.  
 „Bagatel', vokis Grafo, ni estos mult-pliaj;  
 Do subiĝu, Juĝisto, jen liganoj miaj!“

Alkuris Asesoro kun kri': „Arestadon,  
 En nom' de Cara Moŝto, mi faras; do spadon 660  
 Donu Grafo, aŭ venos helpe soldataro!  
 Vi scias: por armita nokt-atako-faro,  
 Estas per mil-ducenta ukaz' avertate,  
 Ke..“ Jus Grafo vizaĝon lian sabris plate.  
 Li falis kaj sin kaŝis en urtik'-profundon:  
 Ĉiuj pensis, ke mortis li aŭ havis vundon.

„Oni, diris Juĝisto, ekrabos ĉi-tie“.

Ĉiuj ekĝemis; Zonjo superbruis krie,  
Kriis, ĉirkaŭpreninte onklon per manetoj,  
Laŭ ido, kiun pikas judoj per pingletoj.

670

Dume inter ĉevalojn Telimeno kure  
Falis, al Grafo manojn etendis, terure  
Kriante: „Je honoro via! — kun klinita  
Kapo al-poste kaj kun harar' dislasita —  
„Je ĉio sankta, Grafo, ni petas genue!  
Vi kuraĝus rifuzi al „damoj\*? 1) Unue,  
Kruelulo, mortigu nin per via glavo!“ —  
Ŝi svene-falis. — Grafo alsaltis por savo,  
Mirante, konfuzite, pro ĉi-tiu sceno:  
„Fraŭlin' Zofi', li diris, estrin' Telimeno!  
Neniam sendefenda sang' makulos spadon,  
Soplicoj iros mian malliber'-tenadon.  
Tiel en Italujo mi faris en loko,  
Sicilianoj nomas ĝin Birbante-roko;  
Mi, konkirinte tendojn, armitojn mortigis,  
Malarmitajn rabistojn mi nur katenigis;  
Ili sekvis ĉevalojn, bril-triumf'-okaze,  
Poste oni pendigis ilin Etna-baze.

680

Por Soplicoj feliĉe, ekster ordinaro,  
Pli taŭgis Graf-ĉevaloj, ol de nobelaro.  
Por unue alveni, Grafo malantaŭe  
Rajdantoj-reston lasis, mejlon almenaŭe.  
Obea, disciplina lia ar' jokea  
Estis kvazaŭ taĉmento regule-armea:  
Dum nobelar' cetera, laŭ ribelo mema,  
Estis tre malkvieta kaj tre pendigema.

690

Dume Graf' malvarmigis el fervor', kolero,  
Pensis fini batalon sen sango-ofero:  
Do li Soplico-anojn en domo fermigis  
Milit'-kapte, kaj gardon ĉe pordoj starigis.

700

Jen „Hejse je Soplicoj!“... Nobelaro venas

1) Sinjorinoj, fraŭlinoj (france kaj internacie), laŭ originalo.

Ĉirkaŭas bien-domon kaj sturme ĝin prenas,  
 Facile: ĉef' — prenita, forkuris eskorto;  
 Sed konkirintoj volas bati, pri objekto  
 Serĉas, kaj ne lasite en domon, al korto  
 Kuras, en kuirejon: de potoj aspekto,  
 Fajro jus estingita, freŝa manĝ-odoro,  
 Hundoj krake mordantaj restaĵojn de manĝo,  
 Kaptas ĉiujn je koroj, sekvas pensoj-ŝanĝo,  
 Koler' foriĝas, vekas sin al manĝ' fervoro. 710  
 Post marŝo kaj tuttaga seĝmeto krom tio,  
 „Manĝi! manĝi!“ trifoje ekbruis laŭtkrio;  
 Respondis: „Trinki, trinki!“ — Nobel-bando lokas  
 Sin du-ĥore, jen „trinki“, kaj jen „manĝi“ vokas.  
 Resono eĥe kuras, trovante rebaton,  
 Naskas en buŝ' agaĉon, en stomak' malsaton.  
 Tiel neatendite, laŭ signala vorto,  
 Armeo, pro furaĝo, disiris en korto.

Gervazo, forpuŝite de ĉambro Juĝista,  
 Cedis respekte antaŭ Grafa ar' gardista, 720  
 Kaj ne venĝinte kontraŭ malamiko sia,  
 Pensis pri dua granda cel' ekspedicia:  
 Kiel spertulo, lerta pri jura procedo,  
 Volas sidigi Grafon, en nova posedo,  
 Leĝe kaj forme; do li Vokiston insidas,  
 Ĝis, post longaj esploroj, post forno lin vidas,  
 Je kolumo lin kaptas, en korton eltiras,  
 Kaj, celinte al brusto per fendilo, diras:  
 „Sinjor' Vokisto, Grafo vin petas humile,“  
 Ke vi, al nobelaro, anoncu akt-stile 730  
 Pri Grafa „intromito“<sup>1)</sup> kastelon, vilaĝon,  
 Soplac-domon, semitajn grundojn, sterilajon,  
 Kune „cum gajis, boris et graniciebus,  
 Kmetonibus, scultefis et omnibus rebus,  
 Et quibusdam aliis“<sup>2)</sup>. Vi laŭscie boju,

1) Leĝa enkonduko.

2) Tiuj vortoj estas diritaj de Ŝlosisto per ŝerce imi-  
 tita malbona latinajo, laŭ uzata tiam en juĝejoj, kiu enhavis  
 ofte polajn esprimojn kun latinaj deklinaciaj finiĝoj. La fra-  
 zo signifas: „kun boskoj, arbaroj kaj limoj, kampuloj, vilaĝe-  
 stroj kaj ĉiuj aĵoj, kaj kelkaj aliaj.“

Nenion forlasante!“ — „Ŝlosist', vi ekboju!  
Diris Protazo, manojn metinte post zonan —  
Mi pretas sekvi ĉian partioj-ordonon:  
Averte, ke ne havos forton, devigita  
Perforte, tia akto nokte anoncita.“

740

„Kiu? diris Ŝlosisto, perfortajon celas?  
Mi petas ja ĝentile; se al vi malhelas,  
Per fendilo, al moŝto, mi fajron eligos,  
Kiel en sep preĝejoj okulojn lumigos.  
„Kial, diris Vokisto, Gervazet', koleri?  
Ne vokista afero — juĝe konsideri;  
Sciate, ke vokiston invitas partio,  
Diktas laŭ vol', vokisto anoncas laŭ tio.  
Vokiston, leĝ-sendonon, neniu arestas;  
Do mi ne scias, kial mi sub gardo estas.  
Do mi ne scias, kial mi sub gardo estas.  
„Mi skribos akton, donu al mi lanterneton;  
Nun mi anoncas: Fratoj, silenton, kvieton!“

750

Por laŭtiĝi, ekstaris li sur grand-trabaro,  
(Traboj sekiĝis apud ĝarden'-palisaro);  
Li suriris, tuj kvazaŭ de vent-blova skuo  
Malaperis. Aŭdiĝis en brasik' fal-bruo;  
Tra kanabej' malhela flugis blanka lia  
Konfederatko, kvazaŭ hel-kolombo ia.  
Verŝilo pafis ĉapon, ne trafis laŭ volo;  
Krakas stangoj, Protazo vokas el lupolo:  
„Mi protestas!“ Jam certas forkuro prospera;  
Restis post li salikoj kaj marĉo rivera.

760

Kvazaŭ, sur konkirita rempar', de kanono  
Lasta pafado, aŭdiĝis ĉi protesta sono;  
En dom' Soplica ĉesis jam ĉia rezisto,  
Malsata nobelaro rabas: Aspergisto,  
En bovejo, sur sia prenita posteno,  
Bovon kaj du bovidojn asperge-mortigis,  
Razil' al ili sabron en gorĝojn dronigis;  
Same ageme uzis spadeton Aleno,  
Jun-porkojn sub ŝkapolojn pikante en staloj.  
Buĉo minacas birdojn: Anseroj, per krio  
Savintaj Romon antaŭ perfido de Galloj,

770

Vane alvokas helpon; anstataŭ Manlio,<sup>1)</sup>  
Kuras Verŝil' kameron, gras-birdojn sufokas  
Aŭ vive, ĉe kontuŝa zon', ligante lokas.  
Vane birdinoj turnas kolojn, raŭkiĝante;  
Vane siblas anseroj, rabiston pinĉante;  
Li kuras: surŝutite per lanugo brila,  
Levate per laŭ-rada movo dens-flugila, 780  
Al malica ĥohlĥiko<sup>2)</sup> li estas simila.

Sed, kvankam malplej krie, buĉo plej teruris  
Inter kokoj. Kokejon juna Sak enkuris;  
El ŝtupetoj per laĉo kaptante koketojn,  
Detirante hirt-plumajn, tufajn kokinetojn,  
Ĉiujn vice sufokas: amason metita  
Kuŝas bela birdaro, per grioj nutrita.  
Sak senpripensa! kia vin kaptis furio!  
Tion al vi neniam pardonos Zofio.

Gervaz' antikva-more farante disponojn, 790  
Al si ordonas doni de kontuŝoj zonojn,  
Kaj per ili eligas, el Soplĥa kelo,  
Barelojn da griz-brando, biero, mielo,  
Kelkajn tuj senŝtopigas; aliajn nobela  
Densa aro forrulas al sojlo kastela,  
Tie ĉiuj kolektas sin por nokt-kuŝejo,  
Tie estas fondita Grafa ĉef-loĝejo.

Cent fajroj brulas, rostas, bakas kaj kuiras;  
Viandoj fleksas tablojn, drinkaĵoj fluiras.  
Nokto estis pasonta trinke, manĝe, kante; 800  
Sed vice ekdormetas oni, oscedante;  
La okulojn estinge nebulo vualas,  
Kapojn balancas ĉiuj, kie sidis, falas:  
Kun plaĉo, glaso, kruĉo, aŭ rostaja pato.  
Tiel venkintojn venkis dormo, morto-frato.

---

<sup>1)</sup> Manlius, brava militisto, post invado kaj dezertigo de Romo per Galloj, en j. 389 antaŭ Kr., savis antaŭ ili Kapitolon (roman kastelon kun templo de Zeŭso), vekite per krio de sanktaj anseroj.

<sup>2)</sup> Speco de koboldo aŭ malbona spirito.

## LIBRO IX.

### BATALO.

Pri danĝeroj, rezultantaj el senorda tendarejo. — Helpe nea-tendita. — Malgaja situacio de l' nobelaro. — Kvestula vizi-to estas antaŭdiro de savo. — Majoro Plut per troa kokete-co turnas sur sin la tempeston. — Pafo el tercerolo signa-las batalon. — Faroj de l' Aspergisto; faroj kaj danĝeroj de Macjek. — Verŝilo per insido savas Sopicovon. — Sukurso rajdistara; atako kontraŭ pied-irularo. — Faroj de Tadeo. — Duelo de ĉefoj, interrompita per perfido. — Vojski per de-cida manovro superpezigas la pesteleron de l' batalo.—San-gaj faroj de Gervazo. — Ĉambelano, grandanima venkinto.

Ili ronkis, dormege tiel, ke, sen veko,  
Kun lanternoj eniris da homoj kelkdeko,  
Atakis nobelaron sen ies rezisto,  
Kiel dormantajn muŝojn arane' „falĉisto”:  
Apenaŭ iu zumas, jam ĝin longa-krure  
Ĉirkaŭprenas rabisto, sufokas terure.  
Sed pli firme, ol muŝoj, dormas ar' nobela:  
Ne zumas, kvazaŭ kuŝas sen vivo iela,  
Kvankam per fortaj brakoj estas ekkaptata  
Kaj, kiel sur ligiloj pajlo, renversata.

10

Nur Verŝilo, al kiu en distrikt' ne trovas  
Vi same fortan kapon ĉe festen': li povas



Trinki du bareletojn da juli-mielo  
Antaŭ lango-konfuzo kaj kapo-sancelo:  
Li, kvankam long-festenis kaj ekdormis ŝtone,  
Donis signon de vivo: okulon duone  
Malfermis, vidas... veraj inkub'-inferanoj!  
Du teruraj vizaĝoj, kun lipharoj-paroj,  
Spiregas, buŝon lian tuŝas per lipharoj,  
Kiel flugile volvas ronde per kvar manoj. 20  
Time, li krucosigni sin volas: sed vane,  
Kvazaŭ flanke-najlita estas dekstra-mane,  
Movas maldekstran, sentas: ve! de man' spirita,  
Kiel ido en vindaĵojn, li estas vindita;  
Li timas pli terure, kun fermit-okulo,  
Kuŝas sen spir', malvarma iĝas, laŭ mortulo!

Sed Aspergist' sin volas defendi: malfrue!  
En propra zon' li estis ligita unue;  
Tamen li kunvolviĝis, elaste eksaltis,  
Falis, sur brustoj, kapoj de dormantoj haltis, 30  
Ĵetiĝis, laŭ ezoko sable, baraktante,  
Muĝis laŭ urs', el pulmoj fortikaj kriante:  
„Perfido...“ Tuj vekita nobelaro ronde,  
Ĥore: „Perfid', perforto!“ ekkriis responde.

Spegulan ĉambron eĥoj atingas laŭtkrie;  
Kun Gervazo, jokeoj, Grafo dormis tie.  
Gervaz' vekite, vane ŝiriĝas, kun miro  
Sin vidas alligita ĉe propra rapiro;  
Ĉe fenestro li vidas: jen homoj armitaj,  
En nigraj kaskedetoj, verd-uniformitaj. 40  
Unu, skarpe-zonita, la spadon tenante,  
Kaj akraĵojn al siaj longuloj turnante,  
Flustradis: „Ligu!“ Ĉirkaŭ-kuŝas, kiel ŝafoj,  
Ĵokeoj en katenoj; malarmita Grafo  
Sidas; kun bajonetoj nudaj, du longuloj  
Staras ĉe li. Rekonis Gervazo: Moskvuloj!!!  
Ve!

Ŝlosisto ne foje estis en teruroj,  
Multfoje havis ŝnurojn sur manoj kaj kruoj:  
Tamen saviĝis; sciis fortul' manieron

Ŝiri katenojn, sekve ne perdis esperon;  
 Li pripensis, okulojn fermis, ŝajn-dormante,  
 Kaj malrapide brakojn, krurojn longigante,  
 Enspiris,—ventron, bruston kunpremis laŭpove:  
 Subite kuntiriĝas, sin streĉas plenblove;  
 Laŭ serpent', kapon, voston, kaŝanta artike,  
 Longa Gervaz' aspektis nun mallonge, dike,  
 Subite distiriĝis: eĉ ekknaris ŝnuro,  
 Sed ne krevis! Ŝlosisto, kun honto, teruro,  
 Renversiĝis, kaŝinte vizaĝon kolere,  
 Fermis okulojn, kuŝis kiel ligno tere. 50

Ĵus aŭdiĝis tamburoj: malofte unue,  
 Poste ĉiam pli dense, pli frakase-brue.  
 Oficir' de moskvuloj, je tiu apelo <sup>1)</sup>  
 Ĵokeojn, Grafon, lasis sub gard' en kastelo,  
 Nobelaron en korton gvidis; staris tie,  
 Dua rot'. Van-baraktas Aspergist' furie.

Stabo — en korto, kune armitaj nobeloj:  
 Podhajsioj, Birbaŝoj, Hreĉeĥoj, Bjergeloj,  
 Ĉiuj Juĝist'-parencoj, amikoj, kun spado  
 Helpe kuris, aŭdante pri atak', invado, 70  
 Ĉar kun Dobjinski-j estis longe en kvereloj.

Kiu moskvan taĉmenton el vilaĝoj gvidis?  
 Kiu najbarojn helpe kolekti rapidis?  
 Asesor'? Jankjel? Estis divers-opinio,  
 Certe neniu sciis tiam, nek post tio.

Jam leviĝas la suno, sange ruĝigite,  
 Malakra-rande kvazaŭ radi'-deŝirite,  
 Duonvideble kaŝas ĝin nigra nub-sfero,  
 Kiel ardas en karboj forĝistaj huf-fero!  
 Nubojn, ŝiritajn kiel glaci-buloj, vento, 80  
 Plifortiĝante, pelis el la oriento;  
 Nubajoj flugas, pluvon malvarman ŝutante.  
 Post ili kuras vento, pluvon sekigante.

<sup>1)</sup> Kunvoko de armeo.

Post vento ree nubo malseka alkuras:  
Tag' alterne malvarmas aŭ pluve murmuras.]

Dume Majoro trajojn, el apud barilo,  
Igas treni, en ĉiu tranĉi per hakilo  
Duonrond-truojn, meti al aperto trua  
Kaptitoj-krurojn, fermi per lignaĵo dua. 90  
Du trajoj, akrarande najle-kunbatitaj,  
Kunpremismurojn, kiel hund-faŭkoj fermitaj;  
Ŝnuroj, forte streĉitaj, dorse manojn ligis;  
Sed Major' al nobeloj turmenton pliiĝis:  
El kapoj deŝirigis la konfederatkojn,  
El ŝultroj la mantelojn kaj la taratatojn,  
Eĉ kontuŝojn, ĵupanojn. Tiel trab-forĝite,  
Dent-klakante, al pluvo, malvarm', elmetite,  
Nobeloj vice sidis dum malbon-vetero;  
Aspergisto baraktas vane en kolero.

Vane sin pro nobeloj Juĝist' intermetas, 100  
Kaj vane Zonjo ploras, Telimeno petas,  
Aĝi pri katenitoj ne tiel severe.  
Nikita Rikov, rota oficiro, vere  
Paciĝus, mem moskvulo, sed bona sinjoro:  
Tamen obei devis li al Plut, majoro!

Majoro, polo, naske el urbo Dzeroviĉ,  
Nomita pole (kiel aŭdiĝas) Plutoviĉ,  
Alibaptiĝis; granda fripon', laŭ regulo,  
Se polo, en car-servo, fariĝas moskvulo.  
Plut, kun pipo front-staris, koks-apogiĝante, 110  
Responde al kapklinoj nazon alt-levante;  
Por signo de kolero li brovojn kuntiris,  
Fumo-volvon ellasis kaj en domon iris.

Dume Juĝist' Rikovon pacemigi penas,  
Kaj ankaŭ Asesoron al flanko forprenas:  
Ili pripensas fini sen juĝo aferon,  
Kaj, pli grave, eviti registaran peron.  
Do diris, al majoro Plut, Rikov sinjoro:

„Kion el ĉi kaptitoj havos ni, Majoro?”

Doni sub juĝon? estos nobeloj-mizero, 120  
 Kaj vi, Major', nenion gajnos el afero.  
 Aŭdu, Major', pli bone paciĝi: Sinjoro  
 Juĝisto rekompencu vin por ĉi laboro;  
 Ni diros, ke li estis de ni vizitata:  
 Tiel vivos kaprinoj, lupo estos sata.  
 Rusoj diras: singarde eblas ĉiu faro,  
 Kaj ankaŭ: por vi rostu sur rostil' de caro;  
 Kaj ankaŭ: ol malpace, pli bone konsente;  
 Nodu bone kaj kaŝu finajojn prudente.  
 Ne raportu, do scios neniu pri tio. 130  
 Rusoj diras: por preno donis manojn Dio.“

Major', aŭdante tion kolere kraĉ-spiris  
 Kaj: „Vi frenezas, Rikov? Cara servo — diris —  
 Ne estas amikeco, stultulo maljuna!  
 Vi frenezas? Ellasu mi, en tempo nuna,  
 Milita, ribelulojn? Ha, poloj ribelaj,  
 Mi vin instruos! Ha, vi friponoj nobelaj,  
 Dobjinski-j! malsekiĝu kanajloj, tremante!  
 (Li rigardis fenestren, tut-gorĝe ridante).  
 Jen ĉi Dobjinski, kiu sidas en surtuto, 140  
 — For surtuton! — pasinta-jare, dum reduto,  
 Kun mi kverelis... Estis ne mi komencinto:  
 Dum mi dancas, li krias: „Post pardon, ŝtelinto!“  
 Ke tiam, por priŝtelo de regiment-kaso,  
 Mi estis sub esploro, en grand-embaraso,  
 Ĉu tio lin koncernis? Estas danc' mazura,  
 Li krias: jen ŝtelisto! kaj nobeloj: hura!  
 Maljust'? Falinte miajn ungojn, li prudentos.  
 Mi diris: He, Dobjinski, vi tion ekpentos!  
 Kaj nun, Dobjinski, kion? la vergojn vi sentos!“ 150

Kliniĝinte, li flustris en Juĝist'-orelon:  
 „Se vi volas, ke ili savu sian felon,  
 Por ĉiu kap' mil rublojn, en kontanta mono;  
 Mil rubletojn, Juĝisto, jen lasta propono.“

Juĝisto ekmarĉandis; Major' ne atentis,  
 Kuris en ĉambro, lasis dens-fumon: prezentis

Sin kiel turn-fajraĵo ia, aŭ raketo;  
 Postiris lin virinoj kun ploro kaj peto.  
 „Major’, diris Juĝisto, antaŭ tribunalo,  
 Kion vi gajnos? Estis nek sanga batalo, 160  
 Nek vundoj; por manĝitaj anseroj, kokinoj,  
 Ŝi sole repagos laŭ Statut’-difinoj.  
 Kontraŭ Graf’ mi ne plendos, ne sekvos verdikto;  
 Tio estis kutima najbara konflikto.“

„Kaj ĉu Juĝisto legis Flavan Libron?“<sup>1)</sup> diris  
 Majoro. — „Kian libron?“ Juĝisto ekmiris.  
 „Libro — pli bona, diris Plut, ol la Statutoj,  
 Ĉiupaŝe: pendigo, Siberio, knutoj;  
 Libro milito-leĝa, nun en Litvo tuta,  
 Deviga; jam sub tablo kuŝas leĝ’ statuta! 170  
 Milit-leĝe vi marŝos, por petolo tia,  
 Jam almenaŭ al puna labor’ siberia“.  
 „Sed mi apelacios al guberniestro.“  
 Diris Juĝist’. — „Eĉ iru al imperiestro!  
 Respondis Plut; — verdiktojn car’ konfirmas noble,  
 Punon pligrandigante, eĉ ofte duoble.  
 Apelaciu, trovos mi eble, bezone,  
 Kontraŭ Juĝisto hokon, por ektiri bone.  
 Jankjel, spiono, kiun registar’ insidas,  
 Via doman’, en via drinkejo loksidas. 180  
 Vin ĉiujn mi areste povas nun reteni.“  
 „Sen ordon’, vi kuraĝus min areste preni?“  
 Diris Juĝist’. Disputo tre vive ekkuris,  
 Kiam al biendomo nova gast’ veturis.

Vetur’ amasa, stranga: Antaŭe kuranta,  
 Nigra vira ŝafego, kun kap’ hirtiĝanta  
 Per kvar kornoj, el kiuj du, laŭ ark-kurbajoj,

<sup>1)</sup> Flava libro, tiel nomata laŭ kovrilo, estis barbara libro da rusaj militaj leĝoj. Ofte dum paca tempo la registaro anoncis tutajn provincojn, kiel estantajn en milita stato kaj, laŭ la Flava Libro, donis al armea komandanto plenan povon pri la havaĵo kaj vivo de loĝantoj. Sciate estas, ke ekde j. 1812 ĝis la revolucio (1831 j.) tuta Litvo dependis de la Flava Libro, kies plenumanto estis la Grand-duko tron-sekvanto.

Ĉe oreloj volviĝas kun sonoriletoj;  
Kaj du, el frunt' al flanko ŝovante finajojn,  
Per latunaj, tintantaj skuas rond-globetoj. 190  
Post virŝafo — ŝafinoj, bovoj, kaprinaro,  
Post brutoj — pez-ŝarĝite, veturiloj-kvaro.

Ĉiuj divenis venon de pastr' Almozisto;  
Do devon de la mastro konante, Juĝisto  
Staris sojle, saluti gaston. Veturante,  
Pastro kaŝis vizaĝon, kapuĉ'-vualante;  
Sed oni lin rekonis: vidinte areston,  
Li alturnis vizaĝon kaj faris man-geston.  
Dua veturigisto estas rekonita: 200  
Maljuna Macjek Vergo, kampule vestita.  
Nobelaro ekkriis, kiam lin rekonis;  
Li diris: „Stultaj!...”, mane silenton ordonis.  
Ŝur tria veturilo — Prus' en vest' flik-ara,  
Fine Zan kun Mickjeviĉ veturis sur kvara.

Kaj dume Podhajsckioj kaj Isajeviĉoj,  
Birbaŝoj kaj Vilbikoj, Bjergeloj, Kotviĉoj,  
Vidante de Dobjinskij pezan malliberon,  
Komencis kvietigi malnovan koleron;  
Ĉar pola nobelaro, kvankam kolerema  
Kaj batalema, tamen ne estas venĝema. 210  
Oni Maljun-Mateon petas pri konsiloj:  
Li starigas amason ĉirkaŭ veturiloj,  
Atendigas.

Kvestulo iris ĉambron, pene  
Rekonebla; ne ŝanĝis li vestajon sian,  
Sed figuron alprenis li tute-alian:  
Kutime malserena, nun li gaj-miene  
Levis kapon, laŭ kruda kvestulo petola,  
Antaŭ ol ekbabili, ridis:

„Ha, ha, hola!  
Mi gratulas! Ha, ha, ha! bonege, image!  
Sinjoroj oficiroj! iuj ĉasas tage, 220  
Vi nokte! Bon-ĉasajo: mi vidis nobelojn;  
Hej! pinĉi, senplumigi, hej! deŝiri ŝelojn!

Nobelaro petolas, vi surmetu bridon!  
 Mi gratulas, Majoro, vi kaptis Grafidon:  
 Grasu! riĉul', sinjoro li el antenatoj;<sup>1)</sup>  
 Ne lasu lin el kaĝo sen tricent dukatoj!  
 Prenu! por monaĥejo donu groŝoj-trion,  
 Kaj por mi; mi pri via savo petas Dion;  
 Jes, vere, mi tre zorgas por vi pri ĉielo!  
 Mort' eĉ stab-oficirojn kaptas je orelo: 230  
 Baka<sup>2)</sup> pravis, ke morto trapikas brokatojn<sup>3)</sup>  
 Kaj skarlatojn; sur draĵon bone faras fraĵon;  
 Kaj tra tolo ĉe kolo ĝi tranĉas laŭ volo,  
 Sama normo: friz-formo, kiel uniformo.  
 Morto panjeto, diras Baka, laŭ bulbeto,  
 Larm-premas, dum alpremas; same karesemas  
 Dum lulo de mamulo aŭ diboĉ-bravulo!  
 Ah! Majoro! ni vivas, morgaŭ morto venos!  
 Kion ni manĝas, trinkas, al ni apartenos!  
 Juĝisto, matenmanĝi estas tempo nune? 240  
 Mi sidigas ĉe tablo, petas ĉiujn kune.  
 Majoro, eble zrazojn? Moŝto Leŭtenanta,  
 Kion vi pensas? vazon da punĉ' varmiganta?«

Oficiroj rediris: „Jes, Patr-Almozisto,  
 Tempas manĝi kaj trinki sanon de Juĝisto!“

La domanoj ekmiris kaj diveni penas:  
 Kial Vermo la gajan mienon alprenas?  
 Juĝist' al kuiristo ordonon raportis:  
 Zrazojn, botelojn, vazojn, sukeron li portis. 250  
 Plut kaj Rikov komencis glutadi rapide,  
 Tiel ofte posttrinki, manĝante avide,  
 Ke duonhore manĝis for dudek tri zrazojn  
 Kaj eltrinkis da punĉo du mezgrandajn vazojn.

Majoro sata, gaja, larĝe sur sofeto

<sup>1)</sup> Antaŭuloj, prapatroj.

<sup>2)</sup> Pastro Józef Baka, jezuito, vivinta en XVIII-a cj., verkis poemon „Rimarkoj pri morto neevitebla, al ĉiuj komununa“, el kiu Mickiewicz citas ĉi-tie kelkajn versojn.

<sup>3)</sup> Brokato, orteksajo. — Skarlato, skarlatkolora teksajo, metafore en senco de reĝa digno aŭ kardinala.

Sidiĝis, prenis pipon, per banka bileto  
Ekbruligis, devisis buŝon per tuk-finoj,  
La ridantajn okulojn turnis al virinoj,  
Kaj diris: „Bel-fraŭlinojn mi deserte ŝatas!  
Je major-bantoj! kiam matene mi ŝatas,  
Post zrazoj mi, deserte, volonte babilas  
Kun bel-fraŭlinoj, kiuj ĉarme vin similas!  
Mi proponus lud-kartojn? elf-cvelfe? <sup>1)</sup> je visto?  
Aŭ ni dancu mazurkon? je diabloj-centoj!  
En jegroj-regimento mi — ĉefmazuristo!“  
Kaj, pli proksimiĝante al damoj-asisto,  
Li alternigis fumon kun la komplimentoj.

260

„Danci! ekvokis Vermo: trinkinte ĝis resto  
Botelon, eĉ mi, pastro, kun levita vesto,  
Dancas mazurkon! Tamen, Majoro, je vere,  
Ni trinkas, kaj la jegroj frostiĝas ekstere?  
Diboĉu! Mastro donos grizbrandon favore,  
Major' permesos: trinku bravuloj ĝojkore!“  
Plut rediris: „Mi petus, lasante laŭvolon.“  
Vermo flustris: „Juĝisto, donu alkoholon.“  
Kaj tiel, dum en domo stabo glutis ĝoje,  
Post dom' armeo drinki komencis samfoje.

270

Kapitan' senparole kalikojn plenumis;  
Major' trinkis, samtempe damojn amindumis,  
Kaj ĉiam pli-grandigis lia danc-inklino;  
Manon de Telimeno li kaptis en fino,  
Por danci; ŝi forkuris; li al Zonjo iris,  
Ŝanceliĝe-kapklino, danc-inviton diris:  
„Hej! Rikov, ĉesu fine blovi fum-pipeton:  
For la pipon! vi bone ludas gitareton;  
Jen kuŝas gitareto, do prenu gitaron,  
Mazurkon! Mi, majoro, dancos gvido-paron.“  
Kapitan' sur gitaro kordojn streĉe-tiris,  
Plut ree Telimenon emigi deziris:

280

„Major'-vorton: ne ruso mi estas, Fraŭlino,

---

<sup>1)</sup> Dekunu-dekdu (germane), kartludo.



Se mi mensogas; estu mi tuj „sukinsin-o“, <sup>1)</sup> 290  
Mensogante: demandu ĉiun oficiron,  
Ĉiuj, tuta armeo atestos ver-diron:  
Ke en naŭa korpuso de l' armeo dua,  
En regiment' kvindeka, divizi' unua  
De Jegroj, Plut majoro — ĉefa mazuristo!  
Venu do, fraŭlineto! ĉar mi, por rezisto,  
Obstinan fraŭlineton punos oficire...“

Li saltis, Telimeno-manon tiondire  
Kaptis, kaj larĝa-kise blankan brakon klakis;  
Tadeo lin alkuris: survango ekkrakis. 300  
Ŝmac', survango aŭdigis en vic-ordo tia,  
Kiel vorto post vorto, unu post alia.

Plut' konsternite, pala kolere, okulojn  
Ekfrotis, poste kriis: „Ribel'! ribelulojn!“  
Kaj kuris, eliginte spadon por trapiko.  
Ĵus pastro tercerolon prenis el maniko,  
Kriante: „Taĉjo! pafu kiel hel-kandelon!“  
Tadeo kaptis, celis, pafis, sed li celon  
Maltrafis, nur surdigis, nigrigis oreton  
Al Major'. — Kun gitaro, vokante: „Ribelo!“  
Al Tade' saltis Rikov; sed Vojski al celo 310  
Trans tablo svingis manon: ekfajfis tranĉilo  
Inter kapoj; plifruis bato ol ekbrilo,  
Trafis gitaron funde kaj trae ĝin splitis;  
Rikov flanken kliniĝis kaj morton evitis,  
Sed ektimis, kaj: „Jegroj! ribelo!“ kriante,  
Prenis defende spadon, al sojlo cedante.

Ĵus aliflanke ĉambron nobeloj konkiras  
Tra fenestro kun sabroj; Vergo fronte iras.  
Plut, Rikov, en vestiblo, vokas je soldatoj.  
Jam helpe plej proksimaj kuras tri vokatoj; 320  
Jam tra pordo eniĝas brilaj bajonetoj,  
Kaj post ili tri nigraj klinitaj kasketoj.  
Mate', levinte „vergon“, apud pordo staras,

1) Sukinsyn (hundin-filo) insulta vorto rusa.

Ĉe mur'; laŭ kat' je ratoj, insidon li faras;  
Terura bat' faligus tri kapojn; sed vidis  
Eble aĝul' malbone, aŭ fervor-rapidis:  
Antaŭ koloj-apero li hakis kasketojn  
Kaj deŝiris; tint-falis vergo bojonetojn.  
Rusoj reniras, antaŭ Mate' forkuregas  
En korton.

Tie granda konfuziĝo regas. 330  
Tie Soplico-anoj labore vet-iras,  
Disforĝas Dobjinanojn kaj trabojn disŝiras.  
Jegroj tien alkuras, ekvidinte tion;  
Per bajonet' trapikis serĝent' Podhajskion,  
Du nobelojn li vundis kaj pafis al tria:  
Ili forkuras.—Tie jam ĉe trabo sia  
Baptist' liberajn manojn havis; do por bato  
Li stariĝis, long-fingrojn volvis ĉe manplato,  
Kaj el supre sur dorson de rus' faris frapon,  
Ke en pafil'-seruron batis lian kapon; 340  
Seruro krakis, sed pro sango ne ekbrulis;  
Serĝento al Baptistaj piedoj sin rulis.  
Baptist' kliniĝis, tubon de pafil' kaptinte,  
Turnas ĝin aspergile kaj, supren levinte,  
Muel-turnas, soldatojn du igas al falo;  
Ŝultre, kape trafita estas kaporalo.  
Reston de trabo pelas for teruro-sento:  
Baptist' nobelojn ŝirmis laŭ mova tegmento.

Oni disbatis trabon, distranĉis ligilojn;  
Nobelaro, libere, kuras veturilojn 350  
De Kvestul': prenas sabrojn, rapirojn, tasakojn,<sup>1)</sup>  
Falĉilojn kaj pafotubojn; Verŝil' — du sturmakojn,  
Sakon da kugloj; ŝutis ilin en sturmakon,  
Per dua sam-ŝargita li ekipis Sakon.

Da jegroj pli alvenas. Tumult' ĉiuparte;  
Nobeloj jam ne povas sabri kruca-arte;<sup>2)</sup>

<sup>1)</sup> Tasako, larĝa glavo; sturmako, pafilo kun larĝa tubo ĉe elfluga aperto.

<sup>2)</sup> Kruca arto, sabrado dekstren kaj maldekstren, kvazaŭ krucforme.

Jegroj ne povas pafi; en mana batalo,  
Dent' por dento, fendiĝas jam ŝtalo je ŝtalo,  
Bajoneto je sabro, falĉil' klingon falas,  
Pugno pugnon renkontas, brak' kun brak' batalas. 360

Rikov, kun jegroj-parto, kuris palisaron  
Ĉe garbej', tie haltas, vokas soldataron,  
Ke ili ne batalu en tia konfuzo,  
Kie sub pugnoj falos sen armiloj-uzo;  
Li koleras, ĉar mem li pafcelon ne trovas,  
Diferencigi rusojn de poloj ne povas,  
Krias: „Stroj!“ (vicón formu signifas ĉi-tio),  
Sed komando ne estas aŭdata en krio.

Maljun-Mate', por manaj luktoj ne taŭgante,  
Retiriĝas, la vojon antaŭ si farante, 370  
Dekstre, maldekstre: Viŝas sabra pinto cela  
Bajoneton el tubo, laŭ meĉo kandela;  
Pikante kaj tranĉante, maldekstran li ŝvingas,  
Kaj tiel singardeme kampon ekatingas.

Sed Mateon atakas, kun granda fervoro,  
Maljuna Gefrejtero, soldat'-instruktoro; <sup>1)</sup>  
Bajoneta ĉef-majstro sin streĉis risorte,  
Pafilon ambaŭmane ekkaptis tutforte:  
Dekstra man' ĉe seruro, maldekstra sur tubo;  
Li turnas sin, eksaltas, kaŭriĝas al subo, 380  
Maldekstran li mallevas, el dekstra armilon  
Ŝovas kiel serpento el faŭko pikilon,  
Kaj ree ĝin retiras, genu'-apogante,  
Tiel turniĝas, saltas, Maĉkon atakante.

Do Mateo, taksinte lerton kontraŭulan,  
Per maldekstra surmetis naz-vitron okulan,  
Verg-tenilon per dekstra man' ĉe brusto tenas,  
Cedas, Gefrejter-movojn okul'-ekzamenas,  
Kruur-ŝanceliĝas, kvazaŭ li estus ebria.  
Gefrejter kuras, certe jam pri venko sia, 390

<sup>1)</sup> Kaporalo, instruanta rekrutojn.

Por fari pli facile al cedant' atakon,  
 Leviĝis, long-etendis tutan dekstran brakon;  
 Puŝante karabenon, li tiel streĉiĝis  
 Per puŝ', armilo-pezo, ke li eĉ kliniĝis:  
 Macjek, kie sur tubon bajonet' metatas,  
 Submetis verg-tenilon kaj supren ĝin batas,  
 Mallevas vergon, ruson je mano hakante,  
 Kaj tuj, maldekstramane, makzelon tranĉante.  
 Tiel falis Gefrejter, majstr' en skerm-turniro,  
 De kvar medaloj kaj tri krucoj kavaliro.

400

Ĉirkaŭ traboj, maldekstra nobeloj-flugilo  
 Jam venke staras. Tie batis Aspergilo,  
 Tie Razil' al rusoj distribuis frapojn:  
 Ĉi-tiu korpojn tranĉas, tiu hakas kapojn,  
 Jen kiel de germanaj majstroj la maŝino  
 Elpensita, nomata de ni draŝistino  
 Kun pajlhakilo: draŝ-, kaj tranĉ-ilojn havante,  
 Pajlon tranĉas kaj grenon samtempe eldraŝas;  
 Aspergist' kaj Razilo tiel kune paŝas,  
 De supre kaj malsupre moskvulojn buĉante.

410

Sed Aspergist', jam certan venkon forlasante,  
 Kuras dekstran flugilon, kie nov-danĝero  
 Maĉkon minacas. Morton de brav-Gefrejtero  
 Venĝante, long-spontone Praporŝĉik<sup>1)</sup> atakas;  
 (Spontono lance pikas kaj hakile hakas,  
 Hodiaŭ neglektita kaj nur en ŝiparo  
 Uzata, tiam servis al piedularo).  
 Praporŝĉik, homo juna, sed batalis sperte:  
 Se kontraŭul' armilon flankbatis, li lerte  
 Cedis: junulon Macjek ne kaptus postkure,  
 Kaj sekve, ne vundante, sin defendis nure.  
 Al li Praporŝĉik lance jam vundeton faris,  
 Jam levante spontanon hako-prete staris:  
 Baptisto alkuranta, mezvoje haltinte,  
 Sub malamik'-piedojn armilon jetinte,  
 Rompis oston: Prapoŝĉik, post sporton'-ellaso,

420

1) Praporŝĉik, unua rango oficira en tiama rusa armeo.

Ŝanceliĝas; alkuras Baptist' kaj amaso  
Nobela, poste rusoj el maldekstr-flugilo.  
Komenciĝis batalo ĉirkaŭ Aspergilo.

Defendinte Mateon, li perdis armilon, 430  
Preskaŭ per vivo pagis serveman ĝentilon;  
Ĉar el poste du fortaj rusoj, alsaltinte,  
Kvar manojn en hararon lian implikinte,  
Per piedoj firmiĝis, tiris laŭ elastaj,  
Ligitaj, al rivera ŝip', ŝnuregoj mastaj.  
Vane Baptist' blind-batojn posten jetas, time  
Ŝanceliĝante: vidas Gervazon proksime,  
Do li vokas: „Fendilo! Ho Jezu! Mario!

Ŝlosist', teruron lian ekkonis laŭ krio,  
Returniĝis kaj ŝtalan akraĵon faligis, 440  
Baptist'-kapon kaj moskvajn manojn fulm-disigis.  
Rusoj, cedante voĉojn terurajn eldonis;  
Sed unu man' pli forte en hararo dronis:  
Tiu restis pendanta, per sango ŝprucinte.  
Tiel aglo leporon per ungo kroĉinte,  
Per dua, por firm-teni, ĉe arbo ekpendas;  
Kaj lepor', ekŝirinte, aglon duon-fendas:  
Dekstra ungo ĉe arbo restas en arbaro,  
Maldekstran, sangan, portas lepor' al kamparo.

Aspergisto, libera, rigardojn rond-sendas, 450  
Serĉas armilon, vokas kaj manojn etendas,  
Dume tondras per pugnoj kaj paŝas sentime,  
Ĉar flanke de Gervazo teniĝas proksime,  
Ĝis, en amas', li vidas sian filon Sakon;  
Sak dekstramane turnis al celo sturmakon,  
Maldekstra man' lignegon poste-treni devis,  
Armitan per silikoj, tuberoj, enhakoj;<sup>1)</sup>

<sup>1)</sup> La litva „maczuga“ estas farata laŭ sekvanta maniero: oni elektas junan kverkon kaj ektranĉas ĝin de supre ĝis malsupre per hakilo, por vundi supraĵe la arbon, distranĉante la mukŝelon. En tiujn entranĉaĵojn oni enmetas akrajn silikojn, kiuj post kelka tempo enkreskas en la arbon kaj formas malmolajn tuberojn. La maĉugoj prezentis dum ido-

(Neniu ĝin eklevus krom Baptisto-brakoj).  
Baptisto aspergilon karan rericervis:  
Kaptis ĝin, kore kisis, ĝoj-salte ĝin levis, 460  
Super kap' ĉirkaŭsvingis kaj tuj ensangigis.

Kiel li plu batalis kaj venkojn multigis,  
Vane kanti: ĉar kredus al Muzo neniu,  
Kiel Vilno ne kredis al virino, kiu,  
Starante super Ostra-Brama, tion vidis,  
Kiel general' Dejov regimenton gvidis  
Kaj malfermis pordegon jam kun bruo kraka,  
Kiam unu urbano, nome Ĉarnobaka,  
Mortigis lin kun tuta regiment' kozaka. 1)

Okazis, kiel diris antaŭe Rikovo: 470  
Jegrojn venkis tumulte kontraŭuloj-povo;  
Dudek-tri, mortigite, jam kuŝas sur tero,  
Tridek-kelkaj, per vundoj tutkovrite, ĝemas,  
Multajn kaŝis ĝardeno, lupol', ĉerivero,  
Kelk sub virinoj-zorgon, en domon sin premas.

Kun ĝoja krio kuras venkantaj nobeloj,  
Tiuj ŝiri akirojn, tiuj al bareloj;  
Triumfon ne kunsentas sola Verm'; Kvestulo  
Mem ĝis nun ne batalis, (ĉar pastra regulo  
Ĉi-tion malpermesas), sed kiel spertulo 480  
Konsilis, batalejon ĉirkaŭe revidis,  
Batalantojn per mano kaj rigardo gvidis,  
Nun vokas, ke kolektu sin oni prefere,

lanaj tempoj la ĉefan armilon de la litova pied-ira armeo.  
Oni uzas ilin iam ĝis nun kaj nomas „nasieki“ (tuber-bastonegoj).

<sup>1)</sup> Post la leviĝo de Jasiński (vidu rimarkon sur p. 7-  
kiam la litvaj armeoj cedis en direkto de Varsovio, la rusoj  
proksimiĝis al la forlasita urbo Vilno. Generalo Dejov, fronte  
de l' stabo, enrajdis tra la Pinta Pordego (v. p. 5) en la  
urbon. La stratoj estis malplenaj, la loĝantaro fermis sin en  
la domoj. Tiam iu urbano, rimarkinte kanonon, forlasitan en  
strata angulo, ŝargitan per kartoĉoj, celturnis ĝin al pordego  
kaj elpafis. Ĉi-tiu unu pafis savis tiam Vilnon. Generalo  
Dejov pereis, kun li kelkaj oficiroj; la restintoj, timante  
embuskon, forcedis de l' urbo. La nomo de tiu urbano ne  
estas certe konata.

Por ataki Rikovon, fini venkon vere;  
Dume lia sendito al Rikov ripetu,  
Ke li, por savi vivon, armilon demetu;  
Sed, se li senprokraste sabron ne fordonos,  
Verm' restintojn ĉirkaŭi, forhaki ordonos.  
Kapitan' Rikov tute ne petis „pardonon“, <sup>1)</sup>  
Ĉirkaŭ si kolektinte duon-bataljonon, 490  
Kriis: „Armil!“ Tuj estis armiloj kaptitaj,  
Ektintis karabenoj delonge ŝargitaj;  
Li kriis: „Cel!“ — ekbrilis tuboj-vic' longstria;  
Kriis: „Vic-pafu!“ — tondras unu post alia;  
Ĉi pafas, tiu ŝargas, aŭdiĝas armiloj:  
Kugloj fajfas, seruroj tintas kaj ŝargiloj.  
Tut-vico ŝajnas kiel rampulego voje,  
Kiu mil bril-piedojn ŝvingas unufoje.

Vere, jegroj per forta trinkajo ebrie,  
Malbon-celas, maltrafas, kaj apenaŭ ie 500  
Iun mortigas, tamen estas du Mateoj  
Vunditaj, falis unu el Bartolomeoj.  
Nobeloj el malmultaj tuboj nur celtiras,  
Malamikon per sabroj ataki ekiras,  
Sed aĝuloj retenas; kugloj cel-akiras,  
Trafas, forpelas, korton preskaŭ malplenigas,  
Kaj jam de biendomo fenestrojn tintigas.

Tade' virinojn ŝirmis en dom', onkl-ordone,  
Sed aŭdante: batalo turniĝas malbone,  
Elkuris; Ĉambelano sekvis kun palaŝo, 510  
Kiun fine alportis laŭ ordon' Tomaŝo;  
Li rapide kuniĝis kun nobeloj, fronte  
Kuras kun sabro; sekvas nobelar' volonte;  
La jegroj allasinte ilin, per subita  
Kugloj-hajlo ekŝutis: Razilo — vundita,  
Pereis Isajeviĉ, Vilbik; do Kvestulo  
Kaj Mateo nobelojn duflanke retiras:  
Nobeloj malvarmiĝas el fervor', reniras,  
Rerigardas; ekvidis ĉi-tion moskvuloj:

1) Indulgo, konservo de vivo soldata.

Kapitan' Rikov pensas laste ekbategi,  
El kort' nobelojn peli, kaj domon ekregi.

520

„Formu atakon! kriis li, per bajonetoj!  
Antaŭen!“ Vic' elmetas tubojn laŭ stangetoj,  
Klinas kapojn, ekiras, paŝon rapidigas.  
Vane el flank' pafante, nobeloj haltigas:  
Vico jam duon-korton pasis sen rezisto;  
Rikov, montrante domon per spad', al Juĝisto  
Krias: „Subiĝu, ĉar mi domon forbruligos!“  
„Mi vin, vokas Juĝisto, en brulo rostigos.“

Biendomo Soplica! se ne detruitaj,  
Brilas, sub poploj, viaj muroj blankigitaj;  
Se najbar'-nobelaron Juĝisto ĝisnune  
Apud gastamaj tabloj sidigas komune:  
Certe li tie trinkas je Verŝilo-sano,  
Sen kiu Soplicovon serĉi estus vano!

530

Verŝilon ne distingis kuraĝo supera  
Ĝin nun; kvankam el trabo unue libera,  
Li tuj en veturilo retrovis sturmakon,  
Sian karan verŝilon, same kugloj-sakon,  
Li ne batalis, tial, ke al si ne fidis  
Tut-sobre; do li iris, kie tinon vidis,  
Per man' al buŝo klinis de brando torenton,  
Kaj kiam, varmiĝinte, sentis kor-kontenton,  
Li ĝuste-metis ĉapon kaj prenis verŝilon,  
Enŝutis pulvon, supre palpigis ŝargilon,  
Rigardis batalkampon: vidas, ke brilante,  
Bajonet'-ondo batas nobelojn, puŝante:  
Li naĝas kontraŭ ondo, al tero kliniĝas,  
Kaj en densa herbaro, tra-l' korto mergiĝas  
Meze; ĝis, kie kreskas urtikoj, li lokas  
Sin embuske, kaj Sakon per gestoj alvokas.

540

550

Sak ĉe domsojlo staris kun sturmako sia,  
Ŝirmante: tie loĝis kara Zonjo lia;  
Kvankam sian rifuzon li konsciis plende,  
Ŝin amis ĉiam, volus perei defende.



Jam jegroj-vico marŝe urtikojn eniris;  
Verŝilo movis ĉanon, tub-faŭko elspiris  
Al moskvuloj dekduon da kugloj hakitaj;  
Sak ellasas dekduon: Jegroj konfuzitaj,  
Per embusk' konsternite, vicon volvajigas,  
Cedas, lasas vunditojn; Baptist' finmortigas. 560

Grenej' — jam for; timante pri longa posteno,  
Rikov al palisaro saltas de ĝardeno,  
Haltigas rot-forkuron, ordigas kaj faras  
El vico triangulon: akra kojn' elstaras  
Antaŭen, kaj du flankoj apud palisaro  
De l' ĝarden' apogiĝas. Prava estis faro,  
Ĉar el kastel' galopas sur lin rajdistaro.

Grafo, kiu gardate en kastelo sidis,  
Kiam rusoj forkuris, saltis sur ĉevalon  
Kaj, aŭdinte pafadon, rajdantojn li gvidis, 570  
Mem fronte, super kapon levante la ŝtalon.  
Rikov ĵus kriis: „Fajron, duon-bataljono!“  
Sur seruroj trakuris longen fajra zono,  
El tricent tuboj kugla ekfajfis zum-sono:  
Rajdant' pereis, falis tri vunditaj grave;  
Graf', el ĉeval' falinta, falis; kuras save  
Al li Ŝlosisto krie: de jegroj celpreno  
Lasta Horeŝko, kvankam laŭ patrin'-deveno.  
Verm', pli proksima, Grafon korp-ŝirmas post falo,  
Ricevas por li pafon, lin el sub ĉevalo 580  
Eligas, ne permesas iri tiel are,  
Oni pli bone celu, maltrafu avare,  
Kaŝu sin post bariloj, putoj, muroj, staloj;  
Graf' kun anar' atendu tempon por ĉevaloj.

Planojn de Verm' komprenis kaj plenumis plene  
Tadeo. Ligna puto lin kaŝas postene;  
Kaj ĉar li sobras, bone el dutubo pafas,  
(En aeron jetitan florenon li trafas),  
Batas terure, ĉefojn elektas por celo:  
De lia paf' unua falis feldvebelo, 1) 590

1) Ĉefserĝento.

El du tuboj serĝentojn du trafas bravulo;  
 Laŭ galonoj li celas, aŭ al triangulo  
 Ŝirmanta stabon. Tial Rikov koleretas,  
 Piedfrapas, de spado tenilon mordetas:  
 „Majoro Plut, li vokas, kio fine estos?  
 Baldaŭ el ni neniu ĉe l' komando restos!“  
 Do Plut granda-kolere al Tadeo vokas:  
 „Moŝto Pol', vi hontinde post arbo vin lokas,  
 Ne timaĉu, eliru mezon, kun honoro  
 Batali.“ Kaj Tadeo respondas: „Majoro,  
 Se vi tiel kuraĝa estas kavaliro,  
 Do kial vi vin kaŝas post jegroj-spaliro?  
 Mi ne timaĉas: iru nur el post barilo;  
 Mi, doninte survangon, pretas al duelo!  
 Kial sang-verŝi? inter ni estis kverelo:  
 Do malpacon decidu spado aŭ pafilo.  
 Vi elektu armilon, pinglon ĝis kanono,  
 Aŭ mi vin pafos kiel lupojn, sen pardono.“  
 Dirinte, li elpafis per celtrafa mano  
 Kaj leŭtenanton frapis apud Kapitano.

600

610

„Majoro, flustris Rikov, eliru unua  
 Kaj revenĝu por lia faro matenfrua.  
 Se ĉi nobel' pereos de iu alia,  
 Major' ne lavos honton el honoro sia.  
 Ni devas ĉi nobelon en kampon eligi,  
 Se karaben' ne taŭgas, per sabro mortigi.  
 Paf' laŭ traf', do mi estas amiko de piko:  
 Diris Suvorov; iru, Major', al duelo,  
 Ĉar li ĉiujn forpafos; jen prenas por celo.“  
 Major' rediris: „Rikov! vi, kara amiko,  
 Estas bravul' pri spadoj: iru, Rikov, frato.  
 Aŭ? leŭtenanton sendos ni por interbato.  
 Al Major' de soldatoj cedi ne konvenas,  
 Batalion'-komando al mi apartenas.“  
 Rikov', levinte spadon, kuraĝe eliris,  
 Ĉesigis pafojn, blankan tukon antaŭtiris,  
 Al Tadeo demandon pri armil' direktis;  
 Post traktad' ambaŭ spadojn konsente elektis.  
 Tadeo ĝin ne havis: oni serĉis spadon;  
 Armita Graf' alsaltis kaj rompita traktadon.

620

630

Sinjur' Soplica! vokis li, pardon', Sinjoro,  
Vi provokis Majoron! plifruas rankoro  
Mia al Kapitano: en kastelon mian...“  
(Diru, rompis Protazo: en kastelon nian)  
„Enkuris, finis Grafo, de rabistoj fronte,  
Ĉi-tiu Rikov, miajn jokeojn ligonte,  
Kaj mi lin punos, kiel mi faris en loko,  
Sicilianoj nomas ĝin Birbante-roko.“

Do ekĉesis pafado, silentis scivolaj  
Armeoj, pro renkonto de ĉefestroj solaj: 610  
Graf', Rikov iras, flanken-turniĝas malpace,  
Per dekstra man' kaj dekstra okulo minace;  
Ĵus per maldekstraj manoj malkovras estime  
La kapojn kaj salutas. (Honoro-kutime  
La mortigon komencas oni salutinte).  
Jam renkontiĝis spadoj kaj ekgrincis tinte:  
Kavaliroj piedojn levas, aŭ genue  
Kaŭriĝas, kaj antaŭen, posten, saltas plue.

Plut, Tadeon vidante antaŭ sia fronto,  
Konsiliĝis mallaŭte kun gefrejtej Gonto, 650  
Kiu en roto estis plej bona pafulo.  
„Gonto, diris Majoro, se al ribelulo  
Kuglon sub kvinan ripon vi batos prudente,  
Vi tuj de mi ricevos kvar rublojn arĝente.  
Gont al serur' kliniĝas, levas karabenon,  
Kompanoj per manteloj kovras entreprenon;  
Sed ne al rip', al kapo li mezuris celon,  
Pafis, trafis — proksime, traboris ĉapelon.  
Tade' ĉirkaŭturniĝis: Baptist' alrapidis  
Kaj atakis Rikovan, kriante: „Perfidis!“ 660  
Tade' lin ŝirmas antaŭ nobelaro-batoj.  
Rikov pen-retiriĝis mezon de soldatoj.

Dobjinaĵoj atakis vete kun litvanoj,  
Malgraŭ antaŭkvereloj inter partianoj,  
Batalas frate, unu alian incitas.  
Dobjinaj vidas kiel Podhajski militas,  
Jegroj-vicon tranĉante per falĉil', do gaja

Kri' ilia eksonis: „Long-vivu Podhaja!  
Antaŭen! frat-litvanoj havas superecon!”  
Kaj Skoluboj, vidante de Razel' bravecon, 670  
Kiu, kvankam vundite, kuras, sabron ŝvingas, —  
Krias: „Vivu! Mazuroj superon atingas!”  
Kaj, sin fervorigante, kontraŭ rusoj iras:  
Vane ilin Mateo kaj Vermo retiras.

Dum tiel jegroj-roton fronte batas oni,  
Vojski cedas el kampo, en ĝarden' disponi.  
Flanke ĉe li Protazo singerdema iras;  
Al li, mallaŭte, Vojski sian planon diras.

En ĝarden' staris, tuŝe apud palisaro,  
Ĉe kiu sin apogis Rikov kun jegraro, 680  
Malnova fromaĝejo, krade konstruita  
El traboj, kruc-ligitaj, simila al kaĝo.  
En ĝi brilis sesdekoj da blanka fromaĝo;  
Ĉirkaŭe ŝanceliĝis garbar' sekigita:  
Salvi', benedikt-kardo,<sup>1)</sup> timian' aroma,  
Vojski-idina, herba apoteko doma.  
Fromaĝej', larĝa klaftojn ĝis tri kaj duono,  
Malsupre apogiĝis sur unu kolono,  
Kvazaŭ nest' cikonia. Malnova kverkajo 690  
De kolono kliniĝis; putre ĝis duono,  
Ĝi fal-minacis. Tamen Juĝist', je propono  
Pri renvers' de kaduka aĝe konstruajo,  
Respondis, ke preferas li dume ripari,  
Ol renversi kaj novan restarigon fari.  
Li prokrastis konstruon kaj donis disponon  
Dume du apogiĝilojn ŝovi sub kolonon.  
Iom plifortigite, konstruaj' malnova  
Ĉe baril' pendis super triangul' Rikova.

Al fromaĝejo Vojski kun Vokisto iras  
Senparole, kaj ĉiu stangegon kuntiras; 700  
Post ili kort-estrino kuras tra kanabo  
Kun kuireja bubo, tre fortika knabo.

<sup>1)</sup> Cnicus benedictus aŭ centaŭrea benedicta, kuraca kreskajo.

Ili en kolon'-supron stangojn batis pinte,  
Puŝas tutforte, mem ĉe finoj pendiĝinte:  
Kiel flosistoj ŝipon, sur sablaja fundo  
Fiksiĝintan, el bordo pelas al profundo.

Krakis kolon': konstruo ŝanceliĝe knaris,  
Falegis triangulon moskvan; trab-etaĝoj  
Premas, vundas, mortigas; kie vicoj staris,  
Kuŝas traboj, kadavroj kaj blankaj fromaĝoj, 710  
Sange-, cerb-makulitaj. Tondras Aspergilo  
En triangul' splitita; jam fulmas Razilo,  
Vipas Vergo; el domo kuras nobelaro;  
Sur diskurintojn falas Grafa rajdistaro.

Jam nur ok jegroj, fronte serĝent', sin defendas.  
Kontraŭkuras Ŝlosisto; do ili etendas  
Naŭ tubojn kaj Ŝlosistan kapon celmezuras;  
Li, ŝvingante fendilon, kontraŭ pafo kuras.  
Pastro, tion vidante, Ŝlosiston voj-baras,  
Falas mem, al Gervazo krur-submeton faras: 720  
Ili falis, tuj pafo pelotona knaris;  
Apenaŭ plumbo fajfis, Gervazo jam staris,  
Saltis en fumon, kapojn du tranĉas balae,  
Postkuras forkurantojn, fendas ilin trae;  
Ili kuras tra korto, de Gervaz' pelate,  
Grenejon, kies pordo staras malfermate;  
Do Gervazo grenejon post jegroj enfalas,  
En malhel' malaperas, sed plue batalas:  
Tra pord' aŭdiĝas densaj batoj, ĝemo, krio.  
Kun sanga glavo, kiam eksilentis ĉio, 730  
Gervaz' eliris.

Kampon nobeloj akiris,  
Kaj dispelitajn jegrojn hakis, pikis, ŝiris.  
Rikov batalas sola, armilon el mano  
Ne demetos: alkuras al li Ĉambelano,  
Levas sabron kaj diras per solena tono:

„Kapitan'! ne makulas honoron „pardono“.  
Vi pruvis, malfeliĉa, brava militisto,

Kuraĝon: do forcedu de vana rezisto,  
Demetu sabron, ŝparu al glavoj laboron,  
Vin malmari: vi savos vivon kaj honoron!<sup>4</sup> 740

Rikovon dignoplena venkis parolado;  
Kliniĝe li fordonis sian nudan spadon,  
Ĝis kaptil' sang-makulan: „Laĥoj,<sup>1)</sup> fratoj! veo,  
Li diris, ke kanonon ne havis armeo!  
Suvorov diris: „Rikov, frat', memoru bone,  
Kontraŭ Laĥoj neniam iru senkanone!“  
Jegroj estis ebriaj, Majoro permesis  
Drinki! Ho, Plut majoro hodiaŭ ekscesis!  
Li al caro respondos pri komando sia.  
Ĉambelano! mi restos bon-amiko via. 750  
Kiuj sin forte amas — rus-proverbo diras —  
Tiuj sin ankaŭ forte je l' hararo ŝiras.  
Vi taŭgas por batalo, kiel por drinkado,  
Sed, pri jegroj, fin-ĉesu via petolado“.

Ĉambelan' levas spadon, aŭdinte proponon,  
Per Vokist' ĝeneralan anoncas pardonon,  
Bandaĝigas vunditojn, el kamp' mortigitojn  
Forigas, militkaptas jegrojn malmarmitojn.  
Plut, tre longe serĉita, en urtik' sin kaŝis,  
Kuŝis kiel malviva; fine li elpaŝis, 760  
Vidante, ke finita estis batalado.

Tiel finiĝis lasta en Litvo invado.<sup>2)</sup>

---

<sup>1)</sup> Malnova rusa nomo de poloj.

<sup>2)</sup> Estis ankoraŭ poste invadoj, kvankam ne tiel famaj, tamen sufiĉe laŭtaj kaj sangaj. Ĉirkaŭ j. 1817-a sinjoro U... en Novogrodka Vojevodlando, venkis dum invado tutan novogrodkan garnizonon kaj malliberigis la ĉefojn.

## LIBRO X.

---

### EMIGRACIO. JACEK.

Interkosilo pri sendanĝerigo de l' sorto de venkintoj.—Intertraktado kun Rikov.—Adiaŭdiro.—Grava malkaŝo.—Espero.

Matenaj nuboj, dise komence kurante,  
Kiele nigraj birdoj, al zenit' flugante,  
Ĉiam ariĝis. Suno apenaŭ al subo  
Ekiris el tagmezo, jam grandega nuboj  
Ĉielduonon kovris. La vento akcelis  
Densiĝantan nubegon, kaj suben ĝin pelis,  
Ĝis, unu flank', duone de ĉiel' ŝirite,  
Al tero kliniĝinte, larĝe etendite,  
En sin prenante ventojn, kiel granda velo,  
De l' sudo okcidenten kuris sur ĉielo. 10

Estis moment' mallaŭta — kaj aero tute  
Silentis, surde, kvazaŭ de teruro mute.  
Grenoj, kiuj antaŭe kuŝiĝis, kaj skuis  
Ree supren la oran spikaron, kaj bruis  
Kiel ondaro, staras nun tute senmove,  
Ĉielrigardas, pajlon hirtigas denove.  
Verdaj salikoj, poploj ĉevoje, starintaj  
Kiele ploristinoj ĉe tombo, klinintaj  
Fruntojn, kaj kiuj plektis longajn brakojn vente,  
Dislasinte harligojn siajn blank-argente, 20

Staras malvivaj, mutaj, laŭ esprim' similaj  
Al funebraj Niobo-statuoj Sipilaj.<sup>1)</sup>  
Sole tremolo skuas per griz-foliaro.

Hejmrevenon kutime ne ŝatas brutaro,  
Paŝtistojn ne atendas nune; ariĝante,  
Ĝi forlasas nutraĵon, al domo kurante.  
Virbovo hufe fosas, korne plugas teron,  
Kaj per muĝo teruras de l' brutar' ceteron;  
Bovino ĉiellevas grand-okulon mire,  
Malfermas buŝon, ĝemas profunde sopire; 30  
Virporko malrapidas, grincas kaj koleras,  
Kaj, grenofaskojn ŝteli provize, preferas.  
Birdojn kaŝis la herboj, tegmentoj, arbaroj;  
Nur laĝetojn ĉirkaŭas da kornikoj aroj.  
Ili per gravaj paŝoj ĉirkaŭpromenante,  
Al nigraj nuboj nigrajn okulojn turnante,  
El seka gorĝ' eligas la langon, etendas  
Larĝe siajn flugilojn, kaj banon atendas.  
Sed tro fortan tempeston ili antaŭvidis, 40  
Kvazaŭ nub' leviĝinte, al arbar' rapidis.  
Lasta, neatingebla en flugo, birdeto,  
Nigran nubon memfide fendas, hirundeto,  
Fine ĝi kugle falas.

Ĝus en ĉi momentoj  
Kun moskvuloj batalon fininte terure,  
Nobelar' sub tegmentojn rifuĝas forkure,  
Lasante batakampon, kie elementoj  
Batalos.

Okcidento ankoraŭ orumas  
Teron: ĝi malserene, flavoruĝe lumas.  
Jam nuboj ombrojn, kvazaŭ retojn, etendante,  
Forkaptas lumoretojn, sunon postkurante, 50

---

<sup>1)</sup> Niobe, laŭ antikvaj tradicioj, estis edzino de Teba reĝo kaj patrino de sep filoj kaj de sep filinoj. Kolerigite pro ŝia fiereco, la dio Apollon kaj diino Diana mortigis ŝiajn infanojn. La malesperanta patrino, pro granda doloro, transformiĝis en ŝtonon sur la monto Sipilos.



Kvazaŭ ĝin kapti, antaŭ subeniĝo, provas.  
Kelkaj ventegoj iam sube sin traŝovas,  
Unu postkuras duan, pluvogutojn ŝutas:  
Grandaj, helaj kaj rondaj, kvazaŭ hajlo gutas.

Ventegoj interbrake sin kaptis subite,  
Luktas, en fajfegantaj rondojn kuntordite,  
Rondkuras sur lagetoj, akvon funde skuas,  
Ruliĝas sur herbaroj, en junkoj fajf-bruas;  
Ŝprucas salik'-branĉetoj, flugas herb', falĉate,  
En venton, kiel haroj, plenmane ŝirate, 60  
Mikse kun garbaj krispoj. Ventoj, hurlas, falas  
Sur kampojn, renversiĝas, baraktas, batalas,  
Fosas, ŝiras terbulojn, al vent' tria faris  
Aperton; vent' ŝiriĝis el grundo, ekstaris  
Hum-kolone: ruliĝas piramidaj ruloj,  
Kap-boras sablon, ŝutas ĝin al stel-okuloj,  
Plenbloviĝas, malfermas supre tubo-veston:  
Per giganta trumpeto trumpetas tempeston;  
Ĝis, kun tuta ĥaoso da akvo, polvajo, 70  
Pajlo, folioj, branĉoj, herbkovra ŝirajo,  
Ventegoj en arbaron ekbatis profunde,  
Muĝante kiel ursoj.

Plaŭdas pluv' abunde,  
Dense, kvazaŭ kribrate. Tondr' ekmuĝis nune:  
Gutoj kuniĝis, kiel kordoj, ligas kune  
Jen per longaj plektajoj teron kun ĉielo,  
Jen fluas per tavoloj, kvazaŭ el siteloj.  
Jam tute kovris teron, kun kupol' ĉiela,  
Nigra nokt' kaj tempesto, ol nokt' pli malhela.  
Horizont' iam krevas derande-alrande:  
Tempest'-anĝelo, kiel suno, ega grande, 80  
Vizaĝe lumas, ree mortvual'-kovrate,  
Forkuras, nuboj-pordon krakfermis tondrbate.  
Ree tempest' pli forta, pluveg' pli intensa,  
Malhel' preskaŭ palpebla, tiel dika, densa.  
Poste pluv' mallaŭtiĝas, tondro pormomente  
Ekdormas, revekiĝas, verŝas pluv-torente,  
Ĝis ĉio kvietiĝis. Nur la arboj brue  
Moviĝas ĉirkaŭ domo, — pluv' murmuris plue.

Tre dezirinda estis nun tempest'-vetero:  
Ĉar, krepuske, pluvego en batal'-tereno 90  
Plenverŝis vojojn, ŝiris pontojn sur rivero,  
El bieno fermitan faris fortikajon.  
Do, pri okazintaĵoj en Soplic'-bieno  
Famo ne povis iri tuj en ĉirkaŭaĵon:  
Kaj dependis nobeloj-sorto de mistero.

Grava interkonsilo estas ĉe l' Juĝisto.  
En lito kuŝas pala, sanga Almozisto,  
Lacigita, sed mense sana; li disponas,  
Kaj Juĝisto plenumas, kion li ordonas: 100  
Invitas Ĉambelanon, Rikovon venigas,  
Vokas Ŝlosiston, poste la pordon ŝlosigas.  
Interparol' sekreta daŭris dum tut-horo,  
Ĝis tiel interrompis ĝin Rikov sinjoro,  
Ĵetante, sur la tablon, monujon or-plenan:  
„Moŝtoj Laĥoj, jam uzas vi proverbon jenan,  
Ke ĉiu ruso ŝtelas; diru demandito,  
Ke li konis Moskvulon, jen Rikov, Nikito  
Nikitiĉ, kapitano rota, kun medaloj  
Ok, kaj tri krucoj, havis ilin por bataloj:  
Jen medal' por Oĉakov, jen por Izmailov,<sup>1)</sup> 110  
Jen por batal' ĉe Novi, jen por Prejŝiŝ-Ilov,  
Tiu por Korsakova fama renirado  
El apud Zuriĥ; ankaŭ por kuraĝo spado;  
Li havis, de marŝalo mem, tri kontentigojn,  
Kaj de l' caro du laŭdojn, kaj kvar memorigojn,  
Ĉion skribe.“

„Sed turnu, Kapitan', atenton,  
Vokis Verm', se ne volas vi interkonsenton,

---

<sup>1)</sup> Oczaków, urbo apud dekstra bordo de Dnjevro; ĝi estis konkirita de princo Potemkin en j. 1788. — Izmail fortikaĵo, kiun prenis sturme Suvorov en j. 1790. — Novi, en Italujo, estas memorinda pro la venko de rusoj kaj aŭstroj super francoj 1799. — Preussisch-Eylau, en Prusujo; tie batalis sange Napoleon I kun prusoj kaj rusoj 1807. — Generalo rusa Korsakov, estis helpe sendita al Suvorov en Svisujon kaj estis kape-batita apud Zurich en j. 1799-a.

Kio kun ni fariĝos? Aranĝi aferon,  
Vi donis vorton.<sup>4</sup>

„Vere, mi faros ceteron,  
Diris Rikov, jen ree vorto! Kaj pro kio?  
Ĉar via pereigo taŭgus por nenio! 120  
Mi, honestulo, ŝatas vin, Laĥoj, por tio,  
Ke vi, ĝajuloj, bonaj por drinko, regalo,  
Kaj same, kuraĝuloj, taŭgas por batalo.  
Rusa proverbo diras, ke, kiu veturas,  
Iam defalas; kiu nun antaŭe kuras,  
Morgaŭ poste; batanto sentos morgaŭ baton;  
Do ne kolero, vivo instruas soldaton.  
El kie homo prenis tiom da kolero,  
Kolero pro malvenko! Oĉakov-afero  
Estis sanga; ĉe Zuriĥ ar' infanteria 130  
Pereis; ĉe Aŭsterlic — tuta roto mia.  
Kaj antaŭe, Koscjuŝko, apud Raclavice<sup>1)</sup> —  
Mi serĝentis — taĉmenton mian forfalĉigis:  
Kio sekvis? Mi ree, ĉe Macjejojvice,<sup>2)</sup>  
Propra-lance du bravajn nobelojn mortigis:  
Kun falĉil', Mokronovski iris antaŭ fronto,  
Al kanonisto tranĉis for manon kun lonto.<sup>3)</sup>  
Oj! vi Laĥoj! Patrujo! mi ĉion-ĉi sentas,  
Mi Rikov; car' ordonas, kaj ni tion pentas.  
Ĉu Laĥoj nin koncernas? Moskvon—Moskvularo, 140  
Polujon — Laĥoj havu! — ne permesas caro.

La Juĝisto rediris: „Sinjor' Kapitano,  
Ke vi honestas, scias ĉiu civitano,  
Ĉe kiu, ekde jaroj, vi loĝis en paco;

1) Raclavice, vilaĝo en nord-orienta flanko de Kraków; ĉi-tie Koŝciuszko, fronte de malgranda armeo (ĉirkaŭ 5000, kaj inter ili 500 kampuloj armitaj per falĉiloj), venkis 7000 rusojn, la kvaran de Aprilo 1794.

2) Maciejowice, urbeto apud rivero Okrzejka, estas memorinda pro la batalo (4 Oktobro 1794), en kiu Koŝciuszko estis venkita de la rusaj armeoj sub komando de Fersen, kaj, grave vundite, kun multaj aliaj fariĝis militkaptito. Ĉi tiu batalo decidis la sorton de la Koscjuŝka insurekcio.

3) Meĉajo (pole lont, germane Lunte).

Sed ne koleru, bona amik', pro l' donaco:  
Ni ne volis ofendi vin, kuraĝis oron  
Dediĉi, vin konante neriĉan sinjoron."

„Ah, jegroj! vokis Rikov: mia roto tuta  
Mort-pikita! kaj ĉio estas kulpo Pluta!  
Li, komandant', respondos pri tio ĉe caro; 150  
Kaj tiun monon prenu al vi, sinjoraro;  
Kapitana salajro ne estas ja riĉa,  
Sed, por punĉo kaj pipo da tabak', sufiĉa.  
Mi vin ŝatas, ĉar kune manĝas, trinkas dome,  
Babilas, diboĉetas kaj vivas tut-home.  
Mi vin defendos, kiam juĝ-esploro estos;  
Honest-vorton mi donas, ke mi bon-atestos.  
Ni diros, ke ni venis ĉi-tien vizite,  
Trinkis, dancis, eĉ iom ebrietigite;  
Plut okaze komandis fajron doni cele, 160  
Batal'! bataliono pereis iele.  
Se sinjoroj esploron per oro bon-ŝmiros,  
Vi elturniĝos. Nune mi nur tion diros,  
Kion de mi jam aŭdis long-rapir'-havanto,  
Ke mi estas nur dua, Plut — ĉefkomandanto:  
Plut restis viva, povas do fleksi hoketojn,  
Ke vi pereos; estas li ruz-intriganto;  
Oni ŝtopu en lian buŝon bank-biletojn.  
Nu, kun longa rapiro, Sinjoro Nobelo,  
Ĉu kun Plut konsentiĝo jam venis al celo?" 170

Gervaz' ĉirkaŭrigardis, kalvajon glatigis,  
Senzorge man-balancis, kaj kvazaŭ sciigis:  
Jam farite. Sed Rikov insisti ne ĉesis:  
„Ĉu Plut, per vort' certiga, silenti promesis?"  
Ŝlosisto, kiun tedis demandoj, kolere,  
Klinis grava-miene grand-fingron al-tere,  
Svingis manon, por tranĉi parolojn cetere,  
Kaj diris: „Ne perfidos Plut; mi je fendio  
Ĵuras, ke ĉesis lia kun iu babilo.“ —  
Gervaz' mallevis manojn, per fingroj klak-bruis, 180  
Kvazaŭ tutan misteron el manoj forskuis.

Tiun maŭklaran geston aŭdantoj komprenis,

Staris kaj sin kun miro okul'-ekzamenis  
En silent' malsarena. Rikov post minuto  
Diris: „Lup' rabis bruton, pereis ĉe bruto!“  
„Requiescat in pace“, <sup>1)</sup> diris Ĉambelano;  
Kaj Juĝisto: „Videbla estas Dia mano!  
Mi ne sciis, pri sango mi senkulpas plene.“

Verm' el kusen' levigis, sidis malserene,  
Kaj diris al Ŝlosisto kun rigard' severa: 190  
„Granda peko — mortigo de hom' senlibera!  
Eĉ malamikon venĝi malpermesas Kristo!  
Vi peze, antaŭ Dio, respondos Ŝlosisto!  
Unu estas escepto: se faris persono  
Ne stult-venĝe, sed sole „pro publico bono“. <sup>2)</sup>  
Ŝlosist' balancis kapon kaj manon ĉe zono,  
Kaj diris palpebrume: „Pro publico bono!“

Pri Plut Majoro plie oni ne parolis,  
Sekvatage lin dome vane trovi volis,  
Vane oni difinis por kadavro pagon: 200  
Majoro malaperis, kvazaŭ falus lagon.  
Pri malaper', diversa estis opinio;  
Neniu sciis certe tiam, nek post tio.  
Vane oni demande tedis sen bezono  
Ŝlosiston; li nur diris: „Pro publico bono“.  
Vojski konis sekreton; sed per vort' ligite,  
Maljunulo silentis, kvazaŭ ensorcite.

Rikov ĉambron forlasis post traktat' finita;  
Verm' ordonis, ke venu nobelar' milita,  
Al kiu dignoplene diris Ĉambelano: 210  
„Fratoj! nian armilon benis Dia mano;  
Sed al Moŝtoj konfesu mi sen ĉirkaŭfrazoj,  
Ke el batal' rezultos malbonaj okazoj.  
Kulpaj ĉi-tie estas ĉiuj, ni eraris;  
Verm', ke famoj-vastigon tro ageme faris;  
Ŝlosist', nobeloj, ĝuste ne komprenis seicon;  
Milit' kun rusoj havos ne baldaŭ komencon;

1) Latine: li ripozu en paco.

2) Latine: por komuna bono.

Dume, kiuj part-prenis ĉefe en afero,  
 Ne povas en Litvujo resti sen danĝero;  
 Do vi devas forkuri Landon Varsovian: 220  
 Kun sinjoro, Baptisto nomata, Mateo  
 Savu kapojn Versilo, Razilo, Tadeo  
 Trans Njemen, por aliĝi taĉmenton nacian.  
 Ni sur vin kaj sur Pluton, dum via foresto,  
 Rulos tut-kulpon; tiel saviĝos la resto.  
 Adiaŭ por nelonge; estas cert-espero,  
 Ke printempe ekbrilos aŭror' de libero,  
 Ke Litvo adiaŭas vin kiel migrantojn,  
 Por baldaŭ vin revidi venkplenajn savantojn.  
 Juĝist' por voj' preparos ĉion laŭ bezono; 230  
 Kaj mi, laŭ kapableco, vin helpos per mono.“

Pravecon de l' konsilo sentis nobelaro:  
 Ĉar, kiu unufoje malpaciis kun caro,  
 Kun li ne repaciĝos sur tero sincere,  
 Kaj batali aŭ putri devas mallibere.  
 Do ili sin rigardis malgaje, silente,  
 Eksopiris kaj kapojn balancis konsente.

Polo, kiu pro tio ĉe popoloj famas,  
 Ke, pli ol vivon, sian hejmlandon li amas,  
 Ĉiam pretas forlasi ĝin, sur fremda tero 240  
 Travivi longajn jarojn en vaga mizero,  
 Batali homojn, sorton, dum, en tondr-vetero,  
 Lumas al li, pri servo al Patruj', espero.

Oni volas vojaĝi tuj; nur tiu plano  
 Ne plaĉis tiaforme al sinjor' Buĥmano:  
 Prudentulo batalon tute ne part-prenis,  
 Sed, pri konsil' aŭdante, voĉdoni alvenis,  
 Trovis projekton — bona, volis aliigi,  
 Pli precize disvolvi, ekzakte klarigi: 250  
 Antaŭe elektita estu komisio,  
 Por konsideri celojn de l' Emigracio,  
 Rimedojn, manierojn, rilatojn krom tio.  
 Mallongeco de tempo malhelpis, domaĝe,  
 Plenumi, kion Buĥman konsilis tre saĝe.  
 Nobelar' adiaŭas, en vojon ekiras.

Sed Juĝisto Tadeon en ĉambreon retiras,  
Dirante: „Pastro! tempas diri al vi tion,  
Pri kio mi hieraŭ ricevis la scion:  
Ke Tadeo sincere amas Zofieton;  
Antaŭ forir', li turnu al ŝi mano-peton. 260  
Kun onklin' mi parolis: ŝi fine konsentas;  
Zonjo ankaŭ pri volo zorganta kontentas.  
Se ni ne povas paron tuj geedze ligi,  
Estus bone, almenaŭ ilin fianĉigi,  
Nun antaŭ forveturo: juna koro, voje,  
Kiel sciante, tentojn havas diversfoje;  
Kaj ja, se edzo-ringon rigardas okulo,  
Ke li jam estas edzo, memoras junulo,  
En si al fremdaj tentoj estingas fervoron;  
Ĉar grandan forton havas edz-ringo sur koron. 270

„Min, antaŭ tridek jaroj, venkis kor-inklino,  
Kaj mi akiris koron de Marto fraŭlino.  
Ni estis gefianĉoj; sed Dio ne benis  
Ĉi ligan, kaj orfigis min, kaj ŝin forprenis  
Al sia gloro, belan, de Vojski idinon,  
De bon-amiko mia, Ĥreĉeho, filinon.  
Restis al mi de ŝia virto rememoro,  
Kaj de ĉarmoj, kaj tiu ĉi ringo el oro.  
Kiam mi ĝin rigardas, mortintino mia  
Staras antaŭ okuloj: el favoro Dia 280  
Ĝis nun, al fianĉino, fidela mi restas,  
Kaj mi, ne edziĝinte, maljun-vidvo estas;  
Kvankam dua, sufiĉe bela Vojskidino,  
Similetas al mia Marto, amatino!“

Tiondire rigardis ringon maljunulo,  
Turnis manon kaj viŝis larmojn el okulo:  
„Frat', li finis, ĉu iĝos fianĉa soleno?  
Ili sin amas, vorton donis Telimeno.“

Sed Tadeo alkuras kaj diras tre vive:  
„Per kio mi redankos onklon efektive, 290  
Kiu penas senĉese pri feliĉo mia!  
Aĥ! bon-onklo, mi estus feliĉe radia!

Se Zonjeto nun iĝus mia fianĉino,  
Se mi sciuz, ke estos ŝi mia edzino;  
Sed mi diros malkaŝe: fianĉiĝo mia  
Ne povas tuj okazi; estas kaŝizo... kia?  
Ne demandu... Se Zonjo atendi volontos,  
Eble pli bonan, indan, baldaŭ min renkontos;  
Eble konstanto gajnos reciprokon ŝian,  
Eble iom ornamos gloro nomon mian;  
Kaj se baldaŭ-revenon ebligos sukceso,<sup>1)</sup>  
Tiam mi memorigos onklon pri l' promeso,  
Surgenu salutoj mi karan Zonjeto;  
Se libera ŝi estos, mi petos maneton.  
Nun mi eble por longe iĝas elmigrulo;  
Dume povas al Zonjo plaĉi aliulo;  
Ligi ŝin, mi ne volas; pri reciprokeco  
Peti, ne meritinte, estus malindeco!<sup>4</sup>

300

Kiam ĉi vortojn diris junulo korsente,  
Kiel du perlo-beroj, ekbrilis arĝente  
Du larmoj sur pupiloj grandaj, el lazuro,  
Kaj sur liajn roz-vangojn ruliĝis en kuro.

310

Sed, el alkov'-profundo, Zonjeto scivola,  
Tra l' fend' aŭskultis, aŭdis pri interparola  
Sekret': kiel Tadeo, sen tim', simpla-vorte,  
Konfesis amon — ŝia kor' ekstremis forte —  
Kaj ŝi vidis du grandajn larmojn en pupiloj;  
Do, kvankam ŝi ne sciis pri sekret'-ligiloj:  
Kial li ŝin ekamis? kaj kial forkuras?  
Ŝi malĝojis pro tio, ke li forveturas.  
Unue de junulo ŝin aliris flata,  
Stranga, granda novaĵo: ŝi estas amata.  
Do ŝi kuris al sia doma altareto,  
Prenis el ĝi bildeton kun relikvuĵeto:<sup>1)</sup>  
Sur ĉi bildeto estis Sankta Genovefo,  
Kaj, en relikvo, vesto de Sankta Jozefo,  
Fianĉo kaj de junaj fianĉoj patrono;  
Kaj ŝi iris en ĉambron kun sanktaĵoj-dono:

320

<sup>1)</sup> Kaŝujo por relikvoj, t. e. restaĵoj de ostoj de Sanktuloj, aŭ de aĵoj de ili poseditaj.



„Sinjor' jam forveturas? Por vojo mi donos  
Al vi donacon, ankaŭ averte proponos, 330  
Ke ĉi relikvojn ĉiam kunportu sinjoro,  
Kaj bildeton, kaj havu Zonjon en memoro.  
Di-Sinjoro vin sane kaj feliĉe gvidu,  
Ke vi al ni feliĉe baldaŭ rerapidu.“  
Ŝi mallevis la kapon; el blu-okuletoj  
Fermitaj, malavare ruliĝis larmetoj;  
Kaj Zonjo, kun fermitaj palpebroj starante,  
Silentis, brilantan larmaron ŝutante.

Tadeo prenis donojn, kisante maneton,  
Kaj diris: „Mi aŭdiaŭ-diras fraŭlineton! 340  
Adiaŭ, min memoru, iam preĝu pie  
Por mi! Zofi'!...” Paroli li ne povis plie.

Sed Graf' kun Telimeno subite eniris  
Kaj vidis, kiel juna par' adiaŭ-diris;  
Kortuŝite, rigardis Graf' al Telimeno,  
Kaj diris: „Bela estas tia simpla sceno!  
Dum paŝtistin'-animon lasas de soldato  
Animo, kiel ŝipon, tempeste, boato!  
Vere! nenio tiel korsentojn ardigas, 350  
Kiel, kiam de koro sin koro forigas.  
Tempo — vento: malgrandan kandelon estingos;  
Granda brulo en vento eksplodon atingos.  
Mia amo fortiĝos pli dum foresteco.  
Sopl'co! mi suspektis vin pri rivaleco;  
Ĉi eraro kunkaŭzis nian kvereladon,  
Min devigis eligi kontraŭ vi la spadon.  
Mi rimarkas eraron: vin, al paŝtistino,  
Kaj min, al bela Nimfo, donis kor-inklino.  
En malamikoj-sango nun dronu rankoroj!  
Ne per mortiga fero militos la koroj; 360  
Nian aman disputon decidu batalo:  
Kiun el ni kor-sente superas rivalo!  
Ni foriros de niaj plej karaj rigardoj,  
Ambaŭ rapidos kontraŭ glavo, jet-ponardoj;  
Ni luktu per konstanto, sufero anima,  
Malamikojn postkuru kun brako sentima.”

Telimenon rigardis Graf' post tiu diro;  
Ŝi nenion respondis, en grandega miro.

„Grafo! diris Juĝisto, pro kio vi vere  
Forveturas? Vi povas resti sendanĝere. 370  
Nobelajn registaro vipus kaj arestus;  
Vi, Grafo, en bienoj sendifekta restus;  
Vi konas registaron: de vi, homo riĉa,  
Duon-enspezo estos elaĉet' sufiĉa.\*

„Ĝin baras, diris Grafo, karaktero mia!  
Se ne amato, estos mi hero' nacia;  
Amo-zorge mi vokos konsolon de gloro,  
Mi estos granda brake, mizerul' en koro.\*

Telimeno demandis: „Kio estas bara,  
Ami, esti feliĉa?“ — „De destinoj povo, 380  
Diris Graf', antaŭsentoj, per mistera movo,  
Puŝas al fremdaj limoj, verk' neordinara.  
Mi intencis, honore al vi, Telimeno,  
Bruligi flamojn apud altar' de Himeno: 1)  
Sed ĉi junulo donis al mi bel-admonon,  
Ŝirante mem, bonvole, sian edzo-kronon,  
Kurante, sian koron provi kontraŭ baroj  
De ŝanĝa sorto, kaj en sangaj milit'-faroj.  
Hodiaŭ komenciĝas mia nov-epoko!  
Mia armilo sonis ĉe Birbante-rokko: 390  
En Polujo ĝi trovu vastan resonadon!“  
Li finis kaj fiere ekbatis la spadon.

„Laŭdinda, diris Vermo, estas ĉi fervoro;  
Iru kun mono, roton vi formu, sinjoro,  
Laŭ Vladimir Potocki 2): li francojn mirigis

1) Himenajos, ĉe antikvaj Grekoj dio de edzeco.

2) Potocki Włodzimierz, filo de Feliks (Szczęsny), kreinto de l' Targovica Konfederacio (vidu rimarkon p. 43), volis forviŝi la patran makulon kaj li aliĝis al la pola armeo (1808 dum la Varsovia Duklando), kie li honore distingiĝis kaj ricevis rangon de kolonelo; li mortis en j. 1811, havante 22 jarojn.

Per milion'-ofero; garantiajgis  
Princ' Dominik Radzivil<sup>1)</sup> el bienoj rentojn  
Kaj plen-armis du novajn ĉeval'-regimentojn.  
Veturu, prenu monon: da brakoj — sufiĉe  
En Dukland', mankas mono; vojaĝu feliĉe!" . 400

Telimen', rigardinte la Grafon malĝoje,  
Diris: „Vee, nenio vin haltigos voje!  
Kavaliro! paŝante milita-arene,  
Al amatin'-koloro turnadu rigardon!  
(Rubandon deŝirinte, ŝi faris kokardon  
Kaj sur bruston de Grafo alpinglis gust-plene).  
Ĉi koloro vin gvidu al fajr' pafegila,  
Kontraŭ pluvo sulfura kaj lancaro brila;  
Kaj kiam vin glorigos jam heroaj faroj,  
Kaj kiam tutvualos senmortaj laŭraroj 410  
Sangan kaskon, pro venkoj fieran: rigardon  
Ankoraŭ tiam turnu sur tiun kokardon,  
Memoru manon, kiu ĝin fiksis unue!“  
Ŝi donis manon. — Graf' ĝin kisis ekgenue;  
Telimen' metis tukon al okulo sia,  
Kaj desupre rigardis Grafon per alia.  
Grafo ŝin adiaŭis kun fort-emocio;  
Ŝi sopiris, sed ŝultrojn ekmovis ĉe tio.

„Graf', rapidu, malfrue jam!“ Juĝist' proponis.  
Kaj Verm', minac-miene: „Ĉesu jam! aldonis, 420  
Rapidu!“ — Pastr' ordonon de Juĝist' akcelas,  
Disigas aman paron kaj el ĉambro pelas.

Dume Tadeo onklon larme ĉirkaŭprenis  
Kaj kisante la manon de Kvestulo tenis.  
Verm', al brusto tempiojn de knabo preminte,  
Sur lian kapon manojn krucforme metinte,  
Ĉielrigardis: „Filo! kun Dio!“ li diris  
Kaj ekploris... Tadeo jam post sojlon iris.  
Juĝist' demandis: „Frato, vi diros nenion  
Al li eĉ nun? Ankoraŭ ne havos ekscion 430

1) Pri Radzivil vidu rimarkon sur. p. 58.

Knabo — antaŭ vojaĝo?“ — „Ne! diris Kvestulo,  
(Plorante, kun kovrita per manoj okulo),  
Ĉu li, mizera, sciu pri patro-ekzisto,  
Kiu sin kaŝis kiel fripon', mortigisto?  
Dio' vidas konsolo-deziron: el tio  
Por la pekaj oferon mi faros al Dio.“

„Tempo, diris Juĝisto, pensi pri vi, frato:  
Homo, en via aĝo kaj malsana stato,  
Kun aliuloj kune elmigri ne povos;  
Vi diris, ke vi certan rifuĝejon trovos; 440  
Diru kie? Rapidu ni, briĉko — jungita.  
Ĉe l' arbarist' plej bone vi estus kaŝita.“

Verm', kap-balance, diris: „Ĝis maten' atendi  
Mi povas; kaj nun volu al preposto sendi,  
Ke plej rapide venu li kun viatiko. 1)  
Forigu ĉiujn, lasu Ŝlosiston, amiko!  
Ŝlosu pordon.“ —

Juĝisto laŭ ordonoj faris,  
Ĉe Verm' sur lit' sidigis, kaj Gervazo staris,  
La kubuton sur klingo de rapir' fiksante  
Kaj sur manoj klinitan frunton apogante. 450

Verm', antaŭ ekparolo, Ŝlosiston severe  
Rigardante, konservis silenton mistere.  
Kiel ĥirurg' antaŭe mola-mane tuŝas  
Korpon malsanan, antaŭ ol ĝin tranĉe puŝas:  
Tiel Vermo okuloj-esprimon mildigis  
Kaj ilin sur okuloj de Gervaz' irigis,  
l'ine, kvazaŭ blind-frape ekbati deziris,  
Kovris per man' okulojn kaj fort-voĉe diris:

„Mi 'as Jacek Soplica...“

Ĉe tiu vort-sono  
Ŝlosist' paliĝis, klinis sin, per korp-duono 460

---

4) Lasta sankta komunio, donata al mortantoj.

Antaŭ-fleksite staris, pendis unu-krure,  
 Kiel monta ŝtonego haltigita kure;  
 Li malfermis okulojn, buŝon dislarĝigis  
 Per blank-dentoj minace, lipharojn hirtigis,  
 Rapiron ellasinte, ĉe plank' ĝin retenis  
 Per genuoj, kaj klingon dekstra-mane prenis,  
 Premante ĝin; rapiro, post li etendita,  
 Per longa nigra pinto balancis. Ŝlosisto  
 Estis tiam simila al linko vundita,  
 Kiu el arb' okulojn saltos al ĉasisto: 470  
 Sang-okule fajreras, volve sin plenblovas,  
 Voston ŝvingas, murmuras kaj lipharojn movas.

„Sinjor' Rembajlo, diris Pastro, ne teruras  
 Min hom-koler': min vokas Dio. Mi aljuras  
 Vin en nomo de mondo-Savinto, de Kristo,  
 Kiu sur kruco benis al ekzekutisto,  
 Kaj peton de fripono akceptis: kvietu,  
 Aŭskultu, kion diros mi, kun pacienco,  
 Ke mi, por malpezigo de la konscienco,  
 Ricevu la pardonon, almenaŭ ĝin petu: 480  
 Aŭskultinte konfeson, vi faros laŭ volo.\*  
 Kaj li kunmetis ambaŭ manojn ĉe l' parolo,  
 Kvazaŭ preĝe. Ŝlosisto, mire, sin reŝovis,  
 Batis per mano frunton, kaj la ŝultrojn movis.

Kaj Pastro ekrakontis sian intimecon  
 Kun Horeŝko, al lia filino amecon,  
 Kaj tial kun Tablestro siajn malkonsentojn.  
 Li parolis senorde, ofte miksis pentojn  
 Kaj plendojn en konfeson, ofte jam intencis  
 Kvazaŭ fini aferon, kaj ĝin rekomencis. 490

Ŝlosisto de Horeŝkoj konis historion  
 Bone, do kvankam Pastro intermiksas ĉion,  
 Li memore ordigis ĉion kaj divenis;  
 Sed Juĝist' mult-aferojn tute ne komprenis.  
 Kapokline aŭskultis ambaŭ diligente;  
 Jacek malrapidigis vortojn kaj momente  
 Interrompiĝis.

„Ja ofte, Gervazeto, Tablestro min gaste  
 Invitis al festenoj kaj trinkis toaste  
 Mian sanon, kaj kriis, levante kalikon, 500  
 Ke li Jacek-egalan ne havis amikon.  
 Kiel li min korprenis! Kiuĵ tion vidis,  
 Pensis, ke li animon por mi disdividis.  
 Li amiko? Li sciis, kio en animo  
 Mia tiam fariĝis! —

„Dume pri tio flustroj ĉirkaŭe jam kuras;  
 Iuj diras: „He, moŝto Jacek! vi konkuras  
 Vane svate; ĉar estas de dignulo sido  
 Tro alta, do ne grimpu ĝin Pokalestrido.“ 510  
 Mi ridis kaj simule mokis la magnatojn  
 Kaj iliajn filinojn; se aristokratojn  
 Mi vizitas, mi faras ĝin pro amikeco,  
 Kaj edzinon mi prenos nur laŭ mia speco.  
 Sed min doloris tia ŝerco pik-incita:  
 Al mi, junul' kuraĝa, mond' as malfermita,  
 En lando, kie ĉiu nobele naskato  
 Estas, kiel sinjoroj, krono-kandidato!  
 Tenĉinski<sup>1)</sup> pri filino reĝo-familia  
 Svatigis: reĝo donis ŝin, sen honto ia.  
 Al Tenĉinskij egalas Soplicoj-honoro, 520  
 Sango, blazon', fidela al patruj' fervoro.

„Kiel facile homon malfeliĉa fari!  
 Momenton — longa vivo ne povas ripari.  
 Nur vorton de Tablestro: feliĉaj ni estus! —  
 Kiu scias? ni eble ĝis nun vivaj restus;  
 Eble ke li, ĉe sia infano sentema,  
 Ĉe sia bela Evo, ĉe bofil' dankema,  
 Maljuniĝus kvietel' eble nepojn nune  
 Li lulus! kaj — nin ambaŭ pereigis kune,  
 Kaj li mem — ĉi mortigo — poste sekvoj ĉiaj 530  
 De l' krimo, ĉiuj kulpoj kaj mizeroj miaj!  
 Akuzi mi ne rajtas: mortiginto lia,

<sup>1)</sup> Jan Tęczyński, Belza vojevodo, estis edziĝonta kun Cecilio, filino de sveda reĝo Gustavo I, sed mortis en mal-liberejo en Kopenhago (1562 j.).

Mi ne rajtas: pardonas al li koro mia;  
Sed ankaŭ li —

„Se li min unufoje rifuzus sincere;  
Li konis miajn sentojn; se li min prefere  
Ne akceptus vizite: tiam? forveture  
Mi kolere insultus iom, kaj murmure  
Lin lasus; sed konceptis li ruze-fiere  
Ŝajnigi, ke neniam li ekpensis vere, 540  
Ke mi povus klopodi pri ligiĝo tia!  
Li min bezonis, ĉar min nobelaro nia  
Respektis, bienuloj min ŝatis ĉirkaŭe.  
Sekve, li mian amon ne vidis kvazaŭe,  
Akceptis min, insistis eĉ, kiel antaŭe,  
Ke mi venu pli ofte; solaj kiomfoje  
Ni estis kaj li vidis okulojn malĝoje  
Larmajn, ke mi plen-bruste eksplodi jam pretis,  
Ruzul' indiferentan vorton intermetis  
Pri procesoj, seĝmetoj, ĉasoj — 550

„Ah, ofte ĉe kalikoj, kiam'li senteme  
Pri amikeco sia asertis korpeme,  
(Li mian sabron, voĉon bezonis tiame)  
Kaj mi devis afable korpremi lin same:  
Mi kolere salivon kolektis en buŝo,  
Kaj per mano mi klingon kunpremis por puŝo;  
Kraĉonte amikecon, mi sabron ekprenis;  
Sed Evo min atentis kaj iel divenis,  
Kio tiam en mia animo fariĝis:  
Ŝi rigardis petege, vizaĝe paliĝis. 560  
Kaj kolombet' ŝi estis bela, mildo-plena!  
Kun rigardo afabla kaj tiel serena!  
Anĝela! ke mi iel ne kuraĝis vere  
Timigi ŝin, mi tial — silentis prefere.  
Kaj mi, en tuta Litvo, malpaculo fama,  
Kiun timis eĉ ofte grandsinjor' tiama,  
Mi, duelisto, kiu, ne nur de Tablestro  
Maljuston ne tolerus, sed eĉ de regnestro,  
Mi, kiun furioza igis disputeto:  
Tiam, koler'-ebrie, mi, laŭ ŝafideto, 570

Silentis, Sanctissimum 1) kvazaŭ mi ekvidus! —

„Kiel ofte mi volis malkovri kviete]  
Antaŭ li koron, kaj eĉ humiliĝi pete,  
Sed vidante rigardon lian, laŭ glacio  
Malvarman, tuj mi hontis pri kor'-emocio!  
Kaj mi, eble malvarme, revenis rapide  
Al aferoj, seĝmetoj, eĉ mi ŝercis ride!  
Ĉi-tio pro fiero: por ne ofendeti  
Soplicoj-nomon, por ne malaltiĝe peti  
Vane, por ne ricevi rifuzon; ĉar kia  
Estus rakonto inter nobelaro nia,  
Se oni scius: Jacek, mi...

580

„Horeŝkoj al Soplico fraŭlinon ne donis!  
Ili al Jacek nigran la supon proponis! 2)

„Kaj fine, por min iel el afer' eligi,  
Mi pripensis nobelan taĉmenton arigi,  
Kaj forlasi por ĉiam distrikton, patrujon,  
Elmigri, milit-iri Moskvon, Tatarujon.  
Do, premi adiaŭe al Tablestro manon,  
Mi veturas, espere: fidel-partianon  
Vidante, kaj amikon, preskaŭ samdomanon,  
Kun kiu li militis, trinkis laŭ intimo,  
Kiu, adiaŭante, iras al mond-limo,  
Ke eble kortuŝiĝos maljuna sinjoro,  
Montros al mi eĉ iom da homana koro,  
Kiel limako kornojn!

590

„Aĥ, kiu, koro-funde, fajreron da sento  
Por amiko konservas: en disig'-momento,  
Ĉe adiaŭ, eliĝas tiu fajrereto,  
Kiel, ĉe agonio, lasta viv-flameto!  
Tuŝinte de amiko frunton lastafoje,  
Plej malvarma okulo eklarmas malĝoje.

600

„Ŝi, aŭdante pri mia forvetur', ekpalis,  
Sen konscio, apenaŭ kadavre ne falis,

1) Plej sankta altara Sakramento.

2) Vidu rimarkon 1) sur p. 43.



Ne povis ekparoli, ĝis torent' larmara  
Vidigis, kiel estis mi, al Evo, kara!

„En viv' unuafoje mi tiam ekploris  
Ĝoje kaj malespere, kaj mi ne memoris,  
Ke mi frenezas, volis min genue jeti  
Antaŭ li, por volviĝi serpente kaj peti: 610  
Patro kara, mortigu aŭ prenu min file!  
Malvarma, sal-kolone, Tablestro ĝentile  
Ekparolis — pri kio? — edziĝo-okazo  
De filin'! Ĉi-momente? Atentu, Gervazo,  
Vi havas homan koron!

„Tablestro diris: Moŝto Soplica, svatano  
Venis al mi, de filo de moŝt' Kastelano;  
Kion, amik', vi diros pri ligo tiela?  
Mia filin', sciate, estas riĉa, bela:  
Kaj Kastelan' — vitebska! Tio, en senato,  
Malalta, ligna seĝo.<sup>1)</sup> Do konsilu, frato! — 620  
Mi tute ne memoras, ĉu mi ekmurmuris  
Aŭ silentis — mi saltis selon kaj forkuris!..

„Jacek! vokis Ŝlosisto, saĝe vi eligas  
Kaŭzojn: ĉu ili kulpon vian malgrandigas?  
Ĉar en mondo pli ofte ekokazis jame,  
Ke, al magnat'-filino, iu ardis ame,  
Volis per fort' akiri, forkapti elŝtele,  
Venĝi malkaŝe — tamen mortigi tiele  
Malice pol-sinjoron, kun Moskvo konsente!“

„Mi ne interkonsentis!“ diris Jacek pente. 630  
„Perforte rabi? El post kradoj, rigloj, ĉie  
Mi ŝin kaptus, disbatus kastelon furie!  
Kvar nobelejoj sekvus min ekster Dobjino.  
Aĥ, se ŝi estus, kiel nia nobelino,  
Forta, sana! ne timus forkuron, postkuron,

<sup>1)</sup> Kastelanoj estis superaj kaj malsuperaj. La Tablestro eraris, dirante, ke la Kastelano de Vitebsk havis en senato malsuperan lignan seĝon; kontraŭe, li apartenis laŭ digno al superaj kastelanoj.

Povus aĉdi armiloj-tinton kaj tamburon!  
Sed ŝin faris dorlotoj de gepatroj tia  
Malforta, tima! tio estis papilia  
Raŭpet' printempa! sekve, ŝin rabi, ektuŝi  
Per brak' armita, estus ŝin mortige puŝi: 640  
Mi ne povis, ne!...

„Venĝi malkaŝe? sturmi kastelon armite?  
Hont'!... oni scius, ke mi venĝis, rifuzite!...  
Ŝlosist', honesta via koro ne komprenas,  
Ke fier' ofendita inferon entenas!

„Fier'-satan' komencis min konsil'-instigi:  
Venĝi sange, sed venĝo-kaŭzon sekretigi,  
Ne viziti kastelon, kaj elradikigi  
Amon, forgesi Evon, edziĝi alian,  
Kaj poste, poste trovi provoketon ian 650  
Kaj venĝi —

„Komence mia koro kvazaŭ aliĝis;  
Pri ideo kontentis mi, kaj — mi edziĝis  
Kun malriĉa knabino, unue vidita!  
Sed mi faris malbone kaj estis punita!  
Malfeliĉan, ne amis mi, Tade'-patrinon,  
Al mi plej sindonitan, honestan virinon:  
Malnova am', kolero, el kor' ne foriris,  
Mi kvazaŭ furiozis; vane mi deziris 660  
Deviĝi al mastrumo, aferoj, sed vano!  
Kolera, obsedita de venĝo-satano,  
Malafabla, nenian konsolon mi konis  
En mondo — kaj el pekojn mi dronis;  
Kaj mi komencis drinki —

„Baldaŭ edzino mia mortis pro sufero,  
Lasinte idon; kaj min mordis malespero!...

„Kiel amata estis Evo malfeliĉa!  
Mult-jaroj!... mond-vagado! ne estis sufiĉa  
Ŝin forgesigi: ĉiam figuro amita  
Ŝtaras antaŭ okuloj, kvazaŭ bel-pentrita!... 670

Mi drinkis, sed ne cedis memor', eĉ momente,  
Nek, kiam mi trakuris landojn kontinente!  
Nun, en monaĥa vesto, — servisto de Dio,  
Sur sanga lit' — mi longe parolis pri tio!  
Nun pri tio paroli? pardonos Sinjoro!  
Ĉar vi sciu, en kia malesper', rankoro,  
Mi plenumis..

„Tio okazis baldaŭ post la fianĉiĝo  
De Evo; oni ĉie nur pri fianĉiĝo  
Babilis kaj rakontis, ke, kiam ŝi prenis 680  
Ringon el Vojevoda mano, ŝi eksvenis,  
Havas febron, de ftizo komencon, kaj ĝeme  
Ploras senĉese; oni diris: sekrete  
Ŝi amas iun. — Dume, Tablestro, kviete,  
Aranĝis balojn, gastojn kolektis ripete,  
Min ne invitis: kial mi estus bezona?  
Senorda dom', mizero, kutimo malbona,  
Min faris malŝatata, ridinda al mondo!  
Min, kiu iam skuis distrikton en rondo,  
Min, kiun nomis princo Radzivil: amato! 690  
Min, kiam mi elrajdis el nobelej'-strato,  
Mi havis sekvantaron, ol princa pli brilant!  
Se sabron mi eligis, sabraron kelkmilan  
Mi briligis, timige al kastel'-granduloj. —  
Kaj poste min mok-ridis idoj de kampuloj!  
Tiel, en hom-okuloj, mi iĝis mizera!  
Jacek Soplica! — Kion sentis li, fiero?..“

Pastro, malforte, falis sur litajo sia;  
Ŝlosist' kortuŝe diris: „Granda juĝo Dia!  
Vere! vere! vi estas? Jacek! kapuĉulo? 700  
Soplica? kaj vi vivis kiel almozulo!  
Vi, kiun mi memoras tiam sana, bela  
Nobelo, kiun flatis sinjorar' kastela,  
Kaj virinoj frenezis pro vi! Lipharulo!  
Antaŭ nelonge! pente iĝis maljunulo!  
Kiel mi ne rekonis vin, kiam vi pafis,  
Kiam vi urson tiel perfekte celtrafis? 1)

1) Vidu paĝ. 104, v. 650—659 kaj paĝ. 108, v. 775—803.

Ĉar super vi en Litvo ne estis pafisto;  
Kaj, post Macjek, vi estis unua sabristo!  
Verel pri vi virinoj kantis kun adoro:  
„Jacek, liphar'-tordante, nobelojn timigas,  
Kaj pri kiu li nodon sur lipharo ligas,  
Tiu tremos, eĉ estu Radzivil sinjoro.“  
Vi ligis nodon ankaŭ pri sinjoro mia!  
Mizerul! kaj vi estas? kvestul' profesia?  
Lipharul' Jacek kvestas! Granda juĝo Dia!  
Eĉ nun, ha! vi senpune ne estos lasita,  
Mi juris: Gut' da sango Horeška, verŝita...“

710

Dume sur lit' sidiĝis Pastro, apogita:  
„Ĉirkaŭ kastel' mi rajdis. Diabloj-kiomon  
En kap' kaj kor' mi havis: kiu diros nomon?  
Tablestro — mortiganto de propra infano!  
Min detruis! — Min logas al pordeg' satano:  
Rigardu, li dibočas! drinkad' en kastelo!  
Kandelar' en fenestroj, en salon' kapelo!  
Kaj kastel' ne falegos sur lian kalvajon?

720

„Pensu pri venĝ', alŝovos satano armajon.  
Mi ekpensis: li sendis moskvulojn. Mi staris,  
Rigardante atakon, kiun ili faris.<sup>1)</sup>

„Malvere, ke mi iel kun Moskvo konsentis! 730

„Diversaj pensoj svarmis en kap'; mi atentis  
Stulte-ridete, kiel infano ĉe brulo;  
Kaj poste mi eksentis ĝojon de rabulo,  
Deziris vidi brulon kaj falegon bruon;  
Iam mi pensis salti, savi ŝin unuan,  
Eĉ Tablestron. —

„Sciate, vi defendis vin brave, konscie.  
Mi ekmiris. Moskvuloj mort-faladis ĉie.  
Brutoj, malbone pafas! — Pro malvenk' ilia

<sup>1)</sup> Tio okazis en j. 1792, kiam Rusujo deklaris militon al Polujo, kaj la rusaj armeoj enpaŝis en limojn de la Pola Respubliko.

Mi koleris. — Tablestro venkoplana tia! 740  
Ĉu li en mondo ĉiam nur prosperon havos?  
Ankaŭ el ĉi atako sin triumfe savos?  
Mi forrajdas kun honto. — Jam estis mateno.  
Ĵus mi vidas: Li staris sur balkon' sen ĝeno,  
Per brilanta buko al suno briletis  
Kaj tordis la lipharojn kaj fiere jetis  
Rigardojn... Al mi ŝajnis, ke min li mok-ridis,  
Manon tiel etendis, ĉar min li ekvidis,  
Kaj minacis. — Mi kaptas moskvul'-karabenon,  
Almetas, ne mezuras eĉ preskaŭ celprenon — 750  
Paf! — Vi scias! —

„Malbenita pafilo! Kiu glav-mortigas:  
Ekatakas, rebatas, ŝvingas, senarmigas  
Eble, povas haltigi glavon duonvoje;  
Sed fajr-armil': seruron nur ektuŝu foje,  
Moment', unu fajrero...

„Kiam al mi desupre celon vi mezuris,  
Mi fiks-rigardis vian tubon, ne forkuris:  
Malesper', stranga pento, min ter-fiksis ŝtone!  
Kial, Gervazo, tiam vi celis malbone? 760  
Estus favoro! Peko penton evidente  
Bezonis...“

Spir' al Pastro remankis momente.

„Vere, diris Ŝlosisto, trafi mi deziris!  
Kiom da sango unu via paf' eltiris,  
Kiel malfeliĉigis nin kaj familion  
Vian, kaj, Jacek, via kulpo kaŭzis ĉion!  
Sed, kiam Grafo estis de jegroj celpreno,  
Lasta Horeŝko, kvankam laŭ patrin'-deveno,  
Vi lin ŝirmis, kaj, antaŭ moskvuloj-elpafo,  
Min jetis teren, tiel savis min krom Grafo. 770  
Se vi estas monaĥo, pastro, laŭ verdiro,  
Via vesto defendas vin antaŭ rapiro.  
Adiaŭ, vian sojlon laste mi trapasu,  
Inter ni kvite, — reston al Dio ni lasu!“

Jacek manon etendis, — Gervaz' sin reŝovas:  
„Sen ofendo de mia nobelec', ne povas  
Mi ektuŝi je mano, mortig'-makulata,  
Ne pro publika bono, sed venĝo privata!\*

Sed Jacek el kusenoj sur liton defalis,  
Turniĝis al Juĝisto, kaj ĉiam pli palis, 780  
Kaj demandis pri pastro prepost' maltrankvile,  
Kaj vokis al Ŝlosisto: „Mi petas humile,  
Restu; baldaŭ mi finos, apenaŭ mi fortas  
Fini. — Sinjor' Ŝlosisto, — ĉi-nokte mi mortas!\*

„Kion, frato? ekkriis Juĝist'; ja, laŭvide,  
Vundo negranda. Kion? al prepost' rapide?  
Malbon-bandaĝo? tuj al doktoro! unue  
El apoteko...” Pastro diris: „Frat', malfrue!  
Mi tie havis pafon malnovan, ĉe Jen0, 1)  
Malbone sanigitan, gratite — gangreno. 790  
Mi konas vundojn: sango — nigra, fulgohava  
Kvazaŭ; doktoron? vane; sed afer' malgrava:  
Unu fojon ni mortas, animon fordonas —  
Sinjor' Ŝlosist', mi devas fini, vi pardonas!

„Estas merit', ne voli nacia kulpulo  
Resti, kvankam vin nomis naci': perfidulo!  
Kaj precipe en homo, kiel mi, fiera!

„Nom' „perfidul'“, gluiĝis, kiel pesto vera,  
Al mi. Forturnis kapojn de mi civitanoj,  
Forkuradis malnovaj amikoj, kompanoj; 800  
Timemaj, evitante, salutis de fore;  
Eĉ kampul', judo, kvankam kapklinis laŭmore,  
Sed, deflanke, min mokis ridete, trabore.  
„Perfidul'!“ en oreloj sonis, rebatiĝis  
Eĥe en dom', en kampo, tut-tagon volviĝis  
Antaŭ mi, laŭ makul' en malsana okulo;  
Kaj tamen mi ne estis lando-perfidulo.

---

1) Jen0, vidu paĝ. 163, rimarkon 4).

„Moskvo min opiniis sia aliĝinto,  
 Sopic' ricevis bien-parton post mortinto;  
 Targovicanoj poste volis honorigi<sup>1)</sup> 810  
 Min per ofic'. — Se volus mi min moskvuligi!  
 — Satan' konsilis — Estis mi en riĉa stato:  
 Se mi moskvulo iĝus, plej granda magnato  
 Serĉus mian protekton, eĉ nobelo-frato;  
 Eĉ popolaĉ' facile landanojn postponas,<sup>2)</sup>  
 Kaj pli feliĉajn Moskvo-servantojn — pardonas!  
 Mi sciis tion, tamen — mi ne povis...

„Mi forkuris el lando!  
 Kaj kie mi ne estis! kion ne suferis?

„Ĝis Dio kuracilon malkaŝis konsole: 820  
 Pliboniĝi kaj tion ripari bonvole,  
 Laŭeble, kio...

„Tablestridin', kun edzo vojevodo, kune  
 Iris en Siberion, tie mortis june:  
 Lasis en land' filinon, la malgrandan Zonjon.  
 Mi ordonis eduki ŝin.

„Pli ol pro amo, eble mi pro stult-fiero  
 Mortigis: do humile, en monaĥa sfero.  
 Pro l' gento mi fiera iam kuraĝulo,  
 Mallevis kapon, Vermo fariĝis, kvestulo, 830  
 Ĉar, kvazaŭ verm' en polvo...

„Al Patrujo malbonan ekzemplon mi donis,  
 Kiu per bon-ekzemploj repagon bezonis,  
 Per sango, oferiĝo...

„Mi batalis por lando. Tie ne glor-amo  
 Min pelis kontraŭ glavoj, kontraŭ pafoj-flamo.  
 Memor'-agrablaĵ estas, pli ol batalilaĵ

<sup>1)</sup> Ŝajnas ke la Tablestro estis mortigita ĉirkaŭ la j. 1792, dum unua milito. Dua milito estis en j. 1794. — Pri Targovico vidu rimarkon sur p. 146.

<sup>2)</sup> Postponi, malpli respekti, malŝati.

Laŭtaj verkoj, la verkoj silentaj, utilaj,  
Kaj suferoj, pri kiuj neniu...

„Al mi prosperis ofte penetri lim-zonojn, 840  
Kaj kolekti informojn, porti ĉef-ordonojn,  
Formi konspirojn. — Konas ja Galicianoj<sup>1)</sup>  
Ĉi monaĥan kapuĉon, — kaj Grandpolujanoj!  
Dum jar' mi ĉarojn puŝis en fortikaj' prusa;  
Kaj miajn ŝultrojn vundis bastonado rusa;<sup>2)</sup>  
Mi iris Siberion; poste Aŭstrianoj  
En Ŝpilberg<sup>2)</sup> min en kelojn fosis, al laboro,  
En „carcer durum“<sup>3)</sup>; tamen, mirakle, Sinjoro  
Min savis, kaj mi mortas inter samlandanoj,  
Kun Sakramentoj. — 850

„Eble eĉ nun mi pekis, antaŭ Dia trono,  
Per leviĝo-akcelo, super ĉef-ordono!  
Penso, ke gent' Soplica armiĝos unue  
Kaj en Litvo Postkuron<sup>4)</sup> lanc-fiksos plej frue,  
Ĉi penso... ŝajnas esti pura...

„Venĝon vi havas! tranĉis vi, ilo de Dia  
Puno, per glav' intencojn de tut-vivo mia:  
Vi konspiro-fadenon ŝpinitan konfuzis!  
Grandan celon, por kiu mi vivon foruzis,  
Lastan mian, en mondo, teran senton, planon, 860  
Kiun mi flegis, kiel plej karan infanon,  
Vi mortigis — kaj mi vin pardonis el koro!  
Vi...“

„Ke egale pardonu ankaŭ Di'-Sinjoro!  
Diris Ŝlosist'; atendas vi je viatiko:  
Mi ne estas skismano, nek Luter-amiko;  
Mortanton malĝojigi, jen peko laŭ scio.

<sup>1)</sup> Galicio, parto de Polujo, aneksita de Aŭstrio. —  
Pri Grandpolujo legu rimarkon sur p. 54.

<sup>2)</sup> Spielberg, urbo proksime de Bern en Moravio,  
malbonfama pro sia malliberejo por politikaj krimuloj.

<sup>3)</sup> Severa malliberejo (latine).

<sup>4)</sup> Pri Postkuro legu rimarkon sur p. 149.



Mi ion diros, certe konsolos vin tio:  
 Kiam sinjoro mia falis, mort-vundite,  
 Kaj mi, genue, super lia brust' klinite, 870  
 Glavon trempis en sangon kaj venĝon jur-diris:  
 Li, kap-skuante, manon al pordeg' eltiris,  
 Al via flanko signis krucon en aero,  
 Kvazaŭ dirus: al Jacek mi pardonas morton.  
 Mi komprenis, sed flamis tiel per kolero,  
 Ke neniam pri l' kruco mi eldiris vorton.“

Interparolon rompis malsanul'-suferoj;  
 Kaj poste venis longa hor' da silentado.  
 Oni atendas pastron. — Ektondris huf-feroj,  
 De spireganta Jankjel aŭdiĝas frapado: 880  
 Grava leter'! al Jacek farmisto ĝin donas;  
 Jacek al frato laŭte ĝin legi ordonas.  
 Leter' de Fiŝer, kiu estis tiam ĉefo  
 De pol-armea stabo, sub princo Jozefo, <sup>1)</sup>  
 Sciigas, ke sekreta decid' primilita  
 Jam estas, de francestro al mond', anoncita;  
 Ke kunvokita Granda Sejmo Varsovia  
 Kaj la konfederita Klasar' Mazovia  
 La aligon de Litvo tuj proklami volas.

Jacek, aŭskulte, preĝojn mallaŭte parolas. 890  
 Li alpremis al brusto benitan kandelon,  
 Esper-lumajn pupilojn levis en ĉielon  
 Kaj diris kun ĝu-larmoj en okul' radia:  
 „Nun, Sinjor', iru pace for servisto via!“  
 Ĉiuj genuis; antaŭ soj! ektintis io —  
 Sonorileto: venis preposto kun Dio.

Ĵus nokto jam foriris; tra blanka ĉielo  
 Roza, kuras unua sunradia helo,  
 Falas tra vitroj kiel sagoj brilantaj,  
 Sur lit', de malsanulo-kap', refleksiĝantaj: 900  
 Vizaĝon kaj tempiojn orumis lumzono,  
 Ke li mirbrilis, kiel sanktulo en krono.

1) Józef Poniatowski, vidu rimarkon sur p. 147.

## LIBRO XI.

### JARO 1812.

Printempaj aŭguraĵoj. — Enmarŝo de armeoj. — Dioservo. — Ofica rehonorigo de sankt-memora Jacek Soplica. — El interparoloj de Gervazo kaj Protazo oni povas konkludi pri proksima fino de l' proceso. — Amindumoj de ulano kun knabino. — La disputo pri Stumpulo kaj Falko decidiĝas. — Poste gastoj kolektiĝas al festeno. — Prezento de gefianĉoj al armeaj ĉefoj.

Jaro! kiu vin vidis sur litva kamparo!  
Ĝis nun popol' vin nomas — bonrikolta jaro,  
Kaj soldatoj — milita; ĝis nun la maljunaj  
Pri vi babilas; kantoj vin gloras eĉ nunaj.  
Delonge vi mirakle estis anoncita  
Inter popol', de fluga famo, antaŭita.  
Printempa suno naskis en litvana koro  
Mir-antaŭsenton, kvazaŭ de mondfina horo;  
Ĉiuj atendis ion sopire kaj ĝoje.

Brutaro, elpelita for, unuafoje 10  
Printempe, kvankam estis malgrasa, malsata  
Ne kuris al paŝtejo, jam herbe-kovrata,  
Sed kuŝiĝis sur kampo, la kapojn klinadis,  
Muĝis, aŭ sian vintran nutraĵon maĉadis.

Kampuloj la plugilojn por semado tiris,  
Sed ne ĝojis, ke longa vintro jam foriris,

Ne kantis; diligente ili ne laboras,  
Semadon kaj rikolton kvazaŭ ne memoras;  
Ili haltigas bovojn, ĉevalon erpilan,  
Al okcident' rigardon turnas maltrankvilan, 20  
Kvazaŭ tie miraklon atendus proksime,  
Kaj revenantajn birdojn observas kortime.

Jam al hejmo alflugis cikoni' unua,  
Etendis blank-standardon de printempo frua;  
Poste venis kriemaj aroj da hirundoj,  
Kiu, kolektiĝante super akvaj grundoj,  
Prenas por nestoj koton el rigida tero.  
En arbustar' skolopo flustras dum vespero.  
Super arbaro flugas anseroj serie,  
Kaj lace, por nutraĵo, defalas laŭtkrie. 30  
Sur ĉielo malhela gruoj krias ĝeme;  
Nokt-gardistoj, aŭdante, demandas timeme:  
Kion, en birdoj-regno, la konfuzo celas?  
Kia ventego ilin tiel frue pelas? <sup>1)</sup>

Jen novaj aroj: kvazaŭ piroloj, sturnetoj,  
Aroj da helkoloraj plumtufoj, flagetoj,  
Ekbrilis sur altajoj, falas sur kamparo:  
Rajdistar'! Strangaj vestoj, fremda armilaro!  
La regimentoj marŝas: kvazaŭ neĝ' fandita,  
Fluas sur voj' vicaro, la fere-forĝita; 40  
El arbar' nigras ĉapoj, bajonetoj brilas,  
Infanterio svarmas, formikar'-similas.

Ĉiuj al nordo! Kvazaŭ, el sudlando varma,  
Irus al ni, post birdoj, la popolo svarma,  
Al fort' nerezistebla, instinkta, cedante.

Ĉevaloj, homoj, agloj, tag-nokte, konstante  
Fluas; ĉielo flamas, ie bruloj ruĝas,  
Tero tremas, kaj flanke fulmotondroj muĝas.

---

<sup>1)</sup> Historiisto rusa simila-maniere priskribas la aŭgurojn kaj antaŭsentojn de l' moskvolanda popolo antaŭ milito en j. 1812-a.

Milit'! milit'!... ne estis, en Litvo, angulo,  
 Ĝis kiu ne alirus ĝia krako, brulo. 50  
 Praarbarano, kiu, laŭ avoj-kutimo,  
 Dumvive ne eliris trans arbara limo,  
 Kaj sur ĉiel' aliajn bruojn ne komprenis,  
 Krom ventoj, kaj sur tero — krom bestegoj-muĝo,  
 Gastojn nur vidis, kiam arbaranoj venis,  
 Nun vidas: strange ardas ĉiela brulruĝo;  
 Kaj li aŭdas krakadon: kuglo de kanono  
 Eraris el batalo tra l' arbara krono,  
 Ŝirante trunkojn, branĉojn. — La grizbarba uro  
 Hirtigas kolhararon, tremas de teruro, 60  
 Duonleviĝas, antaŭpied'-apogite,  
 Skuas barbon, rigardas ege mirigite,  
 Al la fulmanta, inter rompajo, brulejo:  
 Grenad' erara fajfas kaj turniĝas brue,  
 Krevas fulme-fracase; ur' en viv' unue,  
 Time, al pli profunda kuris kaŝiĝejo.

Batal'!... Kie? demandas junuloj, kaptante  
 Armilojn; manojn levas virinoj, preĝante;  
 Ĉiuj esperas venkon; sonas larma krio:  
 Nin gvidas Napoleon! kun li estas Dio! 70

Printempo! kiu vidis vin sur la kamparo!  
 Memorinda printempo, de l' milita jaro!  
 Printempo, kiu vidis vin tiel florantan  
 Per la grenoj kaj herboj, per homoj brilantan,  
 Event-plenan, gravedan de l' esper' ĉiela!  
 Mi vin ankoraŭ vidas, song-vidajo bela!...  
 Mi, naskita sub juĝo, vindita en fero,  
 Havis nur unu tian printempon sur tero.

Ĉe Soplicovo tuŝe, grand-vojo sin tiris,  
 Kiun de Njemen-flanko du ĉefoj marŝiris: 80  
 Princ' Jozef kaj vestfala reĝo Hieronim  
 Okupis Litvo-parton de Grodno ĝis Slonim: <sup>1)</sup>

<sup>1)</sup> La dekstran flugilon de Napoleona armeo komandis reĝo de Vestfalujo, frato de Napoleon I, Hieronimo (Jérôme) Bonaparte, sub kies komando estis princo Jozefo Po-

Reĝo donis ripozon ĝis la tago tria;  
Sed polaj soldataroj, malgraŭ laco sia,  
Plendis, ke ne permesas reĝo marŝi plue;  
Ili volus atingi moskvulojn plej frue.

En urb' proksima, haltis princa stab-ĉefaro.  
En Soplicovo kvardek miloj en tendaro;  
Kun siaj staboj venis: General' Dombrovski,  
Knjazjeviĉ, Malaŝovski, Gjedrojĉ kaj Grabovski. 1) 90

Estis malfrue: ĉiu do prenis laŭ povo  
Loĝejon en kastelo kaj en Soplicovo.  
Kiam antaŭgardaro estis starigita,  
Ĉiu, en sian ĉambron, iris lacigita.  
Nokta silent': en tendoj, dom', kamparo; sole  
Oni vidas, laŭ ombroj, vagantojn patrole,  
Kaj tendaraj fajrujoj flagras en kelk lokoj,  
Alterne de postenoj sonas signalvokoj.

Dormis dolĉe: dom-mastro, ĉefoj, milituloj,  
Kaj sole ne fermiĝis de Vojski okuloj; 100  
Vojski devas por morgaŭ festenon prepari,  
Volas per ĝi Soplicojn eterne glorfari:  
Inda de kor-ŝgrablaj pol-gastoj festeno  
Estu konforma kun la granda tag-soleno,

---

niatowski, ĉefo de pola armeo, kalkulanta ĉirkaŭ 70.000 viroj. — Grodno, urbo apud Niemen, ĉelime de Litvo, Polujo kaj Blank-Rutenujo; — Slonim urbo en Grodna gubernio.

1) Kniaziewicz Karol, pola generalo, nask. 1762, mort. en Parizo, partoprenis en nacia leviĝo 1794, komandis unuan polan legionon en Italujo, kie li plenumis multe da brilaj faroj (vidu p. 32, rim. 2); en 1812 li aliĝis al la Napoleona armeo kaj estis komence lokita en la generala stabo de la vestfala reĝo; poste li ricevis komandecon super la 18-a divizio de 1<sup>a</sup> korpuso de princo Poniatowski; li distingiĝis en bataloj ĉe Smoleŝk, Moskva kaj apud Berezina. — Mala-chowski, Kazimierz, nask. 1765, mort. 1845 en Francujo, aliĝinte al armeo en j. 1786, kiel simpla soldato, atingis rangon de generalo, batalis en polaj legioj, distingiĝis en milito 1812, partoprenis en la pola revolucio 1830. — Grabowski Michał, generalo, pereis en la batalo ĉe Smoleŝk 1812. — Princo Romuald Gjedrojĉ, generalo el tempoj de la Varsovia Duklando.

Preĝeja festo, ankaŭ familia estos:  
Morgaŭ tri paroj sian fianĉigon festos.  
Kaj general' Dombrovski dum vespero diris,  
Ke li, por morgaŭ, polan tagmanĝon deziris.

Kvankam malfrue, Vojski rapide akiris  
Kvin kuiristojn, kiujn ĉirkaŭajo donis:  
Ili servis kaj Vojski, laŭ mastro, disponis. 110  
Li blankan kuirestran tukon antaŭligis,  
Prenis nokt-ĉapon, brakojn ĝis kubut' nudigis.  
Unumane li muŝojn per klakil' batalas,  
Ĉar insektoj avide sur frandajojn falas,  
Per dua man' li okul-vitrojn surnazigis,  
El ĉebrust' libron prenis, elvolvis, disigis.

Libro havis titolon: „Kuirist' perfekta“<sup>1)</sup>  
Kaj estis speciala priskribo korekta  
De pol-tabloj. Tenĉina Graf', laŭ ĉi detala  
Priskrib', festenojn donis en lando itala, 120  
Pri kiuj Sankta Patro Urban Oka miris.<sup>2)</sup>  
Laŭ ĝi Karol-Amato-Radziwil kuiris  
En Njesvjej, ĉe akcepto reĝa Stanislava,  
Aranĝante festenon, kies famo prava  
Ĝis nun en Litvo vivas, en rakont' vulgara.<sup>3)</sup>

Vojski legas, anoncas post kompreno klara,

1) Libro nun tre malofta, eldonita en j. 1682 en Kraków sub titolo: „Compendium ferculorum, aŭ kolekto da manĝaĵoj, de (nobele) naskita Stanisław Czerniecki, Sekretario de Lia Reĝa Moŝto, kaj kuirejestro de L. Moŝto Princo Lubomirski“. La libro estis poste kelkfoje represita sub ŝanĝita titolo.

2) Jerzy (Georgo) Ossoliński, grafo de Tęczyn, eminenta ŝtatviro; sendite de reĝo Władysław IV en delegitaro al la papo Urbano VIII, li faris brilantveturon en Romon (1633 j.), aperante ĉie kun eksterordinara pompo kaj lukso. Czerniecki, aŭtoro de l' „Kuiristo perfekta“, estis ankaŭ lia kuirejestro.

3) Princo Karol Radziwil, nomata „Sinjoro Amato“ (Panie Kochanku), laŭ proverbo kiun li ĉiam uzis, plej riĉa magnato de sia tempo en tuta Polujo, akceptis (1785) en sia kastelo en Nieśwież la reĝon Stanisław Poniatowski, kaj ĉi-tiu akcepto kostis al li milionojn.

Kaj spertaj kuiristoj laŭ tio laboras;  
 Kvindek tranĉiloj vigle sur tabloj sonoras;  
 Kuirej'-buboj nigraj portas, laŭ ordonoj,  
 Lignon; aliaj lakton, vinon, el kaldronoj 130  
 Versas en kaserolojn, potojn, kuirilojn;  
 Ĉe forn' sidantaj buboj movas fajr-blovilojn:  
 Vojski, por pli akceli ekbrulig'-aferon,  
 Sur brullignon verŝigas fanditan buteron;  
 (Tian lukson bonhava dom' ne persekutas).  
 Buboj, en fajron, sekan branĉ-rompajon ŝutas;  
 Aliaj sur ponardojn metas grand-rostajojn,  
 Bovajn kaj kapreolajn, kaj apro-dorsajojn;  
 Ĉi-tiuj senplumigas: flugas lanugaro,  
 Nudiĝas urogaloj, tetroj kaj kokaro. 140  
 Kokoj estis malmultaj: post invad'-atako,  
 Kiun faris Dobjinski, sang-avida Sako,  
 Sur kokejon de Zonjo, kiam, en impeto,  
 Li detruis mastrumon ĝis lasta koketo,  
 Ne povis per birdaro ekflori de-novo,  
 Fama iam, pro siaj birdoj, Soplicovo:  
 Cetere da viandoj abundeco granda,  
 Arigita el domo, butikar' vianda,  
 El arbar', de najbaroj, proksime kaj fore:  
 Vi dirus, birda lakto nur mankis ĉi-hore. 150  
 En Soplicov' kuniĝas, por festen' sinjora,  
 Du kondiĉoj: abundo kaj arto labora.

Jam ekiĝis de Sankta Flor'-Virgin' soleno.<sup>1)</sup>

Vetero estis bela; en frua mateno  
 Ĉielo pura ĉirkaŭ tero sin etendis;  
 Kiel maro silenta, konkave ĝi pendis.  
 Nur ankoraŭ kelk steloj lumas el profundo,  
 Kiel perloj, brilantaj tra l' ondar' el fundo:  
 Flanke nubet' alflugas blanka, unu-nura  
 Kaj flugilojn ekmergas en ĉiel' lazura,  
 Similajn al plumaro de Gardant'-Anĝelo, 160  
 Kiun, per noktaj preĝoj, retenis teranoj,  
 Kaj kiu rerapidas al samĉielanoj.

1) Festo de Anunĉiatio.

Ĉielfunde jam lasta estingiĝis stelo,  
 Kaj en mezo de frunto paliĝas ĉielo,  
 Ombroj-kusenon tuŝas per dekstra tempio  
 Bruneta, dum maldekstran jam ruĝigas !o;  
 Pli fore, rondo, kvazaŭ palpebro, disiĝas  
 Kaj, en mezo, blankajo okulaj vidiĝas  
 Kun ĉielark'-pupilo: jam ŝprucis radio,  
 Sur ĉielrond' fleksite, trabilis lum-strio 170  
 Kaj, en blank-nubo, kiel or-sago pendiĝas.  
 Post ĉi paf' tag-signala, flamoj-fasko ŝprucas,  
 Mil raketoj en mondo-ĉirkaŭo sin krucas,  
 Kaj sun-okul' suriris. — Ĝi iom dormemas,  
 Fermetiĝas, radiaj okulharoj tremas;  
 Sep koloroj kunbrilas: safiro bluhava,  
 Sange-ruĝa rubeno kaj topazo flava;  
 Sekve suno disbrilis kristal'-diafane,  
 Poste brilant-lume, fine fajr-fontane,  
 Kaj kiel luno grande, flagrante laŭ stelo: 180  
 Tiel iris soleca suno sur ĉielo.

Hodiaŭ ĉe tagiĝo, el tut-ĉirkaŭejo,  
 Litvanaro kolektis sin antaŭ preĝejo,  
 Kvazaŭ por ekanonco de miraklo nova.  
 Ĉi kolektiĝon kaŭzis piec' de popolo,  
 Kaj parte ĝi devenis el granda scivolo:  
 Ĉar hodiaŭ al dia-servo Soplicova  
 Estas venontaj ankaŭ kelkaj generaloj,  
 Ĉi-tiuj gloraj ĉefoj de pol-legionoj,  
 Kies nomojn adoris popol' laŭ patronoj,  
 Kies ekspedicioj, vagadoj, bataloj, 190  
 Evangeli' nacia estis litvolanda.

Jam venis oficiroj, soldataro granda;  
 Popol' ĉirkaŭas ilin, kaj apenaŭ fidas,  
 Rigardante, al propraj okuloj: ĝi vidas!  
 Landanojn, uniformon armean portantajn,  
 Armitajn kaj liberajn, pole parolantajn.

Por meso ne ampleksis preĝejet' kunvenon:  
 Popolo genuiĝis sur herboterenon,



Kaj, nud-kape, rigardas al pordo kapela.  
De litvanoj hararo, blanka aŭ blondhela,  
Orumiĝas laŭ bedo de matur-sekalo; 200  
Ie brilas virgina bela kap-ovalo,  
En ornamo freŝ-flora aŭ pav-okulara,  
Kun senligaj rubandoj en plektaĵo hara,  
Inter vir-kapoj, kiel gren-cejan' aŭ lolo.  
Genuanta, kolora amas' de popolo,  
Ĉe tintil'-voĉo, kvazaŭ ĉe blovo matena,  
Kap-klinas, kiel spikoj sur bedaro grenata.

Kampulinoj hodiaŭ, al Mari'-altaro,  
Portas printemp'-donacon de herbofloraro;  
Ĉio en bel-ornamo de bukedoj, kronoj: 210  
Altaro, bildo kaj eĉ sonorej', balkonoj.  
Iam, el oriento, maten-vent' blovetas,  
Deŝiras florkronetojn, sur tempiojn jetas,  
Kiel mes-incensilo bonodor-fumetas.

Kiam finiĝis meso, prediko kaj beno,  
Eliris Ĉambelano, estro de l' kunveno,  
Antaŭ nelonga tempo, en distrikto sia,  
Elektite Marŝalo Konfederacia,<sup>1)</sup>  
En vojevoda vesto: ĵupan' or-brodita,  
Kontuŝo grodetura,<sup>2)</sup> zono orteksita, 220  
Flanke, kun lacert-leda<sup>3)</sup> prenil', karabelo;  
Sur kolo brilis pinglo per brilant'-helo,  
Konfederatko blanka, kun fasko da karaj  
Tuf-plumetoj, de blankaj ardeoj, tre raraj.  
(Por festo nur metiĝas la riĉa tufeto,  
Dukaton kostas ĉiu tiela plumeto).  
Ĉambelan' sur altaĵon ĉe l' preĝej' suriris,  
Kaj de popol', soldatoj, ĉirkaŭite, diris:

<sup>1)</sup> En Litvo, post enmarŝo de francaj kaj polaj armeoj, oni formis en vojevodlandoj konfederaciojn kaj elektis senditojn por la seĝmo.

<sup>2)</sup> Gros-de-Tours, peza silkŝtofo franca.

<sup>3)</sup> Lacertleĉo, leĉo malglata (ĉevala aŭ azena), aspekto simila al lacert-haŭto.

„Fratoj! anoncis pastro al vi el ambono,  
Ke liberon redonis Francestro al Krono, 230  
Kaj nun donas al Litvo, tut-Polujo kara;  
Vi aŭdis pri la grava edikt' registara,  
Pri kunvoko de granda sejmo varsovia.  
Nun aŭdu kelkajn vortojn komunumo nia  
Pri famili'-afero de Soplic', sinjoro  
Ĉi-tiea.

„Vi ĉiuj havas en memoro,  
Kion krimis mortinto — Soplica Jaceko;  
Sed, dum vi ĉiuj scias nur pri lia peko,  
Tempas, al mond' anonci pri meritoj liaj.  
De ĉeestaj ĉi-tie generaloj niaj 240  
Mi aŭdis ĉion, kion mi diras pri l' homo:  
Jacek ne mortis (kiel laŭtis fam') en Romo,  
Sed, post ŝanĝo de vivo, profesio, nomo,  
De kulpoj, kontraŭ Dio kaj Patruj' faritaj,  
Puriĝis, per sankt-vivo, grand-faroj militaj.

„Jen li, ĉe Hohenlinden,<sup>1)</sup> kiam generalo  
Riŝpans, venkate, pensis pri cedo-signalo,  
Ne sciante, ke marŝas Knjazjeviĉ al savo,  
Jacek penetris inter jetaĵoj kaj glavoj,  
De Knjazjeviĉ al Riŝpans leterojn transdonis: 250  
Ke poloj malamikoj-poston ĉirkaŭzonis.  
Li, poste, ĉe hispanoj, dum pol-ulanaro  
Konkiris Sommo-Sjerran dorson de remparo,<sup>2)</sup>  
Ĉe Kozjetulski estis dufoje vundita!  
Kun sekretaj ordonoj poste elsendita  
Li kuradis, spiriton de popolo sondis,  
Sekretajn societojn kolektis kaj fondis;  
Kaj li fine, ĉe litva leviĝ'-preparado,

<sup>1)</sup> En batalo ĉe Hohenlinden (3-an de Decembro 1800), francoj sub komando de Moreau venkis aŭstrojn kaj bavarojn; la venkon decidis pola korpuso sub komando de generalo Kniaziewicz.

<sup>2)</sup> Sommo-Sierra, intermontoj en Hispanujo; en j. 1808, en ĉeesto de Napoleono, ili estis konkiritaj de polaj ulanoj, kiujn komandis Leon Hipolit Kozietulski; tiu heroaĵo ebeniĝis al francoj la vojon al ĉefurbo Madrid.

Pereis en Soplica hejmo, dum invado.

Ĵus venis en Versavon sciigo pri lia  
Mort', dum lin rekompencis Estro Imperia,  
Por antaŭ-heroajoj kaj servoj konspiraj,  
Per signoj, de honora legi', kavaliraj.<sup>1)</sup>

260

„Do mi, aferojn tiujn-ĉi konsiderante,  
Kaj Vojevod'-regecon kunrepresentante,  
Anoncas ĉe bastono konfederacia,  
Ke Jacek, per fidela, longa servo sia,  
Kaj ankaŭ per favoro de l' estr' imperia,  
Forviŝis infamion, al honor' revenas,  
Kaj inter patriotoj ree lokon prenas.  
Do, kiu nun kuraĝos Jacek-familion  
Memorigi pri kulpo aŭ aludi ion,  
Tiun atendas puno, por riproĉo tia,  
„Gravis notae maculae“<sup>2)</sup> laŭ statuto nia,  
Kiu punas „militem“, kiel „skartabelon“,<sup>3)</sup>  
Se ili infamion semas sur nobelon;  
Kaj ĉar regas egalo, artikolo tria  
Devigaŝ por urbanoj kaj kampulo ĉia,  
Tiun marŝal'-dekreton metos moŝt' Skribisto  
Al ĝeneralaj aktoj, — anoncos Vokisto.

270

Kio koncernas krucon de l' honor'-legio: 280

Ke ĝi malfruis, gloron ne ofendas tio;  
Se ĝi ne povis Jackon ornami merite,  
Ĝi servu memoraje, sur tomb' pendigite.  
Dum tri tagoj ĝi pendos, en preĝej' post tio  
Ĝi metiĝos por voto<sup>4)</sup> al Patrin'-de-Dio“.

Ĉambelano ordenon el tego eligis

---

1) Honora legio, franca ordeno por merito, fondita de l' imperiestro Napoleono I en j. 1802.

2) Vortoj latinaj, kiuj signifas: de notajo pri grava malkulo, t. e., ke li estos enskribita en aktojn de juĝejo, kiel homo kiu plenumis krimon.

3) Militem (latine) soldaton, ĉi-tie en senco de nobelo; scartabello (itale) malnova paperaĉo; la latinigita formo scartabellus signifas posedanton de dokumento pri nobeligo.

4) Ajo pie dediĉita.

Kaj sur modestan toambo-kruceton pendigis:  
 Rubandeton kokarde-ligitan, ruĝhelan,  
 Kaj, kun ora kroneto, krucon blankan, stelan.  
 En sun-radioj lumis steletoj kaj oro 290  
 Kvazaŭ lastaj rebriloj de Jacka ter-gloro.  
 Popol' „Anĝel'-saluton“ genue flustretas  
 Kaj pri eterna paco por pekulo petas.  
 Juĝisto, inter gastoj kaj vilaĝ'-kunveno,  
 Ĉiujn al Soplicova invitas festeno.

Du aĝuloj sidiĝis ĉe domo bona:  
 Ĉe ĉiu, sur genuoj, miel-poto plena.  
 En ĝarden' ili vidas: ĉe papav' kolora  
 Staras ulan', sunflore, en kolpak' kun ora 300  
 Lad-ornamo kaj koka vostplumo fiera;  
 Ĉe li knabin', en verda vest', laŭ rut' ĉe-tera,  
 Levas blu-okuletojn, laŭ trikoleretoj,  
 Al okuloj de knabo; pli for, fraŭlinetoj,  
 Kap-deturnante, florojn ŝiris en ĝardeno,  
 Ke geamantoj povu paroli sen ŝeno,

Sed aĝuloj babilas ĉe vino miela  
 Kaj sin tabak'-regalas el ujo arb-ŝela:

„Jes, jes, Protaĉjo“, diris Ŝlosisto Gervazo.  
 „Jes, jes, Gervaĉjo“, diris Vokisto Protazo.  
 „Jes, jes!“ ripetis ambaŭ kelkfoje, cetere 310  
 Takt-balancante kapojn. „Jes, finiĝas vere, —  
 Diris fine Vokisto, — strangamaniere.  
 Ja estis, mi ekzemple memoras, procesoj  
 Kun multe pli malbonaj, ol ĉe ni, ekscesoj,  
 Kaj embarason finis intercizo-datoj: 1)  
 Tiel paciĝis Ĥopot kun Borzobohatoj,  
 Krepŝtuloj kun Kupscioj, Putrament — Pikturmo,  
 Kun Odincoj Mackjeviĉ, Kvileckij kun Turno.  
 Kaj de Poloj kun Litvo! estis pli malica  
 Konflikto, ol ĝin havis Horeŝkoj, Soplica: 320

1) Intercizo, ofica antaŭedziĝa kontrakto.

Sed kiam konsideris reĝino Jadvigo,<sup>1)</sup>  
 Sen juĝo tuj finiĝis la tuta intrigo.  
 Se partioj fraŭlinon havas, aŭ vidvinon,  
 Edziĝo tiam faras al procesoj finon;  
 Do plej longe proceso daŭras kun pastraro  
 Katolika, kaj inter proksim-parencaro,  
 Ne povante finiĝi per geedzoj-paro.  
 Do malpacoj, de Laĥoj — Rusoj, nefinitaj  
 Ekde Leĥo kaj Ruso, du fratoj naskitaj;<sup>2)</sup>  
 Tial tre longe daŭris proces' de litvanoj 330  
 Kun la pastroj Krucistoj, ĝis gajnis Jagjelo;<sup>3)</sup>  
 Do antaŭ aktoj longe „pendebat“<sup>4)</sup> kverelo,  
 Ĝama proces de Rimŝoj kun Dominikanoj,  
 Ĝis gajnis monaĥeja sindik', pastro Dimŝo.  
 Do proverb': Di-Sinjoro pligrandas ol Rimŝo;  
 Mi aldonos: plibonas miel-pot' en mano,  
 Ol fendil'«, kaj li trinkis je Ŝlosista sano.

„Vere! — diris Gervazo per kortuŝo-tono,  
 Tre strangajn sortojn havis nia pola Krono,  
 Kaj Litvo nia! Kvazaŭ du geedzojn Dio 340  
 Kunigis, sed disigis satanoj-envio!  
 Aĥ, frato Protazeto! Jen, kion litvanoj  
 Ni vidas! revizitis nin fratoj kronanoj!  
 Mi antaŭ jaroj servis en taĉment' ilia:  
 Ĝi estis bravularo konfederacia!  
 Se sinjoro Tablestro ĝisvivus ĉi horon!  
 Jacek! Jacek! — sed kial ĉagreni la koron?

1) La unua kuniĝo aŭ unio de Litvo kun Polujo okazis en j. 1386 sekve de edziĝo inter Jadwiga, reĝino pola, kaj Wladyslaw Jagiello, litva grand-duko (vidu p. 86).

2) Laŭ fabela historio poloj kaj rusoj devenas de du fratoj: Lech kaj Rus. Pri Leĥ vidu rim. p. 29.

3) La ordeno de Krucistoj aŭ Kruckavaliroj, venigita en XIII jarcento de pola duko Konrado Mazovia, por ke ĝi defendu la limojn de Polujo kontraŭ atakoj de la idolanaj Prusoj, post venko kaj ekstermo de ĉi-tiu litova gento, volis ankaŭ aneksi Litvon kaj komencis kun ĝi militojn sub preteksto de konvertado en kristanecon. La potencon de l' Ordeno kruckavalira rompis fine Jagiello en la militbatalo ĉe Grunwald kaj Tannenberĝ en j. 1410.

4) Pendebat (latine) pendis, ne estis decidita.

Kiam Litvo kun Krono nun ree sin ligas,  
Jam tio sola ĉion pacigas, bonigas.“

„Strange“, diris Protazo, „pri Zonjo gracia,  
Kies maneton petas nun Tadeo nia, 350  
Antaŭ jar' ĉielsigno estis aŭ omeno!“

„Fraŭlin' Zofi' ŝin oni nomu, laŭ konveno,  
Rompis Ŝlosist', plenkreska, ne eta knabino,  
Krome, dignula sango, Tablestra nepino!“  
„Jen do, finis Protazo, estis signo tia  
Pri ŝia sort'; mi signon per okuloj vidis:  
Antaŭ jaro, dum festo, servistaro sidis,  
Trinkante el potegoj da miel' julia,  
Kiam: klak'! ni rigardas, el tegmento falas  
Du maljunaj paseroj viraj, kaj batalas: 360  
Iom pl! juna havis grizan subgorĝajon,  
Dua nigran: tra l' korto iĝis lukt' furia,  
Kaj renversad', ke ambaŭ fosigis polvajon.  
Ni rigardas, dum flustris servistaro nia:  
Nigra estu Horeŝko, Soplico — alia;  
Oni kriis, dum supre estis la grizulo:  
Vivu Soplico! fi al Horeŝko, timulo!  
Kaj se li falis, tiam: Rebonigu, frato!  
Ĉar honto por nobelo cedi al magnato!  
Ni ridas kaj atendas venkon de rivalo; 370  
Tiam Zonjon pro birdoj kortuŝis kompato;  
Ŝi saltis, kavalirojn kovris per manplato;  
Sed eĉ en man' ne ĉesis plum-ŝira batalo,  
Tia estis, en tiuj etuloj, furio.

Virinoj, rigardante, flustris pri Zofio,  
Ke kredeble destino estas de l' knabino,  
Malpacajn familiojn pacigi en fino.  
Hodiaŭ plenumiĝis omeno; sed vere,  
Ke tiam oni pensis pri Grafo prefere,  
Ne pri Tade.“

Ŝlosisto pri tio respondis: 380  
„Estas strangaj aferoj, kiu ĉion sondis?  
Mi diros pri afero, ne, kiel omeno,  
Mirakla, malfacila tamen por kompreno.

Mi antaŭe Soplicojn droniĝus kolere  
 Ĉiujn, sed ĉi knabeton, Tadeon, mi vere  
 De infaneco lia treege ekŝatis!  
 Ĉar, kiam sin bubetoj kun li, taŭze batis,  
 Li venkadis; do kiam li kuris kastelon,  
 Mi, instige, tuj montras malfacilan celon;  
 Ĉio al li prosperis: kolombojn detiri 390  
 El turo, aŭ la viskon sur kverko forŝiri,  
 Grimpi, al kornik'-nesto sur pino, por rabo,  
 Li scipovis; do pensis mi: naskiĝis knabo,  
 Domaĝe ke Soplica, sub feliĉa stelo!  
 Kiu dirus: li estos mastro de kastelo,  
 Edzinigos Zofion, mian Moŝt-Estrinon!“

Ili finis, medite trinkas miel-vinon,  
 Kaj aŭdiĝas nur iam de vortoj ripeto:  
 „Jes, jes, mia Gervazo, — jes, jes, Protazeto.“

Ĉe pordo-sojlo, fenestro estis kuireja 400  
 Malfermita: eliĝis fum' kvazaŭ bruleja,  
 Ĝis el fumo-volvajoj, laŭ blank-kolombeto,  
 Ekbrilis kuirestra, lumanta ĉapeto:  
 Super aĝuloj-kapojn sin Vojski silente  
 Elŝovis kaj aŭskultis parolojn atente,  
 Fine al ili donis, sur eta tas-plado  
 Biskvitojn, parolante: „Manĝu ĉe trinkado,  
 Kaj mi al vi rakontos sciindan egale  
 Disputon, finiĝotan eble sang-batale,  
 Kiam, en Nalibokaj arbaroj, dum ĉaso, 410  
 Rejtan faris petolon al duko de Nasso.  
 Ĉi petolon li pagis preskaŭ sano-koste,  
 Kaj, kiel mi pacigis, vi aŭdos tuj poste...“  
 Sed rakonton trarompis kuiristoj-veno  
 Kun demand': kiu tablojn kovru por festeno?

Vojski foriris; ĉerpis mielon aĝuloj  
 Kaj medite ĝardenon vagis per okuloj,  
 Kie kun fraŭlineto staris bel-ulano.  
 Ĵus, preninte maneton per maldekstra mano,  
 (Dekstran, laŭ vid' vunditan, tol-bandaĝo ligis), 420

Li, al fraŭlin', per tiaj vortoj sin aŭdigis:  
 „Zofi', vi nepre devas al mi diri tion;  
 Antaŭ ŝanĝo de ringoj mi havu la scion.  
 Malgrave, ke dum vintro pasinta vi pretis  
 Doni vorton; mi tiam la vorton ne petis:  
 Ĉar kion do valoras vort', eldevigite?  
 En Soplicov' mi estis mallonge vizite;  
 Kaj mi ne estas vanta, havi iluzion,  
 Ke mi unu-rigarde vekis simpation.  
 Mi, ne fanfaronulo, volis nur pretendi  
 Merititan favoron, eĉ longe atendi.  
 Nun vi bonvolas vian vorton ree diri...  
 Per kio ĉi favoron mi sciis akiri?  
 Eble min Zonjo prenas, ne el kor-inklino,  
 Sed, ĉar tiel konsilas onklo kaj onklino?  
 Zonjo, edziĝ'-afero estas grava tree!  
 Konsultu propran koron, nenium obee:  
 Nek de onklo minacojn, nek onklin'-inspirojn;  
 Se vi al mi korsentas nur bonajn dezirojn,  
 Ni povas fianĉiĝi, sed iam estonte;  
 Vin ligi mi ne volas, atendos volonte,  
 Nenio urĝas; krome, hieraŭ komando  
 Min lasis regimenta instruktor' en lando,  
 Ĝis miajn vundojn ree sanigos ĉarpio.  
 Do kion, kara Zonjo?“

430

440

Kaj Zonjo je tio  
 Levis kapon, rigardis honteme kaj diris:  
 „Mi ne memoras bone, kio antaŭiris;  
 Mi scias nur, ke estis pri tio parolo,  
 Ke mi kun vi edziĝu: mi, ĉiam al volo  
 Ĉiela kaj zorganta, cedas.“ Ĉi-momente  
 Ŝi mallevis okulojn, por diri korsente:  
 „Kiam mortis la pastro Vermo, dum teruris  
 Nokta tempest', mi vidis, ke vi forveturis  
 Pro ni malĝoje: viajn okulojn vualis  
 Larmoj, kiuj, mi diru, mian koron falis;  
 Ke vi, sinjor', min ŝatas, mi tiam ekfidis;  
 Kaj poste, por sukceso via, kiomfoje  
 Mi preĝis, ĉiam staris vi same, malĝoje  
 Antaŭ mi, kaj du grandajn bril-larmojn mi vidis.

450



Poste Ĉambelanino al Vilno vojiris  
 Kaj, por vintro, kunprenis min; sed mi sopiris 460  
 Al Soplicovo, ankaŭ al tiu ĉambreto,  
 Kie okazis nia renkont', ĉe tableto,  
 Kaj adiaŭo. Ial via memorajo,  
 Simile al aŭtuna legomo-semajo,  
 En mia kor', dum tuta vintro, kreskis bele,  
 Ke, kiel mi parolis, mi ĉiam sopiris  
 Al la ĉambret', kaj io al mi flustre-diris,  
 Ke mi vin tie trovos — okazis tiele.  
 Tion pensante, havis mi ofte en buŝo,  
 Dum karnavalo vian nomon, Tedeuŝo; 470  
 Do, ke mi enamiĝis, fraŭlinetoj diris.  
 Se tiel estis, koron mian vi akiris.“  
 Tade', pri tia pruvo de amo kontente,  
 Ekpremis ŝian brakon, kaj ili silente  
 El ĝardeno eliris al tiu ĉambreto,  
 Kie, antaŭ dek jaroj, loĝis Tadeeto.

Tie Rejento gatis nun; en bel-ornamo,  
 Kiel fianĉo, servis li al sia „damo“,  
 Kurante, transdonante, ringojn kaj ĉenetojn;  
 Cilindrojn, boteletojn, pulvorojn, muŝetojn; 480  
 Li rigardis triumfe, gaje fianĉinon,  
 Kiu, sidante, faris tualetto-finon,  
 Kaj en spegul' konsultis diojn de gracio.  
 Ĉambristinoj, kun frizo-ferajoj, dum tio  
 Refreŝigas ringaron de harplektoj ŝiaj;  
 Genuo, ĉe falbaloj, laboras aliaj.

Kiam Rejenton distris ĉi-tiu laboro,  
 Kuiristeto frapis fenestron: leporo!  
 Lepor', el salikaro, trakuris herbejon  
 Kaj saltis en ĝardenen, inter legomejon, 490  
 Tie sidas; facile estos fortimigi  
 Ĝin kaj apud barilo vertragojn instigi.  
 Asesor' per gvidilo sian Falkon tiras;  
 Rejent' Stumpulon vokas, rapide postiras.  
 Vojski ilin kun hundoj lokas sur postenon,  
 Kaj mem, kun muŝklakilo, iras en ĝardenon,  
 Piede-frapas, fajfas, klakas, timigante;

Instigantoj, vertragojn ĉe rimen' tenante,  
 Montras lokon, leporo elsaltos el kie,  
 Kaj lip-ŝmacas; orelojn streĉinte, vertragoj 500  
 Levis buŝojn al vento kaj tremas pasie,  
 Kiel metitaj, unu tendenon, du sagoj.  
 Vojski kriis: „Pel!“ Saltis best' el post bariloj  
 Herbejon; hundoj sekvas; tuj Falko, Stumpulo,  
 Sen turniĝo, jetiĝis kune al grizulo  
 El ambaŭ flankoj, kiel du birdo-flugiloj,  
 Kaj dentoj kiel ungojn en dorson enpremis.  
 Lepor', laŭ nov-naskito, malĝoje ekĝemis!  
 Instigantoj alkuras: ĝi kuŝas jam morte,  
 Hundoj taŭzas sub ventro blank-hararon forte. 510

Instigantoj glatumis hundojn, Vojski tiris  
 El-ĉe zon' tranĉileton ĉasistan kaj diris,  
 Detranĉante saltilojn: „Hundetoj favoron  
 Ĝuos egale, saman akirinte gloron,  
 Egalis rapideco, egalis kur-spaco;  
 Indas Pac la palacon, kaj Pacon palaco,<sup>1)</sup>  
 Sinjoroj indas hundojn, kaj sinjorojn hundoj;  
 Finiĝis long-disputo en kelkaj sekundoj;  
 Mi, kiun vet-juĝanto vi faris inkline,  
 Eldonas fin-verdikton: ambaŭ gajnis fine; 520  
 La vetajoj revenas: al ĉiu — la sia;  
 Vi subskribu konsenton.“ Post invoko tia  
 Instigantoj heligis vizaĝojn kontente,  
 Long-disigitajn manojn kunigis konsente.

Rejent' diris: „Mi vetis pri ĉeval', jungaĵo;  
 Mi ankaŭ garantiis per ofic'-skribajo,  
 Ke al Juĝisto mian ringon mi deponas.  
 Veto-garantiaĵon oni ne redonas.  
 Ringon akceptu moŝto Vojski por memoro;

<sup>1)</sup> Pola proverbo, signifanta, ke ambaŭ estas egalvaloraĵ. — Generalo Pac konstruigis, en fino de l' XVIII-a jarcento, en sia bieno Jezno (en nuna Vilna gubernio) proksime de l' urbo Troki grandiozan palacon, kiu fariĝis proverba. — Dum tramarŝo de la Napoleona armeo en la Paca palaco ekloĝis tuta regimento. — Alia palaco de Pac troviĝas en Varsovio ĉe strato Miodova.

Sur ĝi gravuru sian nomon la sinjoro, 530  
 Aŭ Hreĉelĉajn blazono-ornamojn laŭ volo;  
 Oro estas altprova, glata karneolo.  
 Ĉevalon nun forprenis ulanoj, rajduloj;  
 Restis jungaĵo; nomas ĝin ĉiuj konuloj;  
 Oportuna, daŭrema, belludilo vera:  
 Selet' mallarĝa, turko-kozak'-maniera;  
 En antaŭparto brilas ŝtonaro juvela,  
 Sidon sternas silk-ŝtofa kuseneto bela;  
 Sur sel-arkon saltinte, sur lanug'-molaĵo  
 Vi sidas oportune, kvazaŭ sur litajo. 540  
 Kaj kiam vi galopas — (Rejento Bolesto,  
 Kiu, sciante, estis ŝatanto de gesto,  
 Disigis krurojn, kvazaŭ sur selon saltante,  
 Poste kvazaŭ galopis, balancet-iĝante) —  
 Kaj kiam vi galopas, tiam ĉabraketo  
 Helbrilas, kvazaŭ gutus or' el ĉevaleta,  
 Ĉar sel-pendaĵoj estas ore-aspergitaĵaj,  
 Kaj arĝent'-piedingoĵ larĝaj — orumitaĵaj;  
 Sur buŝpeco-rimenoĵ, sur kolbrid'-duonoĵ  
 Briletas perlamota vico da butonoĵ; 550  
 Kaj ĉe brustumo pendas Leliva blazono,  
 Tio estas novluno. Ĉi jung-specialo,  
 Konkirita (laŭ famo) en Podhaje'-batalo <sup>1)</sup>  
 El iu grava, turka, nobela persono,  
 Pruvu al Aŝesoro pri estimo mia.“

Kaj Aŝesoro, gaje pro donaco tia:  
 „Mi de princo Sanguŝko iaman donajon  
 Vet-garantiis, mian belan hund-kolajon,  
 Lacert-lede kovritan kun ringoj el oro,  
 Kaj silk-teksan gvidilon, kies art-laboro 560  
 Egale kara, kiel ŝton' lumanta brile.  
 Miaj infanoĵ devis ĉi-tion heredi...  
 Edziĝante, mi idojn esperas posedi;  
 Sed ĉi aĵon, Rejento, mi petas humile,  
 Favor-prenu por via jungaĵo tre kara  
 Kaj memore de nia disputo longjara,

<sup>1)</sup> Ĉe Podhaje (en Galicio) estis kelke da bataloj  
 kun Turkoj kaj Tataroj; ne estas sciante, pri kiu batalo la  
 Rejento parolas.

Kiun finis, por ambaŭ ni, tiu momento  
Honore. Ree floru inter ni konsento.“  
Ili revenis domon anonci ĉe-table:  
Ke Falk', Stumpul', disputon finis tre agrable. 570

Estis famo, ke Vojski edukis en domo  
Leporon, kaj ĝin lasis kaŝe en legomo,  
Por pacigi disputon facil-maniere.  
Aĝul' ĉi-artifikon faris tre mistere,  
Ke tutan Soplicovon li trompis prospere.  
Kuirist' post kelk jaroj tion kaŝ-parolis,  
Asesoron, Rejenton, reinstigi volis;  
Sed li vane pri hundoj semis kalumnion:  
Vojski neis, neniu do kredis ĉi-tion.

Jam gastoj, kolektite en kastela halo, 580  
Ĉe tablo kunparolis antaŭ fest-regalo.  
Juĝist', en vojevoda uniform', dum tio  
Eniris; kune venis Tade' kaj Zofio.  
Per man' maldekstra kapon tuŝante, Tadeo  
Salutadis soldate ĉefojn de l' armeo;  
Kaj Zofio, rigardon al ter' mallevente,  
Per riverenc' salutis gastojn, roziĝante;  
(Bel-riverenci Zonjon instruis onklino).  
Sur kap' kroneton havis ŝi, laŭ fianĉino;  
Ĉetere sama vesto, en kiu Zofio 590  
Metis printempan garbon al Patrino de Dio.  
Ŝi rikoltis nov-garbon da flora herbaro:  
Per unu man' ŝi donas florojn al gastaro,  
Dua sur kap' ĝustmetas brilan falĉileton;  
Ĉefoj prenis herbflorojn, kisanter maneton,  
Kaj ŝi reriverencis, honte-rozigite.

Ĉef' Knjazjeviĉ je brakoj ŝin prenis subite  
Kaj metis patran kison sur frunton Zofian,  
Kaj, levinte knabinon, sur tablo star-lokis;  
Tiam ĉiuj manplaŭde: Jen brave! ekvokis, 600  
Admirante belegan knabinon gracion,  
Kaj ravite de ŝia litva vest' vulgara:  
Ĉar, por ĉefoj, post vivo vaganta, multjara  
En fremdaj landoj, havis strangajn ĉarmojn tia,  
Delonge nevidita, simpla vest' nacia,

Kiu rememorigis ilin pri juneco  
 Kaj malnovaj amajoj. Do, kun kortuŝeco,  
 Ili ĉirkaŭis tablon, rigardis scivole:  
 Tiuj petas, ke frunton ŝi levu bonvole,  
 Montru okulojn; tiuj, ke Zonjo ĉirkaŭe 610  
 Turniĝu; ŝi turniĝas, sed, kiel antaŭe,  
 Kovras per man' okulojn. Tadeo atente  
 Ŝin rigardis kaj manojn kunfrotis kontente.

Ĉu la robeton iu konsilis prudente,  
 Ĉu instinkte ŝi sciis (ĉar knabin' divenas  
 Ĉiam instinkte, kio al ŝi bel-konvenas,  
 Sed, unue dum vivo, Zonjon en mateno,  
 Pro obstinec' insultis onklin' Telimeno:  
 Zonjo kun plor' rezistis al mod-ornamajo;  
 Oni ŝin devis lasi en simpla vestajo. 620

Ŝi havis longan, blankan jupeton el tolo,  
 Robeton verd-kamlotan, kun roz-borderaĵo;  
 Verda, per roz-rubandoj laĉita, korsaĵo  
 Multstrie ŝin ĉirkaŭis de sino ĝis kolo;  
 Sube brust', laŭ burĝonoj sub foli' kaŝitaj.  
 Blankaj ĉemiz'-manikoj sur brakoj sin movas,  
 Kiel por flug' iletojn papili' plenblovas;  
 Ĉe man', krispajoj estas per ruband' streĉitaj.  
 Ĉirkaŭ kolo, mallarĝa kolumet' ĉemiza,  
 Kun roz-ligila nodo; el kerno ĉeriza 630  
 Orel-ringetoj: ilin cizelis tre arte  
 Sak Dobjinski, kaj tial fieris aparte.  
 (Tie estis du koroj, kun sago, flameto,  
 Kiujn Sak, svatiĝante, donis al Zonjeto).  
 Sur kolum' du ŝnuretoj pendas da sukceso;  
 Sur tempioj — kroneto el verd-rosmareno;  
 Harlig'-rubandojn Zonjo sur la ŝultrojn jetis:  
 Kaj, falĉistin'-kutime, sur frunton ŝi metis  
 Rikoltilon, de freŝa herb-tranĉado brilan,  
 Al novluno, sur frunto Diana, similan. 640

Ĉiuj aplaŭdas. Iu oficir' eligis  
 Paperujon el poŝo, paperon pretiĝis,  
 Krajonon pintiĝinte, en buŝ' malsekiĝis,

Rigardas Zonjon, skizas. Apenaŭ krajonon  
Vidis Juĝist', rekonis desegnist'-personon,  
Kvankam lin kolonela vesto aliigis:  
Riĉegaj epoletoj, mieno ulana,  
Lipharoj nigritaj, barbeto hispana.  
Juĝisto diris: „Grafa moŝto, kia farto?  
Eĉ en ŝarguj' vi havas ilojn por pentr-arto!“  
Efektive, jen Grafo ekzercis talenton;  
Juna soldat', sed havis li grandegan renton,  
Proprakoste ekipis rajdist'-regimenton,  
En unua batalo tuj firme ekstaris:  
Do lin imperiestro kolonelo faris;  
La Juĝisto salutis Grafon, gratulante;  
Sed Grafo ne aŭskultis, plue desegnante.

650

Dume eniris dua gefianĉoj-paro:  
Asesor', de Francestro, kaj iam de caro  
Servisto, ĝendarmaran nun komandis vicon,  
Kvankam de dudek horoj nur havis oficon,  
Li prenis uniformon bluan kun fald-zonoj  
Polaj, trenis kurb-sabron kaj tintis per spronoj.  
Flanke, per grava paŝo, iris amatino  
Tre bel-vestita: Teklo, Hreĉeĥa filino;  
Ĉar Asesor' delonge lasis Telimenon:  
Al koketin' volante pliigi ĉagrenon,  
Al Vojskidin' turniĝis li kun kor-inklino.  
Fraŭlino ne tro juna, laŭ dir', kelkdekjara,  
Sed persono solida, mastrino memstara  
Kaj dothava: vilaĝon belan ŝi heredis,  
Kaj, aldone, monsumon de Juĝist' posedis.

660

670

Trian paron longtempe oni van-atendas.  
Juĝist', malpacience, servistojn elsendas;  
Ili revenas, sed ne gvidas paron trian:  
Rejento, ĉe leporo, perdis ringon sian,  
Serĉas en herbo; lia fianĉino sidas  
En la tualetejo; kvankam ŝi rapidas  
Kaj kvankam servantinoj ŝin helpas akcele,  
Tualeton ŝi povis fini neniele;  
Por kvara hor' ŝi estos pene pretigita.

680

## LIBRO XII.

---

### NI AMU NIN.

Lasta festeno malnove-pola. — Ĉef-servico. — Klarigo de ĝiaj figuroj. — Ĝiaj movoj. — Dombrovski ricevas donacon. — Ankoraŭ pri Fendilo. — Knjazjeviĉ ricevas donacon. — Unua ofica akto de Tadeo ĉe posedopreno de l' heredajo. — Rimarkoj de Gervazo. — Koncerto super koncertoj. — Polonezo. — Ni amu nin.

Fine hal-pordo estis krake malfermita:

Vojski, en ĉap', eniras kun kapo levita,  
Ne salutas, ĉe tablo mem lokon ne prenas;  
Ĉar Vojski nun en nova karaktero venas:  
Korteg'-marŝalo, majstro li ceremonia,  
Per bastono, la signo de ofico sia,  
Montras al ĉiuj lokojn, sidigas laŭ vico:  
Unue, laŭ plej grava vojevod'-ofico,  
Honoran lokon prenis Marŝal' Ĉambelano,  
Veluran apog-seĝon kun ebur'-ĉemano; 10  
Apude, dekstraflanke, general' Dombrovski,  
Kaj maldekstre Knjazjeviĉ, Pac kaj Maĵahovski;  
Meze Ĉambelanino, plue oficiroj,  
Sinjorinoj, sinjoroj, nobelaro; viroj  
Kaj virinoj alterne pare prenas vice  
Sidlokojn, kien Vojski indikas ofice.

Juĝisto kapokline forlasis festenon;  
Li, sur korto, regalas kampular'-kunvenon,

Kolektitan, ĉe tablo longega, ĉirkaŭe,  
Mem sidigis ĉe fino, al prepost' kontraŭe. 20  
Tade', Zofi', mem lokojn ĉe tablo ne prenis,  
Regalante popolon, dum manĝo promenis;  
Estis antikva moro, ke nov-hereduloj,  
Ĉe unua festeno, servis al kampuloj.

Dume gastoj, en halo manĝojn atendante,  
Rigardis grand-servicon sur tablo, mirante,  
Kies metal', laboro, egale tre karaj:  
Princo Radzivil-Orfo<sup>1)</sup> ĝin, laŭ tradicio,  
Ordonis iam fari en urb' Venecio  
Kaj bel-ornamis pole laŭ planoj memstaraj. 30  
Servic', dum sved-milito, el princa kastelo,  
lavoje transiris domon de nobelo,  
El trezorej' prenite, okupis de tablo  
Mezon, en form' de rado karosa sur stablo.

Servico, plenverŝite de fund' ĝis randlokoj  
Per ŝaŭmoj, sukerajoj, blankaj laŭ neĝ-flokoj,  
Ŝajnis vintra pejzaĝo, bone imitita:  
Meze nigris grandega arbaro konfita,  
Flanke domoj: vilaĝoj kaj nobelejetoj,  
Kovritaj, kvazaŭ prujne, per suker'-ŝaŭmetoj; 40  
Por servico-ornamo, ĉe anguloj randaj,  
Staras, el porcelano, personoj negrandaj,  
En polaj vestoj, kvazaŭ, dum scena prezento,  
Aktoroj partoprenas en ia evento;  
Gest' ilia — laŭarta, koloroj konvenaj,  
Mankas voĉo, cetere kvazaŭ vivoplenaj.

Kion ili prezentas? la gastoj scivolas.  
Vojski levas bastonon kaj tiel parolas:  
(Dume, antaŭ manĝado, oni donis brandon) —  
„Por respondi de Moŝtaj Sinjoroj demandon: 50

---

<sup>1)</sup> Princo Mikołaj Krzysztof Radziwiłł, nomata Sierotka (Orfeto), Vilna starosto, kortega marŝalo litva, edukite en kalvina religio, transiris al katolika eklezio, faris vojaĝon en la Sanktan Landon kaj priskribis ĝin en aparto verko; li mortis en j. 1616.



Ĉi personoj, starantaj amase aŭ solaj,  
Prezentas historion de seĝmetoj polaj:  
Konsiliĝon, voĉdonon, triumfon, ĉagrenon,  
Kiel mi, diveninte mem, klarigos scenon.

„Jen dekstre—multenombra nobeloj-kunveno:  
Antaŭ seĝmet' petitaj gastoj al festeno;  
Tabl' atendas kovrite; neniu sidiĝas,  
Ĉiuj en amasetoj interkonsiliĝas.  
Jen, en ĉiu areto, meze vir' lokita:  
Laŭ levitaj palpebroj, buŝo malfermita 60  
Kaj malkvietaj brakoj — parolanto ia  
Fingre ion klarigas sur manplato sia.  
Parolantoj proponas siajn kandidatojn,  
Mienoj de nobeloj montras rezultatojn.

„En dua amaseto aŭskultas nobeloj,  
Manojn ĉe zon' metinte, per atent-oreloj;  
Tiu tordas lipharojn, ĉe orelo tenas  
Manon, kaj ŝajne vortojn bon-memori penas;  
Parolanto, vidante efikon, kontentas,  
Glatiĝas poŝon, tie globetojn jam sentas. 70

„Sed en tria areto okazas alie:  
Parolant' aŭskultantojn zon-tenas ĉi-tie;  
Sed ili elŝiriĝas, orelojn retiras;  
Jen, kiel aŭskultanto kolere blov-spiras!  
Levis manojn, minacas kvazaŭ parolanton,  
Ke ŝtopos lian buŝon, ŝajne laŭdokanton  
Aŭdis pri kandidato, kontraŭulo sia.  
Jen dua klinis frunton, laŭ virbovo ia,  
Vi dirus; parolanton sur kornojn li prenas;  
Aliaj kaptas sabrojn aŭ forkuri penas.

„Inter aretoj staras kvieta nobelo, 80  
Videble senpartia, en anim'-ŝancelo,  
Duboj-plene, ne scias, kiel voĉi devas?  
Do, por demandi sorton, grand-fingrojn li levas,  
Fermis okulojn, ungon al ungo cel-gvidas:  
Al kabalo videble voĉon li konfidas;

Se fingroj trafos, donos li afirmativon,<sup>1)</sup>  
Kontraŭokaze, jetos sian negativon.

„Maldekstre dua sceno: monaĥej'-manĝejo  
Al nobelaro servas kiel kunvenejo.  
Pliiĝaj vice sidas, staras plijunuloj 90  
Kaj scivole, trans kapoj, rigardas okazon:  
Marŝal' en mezo staras, mane-levas vazon,  
Kalkulas voĉojn antaŭ avidaj okuloj.  
Ĝus li elskuis lastan; vokistoj manlevis,  
Anoncas nomon, kiu oficon ricevis.

Unu vir', dum komuna konsent', malkvietas;  
El kuirej'-fenestro kapon li elmetas,  
Larĝ-apertis okulojn, rigardojn disjetas,  
Buŝon malfermis, kvazaŭ ĉiujn manĝi pretas;  
Vi devenas, ke: Vetol...<sup>2)</sup> kriis ĉi nobelo. 100  
Vidu, kiel, ĉe tiu instig' al kverelo,  
Ĉiuj al kuirejo premiĝas el halo,  
Eligiĝis sabrojn; certe eksplodos batalo.

„Sed jen, maljuna pastro, tra la koridoro,  
Alvenas en ornato: li estas prioro,  
Kiu la Piejsanktajon portas el altaro;  
Knabo, en mes-ĉemizo, tintas: cedas aro,  
Kaŝas sabrojn, kruc-signas sin kaj genuiĝas;  
Kie armilo sonas, pastro alturniĝas;  
Ĉe lia ven' silentas, paciĝas rankoroj. 110

„Aĥ! tion ne memoras vi, junaj sinjoroj!  
Inter ar' malkvieta, armita, nobela,  
Ne ekzistis bezono de polic' iela:  
Dum floris kredo, leĝoj-estimo en koro,

<sup>1)</sup> Doni afirmativon, voĉdoni por iu; doni negativon, voĉdoni kontraŭ iu.

<sup>2)</sup> Veto, vorto latina, signifas: mi ne permesas. Ĉiu pola sendito havis rajton, se li ne aprobis la rezolucion de la seĝmo, diri: „veto“ kaj tiamaniere interrompi la parlamentan kunvenon. Ĉi-tiun rajton, la simbolon de persona plej alta libereco, dum tre longa tempo kuraĝis uzi neniu sendito. Fine, kiam la moroj malboniĝis, la rajto estis ofte abuza de anarĥiaj elementoj; do ĝin forigis la Konstitucio de la tria Majo 1791. Komparu rimarkon<sup>2)</sup> sur paĝo 43.

Estis libero, ordo, bonhavo kaj gloro!  
Laŭ dir', en alilandoj estas, ĉe registoj,  
Ĝendarmoj kaj konstabloj, <sup>1)</sup> divers-policistoj;  
Sed, kie sole sabro gardas sendanĝeron,  
Mi ne kredas, ke ĝuas ĉi landoj liberon.\*

Tabakujon tintigis Ĉambelan' sinjoro 120  
Kaj diris: „Vojski, lasu moŝt', por posta horo  
Ĉi historiojn. Ili interesas vere;  
Sed ni malsatas, manĝojn portigu prefere.\*

Tiam Vojski, bastonon ĝis al tero klinas:  
„Ekscelenc', vi permesu favore, mi finas  
Tuj de niaj sejmetoj polaj lastan scenon:  
Nova marŝal' forlasas triumfe kunvenon  
Sur partianoj-brakoj. Oni ĝoj-radias,  
Ĵetas ĉapojn, malfermis buŝojn: vivu! krias.  
Kaj tie, duaflanke, sinjor' rifuzita, 130  
Tut-sola, ĉapon premas al frunto medita.  
Edzino, antaŭ domo, rezulton divenas...  
Vee! sur ĉambristino-brakoj ŝi eksvenas  
Malfeliĉa! nomota Ekscelenc' ŝi estis,  
Kaj ree, por tri jaroj, sen titolo restis!\*

Vojski finis priskribon, por signo eltiris  
Bastonon; tuj lakeoj po paroj eniris,  
Portante manĝojn: barĉon, reĝa ĉenomitan,  
Rosolon <sup>2)</sup> malnov-polan, arte kuiritan,  
En kiun sinjor' Vojski, laŭ strangaj sekretoj, 140  
Enjetis monopecon, kelkon da perletoj —  
Sang-purigas, fortigas sanon supo tia.  
Plu — kiu diros nomojn de manĝar' alia!  
Kiu scias pri tiuj nun jam ne konataj,  
Ĉi pladoj da kontuzoj, arkasoj gelataj, <sup>3)</sup>  
Moru'-ingrediencoj, farĉoj, fegateloj,

1) Gardistoj de publika sendanĝereco.

2) Viandsupo, buljono.

3) Kontuzo, speco de kolbaso, mortadelo; — arkaso, gelato el kremo kaj ovoflavo; — fegatelo (ital.), hepatherbo, hepataĵo; — Dunajec, rivero, dekstra alfluo al Vistulo en Galicio; — veneca, Venecia.

Cibetoj, moskateloj, dragantoj, pruneloj;  
Ĉi fiŝoj: salmoj sekaj, salmoj dunajecaj,  
Huzoj, kaj kaviaroj turkaj kaj venecaj,  
Kap-ezokoj, uln-longaj ezokoj mez-pecaj, 150  
Pleŭronektoj, grand-karpoj, karmo delikata,  
Kaj kuirist'-sekreto: fiŝo netranĉata,  
Fritita ĉe la kapo, mez-pece rostita,  
Kaj ĉe vosto, kun saŭco, ragu' alfarita!

Gastoj eĉ ne demandis pri nomoj de manĝo,  
Nek montris intereson pri sekret'-aranĝo,  
Ĉion kun apetito manĝis soldatara,  
Plenigante kalikojn per vino hungara.

Dume granda servico alikoloriĝis, <sup>1)</sup>  
Senigite de neĝo, jam tute verdiĝis; 160  
Malrapide fandiĝis, de varmo somera,  
La malpeza, glacia ŝaŭmeto sukera,  
Kaj aperis kaŝita fund' al okularo:  
Pejzaĝ' prezentis novan sezonon de jaro.  
Jen kolora printempo, verde ekbrilanta!  
Ĝermas divers-grejnaro, rapide kreskanta:  
Safran-flava tritiko movas spikon oran,  
Sekal' surmetis veston arĝento-koloran,  
Poligonon prezentas ĉokolad' artplene,  
Piro- kaj pomo-arboj floras laŭ-ĝardene. 170

Gastoj, somer-donacojn rigardante ĝue,  
Vane petas, ke Vojski ilin montru plue:  
Servico, laŭ planeda nepra turn-reveno,  
Ŝanĝas sezonon: ore pentrita la greno,  
Preninte ĉambro-varmon, malrapid-fandiĝas;  
Jam flaviĝis la herboj, folioj ruĝiĝas,

1) En la XVI-a kaj en komenco de l' XVII-a centjaro, en epoko de florantaj artoj, estis aranĝataj, eĉ de artistoj, festenoj plenaj de simboloj kaj teatraj scenoj. Dum fama festeno, donita en Romo por la papo Leono X-a (1513—21), troviĝis servico, prezentanta laŭvice la kvar jaro-sezonojn, kiu verŝajne servis kiel modelo por la Radziŭilla. La tablo-kutimoj aliiĝis en Eŭropo ĉirkaŭ la mezo de l' XVIII-a centjaro; en Polujo ili daŭris plej longe (M.).

Falas, vi dirus: vento blovetas aŭtune.  
Fine, antaŭmomente verdaj arboj, nune,  
Kvazaŭ en ventoj, prujnoj, ŝiriĝis ornamo,  
Staras nudaj: bastonoj restis de cinamo, 180  
Aŭ laŭro-folietoj, ŝajniĝintaj pino,  
Kiun, laŭ pingloj, vestis grajnoj de kumino.

Gastoj, trinkantaj vinon, komencis ŝireti  
Branĉojn, trunkojn, radikojn kaj ilin mordeti.  
Pan Vojski ĉirkaŭiris servicon kelkfoje,  
Rigardante la gastojn triumfe kaj ĝoje.

Henrik Dombrovski, ŝajne kun miro tre granda  
Diris: „Vojski, jen estis ombraro ĥinlanda?  
Ĉu helpis vin Pinetti<sup>1)</sup> kun diabloj siaj?  
Ĝis nun en Litvo estas servicoj ĉi-tiaj? 190  
Ĉiuj festenas laŭ la malnova kutimo?  
Diru, ĉar mi tut-vivon pasigis trans limo“.

Vojski diris kapline: „Ekscelenco via,  
Generalo! ne estas tio art' malpia!  
Sed sole memorajo de festenoj famaj,  
Kiujn donis sinjoroj en domoj iamaj,  
Kiam feliĉ', potenco, en Polujo regis!  
Priskribon en ĉi-tiu libreĝo mi legis.  
Vi demandas, ĉu restis ĉie moro tia?  
Domaĝe! disvastiĝas jam modo alia, 200  
Jam sinjoridoj krias: ni luksojn ne faras,  
Kaj ili manĝon, trinkon al gastoj avaras,  
Avaras hungarvinon, kaj trinkas satanan,  
Falsan vinon laŭmodan, moskvan kaj ĉampanan,  
Poste, kartlude perdas tiom da dukatoj,  
Ke por ili festenus cent nobeloj-fratoj..  
Eĉ (kio koron premas, mi diros sincere,  
Ĉambelano ĉi-tion ne prenu kolere),  
Dum mi, el trezorejo, eligis servicon,  
Eĉ Ĉambelano mokis min kaj ĉi kapricon! 210  
Dirante, ke maŝino, laŭ malnova stilo,

<sup>1)</sup> Pinetti, italo, jonglisto fama en tuta Polujo; kiam li tie gastis ne estas sciata.

Tempo-prena, simila al infan'-ludilo,  
Ne konvenas por viroj tiel eminentaj!  
Kaj Juĝist': ke enuos gastoj malkontentaj;  
Kaj tamen mi konkludas el sinjora diro,  
Ke tio estas arto inda de admiro!  
Mi ne scias, ĉu estos bon-okazo nova,  
Havi tiajn dignulojn en dom' Soplicova:  
Mi vidas, ke festenojn konas Generalo;  
Li akceptu ĉi libron pri festa regalo!  
Ĝi taŭgos al vi bone, ĉe festen'-dispono  
Por monarĥaro, nu, eĉ por Napoleono.  
Sed permesu, sinjoro, mi antaŭ-dediĉe,  
Diru, kiel mi libron akiris feliĉe.“

220

Ekster pordo levigis bruo, sonas voko  
De multaj voĉoj: „Vivu Surpreĝeja Koko!“  
Ar' puŝiĝas en halon, Mateo front-iras;  
Juĝisto lin al tablo je mano altiras  
Kaj lokas alte, inter armea ĉefaro:  
„Sinjor' Mate', li diras, malbona najbaro!  
Vi venas tre malfrue, preskaŭ post tagmanĝo.“  
„Mi manĝas frue, diris Dobjinski, por manĝo  
Mi ne venis, alĝvidis min sciemo mia,  
Rigardi deproksime al arme' nacia.  
Multo estus direbla — jen strangajo ia!  
Min vidinte, altiris per fort' nobelaro;  
Vi min ĉe tabl' sidigas — mi dankas, najbaro.“  
Li renversis, por montri, ke manĝi ne volis,  
Teleron fund-al-supre, kaj plu ne parolis.

230

„Sinjor' Dobjinski, diris Dombrovski, do sama  
Vi estas, la sabristo Koscjuŝka, la fama  
Mateo Vergo! konas mi vin laŭ la gloro.  
Ĝis nun vi estas vigla, fortika sinjoro!  
Kiom da jaroj pasis! jen, mi maljuniĝis;  
Jen ankaŭ ĉe Knjazjeviĉ hararo griziĝis:  
Vi kun junuloj povus lukti kavalire,  
Kaj vergo, kiel iam floradas; laŭdire  
Antaŭnelonge rusoj sentis vergo-batojn.  
Mi tre dezirus vidi ankaŭ viajn fratojn,

240

Vidi de ĉi-Fendiloj, Raziloj, eksterojn, 250  
De malnova Litvujo lastajn ekzemplerojn.“

„Generalo! post venko — Juĝisto ekdiris —  
Preskaŭ ĉiuj Dobjinskij en Duklandon iris  
Rifuĝe, por aliĝi al pol-legiono!“  
„Vere — respondis juna ĉef' de eskadrono —  
En mia kompanio estas timigilo  
Liphara, la serĝento Dobjinski-Verŝilo,  
Kaj Mazuroj lin urso litvana titolas;  
Ni lin vokos, se tion Generalo volas.“  
Kaj leŭtenanto diris: „Mi konas soldaton, 260  
Devenantan el Litvo, Razilo nomaton,  
Kaj dua kun tromblono rajdas ĉe flankiroj; <sup>1)</sup>  
En ĉasist'-regimento estas grenadiroj  
Du Dobjinskij.“

— „Sed volus mi pri ĉef' ilia  
Scii, diris Dombrovski, pri tiu Fendulo,  
Pri kiu mirrakontis Vojski, moŝto via,  
Kvazaŭ pri antikveca iu grandegulo.“  
„Fendilo, diris Vojski, li ne ekziliĝis,  
Sed juĝ-esploron moskvan timante, kaŝiĝis;  
Mizerul', dum tut-vintro, en arbaroj niaj 270  
Vaginte, ĵus eliris. En militaj tiaj  
Tempoj, li povus taŭĝi, kavalir'! domaĝo  
Nur, ke iom li estas premata de aĝo.  
Sed, jen li!“

Vojski geston al vestiblo faris:  
Servistoj, kampularo, plenŝtopite, staris  
Ĉi-tie; super kapoj, brilanta kalvaĵo,  
Simila al plenluno, aperis subite,  
Trifoje eliĝante el kapoj-nubajo:  
Ŝlosisto klinsalutis; el amas' puŝite,  
Li diris:

---

<sup>1)</sup> Tromblono, pafilo kun larĝa elflug-tubo; flankiroj, rajdista taĉmento, disigita laŭ reguloj kaj destinita por atentado kaj maltrankviligo de l' malamiko, ankaŭ por ŝirmado de l' ĉefa taĉmento antaŭ la malamikaj pafoj.

„Kron-Hetmano! Ekscelenc'! laŭ volo: 280  
 Generalo! — ne gravas ĉi-tie titolo —  
 Jen mi, Rembajlo, venas laŭ alvoko via,  
 Kun plum-fendilo, kiu, ne pro kadro sia,  
 Nek pro surskriboj, sed pro hardo gajnis gloron,  
 Ke famo eĉ atingis Ekscelenc'-sinjoron.  
 Se ŝtal' paroli sciuz, ĝi rakontus plior:  
 Por laŭdo de maljunaj brakoj dirus ion,  
 Kiuj servis fidele, longe, danke Dion,  
 Al Patrujo kaj ankaŭ Horeŝkoj sinjoroj,  
 Pri kio famo vivas ĝis nun en memoroj. 290  
 Moŝtet'! malofte tiel lerte tranĉ-pintigis  
 Skribisto plumojn, kiel ĝi kapojn forigis.  
 Longe nombri! orelojn, nazojn, sen kalkulo!  
 Kaj estas ĉi fendilo nenie fendita,  
 Pri mortigista faro, sen ia makulo:  
 Nur duelo malkaŝa, aŭ batal' milita.  
 Foje nur! pacon donu al li Eternulo!  
 Ve! sendefendan homon forigis persono!  
 Sed, Dio min atestu, „pro publico bono“.

„Montru, diris Dombrovski, ridante sincere:  
 Plum-fendil'! ekzekuta glavego pli vere!“ 300  
 Kaj li rigardis grandan rapiron kun miro  
 Kaj al aliaj ĉefoj montris laŭ vic-iro.  
 Ĉiuj ĝin provis; pene iu oficiro  
 Povis levi rapiron al-supre. Laŭ diro,  
 Sole Dembiński <sup>1)</sup>, fama pro fortika mano,  
 Levus glavon; forestis ĉi-tiu kompano.  
 Nur eskadrona ĉefo, ĉeesta Dvernicki, <sup>2)</sup>  
 Ankaŭ peletonestro, leŭtenant' Rujicki,  
 Ĉi-tiun feran stangon eksvingi scipovis; 310  
 Tiel ĉiuj daŭrige siajn fortojn provis.

<sup>1)</sup> Dembiński Henryk, nask. 1781, generalo de pola armeo, partoprenis en Napoleonaj militoj, en pola nacia leviĝo 1830-31, kaj en hungara 1849, mort. 1864.

<sup>2)</sup> Dwernicki Józef, nask. 1779, servis en polaj legioj, partoprenis en rusa milito 1812, fariĝis generalo de pola armeo 1829 kaj batalis en naciaj vicoj 1830 — 1831, mort. 1857.

<sup>3)</sup> Różycki Samuel, ĉefo de tria bataliono.



Sed general' Knjazjeviĉ, pola kurlandano, 1)  
 Plej altekreska, pruvis plejforton en mano,  
 Kaptis rapiron, levis laŭ spado facile  
 Kaj super gastoj-kapojn svingis fulme-brile,  
 De pol-skerm-artifikoj farante konstaton:  
 Kruc-arton, muelilon, kurban, tranĉan baton,  
 Ŝtel-baton, kontraŭpunktojn, tempojn de terceto  
 Li prezentis, lerninte iam ĉe kadetoj.

Dum ridante li skermis, genue Sabrulo 320  
 Lin ekkaptis je kruroj, kaj kun larm-okulo  
 Post ĉiu turno ĝemis: „Bela, brava bato!  
 Generalo! ĉu estis vi konfederato?  
 Jen piko de Pulavski-j! 2) tiel ataketis  
 Dzjerjanovski! 3) de Sava 4) pik! Kiu ĝustmetis  
 Vian manon? Mateo Dobjinski? Jen, mia  
 Invento, diovere! sen memlaŭdo ia:  
 Jen tranĉ', konata sole en Sabrul'-ejeto,  
 Laŭ mia nom', nomata „bato de moŝteto“.  
 Do kiu vin instruis? estas mia hako! 4 330  
 Li leviĝis, skermiston ĉirkaŭi per brako.

„Nun mi mortos trankvile! Mi trovis kompanon,  
 Kiu karese-premos mian kar-infanon;  
 Tage-nokte el brusto eliĝis sopiro:  
 Post mia morto eble rustiĝos rapiro!  
 Ĝi tamen ne rustiĝos! Generalo! peton  
 Mi havas: vi forjetu tiun rostileton,  
 Fremdan spadeton; hontu nobelid' tielan  
 Bastoneton, kaj prenu vi sabron nobelan!

1) La generalo Kniaziewicz naskiĝis en Kurlando, kie loksidiĝis lia avo, transmigrante el Litvo. Pri liaj meritoj vidu rimarkojn sur p. 52 kaj 257.

2) Puławski (aŭ Pułaski) Józef, forminto de la Bara konfederacio (v. p. 157, rimarkon duan) en j. 1768, kaj ĉef-komandanto de l' armeo, havis du filojn: Franciskon, kiu pereis dum la konfederaciaj bataloj (1769) kaj Kazimiron, gloran heroon kaj bonegan komandanton, kiu pereis (1779) en la amerika milito pri sendependeco.

3) Dzierżanowski Michał, fama konfederato Bara.

4) Sawa, unu el plej bravaj armeestroj en la Bara konfederacio.

Ĉi fendilon mi metas ĉe viaj piedoj,  
Plejkarajon el miaj, en mondo, posedoj.  
Mi estis sen edzino, estis sen infano;  
Jen edzino kaj ido: mi el ĉirkaŭpreno  
Mia ĝin ne ellasis, de frua mateno  
Ĝis nokt' karesis; dormis ĝi ĉe mia mano;  
Kiam mi maljuniĝis, super lito mia  
Ĝi pendis, kvazaŭ super Jud', ordono Dia!  
Mi volis ĝin kuŝigi en tombon kun mano;  
Jen heredant'! — ĝi servu do al vi, Hetmano!“

340

General', duon-ride, duon-emocie,  
Diris: „Koleg', vi cedas jen al mi ĉi-tie  
Edzinon, idon; estos vi, dum resto viva,  
Tre sola, maljun-vidvo, orfo efektiva!  
Por kar-donac' mi donu rekompencan kian,  
Por dolĉigi orfecon kaj vidvecon vian?“  
„Ĉu mi estas Cibulski? <sup>1)</sup> — Ŝlosisto ekplendis —  
Kiu al rus', kartlude, edzinon forvendis,  
Kiel rakontas kanto. — Por mi — jam sufiĉe,  
Ke fendil', antaŭ mondo, rebrilos feliĉe  
En tia man'! — Nur havu, General', atenton,  
Kaj longan, etenditan, prenu pasamenton,  
Kaj haku ambaŭmane, de-maldekstr-orele,  
Tiam de kap' ĝis ventro vi tratranĉos bele.“

350

360

Generalo, preninte fendilon, ne povis  
Pro longeco ĝin porti; servistoj ĝin ŝovis  
En furgonon; pri sorto — divers-opinio;  
Neniu sciis certe tiam, nek post tio.

Dombrovski al Mateo diris: „Laŭ mieno,  
Kolego ne kontentas pro nia alveno?  
Silentas malserene? Do ne saltas koro,  
Kiam vi vidas aglojn el arĝento, oro?  
Dum veksignal' Koscjuŝka sonas al orelo?  
Mi pensis, Macjek estas bravuloj-modelo!

370

<sup>1)</sup> En Litvo estas konata plenda kanto pri sinjorino  
Cybulska, kiun la edzo kartlude malgajnis al moskvulo.

Se vi ne prenos sabron, ne saltos al selo,  
Vi gaje kun kolegoj trinkos en kastelo  
Sanon de Napoleon, de Poluj' esperojn!“

„Ha! rediris Mateo, mi vidas aferojn!  
Sed du agloj ne nestas kune, moŝt-sinjoro!  
Hetmano! tre malcertas de estroj favoro!  
Francestro — grand-heroo, sen long-vortoj iaj! 380  
Mi memoras: Pulavskij, bon-amikoj miaj,  
Diradis, rigardante moŝton Djumurian,<sup>1)</sup>  
Ke Polujo bezonas heroon nacian,  
Kiu estu nek franco, nek ital', sed polo,  
Do Jan aŭ Juzef, fine — eĉ Macjek, laŭ volo!  
Arme! laŭdire pola! sed fuzilieroj,  
Saperoj, grenadiroj kaj kanonieroj:  
En ĉi amas' aŭdiĝas da fremdaj titoloj  
Pli, ol polaj! Kaj tion-ĉi komprenu poloj?  
Ŝajne vi ankaŭ turkojn, tatarojn posedas, 390  
Eble skismanojn, kiuj eĉ Dion ne kredas:  
Ili vilaĝaninojn atakas, voj-baras  
Kaj priŝtelas pasantojn, preĝej-rabon faras!  
Francestro iras Moskvon! malproksime tio,  
Se Lia Moŝto vojon ekiris sen Dio!...  
Laŭ dir', jam episkopoj anatemon metis  
Sur lin; do...“ Macjek panon en supon trempetis  
Kaj, manĝante, en mezo de vort' eksilentis.

Ĉambelan' pri Matea parol' ne kontentis;  
Junular' ekmurmuris. Juĝist' malkomprenon 400  
Trarompis, anoncante fianĉ-par'-alvenon.

Jen alvenis Rejento: laŭ propra deklaro;  
Neniu lin rekonis. Ĝis nun pol-vestaro  
Lin ornamis; nun lia fianĉin' devigis  
Edz-kontrakte rezigni kontuŝon kaj zonan:<sup>2)</sup>

1) Dumouriez Klaŭdio Francisko, franca generalo; li partoprenis en la Bara konfederacio, kiun la franca registaro subtenis per monrimedoj kaj spertaj oficiroj.

2) La modo de alivestiĝado en francajn vestaĵojn disvastiĝis en polaj provincoj de j. 1800 ĝis 1812. La plej multaj junuloj alivestiĝis antaŭ edziĝo laŭ postulo de siaj fianĉinoj.

Do Rejent', vol-ne-vole, france sin vestigis.  
 Frako de li forprenis animo-duonon:  
 Li paŝas rekte, kvazaŭ glutinte bastonon;  
 Kiel gru', flank-rigardi eĉ timas Rejento;  
 Montras mien', en kia li estas turmento, 410  
 Ne scias, kien igi la manojn ĉe l' jako,  
 Li, gest-ŝatinto! manojn post zonon metante —  
 Mankas zon' — sin glatumis sole sur stomako;  
 Li rimarkis eraron; kankre ruĝiĝante,  
 Ambaŭ manojn li kaŝis en poŝon de frako.  
 Li pasas kvazaŭ vergojn, inter mokantaro,  
 Hontas pro frako, kvazaŭ pro malinda faro,  
 Ĝis li ekvidis Maĉkon kaj ekstremis time:

Ĝis nun Mateo vivis kun Rejent' intime,  
 Nun rigardis lin tiel akre kaj sovaĝe, 420  
 Ke Rejent', fariĝinte tut-pala vizaĝe,  
 Butonumi komencis sin, pensante time,  
 Ke Macjek vestojn rabos per rigard' insulta.  
 Dobjinski nur dufoje diris laŭte: „Stulta!“  
 Sed terure indignis pro Rejenta vesto,  
 Ĉar li forlasis tablon sen adiaŭ-gesto,  
 Kaj, eliĝinte, rajdis al hejmo nobela.

Kaj dume, de l' Rejento amatino bela,  
 Telimen', siajn ĉarmojn etendas kun brilo  
 De vesto, ĉiuparte laŭ plej moda stilo. 430  
 Kian robon ŝi havis, kian kap-ornamon,  
 Vane la plumo penus priskribi la damon.  
 Eble penik' nur pentrus ĉi tulojn, ptifenojn,<sup>1)</sup>  
 Tiujn punktojn, kaŝmirojn, perlojn kaj rubenojn,  
 Roz-vizaĝon, vivecon de rigard'-jetado.

Tuj rekonis ŝin Grafo. Pale de mirado  
 Li leviĝis kaj serĉis ĉirkaŭ si pri spado:  
 „Do estas vi! li vokis, ĉu trompas okulo?  
 Vi! ĉe mi, premas manon de alia ulo?  
 Malfidela estajo! anim' nekonstanta!  
 Ĉu sub teron ne kaŝos sin frunto hontanta? 440

<sup>1)</sup> Speco de muslino.

Vi tiel freŝan juron vian tut-forgesis?  
Fidemul'! ĉi rubandon porti mi ne ĉesis!  
Sed ve! rivalon, kiu, por insulta faro,  
Nur tra mia kadavro paŝos al altaro!\*

Rejent' tre konfuziĝis, gastoj jam ne ridas,  
Ĉambelano rivalojn pacigi rapidas;  
Sed flank-preninte Grafon, flustris fianĉino:  
„Ankoraŭ mi ne estas Rejenta edzino;  
Se vi malhelpas, diru en tia okazo,  
Respondu tuj mallonge, Graf', sen ĉirkaŭfrazo: 450  
Ĉu vi ĝisnune amas min, sensanĝa-kore,  
Ĉu vi kun mi edziĝi pretas tuj, ĉi-hore,  
Hodiaŭ? mi rifuzos tiam al Rejento.“  
Grafo diris: „Virino, kun enigma sento!  
Antaŭe vi, en sentoj, estis poezia;  
Kaj nun al mi vi ŝajnas esti proza tia!  
Kio estas edziĝoj viaj? ili ĉenas  
Nur manojn; sed spiritojn ĉu ili katenas?  
Kredu: estas deklaroj, sen amo-konfeso;  
Estas devoj, sen ia deviĝa promeso! 460  
Sur du finoj de tero, du koroj ardantaj,  
Kunparolas, laŭ steloj radie tremantaj...  
Eble pro tio tero rapidas al suno,  
Kaj ĉiam tiel kara ĝi estas al luno,  
Ke ili sin rigardas, plejmallonga-voje  
Kuras al si — sed trafas sin neniujfoje!“  
„Sufiĉe! ŝi trarompis, — laŭ Dia favoro,  
Mi ne estas planedo, sed virin', sinjoro!  
Mi scias reston, ĉesu babiladon vian!  
Mi avertas: se pepos vi vorteton ian, 470  
Por rompi la edziĝon, tiam, dio-vere,  
Mi, kun ĉi-tiuj ungoj, alsaltos kolere  
Kaj...“ „Mi ne malpacigos la ge-feliĉulojn!“  
Diris Graf', kaj fortunis malŝate okulojn,  
Kaj, por puni malindan sian amatinon,  
Flama-kore elektis Ĉambelanidinon.

Vojski junulojn ree pacigi intencis  
Per saĝ-ekzemploj: tial rakonti komencis

Historion pri apro, Naliboka ĉaso,  
Kaj kverelon de Rejtan kun duko de Nassou.<sup>1)</sup> 480  
Sed gastoj, glaciajon manĝinte, senpere  
Iris el halo korton, freŝiĝi aere.

Kampuloj tie trinkas, post festen', mielon;  
Muzikistoj agordas por dancoj kapelon.  
Oni serĉas Tadeon, kiu flanke staris  
Kaj ion al estonta edzino deklaris:

„Zofi! mi vin konsultu, afero tre gravas;  
Mi demandis jam onklon, konsenton mi havas.  
Vi scias, ke vilaĝojn mi nun ekposedas,  
Kiujn leĝe, grav-parte, vi ankaŭ heredas. 490  
Servut'-kampuloj estas sub regeco via:  
Mi ne kuraĝus agi sen estrin' ilia.  
Nun, kiam nov-ekfloras kar-Patrujo nia,  
Ĉu kampuloj profitu nur el ŝanĝo tia,  
Ke ili nun ricevos alian sinjoron?  
Vere, ili regate, ĝuas estr-favoron;  
Post mia morto povus sin ŝanĝi reguloj:  
Mi soldatas, ni ambaŭ estas mortemuloj;  
Mi estas homo, timas mem propran humoron;  
Do, pli certe, rezignos mi mian regecon, 500  
Kaj fordonos kampulojn sub leĝo-zorgecon.  
Mem liberaj, ni faru al kampul' liberon,  
En heredecon donu posedatan teron,  
Sur kiu li naskiĝis, sin labor'-ŝvitigas,

1) La historio pri disputo de Rejtan kun duko de Nassou, kiun Vojski ne rakontas ĝis fino, estas konata el la tradicio. Ni donas ĉi-tiun finon, por kontentigi la sciemon de legantoj: Rejtan, kolerigite pro fanfaronado de la duko de Nassou, stariĝis apud li en mallarĝa trairejo. Ĝuste tiam grandega virapro, furiozigite de pafado kaj hundaro, ĉi-tien al-kuris. Rejtan elŝiras pafilon el manoj de duko, sian pafilon li jetas teren, kaj kaptinte jetponardegon kaj transdonante duan ekzempleron al la germana duko: „Nun, li diris, ni viduos, kiu pli bone svingas lancon.“ La apro jam atakis, kiam Vojski Hreczecha, staranta defore, per celtrafa pafado la beston mortigis. La sinjoroj komence koleris; poste ili inter-paciĝis kaj rekompencis malavare Hreczecha'n. (Rimarko de l' poeto),

Kaj el kiu li nutras ĉiujn kaj riĉigas.  
Sed mi devas averti vin: el grundo resta,  
Malpli-enspez' devigos nin al viv' modesta.  
Mi kutimis jam ŝpari de juneco mia,  
Sed, Zofio, vi estas magnat'-familia,  
En ĉefurb' vi pasigis vian junan aĝon: 510  
Ĉu, for de l' mond', vi volos ekloĝi vilaĝon,  
Nobeline?..."

Modeste respondis Zofia:

„Mi — virino, regado ne estas do mia.  
Vi estos mia edzo; por konsil', sinjoro,  
Mi—junas, sed aranĝon konsentas el koro!  
Se vi, liberigante, malpli riĉa restos,  
Al mia kor', Tadeo, vi plikara estos;  
Famili' nekonata min ne interesis;  
Mi, malriĉa orfino, memori ne ĉesis,  
Ke de Sopl'icoj estis mi filin-igita, 520  
Ĉe ili edukita, al edzo donita.  
Vilaĝon mi ne timas. En urb' infan-aĝon  
Pasintan mi forgesis, kaj ŝatas vilaĝon.  
Kredu al mi, ke miaj kokoj, kokinetoj,  
Min ĉiam pli amuzis, ol ĉi Petr-urbetoj.  
Urbo min enuigas; al homoj, distrajoj,  
Se iam mi sopiris, estis infanaĵoj.  
En Vilno min konvinkis vintro pasigita,  
Ke por vilaĝa vivo mi estas naskita:  
Dum baloj mi sopiris al dom' Sopl'icana, 530  
Kaj laboron ne timas junulino sana.  
Mi jam ŝlosilojn portas, trotetas utile;  
Vi vidos, ke mastrumon mi lernos facile!“

Kiam Zonjo ĉi lastajn parolojn eldiris,

Gervazo malsere, mirante, aliris:  
„Jam de Juĝist' mi aŭdis pri libero tuton!  
Sed mi ne scias, kiel ĝi tuŝas servuton?  
Mi timas, tio estos fremd-modo! Libero  
Ja ne estas kampula, sed nobel'-afero!  
Vere, ke ni devenas ĉiuj de Adamo: 540  
Sed mi aŭdis, kampuloj devenas de Ĥamo,  
La judoj de Jafeto, nobeloj de Semo,

Do ni, pli aĝaj, regas ambaŭn, jen sistemo!  
 Nu, alie instruas prepost' Soplicova...  
 Li diras: tio estis Testament' Malnova,  
 Sed, kiam Krist', devene reĝo multe-pova,  
 Inter judoj naskiĝis, en kampula stalo,  
 Li jam pacigis ĉiujn klasojn per egalo. —  
 Estu tiel, se esti ne povas alio!  
 Precipe, ke mi aŭdas: Ekscelenc' Zofio, 550  
 Mia Estrino, ankaŭ konsentas pri ĉio.  
 Mi obeu, jam regas ŝia opinio.  
 Nur averto: liberon havu kampularo,  
 Ne vanan, vortan, kiel dum rego de caro,  
 Kiam moŝt' Karp kampulojn siajn liberigis,  
 Kaj car-impost' trioble ilin malsatigis.<sup>1)</sup>  
 Mi konsilas: kampulojn, laŭ molnova moro,  
 Ni nobeligu, donu al ili blazonojn;  
 Estrin' al kelk vilaĝoj donos Kapr-duonojn,  
 Al aliaj Lelivojn Soplica sinjoro. 560  
 Tiam Sabrul' rikonos kampul'-egalecon,  
 Kiam kampul' ricevos blazon'-nobelean.  
 Sejm' konfirmos.

„Kaj edzo ne timu pro tio,  
 Ke lin tre malriĉigos grundoj-cedo: — Dio  
 Ne donos, ke manetojn de dignul'-filino  
 Trolacigu laboro de doma mastrino.  
 Estas rimed'. — Mi konas keston en kastelo,  
 Kun Horeŝka surtabla manĝilar', en kelo;  
 Krom tio estas ringoj, kanakoj, maneloj,<sup>2)</sup>

1) La rusa registaro ne rikonis liberajn homojn, krom nobeloj. Kampuloj, liberigitaj de l' posedanto, estis tuj enskribitaj en registrojn de caraj apanaĝaj bienoj, kaj anstataŭ servutajo devis pagi pligrandigitan imposton. Sciate estas, ke en j. 1818 la bienularo de la Vilna gubernio decidis dum sejmeto projekton, liberigi ĉiujn servutulojn kaj tiu-cele elektis delegitaron al la caro; sed la Registaro ordonis nenigi la projekton kaj neniam plu ĝin rememorigi. Ne ekzistis alia maniero liberigi homon, ol adopti lin al nobela familio. Tiamaniere nobeliĝis multaj dank' al sinjora favoro aŭ por pagita mono. (A. M.).

2) Kanako (tatar.), virina kol-ornamo, inkrustita per juveloj; — manelo, braceleto (france manille).



Riĉaj tufoj, jungaĵoj, belaj karabeloj. 570  
 Kion tere-kaŝita trezorej' entenas,  
 Herede al Estrino Zofi' apartenas;  
 Mi en kastel' ĝin gardis per atent-okuloj,  
 Kontraŭ moskvuloj, ankaŭ — Soplicoj moŝtuloj.  
 Krom tio, mia propra taler'-sako plenas:  
 El servo kaj sinjoraj donoj kolektita.  
 Mi pensis, kiam estos kastel' redonita,  
 Ĝiajn murojn ripari por ĉi-tiu mono;  
 Nun ĝi al nov-gemastroj taŭgos en bezono; —  
 Tial mi transloĝiĝos al Soplic' Sinjoro, 580  
 Kaj manĝos, ĉe l' Estrino, panon de favoro.  
 Ĉe lulil' de Horeŝka generaci' tria,  
 Mi skerm-ekzercos idon de l' Estrino mia,  
 Se estos fil' — li estos, ĉar sonas armiloj,  
 Kaj ĉiam, en milita temp', naskiĝas filoj.“

Apenaŭ lastajn vortojn eldiris Gervazo,  
 Kiam, per gravaj paŝoj, aliris Protazo,  
 Salutis, el kontuŝa poŝ' panegiregon  
 Trifolian eligis kaj komencis legon. 590  
 Juna suboficiro rime ĝin komponis:  
 Lin iam, en ĉefurbo, odoj fame-kronis,  
 Poste, en uniformo, plue beletristo  
 Faris versojn. — Jam tricent tralegis Vokisto,  
 Ĝis loko: „Ho vi, kies ĉarmoj vekas sentojn  
 De dolora ĝojeco kaj ĝuajn turmentojn!  
 Se Bellon'-vicon <sup>1)</sup> trafos rigard' via milda,  
 Rompiĝos jet-ponardoj, krevos lado ŝilda!  
 Per Himen' venku Marson, ĉe hidro kruela  
 De malpac', frunt-viperojn ŝiru mano bela!...“  
 Tadeo kaj Zofio manplaŭdis konstante, 600  
 Kvazaŭ laŭde, sed vere, aŭdi ne volante.  
 Pastro, laŭ vol' Juĝista, jam sur tablo staris  
 Kaj de Tade' liberon al popol' deklaris.

Apenaŭ ĝoj-novajon aŭdis vilaĝanoj,  
 Saltis al Sinjorido, al Estrino-manoj,

---

1) Bellona, ĉe antikvaj Romanoj diino de milito.

Ekkriante kun larmoj: „Gesinjoroj-sanon!“  
Tadeo kriis: „Sanon de kuncivitanoj,  
Liberaj kaj egalaj — Poloj!“ — „Popol'-sanon!“  
Diris Dombrovski; kriis popolo: „Hetmanoj,  
Arme', popolo, vivu! vivu ĉiuj klasoj!“ 610  
Alterne tondris voĉoj mil, kaj tintis glasoj.

Sole Buĥman ne ĝojis; li laŭdis projekton,  
Sed dezirus antaŭe malgrandan korekton:  
Oni faru laŭleĝe komisi'-elekton,  
Kiu —

Manko de tempo malhelpis, domaĝe,  
Plenumi, kion Buĥman konsilis tre saĝe;  
Sur kastel-korto staris jam pare estrinoj,  
Oficiroj, soldatoj kun vilaĝaninoj.  
Polonezon! ekkriis ĥore tut-publiko:  
Oficiroj alvenas kun arme'-muziko; 620  
Sed Juĝisto al Ĉefo flustris en orelon:  
„Ordonu moŝt' ankoraŭ haltigi kapelon.  
Sciante, fianĉiĝon festas nevo mia,  
Kaj ĉe ni malnov-moro regas familia,  
Ke kun vilaĝ-muziko solenojn ni festas.  
Violonist', fajfisto, cimbalist' jen estas,  
Bon-ludistoj; indignas jam violonisto  
Kaj kapkline petegas per okul' fajfisto:  
Se mi ilin forigos, ploros mizeruloj;  
Laŭ alia muziko ne saltas kampuloj; 630  
Do ĉi-tiu komencu; distriĝu popolo!  
Poste ni ĝuos vian muzikon laŭ volo.“

Violonist', manikon de l' vest' reŝovinte,  
Prenilon fort-kunpremis; mentonon metinte  
Ĉe apogil', kurigis arĉon laŭ ĉevalo.  
Sakfajfistoj, apude, je tiu signalo,  
Kvazaŭ flugil'-batante, ofte ŝultrojn movas,  
El aer-plenaj vangoj en sakojn spir-blovas;  
Vi pensus: en aeron forflugos la paro,

1) Boreas, ĉe antikvaj Grekoj, norda vento kaj ĝia personiĝo.

Simila al plenvanga Berea idaro. 1)  
Mankis cimbalo.

640

Multaj estis cimbalistoj,  
Sed ne kuraĝis ludi ĉe Jankjel ludistoj.  
(Jankjel, dum tuta vintro, for-estadis ie,  
Nun li, kun ĉefa stabo, aperis ĉi-tie).  
Sciante, ke neniu, sur ĉi instrumento,  
Egalas lin laŭ lerto, gusto kaj talento,  
Oni petas lin ludi, kun cimbal' aliras.  
Jud' rifuzas: ke manoj krudiĝis, li diras;  
Li forgesis, sin ĝenas, sinjorojn hontante;  
Kapkline li foriras. Zosja, ĝin vidante,  
Alkuras lin kaj donas, sur blanka manplato,  
Stangetojn, kiujn uzas majstr' en kordobato,  
Per dua, ŝi glatumas lin je barb' grizhara  
Kaj riverence diras: „Ludu, Jankjel kara!  
Ludu Jankjel, jen estas mia fianĉiĝo!  
Vi promesis ja ludi ĉe mia edziĝo?“

650

Jankjel Zonjon tre amis; do li, kun komplezo  
Barbon konsente klinas; gvidite al mezo,  
Li sidiĝas, cimbalon metas surgenue,  
Kaj rigardas ĝin tiel fiere kaj ĝue,  
Kiele veterano, ĉe servo- Alvoko,  
Kiam nepoj glavegon tiras el mur-hoko;  
Avo ridas: ĝin longe ne uzis kompano,  
Sed sentas, ke armilon lerte ŝvingos mano.

660

Ĉe cimbal' du lernantoj ekgenuas dume,  
Agordas nove kordojn, provas ilin zume;  
Jankjel, duonferminte okulojn, silentas,  
Kun senmovaj stangetoj en fingroj, atentas.

Li ekludis, per takto triumfa batante,  
Poste pli dense, kvazaŭ pluvege, hakante:  
Ĉiuj miras. — Li faris nur ludo-provetojn,  
Ĉar li haltis kaj supren levis du stangetojn.

670

Li ludas. Jam stangetoj tremas per ektuŝo,  
Kvazaŭ sonigus kordon flugilo de muŝo,

295

Mallaŭtan, pen-aŭdeblan zumon ĝi elsendas.  
Majstro ĉiel-rigardas, inspiron atendas.  
Li desupre cimbalon per okul' mezuris,  
Levis manojn, faligis; stangetoj ekkuris:  
Ekmiris la aŭdantoj. —

Jen, sonĝ kordara  
Ektondris, kvazaŭ tuta kapel' janiĉara,<sup>1)</sup> 680  
Kun ŝalmetoj, tintiloj, tambureto-sonoj;  
Tria-Maj'-polonezo bruas!...<sup>2)</sup> Saltaj tonoj  
Per ĝojo spiras; ĝojon aŭdosento ĝuas;  
Knabinoj volas danci, knaboj piedbruas;  
Sed maljunuloj revas pri pasinta dato,  
Pri jar' feliĉa, kiam senditoj, senato,  
Post tago Tria-Maja, en urbdoma halo,  
Reĝon naci'-konsentan festis per regalo,  
Kiam dancantoj kantis: „Vivu reĝo kara!  
Vivu Sejmo,<sup>3)</sup> Nacio la ĉiuklasara!“ 690

Majstro taktojn akcelas kaj tonojn fortigas;  
Ĵus, fals-akorde, sonas siblo de serpento,  
Aŭ grinc' de fer' sur vitro: ĉiujn frost' tremigas  
Kaj la ĝojon konfuzis terur'-antaŭsento.  
Malĝoje, timoplene, dubas aŭdantaro:  
Instrument'-falsagordo? muzikist'-eraro?  
Ne eraras la majstro! Li frapas intence  
Tiun perfidan kordon, melodi'-atence,  
Ĉiam pli laŭte taŭzas akordon koleran, 700  
Kontraŭ konkordo de la tonoj konfederan,  
Ĝis Ŝlosist', kompreninte de majstro kapricon,  
Kovris per man' vizaĝon sian, kaj terure  
Ekkriis: „Vel mi konas voĉon! Targovicon!“<sup>4)</sup>  
Kaj tuj, fajfante, krevis kord' malbon-aŭgure...

<sup>1)</sup> Janiĉara aŭ turka muziko distingiĝas per multaj tintantaj kaj tamburantaj instrumentoj.

<sup>2)</sup> La tria de Majo (1791), dato de la fama konstitucio bonege reforminta la regnon de Polujo. (Komparu rimarkon <sup>2)</sup> sur paĝo 43).

<sup>3)</sup> Pola parlamento.

<sup>4)</sup> Pri la ribela Targovica konfederacio legu rimarkon <sup>2)</sup> sur paĝo 43.

Majstro kuras al primoj, ŝiras takt-mezure,  
 Forlasas primojn, kuras stangetoj al basoj:  
 Aŭdiĝas mil' da ĉiam pli laŭtaj frakaso,  
 Marŝ-takt', milit', atako, sturm'! pafado!—Sonis  
 Infanoj-ĝem', patrinoj-plor'... Li tiel donis  
 Perfekte sturm-teruron, ke virinoj tremis,  
 Al si, kun larm' dolora, re-memorigante 710  
 Praga-masakron,<sup>1)</sup> — ploris ĝin rakontoj kante —  
 Kontentaj, ke li fine per kordoj ekĝemis,  
 Voĉojn sufokis, kvazaŭ en teron bat-premis.

Apenaŭ aŭdantaro eliris el miroj,  
 Ree muzik' alia: unue zum-spiroj,  
 Delikataj, mallaŭtaj; ĝemas kelk kordetoj,  
 Kiel muŝoj ŝiriĝas el arane'-retoj...  
 Sed kordoj plimultiĝas: Diskurintaj tonoj  
 Kuniĝas, sin akordaj ligas legionoj,  
 Kaj jam laŭtakte marŝas harmoniaj sonoj. 720  
 Formiĝas la malĝoja melodio kanta:  
 Pri soldato senhejma, tra l' arbar' vaganta,  
 Mizeron kaj malsaton ofte suferanta;  
 Li falas fine apud fidela ĉevalo,  
 Kiu por li la tombon fosas per huf-ŝtalo.  
 Kant' malnova, al pola arme' sonas kare!  
 Rekonis ĝin soldatoj, kolektiĝas are  
 Ĉirkaŭ majstro, aŭskultas, vidas rememore  
 La tempon, kiam apud Patruj'-tombo, plore 730  
 Ili kantis la kanton kaj en mondon iris,<sup>2)</sup>  
 Kaj poste multejara migrado sin tiris  
 Tra sabl' varmega, frosto, maroj, kontinentoj,  
 Kie ilin en tendo, inter fremdaj gentoj,  
 Ĝojjigis kaj kortuŝis ĉi kanto multfoje.  
 Medite, ili klinis la kapojn malĝoje,

<sup>1)</sup> Praga, antaŭurbo de Varsovio. En j. 1794 la rusa generalo Suvorov forbruligis ĝin kaj buĉis la tutan loĝantaron. Komparu rimarkon sur p. 21.

<sup>2)</sup> Post la tria dispartigo de Polujo (1795) polaj soldatoj elmigris el la patrujo kaj la generalo Dombrovski formis el ili la polajn legiojn, kiuj batalis heroe en diversaj landoj kaj terpartoj por Napoleono. Komparu rim. <sup>2)</sup> p. 32.

Sed baldaŭ ilin levis: tonojn majstr' altigas,  
 Streĉas, la taktojn ŝanĝas, alion sciigas.  
 Ree desupre kordojn li okul'-mezuris,  
 Kunigis ambaŭ manojn, stangetoj ekkuris:  
 Li batis tiel arte kaj tiel potence, 740  
 Ke kordoj eksonoris trumpetar'-parence,  
 Trumpetar'-blove kanton konatan rekreis,  
 Triumf'-marŝon: „Ankoraŭ Poluj' ne pereis! 1)  
 Marŝ', Dombrovski, Polujon!“ Kaj ĉiuj manplaŭdis,  
 Kaj ĉiuj „Marŝ', Dombrovski!“ tutĥiore aplaŭdis!

Muzikist' sian kanton kvazaŭ mem ekmiris:  
 Li faligis stangetojn, manojn supren-tiris;  
 Levita barbo grave flugpendis; el kapo  
 Defalis sur la ŝultrojn lia vulpa ĉapo.  
 Sur vangoj brilis rondoj de stranga ruĝeco, 750  
 En okul' spirit-plena, ardis la juneco.  
 Kiam sin al Dombrovski turnis maljunulo,  
 Larmoj el mankovrita ekfluis okulo:  
 „Generalo! li diris, longe Litvo nia  
 Vin atendadis, kiel ni Judoj Mesian...  
 Vin delonge profetis, al popol' fidela,  
 Kantistoj... vin miraklo 2) anoncis ĉiela...  
 Vivu, ho nia!...“ Ploris li dum la paro!o:  
 Jud' honesta Patrujon amis kiel Polo!  
 Dombrovŝki donis manon al li, dank-favore; 760  
 Li, ĉapon depreninte, kisis manon kore.

Polonezon komenci Ĉambelano iras:  
 Manikojn de l' kontuŝo 3) li iom retiras,  
 Donas manon al Zonjo, ektordas lipharon,  
 Kaj ĝentile invitas en unuan paron.  
 Post Ĉambelano vice la paroj ariĝas;  
 Signalvorto! li gvidas, danco komenciĝas:

Sur herbokovro brilas ruĝaj botoj hele,

1) Kanto de la legioj en Italujo; ĝi fariĝis poste kaj estas ĝis nun pola nacia himno. Komparu rimarkon sur p. 8.

2) Kometo en j. 1811. Komparu p. 183 v. 109 kaj pluajn.

3) Legu rimarkon sur p. 12.

Lumas or-teksa zono, fulmas karabele;<sup>1)</sup>  
 Li paŝas malrapide, kvazaŭ ne atentas, 770  
 Sed ĉiu paŝo, movo, fidele prezentas,  
 Kion ĵus la dancanto pripensas aŭ sentas.  
 Li haltis — por demandi sian sinjorinon;  
 Por flustri en orelon — li faras kapklinon;  
 Ŝi deturnas la kapon, aŭskulti sin ĝenas;  
 Li humile kliniĝas kaj ĉapon deprenas.  
 Ŝi favore rigardas, sed plue silentas;  
 Li malakcelas paŝon, rigardon atentas.  
 Kontente pri respondo, li dankas ekride,  
 Kaj, mokante rivalojn, paŝas pli rapide. 780  
 Sian ardeo-pluman, konfederan ĉapon<sup>2)</sup>  
 Li pendigis sur frunto, lerte skuis kapon  
 Kaj kovris ĝin deflanke, ektordis lipharon  
 Kaj paŝas, sekvigante envieman aron.  
 Li volus kun estrino foriĝi facile,  
 Do li haltas, kaj, manon levante ĝentile,  
 Ke oni preterpasu, petas plej humile.  
 Iam li lerte celas al flanko eliĝo,  
 Ŝanĝas vojon, por trompi aron de kunuloj;  
 Sed lin, rapidapaŝe, sekvas trudemuloj 790  
 Kaj ĉirkaŭe envolas per danca turniĝo;  
 Do li sur sabron metas la manon kolere,  
 Kvazaŭ: „Ve, enviuloj!“ li dirus fiere,  
 Kaj provoke li paŝas rekte en la aron:  
 Dancantoj ne kuraĝas pluan kontraŭstaron,  
 Cedas, kaj, batal-ordon formante alie,  
 Postkuras lin denove.

Krioj sonas ĉie:  
 „Ho, rigardu junuloj! Jen, vi eble vidas  
 La lastan, kiu tiel polonezon gvidas!“

Iris paroj post paroj, bruoplene, ĝoje; 800  
 La rondo sin distordas, kunvolvas refoje  
 En mil volvaĵojn, kiel serpento giganta;  
 Flagras diverskolore, kiel skvam' brilanta:

1) Karabelo, kurba sabro; komp. rim. p. 44.  
 2) Konfederatka, vidu rim. p. 141.

Belvestoj sinjorinaj, sinjoraj, soldataj,  
El orient' oritaj de suno-radioj,  
Kaj, de malhela herba fono, refleksataj.  
Bruas danco, muziko, plaŭdoj, vivukrioj!

Nur kaporal Dobjinski-Sak, li nek atentas  
La kapelon, nek dancas, nek li ĝojon sentas;  
Li staras malserene, manojn dorse-metis, 810  
Pensas, kiel li Zonjon iam svat-koketis:  
Por ŝi alportis florojn, el nestoj birdetojn,  
Faris orelo-ringojn kaj plektis korbetojn...  
Sendankulin'! Donacojn li vane oferis!  
Kvankam ŝi lin evitis, kaj patro koleris,  
Li tamen!... kiomfoje sur barilo sidis,  
Ĝis, fine, tra fenestroj, li Zonjon ekvidis.  
El kanab' li spionis, kiel ŝi bedaron  
Sarkis, kukumojn ŝiris, nutris kokidaron.  
Sendank'!... Li klinis kapon; fine, ekfajfinte 820  
Mazurkon, sur orelojn kaskedon preminte,  
Li foriris en tendon, al kanona gardo,  
Distriĝi kun soldatoj per karta hazardo,  
Kaj trinki el kaliko ĉagren'-dolĉiganta.  
Tiel estis, por Zonjo, Dobjinski konstanta.

Ŝi dancas gaje, kvankam en unua paro,  
Malproksime apenaŭ videbla al aro.  
Sur la herba vastajo, en verda robeto,  
Girlande-ornamita, en flora kroneto,  
Ŝi flugas, nevidebla, regas danc-turniron, 830  
Kiel anĝel' de noktaj steloj rondo-iron.  
Kie ŝi estas? diras okuloj turnitaj,  
Kaj brakoj, interprete, al ŝi etenditaj.  
Resti ĉe Zonjo, vane Ĉambelano celis:  
Jam lin, el gvido-paro, enviuloj pelis.  
La feliĉa Dombrovski ne longe ŝin gvidis:  
Li cedis ŝin al dua; tria alrapidis;  
Ankaŭ tiu foriris, same reŝovita;  
Ĝis, laŭvice, renkontis Zonjo lacigita  
Tadeuŝon: Do, pluan ŝanĝadon timante, 840  
Ŝi finis dancojn, resti jam kun li volante,  
Iris verŝi kalikojn ĉe tablo festena.



Suno subiras — varma vespero serena:

Per nubetoj sternita ie glob' ĉiela,  
Okcidente 'as roza, supre—bluehela.  
Belveteron aŭguras nubetoj: brilantaj,  
Malpezaj — kvazaŭ ŝafoj sur herbo dormantaj;  
Ie pli etaj — kiel sovaĝ-anasaro;  
Okcidente nubajo: tulkurtenoj-paro,  
Diafana, faldita, supre perle pura, 850  
Kun randoj orumitaj, kaj funde purpura,  
Ankoraŭ, per subira brilo, ardas vaste,  
Kaj poste iĝas flava, pala, griza laste. 1)  
Suno mallevis kapon, nubeton surtiris,  
Ekdormante, per varma aero ekspiris.

Nobelar' ĉiam trinkas; tondras vivukrio:

Napoleon, Ĉefestroj, Tadeo, Zofio!  
Vivu ĉiuj tri paroj, la fianĉigitaj!  
Ĝastaro ĉeestanta, ĉiuj invititaj!  
Amikoj, kiuj inter la vivantoj restas, 860  
Mortintoj, kiuj sankte-memorataj estas!...

Mi gastis kaj toastis tie kun aliaj;  
Kion mi vidis, aŭdis, libroj diras miaj.

---

1) La leganto, kiu rimarkis la intiman interligon, en kia la poeto prezentadas natur-aperaĵojn flanke de homaj aferoj, facile komprenos, ke la nubajo, tiel vaste pripentrita, ĉe l' fino de l' poemo, dum la granda festeno, ne estas nur okaza eksterajo, sed, ke ĝi havas por la tuta situacio simbolean signifon. La okcidenta nubajo, ekstere ornamita per oro kaj perloj, interne sange-ruĝa, malgraŭvole pensigas pri la granda okcidenta heroo Napoleon kaj pri la esperoj, kiujn Polujo ligis al lia nomo. Estas la j. 1812: La aŭreolo de lia nomo kaj la ĝojaj esperoj de la festenantoj same baldaŭ iĝos „flavaj, palaj, grizaj laste“, kiel la brilanta, preterpasema aperajo, post kiu la suno ekdormis. — Kiel antaŭe, en la vortoj de maljuna Maciek Dobrzyński (p. 287), la poeto kvazaŭ antaŭsentigas la grandan tragedion, kiu estis baldaŭ skuonta Litvon-Polujon kaj la tutan mondon.

Korekto. Sur paĝo 69 en v. 324 legu: karneola ŝalo (t. e. flavoruĝa).

## FRAGMENTOJ EL EPILOGO.

---

Kion mi, sur Pariza pavimo, meditas,  
Kiam mi la bruegon de l' urbo evitas?

Preterlasis mi, birdo de flugo malalta,  
Regionon de tondroj kaj pluvo senhalta,  
Kaj mi serĉis serenon de aĝo infana,  
Kaj mi serĉis trankvilon de hejmo kabana...

Sed pri sango, verŝita freŝe en patrujo,  
Pri larmoj, kiuj fluas en tuta Polujo,  
Pri ankoraŭ resoni ne ĉesinta gloro,  
Eĉ pensi ne kuraĝis mi en tia horo!  
Ĉar popol' iam estas en turmento tia,  
Ke rigardon turnante al martiro ĝia,  
Malespere eksvenas plej kuraĝa koro.

Al ni, en mondo gastoj, nepetita speco,  
En la tuta nuneco, tuta estonteco,  
Restis jam sole unu lando de konsolo,  
Kiu hodiaŭ havas feliĉon por polo:  
Lando de l' infaneco! restos por ĉiamo,  
Sankta kaj pura, kiel unua ekamo,  
Per eraroj-memoro neniam skuite,  
Per esper'-iluzio ne subefosite,  
Kaj per okazantajoj-torent' ne ŝanĝite.

Ho, se iam ĝisvivus mi konsol'-momenton:  
Ke tiuj libroj migru sub pajlo-tegmenton;  
Ke kampulinoj, kiuj turnas ŝpin-radetojn,  
Kiam ili amatajn kantas la strofetojn:  
Pri knabino, ŝatinta tiel violonon,  
Ke, ludante, ŝi perdis anseroj-duonon,  
Pri orfin', kiu bela, kiel roz-aŭroro,  
Iris hejmpeli birdojn en vespera horo —  
Ke en la manojn prenu kampulinoj polaj  
Ĉi librojn simplajn kiel kantetoj polaj!

---


TABELO DE ENHAVO.


ANTAUPAROLO . . . . .	P. I
LIBRO I. Mastrumado. Reveno de l' sinjorido.—Unua renkonto en chambreto, dua che la tablo.—De l' Jughisto grava instruo pri ghentileco.—De l' Chambelano politikaj rimarkoj pri modoj.—Komenco de disputo pri Stumpulo kaj Falko.—Plendoj de Vojski.—La lasta Vokisto de l' tribunalo.—Ekrigardo je la tiama politika stato en Litvo kaj Europo. . . . .	5
LIBRO II. Kastelo. Chaso kun vertragoj je observita leporo.—Gasto en kastelo.—Lasta el korteganoj rakontas historion de lasta el Horeshkoj.—Ekrigardo en frukto-ghardenon.—Knabino inter kukumoj.—Matenmangho.—Petersburga anekdoto de sinjorino Telimena.—Nova eksplodo de disputoj pri Stumpulo kaj Falko.—Interveno de Vermo.—Parolado de Vojski.—Veto.—Iru kolekti fungojn. . . . .	35
LIBRO III. Koketado. Ekskurso de Grafo en ghardenon.—La mistera nimfo pashtas anserojn.—Simileco de fungo-kolektado al promenado de elizeaj ombroj.—Specoj de fungoj.—Telimeno en la sanktejo de meditado.—Interkonsiligho pri la estonteco de Tadeo.—Grafo kiel pejzaghisto.—De Tadeo pentristaj rimarkoj pri arboj kaj nuboj.—De Grafo opinioj pri arto.—Sonorilo.—Bileto.—Urso, sinjoro! . . . . .	60
LIBRO IV. Diplomatio kaj Chaso. Aperajho en papilotoj vekas Tadeon.—Tro malfrua rimarko de l' eraro.—Drinkejo.—Emisario.—Lerta uzo de tabakujo turnas la diskuton sur ghustan vojon.—Pranestejo.—Urso.—Danghero de Tadeo kaj de l' Grafo.—Tri pafoj.—Disputo, pri pafiloj Sagalasa kaj Sangushka, decidita aprobé por la Horeshka unutubo.—Bigoso.—De Vojski rakonto, pri duelo inter Dovejko kaj Domejko, interrompita per instigo de hundoj kontrau leporo.—Fino de l' rakonto pri Dovejko kaj Domejko. . . . .	84
LIBRO V. Kverelo. Chasistaj planoj de Telimeno.—La ghardenistino, ironte en grandan mondon, auskultas instruojn de la zorgantino.—La pafistoj revenas.—Grando miro de Tadeo.—Refoja renkontigho en la Sanktejo de meditado kaj pacigho faciligita pere de formikoj.—Che la tablo komenceighas diskuto pri la chasado.—Rakonto de Vojski, pri Rejtan kaj la duko de Nassau, estas interrompita.—Komenco de pacaj traktatoj inter la partioj estas ankaŭ interrompita.—Aperajho kun shlosilo.—Kverelo.—Grafo kun Gervazo faras militan interkonsilighon. . . . .	115
LIBRO VI. Nobeletejo. Unuaj militaj movoj de l' invado.—Ekspedicio de Protazo.—Vermo kaj sinjoro Jughisto interkonsilighas pri publika afero.—Daurigo de la senefika ekspedicio de Protazo. —	


Chapitro pri kanabo.—Nobeletara sidejo Dobjhin.—Priskribo de la domajho kaj persono de Macjek Dobjhinski.	142
LIBRO VII. Interkonsilo. Savaj konsiloj de Bartek, nomata Pruso.—Soldata vocho de Macjek Baptisto.—Publika vocho de sinjoro Buhhman.—Jankjel konsilas al konkordo, kiuu Fendilo traranchas.—De Gervazo parolado, el kiu montrighas grandaj efikoj de seĵma elokventeco.—Protesto de maljuna Macjek.—Subita alveno de milita sukurso rompas interkonsilon.—Hejse, kontrau Soplicoj!	162
LIBRO VIII. Invado. Astronomio de Vojski.—Rimarko de Chambelano pri kometoj.—Mistera sceno en chambro de Jughisto.—Tadeo, volante lerte malimpliki sin, falas en grandajn embarasojn.—Nova Dido.—Invado.—Lasta vokista protestado.—Grafo konkiras Soplicovon.—Sturmo kaj bucho.—Gervazo kiel kelestro.—Invada festeno.	180
LIBRO IX. Batalo. Pri dangheroj, rezultantaj el senorda tendarejo.—Helpe neatendita.—Malgaja situacio de l' nobelaro.—Kvestula vizito estas antaŭdiro de savo.—Majoro Plut per troa koketeco turnas sur sin la tempeston.—Pafu el tercerolo signalas batalon.—Faroj de l' Aspergisto; faroj kaj dangheroj de Macjek.—Vershilo per insido savas Soplicovon.—Sukurso rajdistara; atako kontrau pied-irularo.—Faroj de Tadeo.—Duelo de chefoj, interrompita per perfido.—Vojski per decida manovro superpezigas le pesteleron de l' batalo.—Sangaj faroj de Gervazo.—Chambelano, grandanima venkinto.	204
LIBRO X. Emigracio. Jacek, Interkonsilo pri sendangherigo de l' sorto de venkintoj.—Intertraktado kun Rikov.—Adiaŭiro.—Grava malkaŝo.—Espero.	227
LIBRO XI. Jaro 1812. Printempaj augurajhoj.—Enmarŝo de armeoj.—Dioservo.—Ofica rehonorigo de sankt-memora Jacek Soplica.—El interparoloj de Gervazo kaj Protazo oni povas konkludi pri proksima fino de l' proceso.—Amindumoj de ulano kun knabino.—La disputo pri Stumpulo kaj Falko decidiĝhas.—Poste gastoj kolektighas al festeno.—Prezentado de gafianchoj al armeaj chefoj.	254
LIBRO XII. Ni amu nin. Lasta festeno malnove-pola.—Chef-servico.—Klarigo de ghiaj figuroj.—Ghiaj movoj.—Dombrovski ricevas donacon.—Ankorau pri Fendilo.—Knjazjevich ricevas donacon.—Unua ofica akto de Tadeo che posedopreno de l' heredajho.—Rimarkoj de Gervazo.—Koncerto super koncertoj.—Polonezo.—Ni amu nin.	275
FRAGMENTOJ EL EPILOGO	302



5-06 / Skrzyn









71614

BIBLIOTEKA  
NARODOWA